# Heleco

Presorgano de Astura Esperanto Asocio

Organo de Asociación Asturiana de Esperanto

Numero 99 Novembro - 2023



Heleco
Presorgano de Astura Esperanto Asocio
Organo de Asociación Asturiana de Esperanto
Numero 99 Novembro - 2023

**Astura Esperanta-Asocio**

Sidejo: Universitata Kampuso de Vieskes
GIJÓN (ASTURIO-HISPANIO)

Interret-paĝo: http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/

Retadresoj: easturias@telecable.es
mailto:esperanto@uica.info

**Astura Esperanta Asocio** estas esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la **Internacia Lingvo** unuavice en nia urbo, Gijón, kaj ankaŭ, leŭeble, en tiuj partoj de la Asturia regiono, kie ne ekzistas lokaj grupoj de **Esperanto**.

| Enhavo | Paĝo |
|---|---|
| Nia freneza mondo | 3-8 |
| Ĝis hodiaŭ mem | 9-12 |
| FELIPISMO | 13-31 |
| La regad-etapo de Aznar | 32-47 |
| Pluas la koruptado sub Zapatero | 48-63 |
| M. Rajoy: korupto kaj mensogoj | 64-96 |
| Korupto kaj politika malstabileco | 97-112 |
| La koruptaj regantoj agadas senhonte kaj fie ĉar ili scias ke nenio okazos | 113 |
| Sinodo de la Sinodeco: Marŝi kune, sed, kien? | 114-115 |
| La senlegitimigo kiel politika strategio | 116-117 |
| iomete da amuzado… sur fono de koruptado… | 118 |

La enhavo de la tekstoj de ĉi-tiu revuo ne esprimas oficialan opinion de **Astura Esperanta Asocio**: pri ili respondecas la verkintoj mem.

Leĝa Registro 0/319/85




La antaŭa numero de nia revuo aperis en junio de la pasinta jaro, 2022. Pasis, do unu jaro kaj duono kaj ni devas konstati, konsternite, ke la monda situacio ne pliboniĝis de tiam, sed ĝuste male. Tiam, kiam estis publikigita tiu 98-a numero de **Heleco** oni estis batalante en Ukrainio de antaŭ kelkaj monatoj. Nu, tiu milito ankoraŭ daŭras kaj oni ne antaŭvidas baldaŭan finon. Krom tiu konflikto, kaj aliaj pri kiuj oni ne informadas nin tiom amplekse, lasttempe estiĝis, kromanfoje, milita konflikto en Mezoriento inter la israela kaj la palestina gento. Plej grave estas tio ke ambaŭ militoj povas esti la signoj anoncantaj pli mondskalan konflikton, la Trian MondMiliton.

Ja, oni povas taksi kiel freneza la mondo en kiu tio okazas. Milito, interhoma perforto, estas nepra realaĵo de la tuta homa historio kaj sendube ankaŭ de ties prahistorio, estas kvazaŭ kronika malsano de nia homa specio. Kronika malsano sed, ĉu ankaŭ ne-kuracebla? Eble, eble estas en nia speca naturo io, kio inklinigas nin al perforto… La respondon al tiu demando ni lasas al la specialistoj pri la homa animo, ni ne estas psikologiistoj, sed eĉ ni rimarkas ke estas konkretaj situacioj kiuj naskas aŭ stimulas la homan konfliktemon, la perforton, la militon... Do ni povas analizi la konkretan historian kadron en kiu okazas la konfliktoj kiujn ni pritemas. Ni komencu pri la milito en Ukrainio.

En la fundo de ĉi tiu konflikto troviĝas la realaĵo de la "naciismo", la sento de aparteno al iu komunumo. Pro sia propra naturo la naciisma sento generas rifuzon al la universalismo, aŭ simple al enkonduko en pli ampleksan kolektivon. Foje pliintensigas la naciisman senton la fakto havi malsaman lingvon, religion, etnon, kulturon... ol la pli ampleksa politika ento en kiu oni estas enkadrigata. En la kazo de la konflikto rusi-ukrainia apenaŭ ekzistas tiutipaj diferencoj: rusoj kaj ukrainoj apartenas al la sama etno kaj kulturo, ili havas saman religion kaj la respektivaj lingvoj estas tre similaj, tre parencaj.

Do, ŝajnas ke la generado de naciismo estas pli facila ol supozite. Fakte, la interhoma perforto povas aperi eĉ pro etaj diferencoj; estas konataj la perfortaj kontraŭfrontiĝoj inter fanatikuloj de malsamaj futbal-taĉmentoj eĉ se ili apartenas al la sama regiono aŭ sama urbo. Sed ni povas flankenlasi la psikologian aspekton de la afero kiam ni konstatas ke malantaŭ ĉiu naciismo, ĉiu (nov)faŝisma senracieco kaj ĉiu prisporta fanatikeco troviĝas kalkulo, plano. La naciismo, la senracieco kaj la fanatikeco ne estas artefaritaĵoj, sed ties organizado jes. Tial ni povas analizi kaj priesplori kiujn interesojn stimulas kaj profitas la naciismon de Ukrainio, Katalunio k. a.

Oni ne povus kompreni la radikon de la rusi-ukrainia konflikto se oni ne konas ties organizintojn kaj profitantojn. Ja, la etna sento estas sufiĉe forta por stimuli kaj subteni naciismojn. Sed la etna sento estas konvene sufokata kiam tio interesas al la super-regantaj klasoj de la socio. Kiam al tiuj klasoj konvenas krei imperiojn, landojn... ili ne hezitas flankenlasi ĉiujn etnajn, rasajn, lingvajn, religiajn, kulturajn... diferencojn ekzistantajn inter la diversaj popoloj de la imperio. Ne estas hazardo tio ke la naciismoj floris ekde komence de la 19-a jarcento, la jarcento de la romantikismo. Kio okazis? La dominantaj klasoj bezonis fortan ŝtatan povon por krei armeojn kapablajn konkeri



**La freneza homaro militas laŭlonge de la tuta homa historio kaj sendube ankaŭ de ties prahistorio**

koloniojn, por enkonduki industrion, por garantii la posedrajton de la posedantoj… Sed venas la momento kiam tiuj fortaj ŝtataj povoj iĝas vera ĝeno por la posedantoj. La ŝtatregantoj havas la fian kutimon postuli pagadon de impostoj. En iuj kazoj la regantoj de la ŝtato insolente leĝdonas por limigi la profiton de la kapital-investoj kaj malpermesi la fluon de kapitaloj, establi sociajn servojn pri saneco, instruado, loĝado, pensioj... Eĉ okazis ke iuj ŝtatoj celis establi egalecon inter la civitanoj… netolereble!

Do, tiuj dominantaj klasoj devis elpensi alitipan socian sistemon en kiu la ŝtataj aŭtoritatoj sin limigus al la certigado de la socia ordo por ebligi la produktadon sed lasante la ekonomian demarŝadon al la veraj spertuloj pri ekonomio, t. e. ili mem. La nova sistemo nomiĝas "globaliĝo" kaj "tutmondiĝo". Ties ĉefa karakterizaĵo estas ke la kapitalo kaj ties fluo restas for de la kontrolo de la ŝtatoj kaj ties aŭtoritatoj. La kapital-posedantoj povas investi laŭvole tie kie ili povus atingi plian profiton; tio permesas al ili ĉantaĝi la landajn regantarojn.

Kaj jen ĉi tie aperas la vera rolo de la naciismo. Ekde ĝia apero, komence la 19-a jarcento, tiu romantika doktrino furoris tie, kaj nur tie, kie tio konvenis al la dominantaj klasoj. Kompreneble, oni devis subteni la koloniistajn kaj postkoloniistajn imperiojn kiel eble plej, kaj tio postulas potencajn ŝtatojn kun fortaj armeoj. Do, ne esperu naciistan mobiliziĝon en Kalifornio aŭ alia usona ŝtato en la nunaj cirkonstancoj, sed ĝi tuj aperos tie se tio konvenos al la mastroj de la sistemo.

Nu, nun ni povas interpreti la aferon de la Ukrainia milito. Al la usona imperiismo konvenas malfortigi egan potencon kia Rusio. Ukrainio estas nur unu inter la kelkaj naciismoj generitaj, impulsitaj kaj apogitaj de la imperiismo en la periferio de Rusujo. Saman celon havas la enkonduko en la NATO-n de landoj apudaj al Rusujo, kiuj iam eĉ apartenis al la sovetfavora Varsovia Kontrakto, kaj aliaj kiaj Svedio kaj Finnlando, tradicie neŭtralaj.

Sed atentu, la afero estas pli komplika. Ankaŭ la popolaj fortoj kiuj mobiliziĝas en Rusio favore al ***Putin*** kaj ĉi ties politiko agadas, eĉ se senscie, favore al la planoj de la dominantaj klasoj de la tutmonda kapitalismo. ***Putin*** kaj ties partianaro estas kreaĵo de tiu tutmonda kapitalismo. Strange, tiuj du malamikoj kiuj interbatalas, Rusio kaj Ukrainio, fakte, kaj pro la fakto mem ke ili militas, agantas favore al la planoj de la imperiismo, vera malamiko de la homaro.

La popola frenezo aŭ stulteco estas la grundo kiun kultivas, por eltiri frukton, tiuj mastroj de la mondo, la dominantoj de la sistemo. Tion oni konstatas ankaŭ en Okcidenta Eŭropo. La implikiĝo de la tieaj landoj en la NATO kondukis ilin al ties ruiniĝa partopreno en la konflikto de Ukranio. La komercaj rilatoj de Eŭropa Unio kun Rusio estis interrompitaj, la

gasoduktoj estis detruitaj, kaj la landoj de Okcidenta Europo devas elspezi monon por provizi armilaron al Ukrainio.
Notindas ke, same kiel Rusio, Eŭropa Unio estas ega potenco kies malfortiĝo estas interesa por la usona imperiismo. La BREXIT-operacio por la eliĝo de Britio el Eŭropa Unio, kaj la potencigo de naciismoj kiel tiuj de Eŭskio, Katalunio, Korsiko, Skotlando, Galegio, Flandrio… havas saman celon: malfortigi la landajn registarojn en ties rilato kun la kontrolantoj kaj demarŝantoj de la kapitalo kaj ĉi ties fluado kaj investado.
Sed la bildo ne estus kompleta se ni ne aldonus ke ankaŭ la popolaj mobilizoj kontraŭ tiuj naciismoj estas iniciato kaj ilo de la samaj dominantoj ene de la strategio de premado sur la landaj regantaroj. Ni rimarku ke ĉi-kaze temas pri amasoj da faŝism-tipaj sencerbuloj, t. e. politikaj fortoj pretaj alsalti la ŝtatajn instituciojn por nuligi la demokration kaj starigi politikan kadron en kiu la civitanaro ludus nenian rolon. Do estas antaŭ ni alia kontraŭfrontiĝo, kiu povus iĝi perforta, inter du frenezaj homamasoj, kiuj senscie agadas, ankaŭ kaj ĉefe kiam ili interbatalas, favore al la ekspluatantoj de la homaro.
Ĉar ni menciis ankaŭ la prisporta fanatikeco, decas ke ni iomete okupiĝu pri tiu temo, des pli ke oftas la perforto en la sport-stadionoj. Ankaŭ ĉi tiu temo estas signo aŭ indico de la homa stulteco. La homa frenezo tiurilate ne estas nur la perforto inter la kontraŭantaj fanatikuloj, sed la fakto mem ke ekzistas tiuj formoj de sportado bazitaj sur konkurado. Estas necese klarigi ĉi tion. Ĉiu socio-tipo havas la tipo je spektaklo kongrua kun ĝia naturo. Ekzemple, la romia socio, kiu konstruis imperion pere de militoj de konkerado, havis kiel popolan spektaklon la perfortaj luktoj de gladiatoroj. En alitipaj socioj estis alitipaj spektakloj akorde kun la koncernaj valoroj, ekzemple, en la feŭdisma socio de Mezepoko, kies dominanta klaso estis la terposedanta nobelaro, la spektakloj konsistis el kavaliraj turniroj, t. e. la elmontro de simboloj de la superreganta klaso: la ĉevalo kiel ĉefa tiama armilo kaj la kavaliro kiel prototipo de la homo kapabla kaj inda por regi.
Kaj kion pri la nuntempaj sportaj spektakloj, futbalo k. c.? Ĉi-kaze temas pri alitipaj luktoj, sen perfortaj kontraŭfrontiĝoj, sed, ni konstatu ke, same kiel la spektaklaj luktoj de pasintaj epokoj, ankaŭ la nuntempaj baziĝas sur konkurado. T. e., ies gajno aŭ venko postulas alies perdon aŭ malvenkon. Tiu skemo enportas ian pravigon de la esenco de la burĝa socio. Ja, la konkurenco estas baza ideo de la interhomaj rilatoj; por la akiro de vivrimedoj, devas interkonkuri la uloj, la firmaoj, la landoj… La konkurado inter la uloj kaj la grupoj danĝeras evolui al rabado kaj ŝtelado, kaj la konkurado inter landoj kaj socioj ofte







**La romantika doktrino de la naciismo furoras tie, kaj nur tie, kie tio konvenas al la dominantaj klasoj de la globala kapitalista sistemo.**





**Ankaŭ la kontraŭnaciismaj faŝimtipaj fortoj estas artefaritaĵo de la mastroj de la sistemo, samkiel la movadoj kiel la BREXIT kontraŭ la Eŭropa Unio**







**Ĉiu socio-tipo havas la tipon je spektaklo kiu kongruas kun sia naturo, sed ĉiuj ekzistintaj ĝis nun baziĝis/as sur interhoma konkurado**





**La palestina kaj la israela naciismoj havas samajn karakterizaĵojn kiel ĉiuj aliaj naciismoj: romantika, mistika, ideologio bazita en tradicioj**

evoluas al militoj kaj imperiismaj konkeroj. Sub la lumo de la ideo de konkurado estas rifuzeblaj la konceptoj de egaleco, solidareco… Povas studi pli interesajn karierojn nur tiuj kiuj povas pagi siajn studojn. Ĝuos sanecajn rimedojn nur tiuj kiuj povas pagi ilin. Iuj povas havi bonan kaj luksan loĝejon, aliaj povas aliri al nur modestaj loĝejoj, kaj iuj tute ne havas loĝlokon. En la mondo de la konkurenco ne estas loko por ŝtata prizorgo de la bonstato de la civitanoj, ne estas loko por publikaj sanecservo kaj instruado; en nia konkurencema socio oni celas privatigi tiujn servojn. La elitismo, kiun generas tiu ideo de la konkurenco estas alia signo de nia freneza mondo.

Krom la Ukrainia konflikto kiun ni jam prikonsideris, estas nuntempe en nia freneza mondo alia milito en Mez-Oriento. Ekde la jaro 1948 okazis kelkaj militoj inter la israelanoj kaj la palestinanoj kaj aliaj arabaj landoj. Ankaŭ ĉi-kaze en-estas naciismaj interesoj kvankam ne temas pri separatismo sed pri milito celante okupadi teritorion. Ĉiukaze tiu konflikto estas unu el la ĉefaj frenezaĵoj de nia nuntempa mondo.

La palestina naciismo estas relative moderna. La palestina popolo ne reagis al la iama okupado de ĝia teritorio far Turkujo, Britio, Egiptujo kaj Jordanio. La naciisma sento de la palestinanoj vekiĝis kaj disvolviĝis kadre de la iom-post-ioma enmigrado de judoj en la palestinan teritorion. Tiu juda enmigrado estis frukto de alia naciismo, tielnomata "cionismo". Ĉi tiu formiĝis fine de la 19-a jarcento sub la premo de la cirkonstancoj.

Okazis ke laŭlonge de tiu 19-a jarcento estis florante naciismoj multloke. En landoj kie la judoj estis loĝante de antaŭlonge pliintensiĝis la rifuzon al ili; pliintensiĝis, ĉar rifuzo jam ekzistis de antaŭe kiel atestas la multaj persekutoj kaj forpelon kiun ili spertis en diversaj lokoj laŭlonge de la historio. La ***Dreyfus***-afero, en Francio, estis tipa signo de tiu fenomeno de la pliintensiĝo de la kontraŭjudismo. Do, ene de la juda komunumo oni venis al la konkludo ke estis necesa ia juda nacio loĝanta en propra juda lando. Poste la nazia holokaŭsto plu pravigis la neceson de tiu solvo.

Sed, vere, la juda naciismo, eĉ se ankoraŭ ne nomiĝis "cionismo", fakte, ekzistis de tre antikve. Se estis longdaŭra kaj multloka kontraŭ-judismo tio atestas ke ekzistis judoj dumlonge kaj multloke. Kaj tiu ekzistado, per si mem, jam estas signo de ia naciismo. Tiorilate jam la antaŭcionisma judismo estas la plej trafa esprimo de naciismo. La PIV difinas la naciismon tiele: ***Politika doktrino, kun mistika bazo, laŭ kiu la tradicio estas ĉiam preferinda…*** Tiu sento, kun mistika bazo, jam ekzistis en la juda komunumo de antaŭ tri jarmiloj, kaj mistika bazo estas la historio kaj legendoj entenataj en la Biblio. La judoj disigitaj en la mondo estas posteularo de tiuj forpelitaj el tiu tero nun nomata Palestino. Ĉiujare, laŭlonge

de la jarcentoj, en la festo de la juda novajaro, je la eliro el la sinagogoj la gejudoj inter-salutadis tiele: בשנה הבאה בירושלים (Venontan jaron en Jerusalemo). La problemo estis ke tiu tero jam estis okupita de aliaj loĝantoj. Temis pri posteularo de la judoj kiuj restis tie, sed ili estis perdintaj la judan identecon kaj alprenis, aŭ oni trudis al ili, alian de islama kulturo. La cetero estas la freneza historio de la lastaj 75 jaroj: multaj militoj, teroristaj atencoj, reprezalioj… kiuj daŭris ĝis nun. Se la milit-elspezoj de ambaŭ kontraŭfrontantaj komunumoj estus dediĉ-itaj al la bonstato de ĉiuj tieaj loĝantoj oni estus evitinte multajn mortintojn kaj doloron, kaj Palestino/Israelo estus feliĉa kaj komforta loĝloko por ĉiuj.

Sed la frenezo regas tie samkiel en multaj aliaj lokoj en la mondo. Ni prikonsideru alian homan frenezaĵon de la nuntempo: la prospero de la faŝismoj. Ĝenerale, kiam oni volas promocii konservativajn politikojn, defendi la maljustan superregantan sistemon, la plej malracia parto el la loĝantaro estas mobilizata: la faŝismoj estas ĝuste tio. Dum oni verkas ĉi liniojn estas en Hispanio mobilizoj de tiaspecaj sencerbuloj kiuj, subpretekste kontraŭbatali la katalunan separatismon, ili agas same kontraŭleĝe kiel la ekstremistoj, kiujn ili abomenas. Ŝajnas ke la celo de ambaŭ bandoj da malsaĝuloj, kiuj ofendas unuj la aliajn, estas generi en Hispanio intifadon kiel tiuj de Palestino.

La nescio de la subprematoj kaj ekspluatatoj estas esenca faktoro por la supervivo de la ekspluat-sistemo. Tio estas, kiam ĉi tiu sistemo ie estas subdanĝere, necesas mobilizi al ilia helpo la senraciulojn, la ulojn kun animo de sklavoj, kiuj kisas la boton kiu premas ilin kaj pri kiuj oni povas kalkuli por defendi siajn "mastrojn". Ni temas pri tiuj diversaj kategorioj je ultradekstrismo kaj novfaŝismo, kiuj aperis dum la lastaj jardekoj, kaj kiuj karakteriziĝas per alta grado je konservativismo, ksenofobio, rasismo, maskl-superecismo, aporofobio, homofobio, manko je socia solidareco, religia fundamentismo...

La novfaŝismo, pri kiu ni temas, estas, en la planoj de la financa potenco, armilo aŭ instrumento de ĉantaĝo kontraŭ ŝtatoj kaj civitanoj. Estas provo eviti ke la ŝtato kontrolu kaj administru la ekonomion, produktadon, sanon, edukadon kaj aliajn aferojn, kiuj estas de ĝenerala intereso por la tuta socio kaj kiuj perversiĝas kiam ili falas en privatajn manojn. En tiu ĉi batalo, la reganta klaso dediĉas sin al la potencigo de ekstremdekstraj protest-movadoj por premadi la regantojn kaj malhelpi la evoluon de progresemaj politikoj.

La ĉantaĝo estas direktita ankaŭ kontraŭ la civitanoj, por ke ni konformiĝu al la politika kaj ekonomia situacio, kiu damaĝas nin, kaj ne postulu ŝanĝojn en progresema kaj socialiga senco. Ĝuste la civitanoj devas reagi kontraŭ tiuj potencoj, kiuj subpremas nin, kaj postuli pli egalecajn politikojn far niaj regantoj.









**Lastempe pli kaj pli progresas tiuj faŝismaj movadoj liderataj de uloj kiaj Trump, Orban, Le Pen, Meloni, Abascal… Tio ne okazas hazarde; la dominanta sistemo asignas al ili ian rolon**

Ni devas lerni el la historio kaj memori, kio okazas, kiam la reakciaj fortoj, kiuj kolektiĝas ĉirkaŭ karismaj gvidantoj, rajtas regi la stratojn kaj la instituciojn kaj donas al ili absolutan potencon, kiu nuligas la civitanan suverenecon. Senhezite ni devas postuli ke la ŝtato, kiu reprezentas ĉiujn, regu favore al ĉiuj kaj ne serve de la multnacifirmaoj kaj la internacia financa sektoro. Ni devas reagi kontraŭ la nova faŝisma florado.

**Per iliaj fruktoj vi konos ilin.** *(Mateo 7:16)*. La sistemo, la mastroj al kiuj servas la karismaj lideroj de la faŝismo, dank' al la nescio de ties sekvantoj kaj voĉdonantoj, produktis kaj subtenas la ĥaosan mondon kiun ni kontemplas fine de la jaro 2023 p. K.: Temas pri klasista sistemo: laŭ sia propra naturo ĝi estas maljusta kaj perforta; ĝi privilegias kelkajn sociajn klasojn malprofite de aliaj, kiujn ĝi subpremas kaj ekspluatas. Neniu povas ignori, ke la homa historio estas la klasbatalo inter premantoj kaj prematoj, riĉuloj kaj malriĉuloj, ekspluatantoj kaj ekspluatatoj...

La bazo de ĉi tiu klassistemo, unu el la radikoj de la malbono, kiu superfortas la homaro estas la privata proprieto. La profitantoj de la sistemo diras ke la privata proprieto estas homa rajto, sed plejmulto el la homaro posedas nenion. Ĝi ne estas rajto sed privilegio ĉar ĝi estas ĝuata nur de minoritato kaj en tre malegaleca maniero; la rajtoj estas universalaj kaj egalecaj, sed la kapitalismo konstruis mondon kun grandaj diferencoj kaj ekskludoj. La supervivo de tia katastrofa sistemo baziĝas ankaŭ sur la nescio de la subprematoj kaj senposeduloj. Antikva hindua proverbo diris: **Se du regnoj estas en milito kaj unu el ili ne scias tion, la alia havas ĉiun ŝancon por venki**. Nu, alia radiko de la malbono, kiun ni suferas, estas la nescio de la viktimoj de la sistemo. La amaso de la senposedantoj ne scias aŭ ne volas scii kio estas klasbatalo. Ili ne konas aŭ ne volas koni la imponan forton, kiun ili havas, kaj ili donas elektan subtenon, politikan potencon, al siaj klasaj malamikoj, al la politikaj lakeoj de la reganta klaso, kiuj defendas la interesojn de la ekspluatantoj. La potenco de la mondo apartenas al la gigantoj de la financo, bankaro, kapitalo... ili estas la komercistoj, la sola personaro, kiun Jesuo forpelis el la Templo, kiujn li akuzis, ke li igis ĝin kaverno de ŝtelistoj. Nun la kaverno de ŝtelistoj kovras la tutan planedon, ĉar mankas al la homoj la lucideco forigi tian abomenindan personaron.

Oni pensas ke la "***homo sapiens***" aperis antaŭ 200.000 jaroj aŭ eĉ pli. Dubindas ĉu oni povas konsideri "***sapiens***" iu specio kiu post tiom longa tempo ne kapablis solvi siajn problemojn de kunvivado. Oni scias pri militoj kaj ĉiutipaj interhomaj konfliktoj laŭlonge de la historio, kaj sendube ili ekzistis ankaŭ en la prahistorio. Ĉu por ĉiam pludaŭros la malsaĝeco kiu okazigas tiom da homa doloro? Nutras la pesimismon la penso ke la problemo ne estas nur manko je saĝeco sed plej verŝajne manko je homa solidareco, empatio, frateco...



**Amasa migrado, grandaj areoj de mizero. Jen la stato de la mondo post tiom longa ekzistado de la homa specio sur la Tero. Ĉu povas esti taksata kiel *"sapiens"* la homo kiu ankoraŭ ne sciis solvi la problemojn de kunvivado?**




# Ĝis hodiaŭ mem

Per ĉi numero de la revuo ni daŭrigas la pritemadon de la afero de la korupto en nia lando. La antaŭa numero enportas la historion de la koruptado en Hispanio laŭlonge de kvin jarcentoj, ĝuste ĝis aŭtuno de la jaro 1982, kiam komenciĝis la regado de la socialista partio, unuafoje ekde la Civitana Milito. Sep jarojn post la morto de la diktatoro ***F. Franco*** estis socialista registaro en Hispanio. La politika ŝanĝo estis altsignifa kaj promeso-plena. De tiam pasis ĝuste 40 jaroj, kaj estis 40 jaroj da elreviĝo, pri multaj aferoj, ankaŭ pri tiu de la korupto. De tiam, **ĝis hodiaŭ mem**, estis en Hispanio korupto, kaj ĉiaj misagoj de la politika potenco, kiel ĉiam antaŭe. La politika signo de la registaro ŝanĝiĝis kelkfoje, fakte, alternis en la regado de la lando tiu Socialista Partio (PSOE) kaj la dekstrara partio, fondita de ***Fraga Iribarne***, kiu ŝanĝis sian nomon al Populara Partio (PP).

Ambaŭ partioj senĉese perfidis la hispanan popolon **ĝis hodiaŭ mem**; ambaŭ partioj praktikadis kaj permesadis koruptadon **ĝis hodiaŭ mem**. Dume en Katalunio superregis naciismaj, separatismaj politikaj fortoj kiuj perfidis la tiean loĝantaron kaj praktikis koruptadon **ĝis hodiaŭ mem**. Pri ĉio ĉi ni raportos en ĉi numero de **Heleco**.

Povas surprizi, al tiuj kiuj ne konas la hispanan popolon, ĉi ties toleremo rilate al la politikaj fortoj kiuj perfidas kaj pritrompas ĝin. Sed, estante objektivaj, ni agnosku ke tiu lakea teniĝo ne estas specifa trajto de la hispana gento. Per nia raporto de la antaŭaj kvin jarcentoj oni povas konstati ke kvankam la hispanoj ade submetiĝis al ties predantoj, tamen ne mankis ribeloj kaj revolucioj kontraŭ la subpremantoj. Krome estis simila servutemo en aliaj popoloj krom la hispana, ekzemple, ni vidu, interalie, la reagon de la loĝantoj de la ***Vendée***, dum la Franca Revolucio, favore al la feŭdsinjoroj kiuj ekspluatis dum jarcentoj la kamparanojn de tiu regiono. Aŭ la pretecon de la eŭropaj muzulmanoj de dua generacio batali favore al la Islama Ŝtato kiu simbolas la kialon de ĉiuj malfeliĉoj de la muzulmana gento ĉu elmigrinta aŭ ne.

Ekzistas sociologiaj studoj pri la kaŭzo(j) de tiu popola servutemo aŭ lakea sento, sed ne estas la celo de ĉi raporto pritrakti tiun temon. Interesitoj pri la afero povas adresiĝi, ekzemple, al la eseo «Jano», verkita de ***Arthur Koestler*** en 1978.
















*kaj tiele...*
**ĝis hodiaŭ mem**



La PSOE de ***Felipe González*** komencis perfidi la socialistan programon baldaŭ post ĝia akiro de la politika potenco. Se en 1981 la PSOE postulis, ke Hispanio kunlaboru kun la internacia ekvilibro ne aliĝante al NATO, en 1984 ĝi argumentis ke nia lando faru tion restante en tiu militista pakto. Se en 1981 ĝi asertis, ke la NATO legitimis la grekan, portugalan, kaj turkan diktaturojn, en 1984 tiu partio emfazis ke la NATO estis ensemblo de demokratiaj landoj. Kiu estis la kialo de tiu turno de la partio, kiu en la opozicio protestis kontraŭ la NATO kaj en la Registaro, pledis por la restado de Hispanio en la Traktato, la fabela pirueto de la socialistoj, kiuj diris unu aferon en la opozicio kaj alian, kiam ili atingis la potencon, kiel ni vidis tiomfoje ekde tiam kaj **ĝis hodiaŭ mem**?

Kiel respondo al tiu demando oni asertas ke en la decido de ***Felipe González*** intervenis du faktoroj. Unue, estis la fakto ke por la enkonduko de Hispanio en la Eŭropan Union, dezirata de preskaŭ la tuta hispana loĝantaro, estis kondiĉo, ne formale sed fakte deviga, integriĝi en la militistan kontrakton. Notindas ke la saman argumenton oni uzis por altrudi la aldoniĝon al la NATO de la iamaj orienteŭropaj landoj, iam apartenintaj al la Varsovia Kontrakto, post la krizo de la komunistaj reĝimoj. Dua kialo por tiu decido estis tio ke la eniro de Hispanio en la NATO ŝajnis esti la solvo de problemo kiu kaptis Hispanion post la perdo de siaj lastaj kolonioj en Afriko. La afero pri la urboj Sebto kaj Melilo, postulitaj de Maroko, bezonis taŭgan kirason. Nur la membreco en la NATO povus garantii teritorian integrecon en la malriĉa, malforta Hispanio, kun armeo heredita de la diktaturo de ***Franco*** kaj tre febla kompare kun la ĉirkaŭaj landoj. Nu, la eniro de Hispanio en la Eŭropan Union okazis, kaj estis bona ŝanco por nia lando, sed rilate al la sekureco antaŭ Maroko la rezulto estis magra. La ĉantaĝo de tiu lando al Hispanio pro iu aŭ alia kialo, per iu aŭ alia preteksto daŭris, kiel ni vidos per nia raporto, **ĝis hodiaŭ mem**.

Sed, kiel dirite, la ĉefa afero kiu karakterigis la kvardekjaran periodon kiun ni pritemos estas la korupto. Urbestroj de ĉiuj politikaj signoj, altaj oficistoj de la Andaluzia Registaro, kantistinoj, aristokratoj kaj komercistoj devis raporti antaŭ la Justico. Politikistoj de ĉiuj partioj, bankistoj, juĝistoj kaj eĉ membroj de la Reĝa Domo estis kondamnitaj al prizontempo.

Tiel estis; malgraŭ la espero kiun vekis la Socialista Partio en ties voĉdonintoj, oni tuj konstatis ke ankaŭ ĝiaj gvidantoj inklinis al korupto. La Ekonomiaj skandaloj estis, ekde tiu momento, konstanta en la lastatempa historio de Hispanio: la du regantaj politikaj partioj kiuj sin alternis en la politika potenco, igis la ŝtaton fonto de personaj enspezoj. Siaflanke, ankaŭ la Reĝa Familio eniris en memdetruan spiralon de korupto kaj apartiĝo el la socia problemaro.

Same kiel en la antaŭaj periodoj de la hispana historio, jam priraportitaj, ankaŭ dum ĉi tiu etapo la korupto estis ligita al la kontrolo de la politika potenco... kaj de la jura sistemo; nuntempe, de antaŭ pluraj jaroj ĝis nun, aŭgusto de 2022, estas en Hispanio politika batalo por la kontrolo de la Plejalta Tribunalo.

La koruptado estis speciale grava dum la regadetapo de ***Mariano Rajoy*** (fine de 2011 ĝis meze de 2018). Notindas ke ĉi-kaze la punitoj de la Justico estis ne nur kulpaj personoj sed la partio mem kiel jura ento. La puno de la kulpuloj de sinsekvaj skandaloj ne evitis la agadon de novaj koruptuloj, kiel atestas la fakto ke la informedioj senĉese estis pritemante skandalojn pri koruptado. Ekde la komenco de nia verkado pri ĉi tiu temo per la antaŭa revua numero, senĉese estis aperante novaj kazoj. Ĉi raporto estas kondamnita ne resti aktuala dumlonge. Sendube kiam ĉi tiu numero de la revuo estos fineldonita, ekzistos jam novaj korupto-kazoj pri kiuj oni scias nenion nun kiam ni estas verkante ĉi tiun unuan ĉapitron, tio estas: la koruptado pludaŭris **ĝis hodiaŭ mem**.





Kiam ni entreprenis la taskon pritrakti la temon de la korupto en Hispanio ni tute ne pensis ke la afero estus tiom grava kaj ampleksa. Esplorante la dokumentaron pri la korupto-skandaloj, ni konstatas ke la nombro da fraŭdoj kaj koruptuloj estas ege pli granda ol ni povis supozi. Ekde kiam ni komencis priverki ĉi tiun raporton la nombro da korupto-aferoj pligrandiĝis preskaŭ ĉiu-tage, kaj tio **ĝis hodiaŭ mem**. Kaj kiam ĉi tiu materialo estos fine publikigita, sendube estos aperintaj novaj fraŭdo-aferoj.
Do, ĉi tiu raporto estas kondamnita resti nekompleta. Pro tio ni petas pardonon al niaj legantoj, kaj ĉefe al la altrangaj friponoj kies korupt-prodaĵojn ni ne kapablis pritemi.




La regad-etapo de ***Felipe González*** daŭris dek tri jarojn kaj duonon, de la 2-a de decembro de 1982 ĝis la 5-a de majo de 1996. Ĝi havis sendube favorajn rezultojn por la lando, sed ankaŭ karakteriziĝis pro la daŭrigo de la politika perfido al la hispana popolo kaj senĉesa korupto. La eniro de Hispanio en la NATO, en junio de 1982, regante ankoraŭ ***Leopoldo Calvo Sotelo***, estis favora faktoro por atingi eksterlandan apogon al la febla hispana demokratio, kaj kontribuis plifaciligi la postan aliĝon de la lando al la Eŭropa Ekonomia Komunumo, sed ĉefe por deadmoni la militistojn je ilia obsedo interveni en la nacian politikon. Komence, la Socialista Partio sin oponis al la hispana enkonduko en la NATO-n sed, post la atingo de la politika potenco, ***Felipe González*** ne retiris Hispanion el la Atlantika Alianco. Dum la tuta jaro post la puĉo (23-F de 1981), la reĝo estis la plej fervora defendanto de la armea disciplino kaj de la eniro de Hispanio en la Eŭropan Ekonomian Komunumon. La tempo de trankviligo de la militistaro fare de la UCD, en kiu la reĝo ofte devis roli kiel "fajro-estingisto", finiĝis per la balotado de la 28-a de oktobro 1982 kaj la ampleksa pli-multo akirita de la socialistoj. ***Felipe González*** venkis en kvar sinsekvaj balotadoj: 1982, 1986, 1989 kaj 1993, la unuaj tri per absoluta plimulto.

Tiu granda balota venko de la PSOE ĉesigis la pretendon ke la Armeo povus pli bone interpreti la nacian volon ol la elektitaj politikistoj. Tamen la taskoj kiujn ***Felipe González*** devis alfronti estis enormaj. Estis pasintaj nur ses jaroj ekde la leĝigo de la PSOE. La problemoj rilate al la ETA-terorismo kaj la armea ribelemo postulis lertecon kaj aŭtoritaton. ***Narcís Serra***, kiel ministro pri Defendo, aplikis programon de modernigo kaj profesiigo, kiu finfine nuligis la puĉisman inklinon de la armeestroj. Specialan atenton oni devis apliki al la rekonverto de la hispana industrio, kun ties malnoviĝintaj sektoroj, alta energidependeco, regionaj malekvilibroj kaj teknologiaj mankoj. Same okazis kun la agrara reformo. La fakto ke la PSOE pretis alfronti la taskojn kiujn la UCD preterlasis igis ĝin inda je ia toleremo de la publika opinio pri rimedoj kiaj la malplivalorigo de la peseto, la plialtigo de impostoj kaj la prezo de la karburaĵo.


La socialista registaro heredis ŝtat-aparaton kaj ekonomion kiuj bezonis urĝan reformon. ***González*** alvenis al la politika potenco prirezignante aspirojn por socialisma transformo



***Felipe González* kaj *Alfonso Guerra***



***Narcis Serra* Ministro pri Defendo**



***Miguel Boyer* Ministro pri Ekonomio**



***Carlos Solchaga* Ministro pri Industrio**

favore al pragmatismo. Kaj li kaj lia Vicprezidanto ***Alfonso Guerra*** estis konvinkitaj ke por ke la demokratio pluvivu, estis necese enkonduki ŝpar-politikojn kaj eĉ toleri la supervivon de iuj elementoj de la frankisma reĝimo. Tial ne estis juĝaj esploroj aŭ sankcioj pro la kontraŭleĝa militista puĉo de 1936 aŭ pro la kruelaĵoj de la frankisma subpremo. La ĉef-komando de la armeo kaj la sekurecaj taĉmentoj daŭre estis plejparte frankismaj. Tial pludaŭris la problemoj pri la ETA-terorismo kaj la puĉo. Fakte, la pragmatismo de la socialistoj igis ilin sekvi la politikon de siaj antaŭuloj kaj konsenti la ŝtatan terorismon kontraŭ ETA, fia milito kiu fine estis unu el la faktoroj kiuj kaŭzis ilian fiaskon. Alia prioritato estis la industria rekonverto. La senlaborec-procento estis 16, kaj la inflacio-procento 14. La konservativa politiko de la Ministro pri Ekonomio, ***Miguel Boyer***, kaŭzis malpli-valorigon de la peseto je 8 procento, la mon-politiko iĝis tre severa, kaj la sindikatoj estis devigitaj akcepti salajran moderigon.

Sub la preteksto ke la industrioj de la INI (Nacia Instituto de Industrio) ne estis konkur-kapablaj, oni iniciatis procezon de industria rekonvertigo kiu kondukis al la privatigo de kelkaj publikaj entreprenoj kaj la fermo de aliaj. Ĉi tiu politiko demarŝita de la Ministro de Industrio, ***Carlos Solchaga***, same kiel la ŝanĝo de teniĝo de la socialistoj pri la NATO-afero, estas parto el la procezo de akceptado de la valoroj de la burĝa kapitalismo, la integriĝo en la sistemon de mond-regado, far la hispana socialismo. La monda kapitalisma sistemo ne bezonis tiam faŝismojn kiel tiu de la diktaturo de Franco en Hispanio, ĝi havis "socialistojn" kiel ***Felipe González*** kaj ***Solchaga*** por esti bone servita. La drameca procezo de senindustriigo kaŭzis la fermon de ***Altos Hornos*** kaj pluraj ŝtalfabrikoj en Eŭskio, Kantabrio, Asturio, Galegio kaj Valencio, kio kaŭzis la perdon de duonmiliono da labor-postenoj, kun la sekvaj sociaj kostoj. La finigo de la pater-nalismo heredita de la frankisma reĝimo cele plifleksigi la labor-merkaton igis la senlaborecon pliiĝi al 21,5 elcentoj en tri jaroj kaj la inflacion malaltiĝi al 8,8 elcentoj. Kiam la socialistoj forlasis la registaron en 1996, la inflacio estis proksima al 2 procentoj, sed senlaboreco ankoraŭ estis super 20 procentoj.

Tamen, dum la unuaj tri jaroj de la socialisma regado, pli-iĝis la eksportoj kaj la eksterlandaj investoj. La MEP-kresko-

procentoj inter 1986 kaj 1990 estis proksimume 5, multe super tiuj registritaj fare de membroj de la Eŭropa E. Komunumo.
En 1988, la tiama ministro pri ekonomio kaj financo, ***Carlos Solchaga***, fanfaronis, ke “Hispanio estas la lando, kie oni povas kurtatempe gajni pli da mono en Eŭropo kaj eble en la mondo”. Eble sen rimarki tion, li subtenis per siaj vortoj la disvastiĝon de la serĉado de kurtatempa profito, ofte per koruptaj praktikoj rilataj al spekulado, kio poste estis nomota “la kulturo de la pilko-bato” (***pelotazo***, en la hispana lingvo). La ekonomia sukceso plifirmiĝis per la aliĝo de Hispanio al la Eŭropa Ekonomia Komunumo en januaro de 1986. Konsiderante ke tiu sukceso estis fáciligita de ĝia membreco en la NATO, estis necese solvi la problemon de la opozicio de la PSOE al la Atlantika Alianco, do, plenumante la promeson faritan en la balotkampanjo de 1982, oni faris referendumon la 12-an de marto 1986. Ne sen interna diskordo, la PSOE faris kampanjon favore al la “jes” per la slogano “NATO en la intereso de Hispanio”. Kun partopreno de 59,4 elcento el la voĉdonantaro, la voĉdono favora al la restado en la NATO venkis per 53 elcente kontraŭ 40,3 elcente da nea voĉdono. La plej alta procento de neaaj voĉoj, 67,55 elcento, estis registrita en Eŭskio. ***Felipe González*** profitis la okazon por antaŭenigi al la 22-a de junio la ĝeneralan balotadon antaŭviditan por la fino de novembro. Kun 184 sidlokoj, dek-ok malpli ol en 1982, la PSOE konservis komfortan absolutan plimulton.



**Kampanjo por la referendumo de la 17-a de marto - 1986**

Krom pliigi la eksteran komercadon kaj la investadon, la membreco en la Eŭropa Ekonomia Komunumo alportis al Hispanio aliajn avantaĝojn. La kreado de la EEK-Koher-Fonduso en decembro 1992, celanta plibonigi la ekonomiojn de la plej malriĉaj landoj al la meza skalo de la EEK, kaj la enfluo de strukturaj kapitaloj signifis transformon de la hispanaj transportaj infrastrukturoj en tio, kio koncernas al vojretoj kaj flughavenoj, same kiel la enkondukon de altrapida fervoja sistemo. Tamen, ĉio-ĉi ankaŭ faciligis la korupton. La ekonomia sukceso malpliiĝis ekde 1993, pro la apliko de ŝpar-iniciatoj post iometa recesio. Krome, tiam Hispanio spertis nivelojn de korupto kiu influis preskaŭ ĉiujn instituciojn de la lando, ekde la monarkio ĝis la ĉefaj partioj, inkluzive la bankoj, entreprenistoj, sindikatoj kaj lokaj administracioj. Dum la socialista regado, la publika elspezo preskaŭ duobliĝis, parte pro 40-elcenta pliiĝo de dungado en la publika sektoro. Proksimume 70 elcento el la membraro kaj subtenantoj de la Socialista



**Afiŝoj de la kampanjo por la balotado de la 22-a de junio de 1986**




José Barrionuevo kaj Rafael Vera



Segundo Marey



Julián Sancristóbal



José Amedo Fouce



Baltasar Garzón

Partio estis rekompencitaj per kelkaj el la 500.000 labor-lokoj kreitaj inter 1982 kaj 1994. Tiu praktiko instigis kaj plifirmigis la ideon ke oni povus atingi privatajn avantaĝojn de la ŝtatoficistoj. La elspezoj kreskis inter 1982 kaj 1996 ankaŭ kiel rezulto de la fruktodona klopodo plibonigi la magran socian servon de la frankisma ŝtato, ĉefe en la areoj de sanservo, pensioj kaj edukado.

Bedaŭrinde, la sukcesoj de la socialistoj estis makulitaj de du grandaj problemoj: terorismo kaj korupto. La UCD, unue, kaj la socialistoj poste, uzis nereformitajn policajn taĉmentojn, precipe la Civil-Gvardio, kiu ne reduktis la malamikecojn de ETA kontraŭ la ŝtato. Responde al la teroristaj atencoj, la UCD estis tolerinta agojn ambaŭflanke de la franc-hispana limo far ekstremdekstraj mort-taĉmentoj ligitaj al la policaj servoj. Tiuj ĉi taĉmentoj, konsistantaj el francaj, argentinaj kaj italaj ekstremdekstruloj, same kiel dungitaj murdistoj, uzis malsamajn nomojn, inter kiuj plej oftis: “Hispana Eŭska Bataliono”. La socialista ministro pri Internaj Aferoj, ***José Barrionuevo***, kaj lia Ŝtata Sekretario pri Sekureco, ***Rafael Vera***, dungis agentojn de la frankisma sekreta polico. Inter oktobro 1983 kaj julio de 1987, ili financis tiujn bandojn per rezervitaj monrimedoj de la registaro, kiuj operacis sub la nomo: Grupoj Antiterror-istaj de Liberigo (GAL). La murdoj de dudek sep ETA-anoj en la Franca Eŭskio celis devigi la francajn aŭtoritatojn ĉesigi la rifuĝadon de ETA-anoj en la areo. La 4-an de decembro de 1983, GAL erare kidnapis iun senkulpan francan civitanon sen rilato al ETA: ***Segundo Marey***. Finfine oni eksciis ke la operacio havis la kunkulpecon de ***Vera*** kaj ***Julián Sancristóbal***, civila guberniestro de Biskajo, kaj estis gvidita de la vic-komisaro de la frankisma polico, ***José Amedo Fouce***. Post ĝis-funda esploro de la enket-juĝisto ***Baltasar Garzón*** pri la financado de la GAL kaj ĝiaj agadoj, inkluzive la kidnapo de ***Marey***, estis enprizonitaj ***Barrionuevo***, ***Vera***, ***Sancristóbal*** kaj ***Amedo***. La politika skandalo pri la GAL kaj la kunkulpeco de la registaro plifortigis malamikecon kontraŭ Madrido en Eŭskio kaj kaŭzis grandegan politikan damaĝon al ***Felipe González***. Ties fama eldiro ke “la jurŝtato ankaŭ defendas sin en la kloakoj” ne kontribuis estingi tiujn onidirojn.

Unu el la unuaj kazoj de socialista korupto okazis kiam, por mildigi subdungadon en la kamparo, estis pligrandigita la

helpo kaj oni kreis subvenciojn de la Kampara Dungado-plano (***Plan de Empleo Rural***, PER), kiu instigis fraŭdon, kiel ilustras la tipa kazo denuncita en ***Pinos Puente*** (Granado). La urbestro de tiu ĉi urbo inter 1987 kaj 1991, ***Juan Ferrándiz***, malfermis konton en loka banko; ĉiu kiu faris enspezon de 300 pesetoj ricevis interŝanĝe ateston esti laborinta la 60 tagojn necesajn por rajti la prisenlaboran subvencion je 28.000 pesetoj fiksitan de la PER. Inter 1988 kaj 1990, la Urba Konsilio atestis, ke 4.000 lokaj enloĝantoj estis laborintaj 200.000 tagojn je kosto de 990 milionoj da pesetoj al la Nacia Laborinstituto. En junio de 1996, ***Ferrándiz*** estis kondamnita al 18 monatoj en prizono kaj monpunita je 100.000 pesetoj. Estis aliaj similaj kazoj.

En Andaluzio, kie la socialistoj regis seninterrompe ĝis 2018, estis multaj skandaloj, sed la plej grava el ili estis la kazo de la dosieroj pri dung-regulado (***Expedientes de Regulación de Empleo***, ERE), en kiu estis defraŭditaj proksimume miliardo da eŭroj inter la jaroj 2000 kaj 2012 el la fondusoj destinitaj helpi homojn perdintajn ties laborpostenojn. En iu kazo, la pensia sumo pagota al viro estis kalkulita laŭ la supozo ke laboris por la sama firmao ekde lia naskiĝtago. ***Javier Guerrero***, ĉef-direktoro pri Laboro kaj Socia Sekureco de la Konsilio de Andaluzio, estis la cerbo de la intrigo. Liaj malavaraj stipendioj inkludis 1,3 milionon da eŭroj por lia ŝoforo kaj 430.000 eŭroj por lia bopatrino. Aliaj 266 homoj, inter ili la eksprezidantoj ***Manuel Chaves*** kaj ***Antonio Griñán***, kaj aliaj politikistoj, estis akuzitaj je defraŭdo de publikaj financoj.

Iu el la plej grandaj skandaloj pri korupto estis malkovrita en 1985. Ĝia protagonisto estis la kataluna financisto ***Javier de la Rosa Martí***, viro ŝatanta jaĥtojn, privatajn aviadilojn kaj luksajn aŭtojn, kiu apartenis al dinastio de trompantoj. Lia patro, Antonio, kaŝis sin en Sudameriko post kiam estis malkovrite ke, inter 1975 kaj 1979, li estis defraŭdinta 1.200 milionojn da pesetoj per la fikcia aĉeto de neekzistanta tereno por la Konsorcio de la Liberkomerca Zono de Barcelono, el kiu li estis sekretario. Tiu ĉi ento, kun financado de la Urbodomo kaj de la centra registaro, entreprenis la konstruadon de granda loĝistika kaj industria centro duonvoje inter la Barcelona Liberkomerca Zono kaj la flughaveno. La ŝtelita mono estis elspezita, interalie, por prostituitinoj kaj la aĉeto de aro de luksaj aŭtoj. La filo de ***Javier*** estis poste implikita en la supozitaj koruptaj praktikoj de ***Jordi Pujol***, kiu prezidis la Generalitat de Catalunya de 1980 ĝis 2003.


Javier Guerrero


Manuel Chaves kaj Antonio Griñán


Javier de la Rosa Martí


Jordi Pujol Soley


Mario Antonio Conde

En 1974, post meteora ascendo en la mondo de financoj, ***Javier de la Rosa*** akiris la postenon de direktoro de la ***Banca Garriga Nogués***, invest-agentejo, filio de la ***Banco Español de Crédito (***BANESTO***)***. Lia administrado estis ruiniga, plejparte pro investo en ***Quash-Tierras de Almería***, spekulad-cela agrokomerca firmao. En 1988, iu esploro far BANESTO en ***Banca Garriga Nogués*** malkovris ke estis manko de 98.500 milionoj da pesetoj, dekses-foje pli granda ol la nominala kapitalo de la banko. Post la bankroto de la ento, la nova estro de BANESTO, ***Mario Conde***, arkivis la esplorojn, ŝajne post kiam ***De la Rosa*** minacis publikigi dosieron enhavantan pruvojn de la neklaraj negocoj de ***Conde***. En tiu tempo, ***De la Rosa*** estis fariĝinta la reprezentanto en Hispanio de la Kuvajta Investa Oficejo (KIO), por kiu li akiris ampleksan aron da kompanioj, kelkaj el ili profitdonaj, dediĉitaj al la fabrikado de kemiaj produktoj, sterkoj, papero, manĝaĵo… same kiel la sektoro de nemoveblaĵoj; aliaj, aliflanke, estis en krizo, kaj li utiligis ĝin por likvidi ilin. La rezulta firmao-aro, subgvide de ***De la Rosa***, estis nomita ***Grupo Torras***. Post la invado de Kuvajto far ***Saddam Hussein*** en aŭgusto 1990, 167 miliardoj da pesetoj estis transdonitaj de ***Torras*** al la impost-paradizoj de Ĵerzo, Ĝibraltaro, la Kajmana Insularo, Svislando kaj Panamo. El tiu mono, ŝajne 70.000 milionoj iris al kontoj posedataj de ***De la Rosa***, kiu poste asertis esti doninta la monon al politikaj partioj por subteni la kuvajtan aferon. La Kuvajta Investoficejo deklaris ke ĝi investis 5.000 milionojn da dolaroj en ***Torras***, el kiuj 950 estis ŝtelitaj kaj la resto, perdita pro mis-administrado de ***De la Rosa***. Post la bankroto de la grupo ***Torras***, ĝia direktoro estis implikita en la disfalo de la holdingo ***Grand Tibidabo***, kiu interalie estis malantaŭ la amuzparko ***Port Aventura***. Miloj da laboristoj perdis sian labor-postenon kaj 10.500 akciuloj perdis siajn ŝparaĵojn. ***De la Rosa*** kaj kelkaj membroj de la kuvajta reĝa familio estis akuzitaj je fraŭdo, defraŭdo de publika financo kaj subaĉeto de politikistoj. En oktobro 1994, ***De la Rosa*** estis trovita kulpa pro fraŭdo, falsaĵo kaj misproprigo de unu miliardo da pesetoj de la firmao ***Grand Tibidabo***. Li estis malliberigita, sed en februaro 1995 li estis liberigita sub kaŭcio de mil milionoj da pesetoj.
La makulo de korupto finfine trafis la reĝan familion, sed en la unuaj jaroj de la socialista registaro, la populareco de la reĝo altiĝis malgraŭ konstanta malamikeco de ETA kaj pluraj atencoprovoj. La procezo estis faciligita per la reĝaj vizitoj al Eŭskio kaj la geedziĝo en la barcelona katedralo de la Infantino ***Cristina*** kun la eŭska sportisto ***Iñaki Urdangarín Liebaert*** la 4-an de oktobro 1997. La geedziĝo, kune kun la fakto, ke la infantino loĝis en Barcelono kaj parolis katalunan, venigis ducent mil homojn al la stratoj por ĝojigi la geedzon kaj iliajn gepatrojn. La rilatoj de la reĝo kun Katalunio, kvankam ne sen malfacilaĵoj, estis multe pli facilaj ol kun Eŭskio kaj estis favoritaj de lia entuziasma subteno al la oferto de Barcelono por la Olimpikoj de la jaro 1992. ***Juan Carlos*** ankaŭ plene kunlaborontis kun ***Narcís Serra*** en la klopodoj solvi la problemon de la puĉismo. En la aktoj de festado de la Milita Pasko de la 6-a de januaro 1984, kiel supera komandanto de la armeaj fortoj, li alvokis ke ĉi tiuj restu unuigitaj kaj kun-laboru “sen duboj aŭ rezervoj” en la militaj reformoj de la Registaro. La sekvintan jaron, la monarko emfazis la avantaĝojn de modernigo kiun la aliĝado al NATO implicis.

Longatempe, la militista situacio spertis konsiderindan pliboniĝon, sed antaŭ tio, dum la paska Semajno de 1985, la ĉefa hispana sekreta servo, (CESID), malaktivigis planitan puĉon por la 2-a de junio. La puĉistoj planis eksplodigi bombon sub la tribuno de kiu la reĝo prezidos la feston de la Armeo en Korunjo. Se la komploto estus sukcesinta, la tuta reĝa familio, same kiel ***Felipe González***, ***Narcís Serra***, la ĉefkomando de la armeo kaj aliaj gravuloj estus murditaj. La eksplodo estus atribuita al ETA, kio utilus kiel preteksto por la altrudo de armea junto. Tiu estis la lasta serioza komploto kontraŭ la reĝo.




Geedziĝo de la infantino *Cristina* kaj *Iñaki Urdangarín*

Post la socialista venko en 1986, la sekva balotado ne devus okazi antaŭ julio de 1990. Tamen, ***Felipe González*** antaŭenigis ĝin al oktobro 1989 en respondo al kreskanta maltrankvilo en diversaj medioj, la plej surpriza el kiuj estis la streĉitecoj inter la socialista registaro kaj la socialista sindikato UGT. La ekonomia kreskado dum la periodo inter 1985 kaj 1992 estis atingita per liberaligo de la labormerkato, fermo de malnoviĝintaj industrioj, ĝeneraligitaj maldungoj kun reduktita kompenso, malpli laborsekureco, kaj salajra moderigo. La kresko de 10 al 15 jaroj da minimuma kotizado por rajti pensionon, la prokrastoj en la enkonduko de la kvardekhora labor-semajno kaj la ĝeneraligo de rub-laborkontraktoj kaŭzis malkontenton en la laborista klaso kaj konfliktojn inter laboristoj kaj la polico. La senkaŝa kunfrontiĝo inter la ĝenerala sekretario de UGT, ***Nicolás Redondo***, kaj la registaro kaŭzis amasan ĝeneralan strikon la 14-an de decembro 1988, en kiu la UGT kaj la Laboristaj Komisionoj kuniĝis por alporti ok milionojn da laboristoj surstraten kaj paralizi la tutan landon.




***Nicolás Redondo***



***José María Aznar***

En la balotado de 1989, la PSOE gajnis 175 parlamentajn seĝojn, 9 malpli ol en la jaro 1986 kaj unu sub la absoluta plimulto. ***Felipe González*** povis regadi kvazaŭ li havus tian plimulton, ĉar la kvar deputitoj de ***Herri Batasuna*** rifuzis okupi siajn parlamentajn sidlokojn. La "Populara Alianco" reorganizis sin kaj adoptis la novan nomon de "Populara partio" (PP), tiam subgvide de la 43-jaraĝa ***José María Aznar***. Sen karismo kaj elokventeco, iama fiska inspektisto kaj frankisto en sia junaĝo, ***Aznar*** estis iama intima kunlaboranto de ***Fraga*** kaj ĝenerala sekretario de "Popola Alianco". Lia antaŭinto, ***Jorge Verstrynge*** deklaris ke li forlasis la PP ĉar ***Aznar*** «pli kaj pli priskribis siajn dialogojn kun Sankta Tereza kaj eĉ kvalifikis siajn kontraŭulojn kiel "judaj hundoj"».



***Jorge Verstrynge***

En tiu balotado, la PP gajnis 107 parlamentajn sidlokojn, du pli ol en 1986. La malkresko de la popola apogo al la PSOE reflektis la kunfrontiĝon kun la UGT, maltrankvilon pri la ĉiam pli seriozaj novaĵoj pri la GAL kaj elreviĝon pro la korupto. Se la malboniĝo de la pozicio de la PSOE ne estis pli granda estis pro la fakto ke al la voĉdonantaro ne plaĉis apogi la Popolan Partion, kiun oni konsideris frankisma. Tamen, de maldekstrema vidpunkto estis malfacile akcepti ke dum la nacia ekonomia plibonigo negative influis la vivnivelon de la laborista klaso, uloj kiaj ***Mario Conde*** kaj ***Javier de la Rosa*** amasigis grandajn riĉaĵojn dank' al la kulturo de la “pilko-bato”.

Aferoj baldaŭ plimalboniĝis kiam aperis serio de sensaciaj koruptaj skandaloj. La kazo de ***Juan Guerra***, frato de la Vicprezidanto de la Registaro, ***Alfonso***, estis la unua kiu rekte efikis kontraŭ la PSOE kaj estis la ellasilo kiu instigis ĵurnalistojn esplori aliajn. Tiu ***Juan Guerra,*** kaj ankaŭ sufiĉgrade lia frato la Vicprezidanto ***Alfonso***, apartenas al tiu homtipo kiun ni difinis kiel operet-roluloj, kiuj tre multe abundas en la publikaj, politikaj aferoj de Hispanio. Ĉi-ĉapitre jam aperis iuj el tiaj homaj figuroj: ***Conde***, ***De la Rosa***... kaj aperos multaj aliaj laŭlonge de nia raportado pri la korupto en Hispanio. Kiam la socialistoj ekregis, ***Juan***, tiam senlaborulo, ricevis modestan salajron kiel asistanto de sia frato kaj la uzadon de oficejo en la Registara Delegacio en Sevilo. La skandalo eksplodis meze de 1989, kiam lia edzino, kiun li forlasis, malkaŝis al ***Manuel Fraga*** –kiel venĝo–, ke ŝia edzo fariĝis grava akciulo de pluraj kompanioj kaj ke li akiris bienon, ĉevalojn kaj altekostajn aŭtomobilojn. Je la fino de la jaro, la gazetaro pleniĝis je revelacioj pri lia agado kiel peranto nome de firmaoj kaj individuoj kiuj serĉis akiri kontraktojn, reklasifikon de terenoj aŭ konstrupermesojn de la regiona, provinca aŭ loka administracio. ***Juan Guerra*** estis akuzita je subaĉeto, impostfraŭdo, influo-trafiko, defraŭdo de publikaj financo, mon-lavado... Kvankam komence ***Alfonso*** neis ke lia frato faris ajnan krimon, li estis devigita eksiĝi kiel vicprezidanto en januaro 1991, markante la komencon de disigo inter la PSOE, kiun li kontrolis, kaj la registaro. Tiam, same kiel nuntempe, la juĝistaro estis ege malrapida kaj estis akuzita pri enmiksiĝo en politiko. Kaj tiu socialisma registaro kaj la postaj de la Populara Partio kaj la PSOE povis nomumi subtenantojn de siaj formacioj al postenoj de respondeco en la Konstitucia Tribunalo, la Supera Kortumo kaj, ĉefe, en la Ĝenerala Konsilio de la Juĝistaro, organo kiu havas la maksimuman respondecon super la hispana jura ordo. Tiel, komence de la 1990-aj jaroj, la fakto, ke ***Juan Guerra*** eliris relative bone el sia pasado tra la tribunalo, estis atribuita al la ĉeesto de socialistoj en la juĝa aparato, kiu ege streĉis la rilatojn inter la PSOE kaj la PP; tamen, kaj la nomumo de simpatiantoj kaj la mekanismo de provi defendi tiujn akuzitajn pri korupto poste ankaŭ estis uzotaj de la PP kiam ĝi atingis la politikan potencon.


Krom la kazoj de persona gajno, tiam eksplodis serio da skandaloj rilate al la financado kaj de la PSOE kaj de la Populara Partio. En la kazo de la socialistoj, fine de majo de 1991, surbaze de datumoj donitaj de malkontenta iama oficisto, ***El Mundo*** malkaŝis, ke, inter 1988 kaj 1991, kontraŭleĝaj monrimedoj estis enkanaligataj por kvanto proksima al unu miliardo da pesetoj per tri malgrandaj fikciaj firmaoj, ligitaj unu al la alia

kaj nomitaj ***Filesa***, ***Malesa*** kaj ***Time Export***; ĉi-lasta, firmao kun apenaŭ iuj dungitaj laboristoj, kiun ***Filesa*** aĉetis per 400 pesetoj. La enormaj profitoj generitaj de la vendo de fikciaj dosieroj por grandaj publikaj kaj privataj firmaoj, kaj eĉ grandaj bankoj, utilis por pagi la politikan propagandon de la socialista balotkampanjo de 1989. Laŭdire, ***Guillermo Galeote***, la prifinanca oficiro de la partio, kontrolis la operacion. La juĝa esploro de la kazo daŭris ses jarojn, kaj la proceso finiĝis per malliberecaj punoj por iuj altrangaj funkciuloj de la PSOE. En simila kazo, sed de malplia graveco, en 1992, oni asertis ke dum la ofertado por la aranĝo de la rapidtrajna linio inter Madrido kaj Sevilo, oni provis plenigi la kason de la PSOE per komisionoj de la kompanioj, kiuj konkuris por la kontraktoj. ***Julián García Valverde***, prezidanto de RENFE inter 1985 kaj 1991, kaj tiutempe ministro pri Sano kaj Konsumado, estis devigita eksiĝi, kvankam li poste estis absolvita de ajna respondeco.

La afero ***Filesa*** damaĝis la PSOE-on malpli ol ĝi povintus fari, ĉar ĝin antaŭis simila skandalo de kontraŭleĝa financado en la Popularа Partio. En aprilo de 1990, enketjuĝisto ordonis la areston de iuj altrangaj oficialuloj de la Popularа Partio, inter ili la nacia kasisto, ***Rosendo Naseiro***, kaj la konsilisto de la Urbodomo de Valencio ***Salvador Palop***, kiu estis la estro de la municipa aĉetkomisiono. Ili estis akuzitaj je uzado de privilegiaj informoj provizitaj de ***Palop*** por organizi la aljuĝon de publikaj konstrukontraktoj al entreprenoj pro grandaj kontribuoj al la kaso de la partio en formo de komisionoj pro la kontraktoj. La fraŭdo diskoniĝis kiel rezulto de pertelefonaj subaŭskultiloj de aparta enketo pri drog-kontrabandado implikanta la pli junan fraton de ***Palop***, ***Rafael***, kiu senintence malkovris la financan sistemon de la PP en Valencio. Tamen, la kazo disfalis ĉar la pertelefona subaŭskultado estis nuligita fare de la Plejsupera tribunalo kaj poste detruita. Kvankam tio signifis ke tiuj implikitaj en la PP ne devis iri al juĝo, iliaj politikaj karieroj estis trunkitaj kaj la espero de ***Aznar*** pri tuja balota venko estis nuligita post kiam la gazetaro publikigis la pertelefonan aŭskultad-registraĵojn. Post mallonga restado en malliberejo, ***Naseiro*** deponis antaŭ advokato el Alakanto serion da dokumentoj, kiuj pruvis la ekziston de la B-kesto de la Popularа Partio. Inter tiuj dokumentoj estis ĵura deklaro ke "kiu ajn decido



***Juan Guerra***



***Guillermo Galeote***



***Julián García Valverde***



***Rosendo Naseiro* kaj *Salvador Palop***




Eduardo Zaplana






Olimpikoj de 1992



Geparo *Boyer-Presley*

estis farita, ĝi ĉiam estis sub la superrigardo, gvidlinioj kaj kriterioj de S-ro ***José María Aznar***". Poste, el la fakso de la advokata oficejo, li sendis kopion al ***Aznar*** klarigante, ke li publikigos ĉion, se la partio faros lin la propeka kapro en la kazo.

Unu el la plej teruraj riveloj de la nuligitaj sonbendoj estis konversacio registrita la 11-an de februaro 1990 inter ***Palop*** kaj ***Eduardo Zaplana***, kiu baldaŭ poste estis prezidanto de la PP de Alakanto kaj poste, sinsekve, urbestro de ***Benidorm*** en 1991, prezidanto de la Valencia ***Generalitat*** en 1995 kaj Ministro pri Laboro en 2002, en la dua registaro de ***Aznar***. En longa babilado, en kiu oni parolis pri neleĝaj komisionoj pri vendado de proprietoj, ***Zaplana*** konfesis al ***Palop***, ke li bezonis riĉiĝi ĉar "mi elspezas ĉion por politiko": "Mi devas riĉiĝi... ...mi devas gajni multe da mono, mi bezonas multe da mono por vivi. Nun mi devas aĉeti aŭton". En majo 2018, ***Zaplana*** estis arestita pro akuzoj pri korupto en sia periodo de prezidanto de la ***Generalitat*** inter 1995 kaj 2002. Specife, ĝi implicis subvenciojn kaj falsajn fakturojn dum la konstruado de la ega kaj finfine malsukcesa plezurparko ***Terra Mítica***. La akuzoj inkluzivis daŭran subaĉeton, defraŭdon de publikaj monrimedoj, influo-trafiko, falsaj dokumentoj, monlavado, neleĝa asocio por krimi, apartenon al krima grupo kaj imposta krimo, kun mono en eksterlandaj bank-kontoj ne deklaritaj en Andoro, Urugvajo kaj Paragvajo.

La UGT kolektis monon per kooperativo, Socia Promocio de Loĝejo, por konstrui 22.000 hejmojn por laboristoj. La kooperativo bankrotis en februaro de 1994, meze de riveloj de fraŭdo kaj spekulado per ĝiaj fondusoj en projektoj kiuj havis nenian rilaton kun la loĝejoj. La lidero de UGT, ***Nicolás Redondo***, sin konsideris devigita demisii. Tiuj ĉi riveloj pri korupto, kune kun la kazo GAL, kreis la impreson, ke la PSOE estis putriĝinta. Ja, kiam la informo pri ***Filesa*** de la Financ-ministrejo estis publikita en marto de 1993, ***Felipe González*** estis insultita de universitataj studentoj de Madrido kriante "ŝtelisto" kaj "fiulo". La balotado de la 6-a de junio 1993 estis tre disputita. Por kontraŭbatali la skandalojn, la PSOE bazis sian kampanjon sur siaj egaj atingoj dum la regado, inkluzive, la Barcelona Olimpiko kaj la Universala


Ekspozicio de Sevilo en 1992, en kies preparado estis investitaj grandaj monsumoj en la infrastrukturo de ambaŭ urboj. La socialistoj krome insistis pri la frankisma origino de la Populara Partio. Por konvinki la voĉdonantaron ke estis prenitaj rimedoj kontraŭ korupto, ***Baltasar Garzón***, enketjuĝisto en la kazo de GAL, estis inkludita kiel sendependulo en la PSOE-kandidataro. La rezulto estis ke la socialistoj venkis en la elektoj, sed perdis la absolutan plimulton, kun 159 parlamentaj sidlokoj kaj 38 elcento de la voĉdonoj. La pliiĝo de apogo al la PP, kiu atingis preskaŭ 35 elcenton de la voĉdonoj kaj gajnis 141 parlamentajn sid-lokojn, signis ĝian fortan pozicion por atingi la politikan potencon.
Post la balotadoj de junio 1993, la kvara socialisma registaro estis malfortigita per la diferencoj inter la renovigistoj de ***Felipe González*** en la registaro kaj la subtenantoj de ***Alfonso Guerra*** en la partio. Krome, la PSOE suferis de preskaŭ ĉiutagaj riveloj pri koruptaj kazoj, kiuj implicas la ***beautiful people***, grupon da homoj famaj pro fanfa-ronado pri sia luksa vivmaniero, pluraj el kiuj estis ligitaj al la partio. Inter ili estis la eksministro ***Miguel Boyer***, edziĝinta al ***Isabel Preysler***, la ŝika kaj riĉa eksedzino de kantisto ***Julio Iglesias***. Alia personulo ligita al la socialista registaro estis la aventurema prezidanto de ***Banesto***, ***Mario Conde***, kies brila kaj senkompata ascendo gajnis al li la kromnomon "***El Tiburón***" ("la Ŝarko"). Post la kazo ***Juan Guerra***, la riveloj inter aprilo kaj majo de 1994 malfortigis la registaron kun skandaloj kiuj kaŭzis la eksiĝon de iuj ministroj. En la plej gravaj kazoj estis implikitaj la estroj de alte respektataj institucioj: ***Mariano Rubio***, guberniestro de la Banko de Hispanio, kaj ***Luis Roldán***, la unua ĝenerala direktoro de la Civil-Gvardio ekster la armea mondo. En la akto de festado de la 150-a datreveno de la fondo de la Civil-Gvardio, ***González*** estis fifajfita kaj oni insultis lin per krioj de "***chorizo***" ("kolbaso" kun la signifo de ŝtelisto kaj fiulo).
***Rubio*** ricevis mallongan malliberecan punon pro impostfraŭdo kaj pro provizado de privilegiaj informoj al la kliko de ***Ibercorp***. Estis enkarcerigita ankaŭ la prezidanto de ***Ibercorp***, ***Manuel de la Concha***, eksprezidanto de la Madrida Borso. Inter la profitantoj de la fraŭdo estis ***Miguel Boyer***, ***Isabel Preysler*** kaj pluraj personuloj de la prifinanca mondo. Tio kaŭzis la eksiĝon de ***Carlos Solchaga***, la parlamenta proparolanto de la regist-aro kiu, kiel financministro, estis nomuminta ***Rubio***-n. Ĝi ankaŭ kaŭzis la demision de ***Vicente Albero***, ministro pri agrikulturo, kiu agnoskis, ke li faris impost-fraŭdon kun sia partopreno en la fraŭda strukturo kreita de ***De la Concha***.
Estis sensacia ankaŭ la falo de ***Mario Conde***: en la tiel nomata kazo ***Banesto***, la banko estis kontrolita en decembro de 1993 kaj urĝa revizio malkovris nigran truon de 3.000 milionoj da eŭroj en la kontoj de la ento. ***Mario Conde*** estis arestita kaj kondamnita al 20 jaroj da mallibero pro fraŭdo kaj mispropriigo kaj estis ordonita redoni 22,6 mili-onojn da eŭroj al la fraŭditaj akciuloj.
***Luis Roldán*** estis municipa politikisto de Zaragozo kiu, kun falsaj akademiaj titoloj, progresis tra la provinca administracio por iĝi registara delegito en Navaro. En ĉi tiu malfacila pozicio, li kultivis la favoron de la Civil-Gvardio, kies direktoro li estis nom-umita en novembro de 1986 kun la celo modernigi la institucion. Unu el liaj projektoj



**_Mariano Rubio_**




**_Luis Roldán_**



**_Manuel de la Concha_**



**_Vicente Albero_**



**_Manuel Prado y Colón de Carvajal_**

estis la restrukturado de la kazernoj de tiu polica korpuso. En novembro de 1993, esploro de liaj agadoj farita de ĵurnalistoj de ***Diario 16*** malkaŝis ke, dum sep jaroj, li amasigis riĉaĵon de 400 milionoj da pesetoj, gravan posedaĵon en Hispanio kaj Francio kaj bankkonton en Svisio. La mono venis el plej diversaj fontoj: komisionoj por konstruado de konstruaĵoj de la Civil-Gvardio, mono pagita al konfiduloj kiuj ne ekzistis, monrimedoj de la Asocio por Orfoj-Lernejo de la Civil-Gvardio, pagoj de komercistoj por neekzistanta protekto kontraŭ ETA kaj vendo de armiloj al Angolo. Komence de decembro, ***Roldán*** estis maldungita kaj esplorita. Lia fuĝo de Hispanio en aprilo de 1994 kaŭzis la demision de la ministro por Internaj Aferoj, ***Antoni Asunción***. En intervjuo kun la hispana ĵurnalo ***El Mundo*** en Parizo la 29-an de aprilo de tiu jaro, ***Roldán*** deklaris, ke la uzo de rezervitaj fondusoj por pagi gratifikojn al altrangaj oficistoj de la Ministerio pri Internaj Aferoj estis rajtigita de la ĝenerala direktoro pri sekureco ***Rafael Vera***, kiu, laŭ ***Roldán***, estis unu el la ĉefaj profitantoj de la afero. ***Roldán*** mem asertis, kvankam sen prezenti pruvojn, ke la du ministroj pri Internaj Aferoj, kiuj antaŭis ***Asuncion***-on –***José Barrionuevo*** kaj ***José Luis Corcuera***– ricevis el tiuj fondusoj. ***Roldán*** estis finfine kaptita en februaro de 1995, resendita al Hispanio kaj kondamnita al 31 jaroj en malliberejo pro subaĉeto, falsaj dokumentoj, defraŭdo de publikaj financoj, ĉantaĝo kaj impost-fraŭdo. Nur proksimume triono de la ŝtelita mono estis reakirita.

En tiu tempo, la nomo de la reĝo komencis aperi en iuj skandaloj. La ĉeso de ***Sabino Fernández Campo*** kiel estro de la Reĝa Domo en januaro de 1993 forigis barieron inter la reĝo kaj ***Mario Conde*** kaj aliaj financistoj de la ***jet set*** kiuj volis ekspluati la favoron de la monarko. Krom ***Mario Conde***, alia personulo kiu provis, sen konsiderinda sukceso, alproksimiĝi al la reĝo estis ***Javier de la Rosa***. Kiam kaj ***Conde*** kaj ***De la Rosa*** falis devis responsi antaŭ la aŭtoritatoj fine de 1993, ili pensis ke, dank' al siaj aferoj kun la amiko kaj neoficiala peranto de ***Juan Carlos***, ***Manuel Prado y Colón de Carvajal***, ili povus iel kalkuli je la protekto de la monarko kontraŭ la justico. Ilia espero, ke la reĝo savus ilin, estis frustrita. Estis dirite ke, post kiam ili estis enkarcerigitaj meze de oktobro de 1994 pro misalpropriigo, kolerege ***De la Rosa*** provis ĉantaĝi al ***Prado kaj Colón de Carvajal*** pri la malaperinta mono de KIO, kaj ke, por igi la aferon pli verŝajna, li faris vualitajn minacojn riveli kompromitajn informojn pri la reĝo. En 1997, ***De la Rosa*** asertis ke li donacis parton de tiu mono al la delegacio de la PP en Katalunio.

Post la balotado de 1993, tre intensiĝis la malamikeco inter la PSOE kaj la Populara Partio. La interna unueco de la PSOE estis plifortigita danke al la foresto de ***Alfonso Guerra*** kaj la kreado de forta gvida nukleo kun ***Narcís Serra*** kiel Vicprezidanto, ***Javier Solana*** en la Ministerio de Eksteraj Aferoj kaj ***Pedro Solbes*** kiel Ministro de Ekonomio kaj Financo. Tamen, estis neeviteble ke ***José María Aznar*** uzu la demisiojn de ***Solchaga***, ***Corcuera***, ***Albero*** k. a. por severe kaj akre kritiki la Registaron kaj postuli fruan balotadon. Liaj multaj atakoj donis frukton en la eŭropa balotado de junio de 1994, en kiuj la voĉdono por la PSOE falis de 39,6 elcento en 1989 al 30,7 elcento, dum la voĉdono por la PP kreskis de 21,4 elcento, de 1989, al 40,2 elcento. Komencis ŝajni verŝajne ke ***Aznar*** prezidus la sekvontan Registaron. Post kelkaj semajnoj, en la Somera Lernejo de la PSOE, ***Felipe González*** agnoskis, ke la malbonaj rezultoj de sia partio ŝuldiĝas al korupt-skandaloj kaj indikis, ĉefe, la kreskantan zorgon de la publiko pri la implikiĝo de la Registaro en la kazo GAL, kiu aperis en dokumentoj ŝtelitaj de la ĵus eksigita vicdirektoro de CESID, kolonelo ***Juan Alberto Perote***.

Post esti elektita deputito en 1993, ***Baltasar Garzón*** estis nomumita registara delegito en la Nacia Plano pri Drogoj, pozicio el kiu li demisiis en majo de la sekva jaro en protesto kontraŭ la manko de dinamismo de la Registaro en la batalo kontraŭ la korupto, kaj revenis por esplori la kazojn de la GAL kaj ***Roldán***. Dume, eble la riveloj pri la GAL-kazo publikigitaj de la ĵurnaloj ***El Mundo*** kaj ***ABC*** pli damaĝis la registaron ol iu ajn alia skandalo. La fakto ke ili koincidis kun la kazo pri fraŭdo kontraŭ ***Mario Conde*** igis suspekti ke ĉi tiu uzadis sian riĉaĵon por influi la gazetaron kaj ĉantaĝi la registaron. ***Conde*** estis en kontakto kun la indignita kolonelo ***Perote***, kiu estis forpreninte el la CESID ne nur multajn konfidencajn dokumentojn, sed ankaŭ registraĵojn de telefonaj konversacioj de altrangaj registaraj oficistoj. La rivelo de tiu materialo al la gazetaro koincidis kun la leĝaj agoj kontraŭ ***Conde*** kaj ***Perote*** kaj ege damaĝis la PSOE-on. Gravas ke la direktoro de ***El Mundo***, ***Pedro J. Ramírez***, estis en kontakto kun iu gravulo de la PP de ***Aznar***. La riveloj kaŭzis la eksiĝon de la estro de la CESID, generalo ***Emilio Alonso Manglano***, same kiel de la Vicprezidanto de la Registaro, ***Narcís Serra***, kiu estis ministro pri defendo tiutempe kiam la registraĵoj estis faritaj.


La Registaro suferis ankaŭ pro profunda recesio; la peseto estis devalutita trifoje ekde junio 1992 kaj la senlaboreco plialtiĝis




***José Luis Corcuera***



***Juan Alberto Perote***



***Pedro J. Ramírez***



***Emilio Alonso Manglano***



***Pedro Solbes***

ĝis 23 elcento. Danke al la alveno de monrimedoj el la Eŭropa Unio kaj al pluraj strukturaj reformoj faritaj de ***Pedro Solbes***, la plej malbona de la recesio estis pasinta antaŭ la fino de 1994. Tamen, la malvenkoj en la regiona balotado en Galegio kaj en la Eŭropa Komunumo kaj la amasa kresko de la voĉdonoj de la PP en multaj municipoj indikis ke la socialista hegemonio estis alvenante al sia fino. Komence de la jaro 1996, ***Felipe González*** estis devigita anonci balotadon por la 3-a de marto kvankam ĝi ne devus okazi ĝis julio de 1997; la kaŭzo estis la retiro de subteno al la projekto de Ĝenerala Ŝtata Buĝeto de la socialista registaro por la sekva jaro fare de ĝia parlamenta aliancano, la kataluna koalicio ***Convergència i Unió*** (CiU) de ***Jordi Pujol***. La PSOE perdis per mallarĝa marĝeno, per 37,6 elcento de la voĉdonoj kaj 141 parlamentaj seĝoj kompare kun 38,8 elcentoj kaj 156 sidlokoj por la PP, al kiu mankis 20 deputitoj por la absoluta plimulto. La kredindeco de la PSOE estis tre tuŝita de la partopreno de partiaj figuroj en la kazoj ***Ibercorp***, ***Roldán*** kaj GAL kaj la ĝenerala percepto ke la fiagoj de ***Mario Conde*** kaj ***Javier de la Rosa*** estis faciligita de la neglektemo de la Registaro.
Serio da ETA-atakoj, faritaj eble por devigi la sendependecon de Eŭskio, kontribuis al la sukceso de la PP. Aparte, ***Aznar*** akiris iom da populareco pro la trankvileco kiun li montris post intenco de ETA mortigi lin en aprilo de 1995. Tamen, malgraŭ prognozoj de grava venko de la PP, la malvenko de la PSOE estis multe malpli grava ol antaŭvidite, ĉar ***González*** daŭre superis ***Aznar***-on pri populareco kaj karismo.
Finiĝis la "felipismo", kiel estis nomata en Hispanio tiu preskaŭ 14-a periodo de la unua socialista regado. Se bilanci la regad-etapon de ***Felipe González***, oni devas registri ke ĝi signifis iajn sukcesojn. Plifirmiĝis la demokratia sistemo evitante la danĝeron je armea puĉo kiu signis la antaŭan etapon. Krome, en junio de 1985 estis subskribita la Traktato de Aliĝo de Hispanio al la Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK); la efektiva aliĝo de al la EEK okazis la en januaro de 1986. Tio estis la kialo de konsiderinda ekonomia kresko kiu kondukis Hispanion al la vojo de modernigo. Okazis ankaŭ procezo de liberaligo en moralo kaj kutimoj en klara kontrasto al la ega subpremo de la frankismo.
Sed la sama bilanco devas montri ankaŭ la misagojn. Jam estis menciita la perfida maniero fincertigi la apartenon de Hispanio al la NATO per la referendumo kiun oni prokrastis dum tri jaroj, ĝis la 31-a de januaro de 1986. Antaŭe, dum la tagoj 6-a al la 8-a de majo de 1985 vizitis Hispanion la usona prezidento ***Ronald Reagan***. Dum tiu vizito kaj dum la postaj monatoj ĝis la referendumo oftis en la lando manifestacioj kontraŭ la NATO. ***Felipe González*** tre pledis favore al la referenduma aprobo de la plurestado de Hispanio en tiu militista bloko, kaj faris promesojn kiuj poste ne estis plenumitaj, t. e. la usonaj militistaj bazoj restis en la hispana teritorio kaj krome Hispanio plene integriĝis en la militistan strukturon de la NATO. La opozicio al hispana kompromiso kun la NATO estis gvidata de la Komunista Partio de Hispanio kiu tiam estis liderata de la asturo ***Gerardo Iglesias.*** La referenduma venko ne estis granda; nur 56,85 elcento el la voĉdonantaro aprobis la NATO-favoran proponon.
Ceteraj misagoj de la regantaro de ***Felipe González*** rilatis al la korupto. Ni jam priskribis iujn korupto-kazojn kiuj rilatis al la reganta partio kaj ankaŭ al la PP. Sed meritas ian

atenton aliaj kazoj kiuj ne-rekte aŭ tute ne rilatis al politikaj responsuloj. La plej grava inter ili estis tiu konata kiel kazo RUMASA. Temis pri eksproprietigo, vendo kaj likvido de tiu holdingo en operacio kiu kaŭzis ĝian totalan bankroton, pro neregulaĵoj en ĝia administrado de la familio ***Ruiz-Mateos***. La holdingo RUMASA, la ekonomia imperio de ***José María Ruiz Mateos***, estis eksproprietigita de la registaro de ***Felipe González*** en 1983. La komerca grupo tiam havis 65.000 laboristojn, 700 firmaojn kaj 18 bankojn. ***Ruiz Mateos*** neniam akceptis la eksproprietigon, kiun li konsideris maljustaĵon, kaj per la kreado de nova holdingo li provis reakiri sian komercpotencon. La komercisto el ***Jerez*** estis komencinta sian komercadon per malgranda vinfarejo en ***Jerez*** en 1961. Poste li aĉetis entreprenojn en krizo kaj baldaŭ disvastigis sian komercon tra la lando. Dum la epoko de evoluo en Hispanio, kies ekonomion gvidis la teknokratoj de ***Opus Dei***, al kiu aniĝis ***Ruiz Mateos***, li sukcesis krei grandan imperion, giganton kun propra strukturo, en kiu la firmaoj de la grupo subtenis unuj la aliajn. La grupo konsistis el: bankoj, hoteloj, vinproduktado, grand-magazenoj, luksaj vendejoj, nutraĵa industrio, asekuro, farmacia industrio, ŝipa industrio, kosmetikaĵoj, konstruado, nemoveblaĵoj...

La Ministro ***Miguel Boyer***, klarigis la eksproprieton de la grupo, kiu havis perdojn je 346.000 milionoj da pesetoj. La kialoj deklaritaj en la eksproprietigo-dekreto estis: -La ripeta manko de eksteraj revizioj de la bankoj de la grupo kaj ankaŭ de ĝiaj plej gravaj kompanioj ekde 1978; -La konstanta obstrukco al la inspekta agado de la Banko de Hispanio; -La neproporciaj riskoj supozitaj de la bankoj kiuj financis la grupon interne, rilate al la solventeco de la grupo; -La neglektado de la multnombraj avertoj de la monaj aŭtoritatoj al RUMASA, rekomendante pli prudentan investpolitikon kaj malkoncentriĝon de riskoj; -La riska spiralo de akiroj kaj investoj de la grupo.

La komercisto fuĝis unue al Londono kaj poste al Frankfurto, de kie li estis ekstradiciita al Hispanio en 1985 kaj malliberigita. Li poste kreis politikan partion kaj estis elektita deputito de la Eŭropa Parlamento en 1989. Li komencis kampanjon kontraŭ la socialistoj uzante ajnan metodon por altiri atenton. La Registaro privatigis preskaŭ ĉiujn firmaojn de la grupo. Kelkaj el tiuj privatigoj estis tre kontestataj, ekzemple tiu de ***Galerías Preciados***. La juĝa batalo daŭris dum jaroj. La Plejsupera Tribunalo aprobis kaj la eksproprietigon kaj la reprivatigojn. Sed ankaŭ ***Ruiz Mateos*** havis venkojn. La Nacia Apelacia Kortumo absolvis lin je la deliktoj de malvero kaj la Strasburga Tribunalo agnoskis kompenson al li.

La disvolviĝo de tiu RUMASA-afero daŭris, do, 15 jarojn, kaj ties kulmino estis elreviga por la hispanoj kiuj esperis justan kulminon ĉar ***José María Ruiz-Mateos*** kaj kvar aliaj akuzitoj estis absolvitaj la 12-an de junio de 1997 far la Nacia Tribunalo kvankam ili estis kulpaj pri deliktoj de malvero kaj fraŭdo. La sentenco de la juĝo konsideris pruvite ke ili kulpis pri malveraĵoj kaj nepagoj al la Publika Trezoro kaj Socia Sekureco, sed ili liberiĝis el la koncerna puno ĉar tiam, oportune, la Puna Kodo, estis ŝanĝita favore al akuzitoj kiaj ili. Oni klare vidis ke la leĝaro povas esti manipulata favore al alt-rangaj personoj. De tiam kelkaj aliaj deliktuloj, inter ili, politikistoj de la Socialista Partio estis favorataj de tiu leĝa malseveriĝo.




**Ronald Reagan vizitas Hispanion en 1985**



**Turoj KIO**



***José María Ruiz Mateos***



***Gabriel Urralburu***



***Artur Suqué***

Ni vidu, ekzemple, la t. n. "Kazo ***Flick***". Temis pri grava korupt-intrigo organizita de la germana komercisto ***Friedrich Karl Flick***, kiu subaĉetis politikistojn de ĉiuj partioj de la ***Bundestag*** ŝanĝe ricevi impostajn avantaĝojn. La kazo etendiĝis al Hispanio, ĉar la ***Friedrich Ebert Foundation***, proksima al la germana partio SPD, asignis donacojn de ***Flick*** kun valoro de miliono da germanaj markoj por financi la PSOE-on. La germana revuo ***Der Spiegel*** asertis en 1990, ke la unuaj liveroj al Hispanio venis ne de ***Flick***, sed de la rezervitaj fondusoj de la germanaj sekretaj servoj kreitaj dum la Registaro de ***Helmut Schmidt*** (1974-1982), kun la konsento de ĉiuj parlamentaj partioj. Dum la transiro, por la sekreta livero de subaĉetaĵoj, la germanaj sekretaj servoj uzis kvar malsamajn politikajn fondaĵojn, ĉefe la ***Friedrich Ebert***. Por forviŝi la spurojn de la origino de la mono, ili ankaŭ falsis la dokumentaron. Donacoj al Hispanio kaj Portugalio inter 1978 kaj 1981 atingis la sumon je proksimume 3,3 milionoj da eŭroj, laŭ ***Der Spiegel***. Kion intencis kaŝi la sekretaj servoj kaj la socialdemokratio? La klarigo aperis kiam ***Eberhard von Brauchitsch***, la peranto de ***Flick***, aperis en la enket-komisiono de la hispana Parlamento, ***Santiago Carrillo*** demandis lin: *Laŭ mia scio, sinjoro **Flick** estis kondamnita de la Nurenberga Tribunalo kiel nazia militkrimulo. Kaj mi pensas, ke vi estas la filo de la generalo, kiu estis la stabestro de **Hitler**... Do, kiel vi klarigas kial vi financas la PSOE-on?* ***Von Brauchitsch*** ne hezitis respondi: *Ni celis bari la vojon al la komunismo kaj la partio plej bone situita por fari tion estis la PSOE.* Embarasita, ***Felipe González*** prononcis tiun faman frazon: *Mi ricevis nek de **Flick**, nek de **Flock** eĉ unu pencon, nek peseton.* Tamen, en la parlamenta enketa komisiono, la koncernatoj konsentis konfesi, ke la Fondaĵo ***Friedrich Ebert*** asignis milionon da markoj al Hispanio, sed ili trovis leĝan truon tra kiu eskapi: ili ricevis la monon unu jaron antaŭ ol oni estis malpermesinte al la hispanaj partioj ricevi eksterlandajn donacojn. La hispana Parlamento aprobis absolvon al ***Felipe González*** per 263 voĉdonoj, akceptante la konkludojn de la komisiono koncerne al la manko de pruvoj. Evidentas ke, spit' al la nedubeblaj politikaj ŝanĝoj, la politikista klaso restis konvinkita ke al la regantaro estis ĉio permesita, kiel ni vidos per la sekvaj skandaloj.

- Kazo de rezervitaj fondusoj: deturnigo de monrimedoj destinitaj al la batalo kontraŭ terorismo kaj drogokomerco kun valoro de 5 milionoj da eŭroj inter 1987 kaj 1993 por privata uzo,

persona riĉigo kaj pago de kromsalajroj kaj gratifikoj al sep altrangaj funkciuloj de la Ministrejo pri Internaj Aferoj.

- Kazo de ***Osakidetza***: en la konkursaj ekzamenoj por la Eŭska Sanservo en 1990, estis detektita amasa "ŝanĝo" de ekzamenoj, kio devigis ripeti grandaparton el la testoj, en kiuj estis partoprenintaj preskaŭ 50.000 kandidatoj. Pro ilia supozata rilato kun ĉi tiu kazo, estis arestitaj ***Pedro Pérez***, direktoro de ekonomia administrado de ***Osakidetza***, kaj tri aliaj aktivuloj de la PSOE, akuzitaj pri fraŭdo kun la celo favori anojn de la PSOE kaj UGT kaj instali grupon da afinaj homoj en postenoj de respondeco.

- Operacio ***Mengele***: supozata kidnapo kaj kontraŭleĝa eksperimentado kun tri almozuloj, unu el kiuj mortis, far la CESID kaj la kardiologo ***Diego Figuera***, por testi sedativon kiu estis administrota al la ETA-gvidanto ***Josu Urrutikoetxea Bengoetxea***, kiun oni planis kidnapi. La procedura kaŭzo, instrukciita de la juĝisto ***Garzón***, estis suspendita en 1999 laŭ peto de la Oficejo de la Ĝenerala Prokuroro.

- Kazo CESID: kontraŭleĝa teleaŭskultado farita de la hispanaj sekretaj servoj en la sidejo de ***Herri Batasuna*** en Vitorio.

- Kazo Kazinoj: deturno de proksimume 3.000 milionoj da pesetoj de la kompanio ***Casinos-Inverama*** fare de ĝia prezidanto, ***Artur Suqué***, milo el kiuj estus uzataj por kontraŭleĝa financado de ***Convergencia i Unió***.

- Kazo ***Urralburu***: komploto por subaĉeto pro la ricevado de kontraŭleĝaj komisionoj en publikaj konstrulaboroj efektivigita de la registaro de la socialista prezidanto de Navario, ***Gabriel Urralburu***, inter la jaroj 1987 kaj 1991. ***Urralburu***, estis procesita kaj juĝita kune kun la ekskonsilisto ***Antonio Aragón Elizalde***.

- Kazo Tombejo: privatigo de la Funebra Servo de la Magistratanaro de Madrido kontraŭ 100 pesetoj en 1992. La adjudiko de 49 elcento al la kompanio ***Funespaña*** estis juĝita pro akuzo de defraŭdo de publikaj monrimedoj, administra misfarado kaj influo-komerco. La kasacia kortumo diktis punan sentencon kontraŭ ***Luis María Huete***, unua vicurbestro en 1993, kaj ***José Ignacio Rodrigo***, prezidanto de ***Funespaña***.


- Kazo ***Godó***: kontraŭleĝa subaŭskultado aŭ telefona spionado farita en 1992 de eksaj agentoj de la CESID al dungitaro de la gazeto ***La Vanguardia***, komisiita de la entreprenisto ***Javier Godó***, kiu estis finfine senkulpigita. La polica raporto akuzis



**Luis María Huete**



**Javier Godó Muntañola**



**Jordi Planasdemunt**



**Luis Pascual Estevill**




*Carmen Salanueva*



*Francisco Palomino*



*Juan Hormaechea*



*Gabriel Cañellas*

CESID-on mem pri kontrolo de la reto.

- Kazo BFP: en 1992, oni malkovris delikton de fraŭdo farita per reto de falsaj firmaaj biletoj de BFP-Prifinanca Administrado kaj Konsilado, je valoro de 4.000 milionoj da pesetoj. En 1994, ***Jordi Planasdemunt***, altranga oficisto de CiU kaj ĝenerala direktoro de la Kataluna Instituto pri Financo, kaj 10 aliaj homoj, inter ili ***Salvador Forcadell***, ***Carles Vila*** kaj ***Joan Basols***, estis procesitaj kaj enprizonitaj.
- Kazo ***Estevill***, intrigo de juĝa korupto rilate al la eksa juĝisto kaj eksa membro de la Ĝenerala Konsilio de la Juĝistaro, ***Luis Pascual Estevill***, juĝita pro deliktoj de subaĉeto kaj falsado.
- Kazo ***Turiben***: supozata reto de malveraj fakturoj uzataj de miloj da armeanoj kaj policanoj por fraŭdi la Ŝtaton pravigante vojaĝ-elspezojn.
- Kazo ***Salanueva***: Aresto de la eksa direktorino de la BOE (Ŝtata Oficiala Bulteno), ***Carmen Salanueva***, pro supozata fraŭdo la 29-an de novembro 1993. Oni taksas, ke ŝi eble faris fraŭdon akirante gazetpaperon kun totala valoro de 2.385 milionoj da pesetoj, multe pli alta prezo ol tiu de la merkato, kaŭzante perdon de pli ol 653 milionoj por la BOE kaj la Fisko. Ŝi estis liberigita la 1-an de decembro. En 1994 ŝi estis denuncita pro pertelefona imitado de la voĉo de ***Carmen Romero***, tiama edzino de ***Felipe González***, kaj la Reĝino por konservi pentraĵojn de fama pentristo per malveraj promesoj.
- Kazo ***Palomino***: la bofrato de ***Felipe González***, ***Francisco Palomino***, gajnis 346 milionojn da pesetoj dank' al la vendo de sia firmao, en teknika bankroto, kontraŭ 310 milionoj al CAE, (poste aĉetita de ***Dragados***), kies postulo pri kontraktoj por la MOPU (Ministerio de Publikaj Konstruaĵoj kaj Urboplanismo) multiĝis. Poste, enketo ligis lin al la malbona kvalito de la stangoj en la Sevila malliberejo.
- Kazo ***Hormaechea***: malversacio kaj defraŭdo de publikaj monrimedoj fare de la populara ***Juan Hormaechea***, eksa urbestro de Santandero kaj eksprezidanto de Kantabrio, kondamnita en oktobro 1994 al ses jaroj da malliberejo kaj 14 jaroj da malkvalifiko por politika rolado.
- Kazo de la minejoj: kontraŭleĝa subvencio al minindustriaj kompanioj far ***Miguel Ángel Pérez Villar***, eksa senatano por la PP kaj Ministro de Ekonomio de Kastilio kaj Leono, kondamnita de la Supera Kortumo al ok jaroj da malkvalifiko

por politika rolado pro daŭra fraŭdo.
- Kazo ***Sóller***: fraŭdo kaj subaĉeto en la aljuĝo de la tunelo de Sóller-laboroj de la ekspreziđanto de Balearoj de la PP, ***Gabriel Cañellas***. Absolvita pri malbonfarado en tribunalo, la pruvita delikto de fraŭdo estis preskribita.
Ĉiuj-ĉi lastaj kazoj, kiel oni povas konstati, rilatas al prikoruptaj skandaloj en kiuj estas implikitaj politikistoj kaj institucioj de la ŝtato. Ne ĉiuj el ili koncernas al la socialista partio kiu regis la landon dum tiu periodo. Ankaŭ la opozicia AP kaj la naciismaj partioj de Eŭzkadio kaj Katalunio deliktis kaj fraŭdis en la regionoj kaj municipoj kie ili regadis.
Jes, temis pri ĝenerala situacio kaj sensacio de korupteco. Kiel dirite, tiun situacion oni alnomis tiam "la kulturo de la pilkobato". La politikistoj kaj influopovaj personoj povis pensi ke ili estis "ne-puneblaj", kaj multaj el tiuj fraŭdistoj, fakte, restis senpunaj, aŭ preskaŭ, en la juĝ-procesoj kiujn oni faris al ili. En iuj kazoj la proceso tiom longe daŭris ke la procesatoj mortis antaŭ la diktado de la sentenco, kiel en la kazo de ***Carmen Salanueva***, aŭ ili estis jam sufiĉe multaĝaj por ke oni ne povu enkarcerigi ilin.
La kazo de la vestaĵoj de ***Pilar Miró*** estas ridinda afero kompare al tiuj fraŭdoj de milionoj da pesetojn jam priskribitaj. Ŝi redonis la preskaŭ 24.000 eŭrojn, kiuj estis elspezitaj por vestaĵoj, kaj lasis la tribunalojn decidi sen premo. La kinoreĝisorino estis absolvita. ***Pilar Miró*** neniam neis, ke ŝi aĉetis la kostumojn kaj defendis ke ili estis por protokola uzo kiel Direktorino de la oficiala Radio-Televido. La problemo estis ke la buĝetoj de la oficiala televida ento ne antaŭvidis ĉi tiun tipon de reprezentaj elspezoj. La Provinca Juĝejo de Madrido procesis ŝin pro la menciita elspezo por kostumoj kaj pro liverado de donacoj pagitaj per publika mono taksitaj je preskaŭ tridek mil eŭroj. Menciindas ke la AP-politikisto ***Luis Ramallo***, kiu denoncis tiun kazon de ***Pilar Miró***, estis procesita 10 jarojn poste pro lia implikiĝo en alia skandalo, tiu de GESCARTERA, pri kiu ni devos okupiĝi ĝiamomente.
Sed pri tiu kazo de ***Pilar Miró*** notindas ke dum iom da tempo ŝi rifuzis demisii konsiderante ke ŝi rajtis fari tion kion ŝi faris. Ĝenerale, tiele teniĝis, kaj daŭre teniĝas, la multaj politikistoj, finacistoj kaj potenculoj de nia lando kiuj fraŭdis dum la sekvintaj etapoj. Ni devos priraporti multegon da tiaj kazoj laŭlonge de nia priskribo de la korupto en Hispanio.


Doktoro *Diego Figuera*


*Salvador Forcadell*


*Miguel Pérez Villar*


*Pilar Miró*




Post la balota socialista malvenko de marto de 1996, ***Felipe González*** neatendite demisiis kiel ĝenerala sekretario de la PSOE ĉe la 34-a Kongreso en junio 1997. Li estis anstataŭigita de ***Joaquín Almunia***, kiu heredis dividitan partion kaj devis alfronti renoviĝintan popolan oprobon kiam oni publikigis la sentencojn de juĝoj en la kazoj: FILESA, ***Roldán*** kaj GAL.

Sen absoluta parlamenta plimulto, ***José María Aznar*** devis serĉi la subtenon de la CiU de ***Pujol*** kun 16 parlamentaj seĝoj, tiun de la PNV kun 5 seĝoj kaj la Kanaria Koalicio kun 4, kio igus ke Eŭskio kaj Katalunio plibonigis sian memregadon. Dum preskaŭ du monatoj, ***Macià Alavedra*** kaj ***Joaquim Molins***, nome de CiU, negocis interkonsenton kun ***Mariano Rajoy*** kaj ***Rodrigo Rato***. El tio rezultis la t. n. "Pakto de la ***Majestic***" kiu estis subskribita de ***Aznar*** kaj ***Pujol*** ĉe vespermanĝo en la samnoma hotelo la 28-an de aprilo. Similaj intertakordoj okazis inter la PP kaj la PNV. La pakto signifis la forigon de la posteno de civila guberniestro kaj la finon de la deviga militservo, krom duobligi la procenton de la enspezado el la impost-kolektado cedita al Katalunio (de 15 ĝis 30 procentoj), kaj transdonon de la povoj de polico, infrastrukturo, ŝoseoj kaj havenoj. ***Francisco Álvarez Cascos*** estis la ĉefa vicprezidanto de la registaro de ***Aznar***, kaj la Dua Vicprezidanto kaj Ministro pri Ekonomio kaj Financo estis ***Rodrigo Rat***o. ***Rajoy*** iĝis Ministro pri Publika Administrado. La PP lanĉis programon de ekonomia liberaligo. Por faciligi la rilatojn kun ***Pujol***, la katalunа ekonomikisto ***Josep Piqué*** estis nomumita Ministro pri Industrio kun la misio privatigi parton el la publika industrio. La streĉa tono en la rilatoj kun la PSOE estis konservita, kaj ĉiuj dungitoj de la Ŝtata Administracio, kiuj bonrilatis kun la socialistoj, estis rapide elpurigitaj.

La unua tasko entreprenita de la popola registaro estis la totala likvido de la Nacia Instituto de Industrio, jam iniciatita de ***Carlos Solchaga*** kaj ***Pedro Solbes***. Entute, 43 firmaoj estis privatigitaj, kun perdo de proksimume 60.000 laborlokoj. Tamen, la sen-laboreco baldaŭ malkreskis en la ĝenerala kunteksto de la tiama ekonomia ekspansio, sed la laborkondiĉoj komencis malboniĝi pro la iompostioma anstataŭo de la fiksaj per eventualaj laborkontraktoj.

***Aznar*** alvenis al la politika potenco kun kompromiso prezenti "puran registaron" kaj trovi homojn por administri la publikajn firmaojn estante sufiĉe riĉaj por ne emi fraŭdi. Tamen, la nomumoj -ofte de personaj amikoj liaj- igis pridubi la sincerecon de lia batalo kontraŭ la korupto. Ekzemple, ekzistis suspektoj pri la ligoj de ***Josep Piqué*** kun ***Javier de la Rosa***. ***Piqué*** prezidis de 1989 ĝis 1992 la firmaon de oleo kaj lubrikaĵoj ERTOIL, filio de la nafto-firmao ERCROS, kiu estis parto de la ***Grupo Torras-KIO***, kaj estis duboj pri kiu estis lia rolo en la vendo de ERTOIL en 1991, labirinta operacio malantaŭ kiu estis ***Javier de la Rosa***. La kazo estis fine esplorita post jardeko, sed la juĝisto fermis ĝin en 2007 pro manko de pruvoj. Dume, ***Piqué*** plurfoje rolis kiel ministro kaj forlasis la Registaron en 2003, post kio li plu prosperis kiel prezidanto, direktoro aŭ konsilisto de 25 publikaj kaj privataj kompanioj.


Jordi Pujol i Soley



Rodrigo Rato

Unu el la amikoj de ***Aznar***, ***Juan Villalonga***, estis nomumita prezidanto de ***Telefónica***. Li igis la firmaon potenca telekomunika multnacio kompanio dank' al ĝia ekspansio en Latin-Ameriko kaj interakordoj kun telekomunikaj firmaoj en Britio kaj Usono, kiuj kaŭzis ĝian akcian prezon altiĝi. Tamen, en junio 2000, enketo de la ĵurnalo ***El Mundo*** konkludis ke Villalonga, kune kun ***Alberto Cortina Alcocer***, bankiero kaj konstrumagnato, amasigis en 1998 riĉaĵon, uzante konfidencan informon kaj liajn akciopciojn por aĉeti akciaron de la firmao antaŭ la granda vastiĝo de ***Telefónica*** kaj vendi ĝin post kiam ĝia akcioprezo tre altiĝis. La 24-an de julio, la Nacia Borsa Komisiono (CNMV) komencis siajn esplorojn. La rezultaj onidiroj igis ke la registaro de ***Aznar*** ĉesigu la prezidantecon de ***Telefónica*** de ***Villalonga***, kvankam la CNMV-enketo estis fermita la 2-an de aŭgusto konkludante ke estis nesufiĉa indico de uzo de sekreta informo por pravigi la iniciaton de sankcia proceduro.


Mariano Rajoy


Francisco Alvarez Cascos

***Villalonga*** estis anstataŭita, en la prezidanteco de ***Telefónica***, de ***César Alierta***, ĝis tiam prezidanto de la ŝtata tabaka monopolo, ***Tabacalera***, kies kariero ne estis tre malsama ol tiu de sia antaŭulo. Komence de 2002, alia enketo de ***El Mundo*** rivelis ke ***Alierta*** kaj lia edzino formis invest-entreprenon kiun, en 1997, ili vendis al sia nevo ***Luis Javier Plácer***. Fine de 1997, la prezo de ***Tabacalera*** altiĝis pro sia akiro de iu usona kompanio. Dank' al la privilegiaj informoj pri la baldaŭa aĉeto, la firmao, kiun ***Alierta*** vendis al ***Plácer***, akiris grandan nombron da akcioj de ***Tabacalera***, kio donis al li profiton de 309 milionoj da pesetoj kiam li vendis ilin post ses monatoj. Kiel rezulto de la akuzoj


Josep Piqué Camps

de ***El Mundo***, la Oficejo de la Speciala Prokuroro kontraŭ la Korupto kaj Organizita Krimo komencis esplori ***Alierta***-on pro influo-trafiko kaj uzo de privilegiaj informoj. La kazo estis prezentita antaŭ la Provinca Juĝejo de Madrido, sed estis malakceptita en novembro de 2005 pro tio ke la afero jam estis preskriptiĝinta. Tamen, la kasacia kortumo insistis ke la kazo devus iri al testo. Post serio de prokrastoj, en julio 2009 la kazo estis definitive arkivita, kaj ***Alierta*** daŭrigis sian tre sukcesan karieron ĉe ***Telefónica***.



**Juan Villalonga**



***Alberto Cortina Alcocer***



***César Alierta* kaj edzino**



**Luis Javier Plácer**



***Jaime Mayor Oreja***

Dum la unua registaro de la PP, milito estis deklarita kontraŭ ETA, por kio la Ministro pri Internaj Aferoj, ***Jaime Mayor Oreja***, atingis la kunlaboron de Francio. En januaro 1996, la kidnapo, far la terorista grupo, de ***José Antonio Ortega Lara***, prizonestro kaj PP-aktivulo, kaj lia posta terura kaptiteco en kelkarcero dum 532 tagoj provokis la rifuzon de la loĝantaro. ETA vane postulis la translokigon de ĉiuj malliberuloj de la organizo al malliberejoj en Eŭskio. ***Ortega Lara*** estis savita la 1-an de julio 1997. Post iom pli ol unu semajno, la teroristoj serĉis alian viktimon: ili kidnapis ***Miguel-Ángel-Blanco***-n, magistratano de PP en Ermuo, kaj faris la saman postulon, kiu estis rifuzita de la Registaro. ETA respondis per malvarma sanga murdo de ***Blanco*** la 13-an de julio. La krimo inspiris grandajn manifestaciojn kaj kaŭzis la aperon de la t. n. "Ermua spirito", ondo de popola malakcepto kiu draste reduktis subtenon al ETA. Tamen, malgraŭ la severa retoriko, dum la unua PP-registaro, 135 ETA-malliberuloj estis translokigitaj al eŭskaj malliberejoj kaj aliaj 207, el totalo de 535 malliberuloj apartenantaj al la organizo, estis liberigitaj.


***Aznar*** kunvokis balotadon por la 12-a de marto de la jaro 2000 por profiti la pozitivan ekonomian situacion, la aŭron de korupto, kiu ankoraŭ ĉirkaŭis la PSOE-on kaj la fakton, ke la malpuraj aferoj de gravaj PP-figuroj ankoraŭ ne estis publike konataj. La partio de ***Aznar*** atingis absolutan plimulton en la Kortesoj kun 10,3 milionoj da voĉdonojn kaj 183 parlamentajn seĝojn, 27 pli ol en 1996. La PSOE ricevis nur 125, 16 malpli ol kvar jarojn antaŭe. Ankaŭ la sukcedinta partio de la komunistoj, Unuiĝinta Maldekstro, falis de 21 al 8 seĝoj. ***Joaquín Almunia*** eksiĝis kiel ĝenerala sekretario de la PSOE kaj estis sukcedita de ***José Luis Rodríguez Zapatero***.

En septembro de 2001, ***Vicente Martínez Pujalte***, la priekonomia proparolanto de la PP, deklaris ke korupto estis neebla dum

lia partio regus. Ne pasis multe da tempo antaŭ tio ke altrangaj oficistoj de la PP estis akuzitaj pri subaĉeto kaj korupto, inkluzive ***Martínez Pujalte*** en 2016. Eĉ antaŭ la balotado de marto de la jaro 2000, la amaskomunikilaro amplekse priraportadis tion, kion estis nomita «linfraŭdo».

La kultivado de lino, por la produktado de linoleo kaj teksaĵuzo, estis subvenciita de la Eŭropa Unio po 120.000 pesetoj (proksimume 720 eŭroj) je hektaro. Kiam estis Ministrino pri Agrokulturo ***Loyola de Palacio y del Valle Lersundi***, de 1996 ĝis 1998, grandaj etendaĵoj de lino estis plantitaj en terenoj apartenantaj al parencoj de altranguloj de la Ministerio pri Agrikulturo kaj gravuloj kiel ekzemple la Dukino de ***Alba*** kaj ***Mario Conde***. La nombro da hektaroj plantitaj per lino, kiuj en 1994 estis apenaŭ ducent, altiĝis ĝis tridek mil en 1998, malgraŭ tio, ke ĝi estis maltaŭga rikolto por la koncernaj areoj, inter kiuj estis terenoj antaŭe dediĉitaj al tritiko kaj aliaj utilaj kultivaĵoj. La plej granda parto de la kultivita lino, kiu ne estis vendita, estis lasita putri sur la kampoj aŭ brulita. En aprilo de 1999, ***Nicolás López de Coca***, ĝenerala direktoro de la ento komisiita de demarŝado de subvencioj kun la Eŭropa Unio, demisiis kiam iĝis konata ke membroj de lia familio estis inter la profitantoj de la subvencioj. En decembro 2000, la Kontraŭkorupta Prokuroro komencis esplori eblajn deliktojn kaj informis la Eŭropan Komisionon pri la ekzisto de fraŭdo en la subvencioj de Eŭropa Unio al teksa lino. La PP impete neis, ke ***Loyola de Palacio***, kiu tiam estis vicprezidantino de la Eŭropa Komisiono, faris ajnan fraŭdon. En aprilo 2007, la Nacia Kortumo konsideris ke tiuj kiuj profitis el la eŭropaj subvencioj faris nenion kontraŭleĝan.

La korupto en rilato kun la Registaro estis en la frontpaĝoj de la ĵurnaloj informante pri la kazoj GESCARTERA en 2001 kaj BBVA (***Banco Bilbao Vizcaya*** ARGENTARIA) en 2002. En junio 2001, la CNMV malkovris ke la invest-demarŝa firmao GESCARTERA, trompis siajn klientojn, inter ili iujn episkopojn, tridek religiajn ordenojn kaj la investo-fonduson de la Polico, laŭ sumo de 88 milionoj da eŭroj. La vicministro pri financoj de PP, ***Enrique Giménez-Reyna***, demisiis la 21-an de julio. Lia fratino ***Pilar*** estis la prezidantino de GESCARTERA, kaj estis akuzita je kontraŭleĝa alpropriigo. En septembro, ***Giménez-Reyna*** estis esplorita pro tio ke li faciligis kontaktojn inter sia fratino kaj ***Pilar Valiente***, prezidantino de la CNMV, kio kaŭzis la eksiĝon de ***Valiente*** la 21-an de septembro, post kiam ŝi estis


***José A. Ortega Lara***


***Miguel Angel Blanco***


***Joaquín Almunia***


***José Luis R. Zapatero***



***Vicente Martínez Pujalte***



*Loyola de Palacios*



*Nicolás López de Coca*



*Enrique Giménez-Reyna* kaj lia fratino *Pilar*



*Pilar Valiente Calvo*



*Antonio Camacho Friaza*

akuzita je provizado de konfidencaj informoj al GESCARTERA kaj ricevado de donacoj el la firmao. Kiam la kazo finfine venis al la proceso en 2007, la tribunalo punis la posedanton de la firmao, ***Antonio Camacho Friaza***, per 11 jaroj da malliberejo kaj ĝian prezidanton, ***Pilar Giménez-Reyna***, al tri. En januaro 2002, estis rivelita ke ***Baltasar Garzón*** lanĉis gravan enketon en la sekretajn kontojn tenitajn fare de BBVA en fiskaj paradizoj. Du direktoroj de la firmao eksiĝis en decembro 2001, sekvotaj de pliaj kvar en aprilo 2002, pro ilia implikiĝo en supozataj deliktoj de impost-fraŭdo, kontraŭleĝa alpropriigo de la pensia fonduso kaj tenado de sekretaj kontoj en fiskaj paradizoj.


La tre trumpetata aŭstereco de ***Aznar*** iĝis pridubinda okaze de la geedziĝo de lia filino ***Ana*** kun unu el liaj konsilistoj, ***Alejandro Agag***. La ligo, festita en la monaĥejo de ***El Escorial*** la 5-an de septembro de 2002, estis okazaĵo simila al reĝa geedziĝo. Inter la mil cent invititoj estis la gereĝoj de Hispanio, la registrar-estroj de Britio, Italio kaj Portugalio, same kiel kelkaj hispanaj altranguloj kaj politikistoj. Estis dudek kvin atestantoj ĉe la ceremonio, unu el ili estis ***Francisco Correa***, la ulo kiu poste iĝis la protagonisto de la fama GÜRTEL-kazo. ***Agag*** neis en 2009 ke li havis ajnan komercrilaton kun ***Correa***, sed lia nomo aperis en la sekretaj kontoj de unu el la esencaj partneroj de ***Correa***, lia libro-tenisto, ***José Luis Izquierdo López***. ***Correa*** posedis kelkajn vojaĝ- kaj event-agentejojn, kiuj ĝuis iom da sukceso kaj jam organizis la feriojn de kelkaj altrangaj gravuloj de la PP, al kiuj li estis prezentita fare de liaj amikoj de la junularo de la partio, **Novaj Generacioj**, de kiu ***Agag*** estis sekretario. Eĉ tiam estis iuj, kiuj scivolis, kiel iama fiska inspektisto kia ***Aznar*** povis pagi tian grandiozan geedziĝan bankedon, kiu inkludis la donacon de vino de kelkaj famaj vinfaristoj. Post dek unu jaroj, la esploroj de la kazo GÜRTEL malkaŝis ke ***Correa*** donis 32.452 eŭrojn por pagi la lum- kaj son-kostojn kaj ke diversaj donacoj por la geparo estis ŝarĝitaj al la kontoj de GÜRTEL. ***Aznar*** ĉiam neis, ke publika mono estis elspezita por la geedziĝo; tamen, sendepende de la kostoj de la geedziĝa bankedo, la Urbodomo de ***El Escorial*** zorgis pri la grava elspezo en transportado, homamas-kontrolo kaj parkado por la gastoj.

Kiel fono, eta korupto regis ĉefe en la sektoro de la konstruado. Unu el la esencaj dispozicioj -kaj ja la plej damaĝa- prenitaj de la unua registaro de ***Aznar*** estis tiu rilate al la ter-liberaligo. Tiu ĉi leĝa ŝanĝo, kombinita kun la alveno de malaltekosta


kredito post la eniro de Hispanio en la eŭro-monunuon, generis la konstru-eksplodon kiu estis la motoro de la hispana ekonomia kresko dum la sekvintaj dek jaroj. La havebleco de facila mono ekigis tutan serion da kritikindaj praktikoj, kiel ekzemple la fraŭda reklasifikado de tereno, la aljuĝado de serv-kontraktoj ŝanĝe de makleraĵoj por politikaj gvidantoj, kaj la konstruado de infra-strukturo kaj nenecesaj emblemaj laboraĵoj kiel ekzemple la Grandurbo de la Artoj kaj la Sciencoj de Valencio. Ĉi-lasta kostis preskaŭ 1.300 milionojn da eŭroj, pli ol kvaroble kio estis buĝetita, kaj estas ekzemplo de tio, kion ***Antonio Muñoz Molina*** nomis "la plej senutilaj kaj plej multekostaj arkitekturoj en Eŭropo". En la urba medio, aperis amaso da publikaj kaj privataj entoj, al kiuj, sen institucia kontrolo estis subkontraktitaj urba planado, rubkolekto, stratpurigado, akvo- kaj energi-provizo, publika trans-porto kaj aranĝo de eventoj. Unu el la plej lertaj demarŝantoj pri tiuj taskoj estis ***Francisco Correa***, kiu konvinkis municipajn funkciulojn falsi kontraktojn favore al firmaoj kiujn li kontrolis. La prezo de la kontrakto estis ŝveligita kaj la politikistoj kolektis sian subaĉetaĵon. Aliĝo al politika partio ofte havigis al ne-kvalifikitaj kandidatoj postenojn de respondeco en provincaj ŝparkasoj, kie ilia avideco aŭ tiu de iliaj politikaj mastroj eventuale kondukis al la disfalo de la entoj kaj la perdo de ŝpar-aĵoj de la malgrandaj investintoj.



**Geedziĝo de *Alejandro Agag* kaj *Ana Aznar***



***Francisco Correa***



***José Luis Izquierdo López***



***Konsiderante la vivo-vojon de multaj gastoj de la geedziĝ-festo de la filino de Aznar, ŝajnas ke tiu ĉi evento povas esti pritaksata kvazaŭ kongreso de koruptuloj.***



**Eugenio Hidalgo**



**Jaume Massot**



**Jaume Gibert**



**Jaume Matas**

Hispanio disipis inter 80 miliardoj kaj 90 miliardoj da eŭroj en "nenecesaj, forlasitaj, subuzitaj aŭ malbone planitaj infrastrukturoj" inter 1995 kaj 2016, laŭ lasttempaj esploroj per kombino de malŝparo, malefika uzo de publikaj rimedoj kaj korupto. La manko de reguligo, travidebleco kaj kontado permesis ke la nenecesaj publikaj konstru-kontraktoj estis aljuĝitaj je ŝveligitaj prezoj al la karteloj, en tio kio estis nomita "kapitalismo de amiketoj". Triono el tiu sumo (26.200 milionoj da eŭroj) estis elspezita por nenecesaj sekcioj de la altrapida fervoja reto, inkluzive de fervojaj stacidomoj sur linioj kiuj rapide fermiĝis pro manko de uzo aŭ restis nefinitaj. La ***Castellón***-flughaveno estis inaŭgurita en marto 2011 sen la koncernaj flugpermesoj kaj logike devis alfronti gravajn perdojn dum pluraj jaroj. La kvar-kilometra dromo en la flughaveno de ***Ciudad Real*** estas la plej longa en Hispanio. Kvankam la urbo havis malpli ol 74.000 loĝantojn, la flughaveno estis kapabla servi 2,5 milionojn da pasaĝeroj jare. Inaŭgurita en oktobro de 2008, ĝi akumulis ŝuldon de 300 milionoj da eŭroj, fermiĝis kvar jarojn poste kaj estis vendita en 2016 kontraŭ dudekono de la origina kosto de unu miliardo da eŭroj.

La konstru-kompanioj transdonis tekojn plenajn je mono al municipaj oficistoj page de ter-reklasifiko. Dum la du regad-periodoj de ***Aznar***, la senlaboreco falis al 11,5 elcento pro la laborpostenoj kreitaj dum la konstru-prospero. La liberaligo kaŭzita de la Ter-leĝo de aprilo de 1998 draste pliigis la disponeblan terenon por urba evoluo, sed ne sufiĉe por eviti ke la konstru-entreprenoj serĉadu pli da tero, ofte per koruptaj rimedoj, kiel reliefigite per la fakto ke la nombro da loĝejoj komencitaj konstrui kvaroblîĝis sub la mandato de la Populara Partio. En 2010, pli ol 150 municipoj estis esploritaj fare de la Imposto-Agentejo pro impost-fraŭdo, mon-lavado aŭ subaĉeto de publikaj oficialuloj. La plej multaj estis sur la mediteranea marbordo de Andaluzio kaj la Valencia Komunumo. La plej ofta formo de korupto en la konstru-sektoro estis la subaĉeto de municipaj aŭ provincaj oficialuloj far posedantoj de kampara tero por kontraŭleĝe reklasifiki ĝin kiel "urba", tre pliigante ĝian valoron. Iuj funkciuloj vendis al entreprenistoj neleĝajn konstru-permesojn kiuj faciligis kontraŭ-leĝan konstruadon de miloj da hejmoj sur agrikultura tero.


La aĉetintoj de tiuj hejmoj poste renkontis minacojn je malkonstruo far aliaj municipaj oficialuloj. En la kazo de ***Catral*** (Alikanto), pli ol 1.200 hejmoj estis konstruitaj post kiam municipaj funkciuloj de la Urbodomo donis ne-leĝajn permesojn al la konstruo-firmaoj, kun kies entreprenistoj ili estis enparencigitaj. Multaj el la viktimoj estis eksterlandanoj kiuj estis trompitaj de iliaj advokatoj. La Junto de Andaluzio agnoskis ke ekzistis proksimume 250.000 eksterleĝaj posedaĵoj en la regiono, kio lasis iliajn posedantojn en pridubinda laŭleĝeco. Alia paradigma kazo estis tiu de ***Andratx***, en la insulo Majorko. En novembro de 2006 estis arestitaj la urbestro ***Eugenio Hidalgo***, la ĝenerala direktoro de la Tera Planado de la Baleara Registaro ***Jaume Massot***, la municipa estro de publikaj konstrulaboroj ***Jaume Gibert*** kaj la jura konsilisto de la Urbodomo ***Ignacio Mir***. Ili estis akuzitaj je akceptado de subaĉetaĵoj ŝanĝe de provizado de atestiloj por permesi la konstruadon de vilao por la urbestro, restoracio kaj 11 domoj kun naĝejoj sur protektita kampara tero. Komence, la Baleara Registaro, estrita de la fifame korupta ***Jaume Matas*** de la Populara Partio, rifuzis procedi laŭ la denuncoj pri la deliktoj. Akuzitaj pri falsaj dokumentoj, subaĉeto, urbo-planisma fraŭdo kaj deliktoj kontraŭ la medio kaj la teritoria planado, estis kondamnitaj inter aliaj, ***Hidalgo***, ***Massot*** kaj ***Gibert*** al prizon-punoj, dum ***Mir*** devis alfronti la pagon de monpuno.
***Jaume Matas***, Ministro pri Medio de ***Aznar*** de 2000 ĝis 2003 kaj Prezidanto de la Balearaj Insuloj de 1996 ĝis 1999 kaj de 2003 ĝis 2007, kaj lia edzino, ***María Teresa Areal***, elstaris pro siaj investoj en luksaj posedaĵoj kaj vivmaniero. Kiel prezidanto de la Baleara Registaro, ***Matas*** estis implikita en kelkaj kazoj de korupto. La plej konata estis la ciklodromo de ***Palma Arena***, kies komenca buĝeto de 27 milionoj estis superita per 83 milionoj da eŭroj. Krom lia persona riĉiĝo, la mono estis uzata por pagi la balot-elspezojn de la PP en 2007. En la kazo ***Palma Arena***, ***Matas*** estis juĝita pro defraŭdo de publikaj financoj, monlavado kaj misbonfarado, sed temis pri labirinta afero en kiuj, krom ***Matas***, partoprenis multaj aliaj, kiel la bofilo de la reĝo, ***Iñaki Urdangarín***.
Alia skandalo kiu grave tuŝis la PP estis la tiel nomata kazo ***Brugal***. "***Brugal***" estis la akronimo, kiun la polico donis al la kazo de korupto en la aljuĝo de profitdonaj kon-traktoj por rubo-kolektado en la provinco de Alakanto: ***Basuras Rurales Gestión Alicante*** (Alakanta Administrado de Kampara Rubo). La esploro komenciĝis en marto 2006, sed baldaŭ ampleksiĝis por inkluzivi ĉantaĝon kaj subaĉeton de publikaj funkciuloj, ne nur rilate al rub-kolektaj kontraktoj, sed ankaŭ al la konsiderinde pli profitdona areo de rekvalifikado de agrikultura tero por la konstruado. En la centro de la kazo estis ***Ángel Fenoll***, la posedanto de kelkaj konstruaĵoj kaj rubaĵ-kolektaj kompanioj en ***Orihuela***, kiu estis kaj ĉefa protagonisto kaj la konfidulo kies revelacioj metis komencon al ega 13-jara enketo pri korupto en Alakanto. Dum multaj jaroj, ***Fenoll*** estis registrinta siajn komercajn konversaciojn kun municipaj kaj provincaj aŭtoritatoj per kaŝita filmilo en sia oficejo. La decida momento estis en 2006, kiam oni anoncis konkurson por la oferto por la rub-kolekta kontrakto en ***Orihuela*** kun la firmao de ***Fenoll*** kaj kvar aliaj, inkluzive de URBASER, lia plej firma rivalo. ***Fenoll*** pensis tiam ke la rezulto ne estos favora al li, sed ke URBASER venkus dank' al la subaĉetaĵoj ofertitaj al la



Iñaki Urdangarín



Ángel Fenoll



José Manuel Medina



Mónica Lorente



Luis Fernando Cartagena

urbestro, ***José Manuel Medina***, de la Popola Partio, kaj aliaj urb-konsilistoj. Krome, li estis maltrankvila ke ***Medina*** estis reklasifikonta iun agrikulturan teron por permesi la konstruon de tri mil domoj. Tiuspeca eksterleĝeco normale ne ĝenus lin, sed ĉi-kaze, la tero najbaris la posedaĵon kie ***Fenoll*** havis la rubo-deponejon kaj sian grandan privatan zoologian ĝardenon de afrikaj kaj aziaj bestoj.

Do, por fari premon sur ***Medina***, ***Fenoll*** apogis la kandidatecon de ***Mónica Lorente*** kiel urbestrino en la sekvonta balotado en ***Orihuela*** kaj minacis publikigi kompromitajn bendojn. La aferoj iris duonbone por li: ***Lorente*** estis elektita urbestrino en junio de 2007 sed, kelkajn semajnojn antaŭe, la komercisto kaj kvin aliaj homoj, inter ili lia filo, estis arestitaj pro ĉantaĝo.

Liberigita sub kaŭcio, profunde amarigita ***Fenoll*** minacis publikigi siajn registradojn de intervjuoj kun alakantaj komercistoj kaj politikistoj. Por kredindigi siajn minacojn, kaj kiel signo de sia arsenalo, li rememoris sian rilaton kun ***Luis Fernando Cartagena***, urbestro de la PP en ***Orihuela*** de 1986 ĝis 1995 kaj ankaŭ Ministro pri Publika Konstruo de la ***Generalitat Valenciana*** de 1995 ĝis 1998 sub la prezidanteco de ***Eduardo Zaplana***. En 1997, ***Cartagena*** aljuĝis al ***Fenoll*** la kontrakton pri rub-kolektado por la tuta marbordo de la regiono, ŝanĝe de kaŝado de iu delikto: ***Fenoll*** estis provizinta al li falsajn fakturojn por sumo de 49.000 eŭroj, kiujn ***Fernando Cartagena*** ŝtelis en 1993 el la mono donacita al ***Orihuela*** far la karmelitaj monaĥinoj de la municipa flegejo ***San Juan de Dios*** por sociaj projektoj. Kiam la kazo estis malkovrita en 1997, ***Cartagena*** bezonis kvitancojn por ŝajnigi ke la mono estis elspezita por tiuj sociaj projektoj. Ambaŭ estis juĝitaj pro tiu fraŭdo kaj ***Cartagena*** estis malliberigita kaj ***Fenoll*** monpunita. Ricevinte la egan kontrakton de ***Cartagena***, ***Fenoll*** montris sian dankon donante bonifikojn en siaj kompanioj al la parencoj de altranguloj de la PP, kiel ***Carmen Zaplana***, fratino de ***Eduardo***; financante lokan radiostacion kiu subtenis la PP-on, kaj, unufoje, pagi por du aŭtobusoj plenaj da PP-aktivuloj por voĉdoni en grava kunveno. Dek jarojn poste, en 2007, ***Fenoll*** deklaris per minaca tono: *Mi havas pli da registradojn. Mi esperas, ke mi ne devos uzi ilin. Tio signifos, ke mia komerco ne estas sundanĝere.*

En februaro de 2010, la kazo komplikiĝis kiam ***Fenoll*** kaj deksep aliaj komercistoj kaj municipaj oficialuloj estis akuzitaj je

impostfraŭdo preparante milojn da malveraj fakturoj. En junio, naŭ pliaj homoj estis arestitaj, inter ili ***José Joaquín Ripoll***, prezidanto de la Provinca Konsilio de Alakanto kaj estro de la PP en la provinco. La kontraŭkorupta prokuroro akuzis ***Ripoll***-on, la urbestrino de Alakanto, ***Sonia Castedo***, kaj lian antaŭulon, ***Luis Díaz Alperi***, pri korupto en apliko de la novaj dispozicioj por la rekvalifiko de terenoj en la provinco, la Ĝenerala Urba Planado. Ili estis akuzitaj je postulado de subaĉetaĵoj, influo-trafiko kaj vendado de internaj informoj al ***Enrique Ortiz***, loka konstrumagnato konata pro lia korupto. Inter aliaj aferoj, ***Ortiz*** estis la ĉefakciulo de ***Hércules CF***, kaj estis akuzita je subaĉetado de ***Córdoba CF*** kaj aliaj teamoj por ke ĝi perdu antaŭ la ***Hércules*** dum la sezono de 2009-2010 por certigi la promocion de lia teamo al la Plejalta Futbala Ŝtupo. ***Sonia Castedo*** neis la akuzojn, kvankam ŝi agnoskis esti akceptinta ekskurseton al Balearoj sur la jakto de ***Ortiz***. La kontraŭkorupta prokuroro akuzis ankaŭ administrantojn de BANCAJA kaj la eksprezidanton kaj direktoron de ***Caja de Ahorros del Mediterráneo***, ke ili estas implikitaj en ne-klara rekvalifiko de tero. En 2012, la enketo estis etendita al 29 homoj, inter ili la iama urbestro de ***Orihuela***, ***José Manuel Medina*** kaj la tiama urbestrino ***Mónica Lorente***. Oni asertis ke ***Lorente*** akceptis subaĉetaĵojn por garantii al ***Fenoll*** la kon-trakton por rubkolektado kiun ***Medina*** neis al li. La sekvoj de la kazo estis tiom multaj kaj kompleksaj ke ĝi ne venis al juĝo ĝis marto de 2019, kiam ĉiuj akuzitoj neis la akuzojn.

Somere de 2008, juĝa enketo estis lanĉita pri la kontoj kaj havaĵo de ***Carlos Fabra***, prezidanto de la Provinca Konsilio de ***Castellón*** de 1995 ĝis 2011, grava figuro de la PP en la Valencia Komunumo kaj aliancano de ***Zaplana***. ***Fabra*** estis hereda kaciko: lia patro, lia avo, lia praavo, du fratoj de lia praavo kaj praonklo estis prezidantoj de la ***Diputación*** antaŭ li. Estis malkovrite ke li deponis 15 milionojn da eŭroj en siaj pli ol cent bankkontoj, el kiuj almenaŭ ses milionoj estis deponitaj kontante sen ia dokumenta pravigo de ilia deveno kaj sen deklari ilin al la fisko. Entute, oni taksas, ke la multnombraj kontantdeponejoj de inter 40.000 kaj 100.000 eŭroj multobligis per 30 liajn enspezojn deklaritajn al la Fisko. En 1999, ekzemple, lia deklarita enspezo estis 73.000 eŭroj, sed li kaŝis pliajn 800.000 de la Fisko. Li asertis ke li gajnis 2,2 milionojn da eŭroj en la loterio en sep okazoj inter 2000 kaj 2004. Tiu neverŝajna bonŝanco estis la rezulto de ofta monlava mekanismo per kiu gajnanta bileto estas aĉetita per sumo


***José Joaquín Ripoll***


***Sonia Castedo***


***Luis Díaz Alperi***


***Enrique Ortiz***


***Carlos Fabra***



Pasqual Maragall



Artur Mas i Gavarró



María Victoria Álvarez



Jordi Pujol Ferrusola



José de la Mata

pli granda ol la kvanto de la premio, kio ebligas ke la premiomono estu metita en cirkuladon pura kaj senimposta. Kiam ***Fabra*** unue estis akuzita, ***Rajoy*** venis al lia helpo, nomante lin ekzempla civitano. ***Fabra*** fifamiĝis pro tio ke li promociis la konstruadon de la flughaveno de ***Castellón***, senutila projekto por pli granda persona gloro, kiu kostis al la provinco riĉaĵon. En novembro de 2013, li estis kondamnita al kvar jaroj en malliberejo pro subaĉeto, influo-trafiko kaj impostfraŭdo.

Ankaŭ aliaj partioj, krom la PSOE kaj la PP, estis implikitaj en koruptaj praktikoj. La deliktoj de CiU iĝis publike konataj post kiam ĝi perdis subtenon en Katalunio pro ĝiaj proksimaj ligoj kun la PP. La ĉefa profitanto de tiu perdo de subteno por CiU inter la katalunisma medio estis la ***Esquerra Republicana de Catalunya*** (Respublikana Maldekstro de Katalunio, ERC). En la balotoj de novembro 2003, la socialisto ***Pasqual Maragall*** venkis la posteulon de ***Pujol***, kiu estis la ekonomikisto ***Artur Mas***, sed ne atingis absolutan plimulton. En decembro, ***Maragall*** iĝis prezidanto de la ***Generalitat*** estrante koalicion de la PSC, ERC kaj la ***Iniciativa per Catalunya Verds*** (siavice, koalicio de komunistoj kaj verduloj). La tripartio regantis de 2003 ĝis 2010.

Same kiel la PP, ***Convergència i Unió*** kontraŭleĝe financis sin per makleraĵoj kontraŭ publikaj kontraktoj, fakto kiu iĝis publike konata sekve de debato en la Kataluna Parlamento la 24-an de februaro 2005 pri la disfalo de la tunelo de la metroo, kiu estis konstruita en la barcelona kvartalo de ***Carmel***. Responde al akuzoj pri registara neglektemo far la CiU-gvidanto ***Artur Mas***, la socialista prezidanto de la ***Generalitat***, ***Pasqual Maragall***, deklaris: "Vi havas problemon, kaj tiu problemo nomiĝas tri elcento", aludante al onidiroj, ke CiU ŝarĝis komisionon je 3 elcento por la aljuĝo de publikaj laboraĵ-kontraktoj. Kiam ***Mas*** minacis ĉesigi subtenon por la reformo de la Kataluna Statuto de Aŭtonomeco, ***Maragall*** estis dev-igita retiri la akuzon. Pli postaj juraj enketoj rivelis ke ***Convergència*** ricevis makleraĵojn pro publikaj laboraĵ-kontraktoj aljuĝitaj al konstru-firmaoj. Kiam firmao ricevis kontrakton, ĝi faris "donacon" ekvivalentan al 3 el-cento de la kontrakto al la ***Fundació Orfeó Català-Palau de la Música***, posedanto kaj administranto de la fama barcelona modernisma konstruaĵo, kiu siavice poste transdonis parton al la grupo de ekspert-uloj de ***Convergència***, la Fondaĵo ***Trias Fargas***.

Ekzemple, ***Ferrovial***, pere de ***Palau***, pagis makleraĵojn entute 5,1 milionojn da eŭroj por kontraktoj kiel la komplekso de konstruaĵoj destinitaj por juĝejojn kaj komplementajn servojn konatajn kiel ***Ciutat de la Justícia*** aŭ la ambicia linio 9 de la metroo de Barcelono.

En 2013, esploro pri la eksterleĝa financado de CiU, kiu estis daŭranta de iom da tempo, malkaŝis la personan korupton de ***Jordi Pujol***. La skandalo aperis kiam ***María Victoria Álvarez***, eks-amantino de lia plej aĝa filo, ***Jordi Pujol Ferrusola***, malkaŝis ke la familio havis gravajn bankkontojn en la fiska paradizo de Andoro. En respondo al la publike konataj revelacioj, en julio 2014, ***Jordi Pujol*** deklaris ke temis pri heredo el sia patro kaj ke li simple estis tro okupata por deklari ĝin al la fiskaj aŭtoritatoj. Tamen, ***María Victoria Álvarez*** deklaris ke ĝi estis mono el la makleraĵoj pro publikaj konstruolaboraĵoj. Tio kaŭzis etan tertremon en la kataluna politiko. La skandalo estis rilatita tiam al la bankroto de ***Banca Catalana***, sed estis pli ofte asociita kun la akuzo ke la ***Pujol***-klano ŝargis makleraĵojn al komercistoj dum la 23-jara  prezidanteco de ***Pujol*** en Katalunio. La juĝisto de la Nacia Tribunalo komisiita de la kazo, ***José de la Mata***, konsentis kun ***Maragall*** kiam li identigis pli ol cent firmaoj al kiuj estis aljuĝitaj kontraktoj de la ***Generalitat*** kaj de municipoj regataj de CiU, kiuj pagis makleraĵojn kun valoro de 11,5 milionoj da eŭroj al la familio ***Pujol***.

Gravaj figuroj de ***Convergència i Unió*** kaj la ***Partit dels Socialistes de Catalunya*** (PSC) estis implikitaj en alia grava skandalo en Katalunio. En 2009, Baltasar Garzón komencis esplori la ***Pretoria***-kazon, intrigon de urba korupto kiu rilatis al tri municipoj en la provinco de Barcelono kaj kelkajn eksajn altrangajn oficialulojn de ***Convergència i Unió*** kaj la PSC. La reto, aktiva ekde 2002, estis dediĉita falsi publikajn kontraktojn kaj kontraŭleĝe reklasifiki terojn apartenantajn al municipoj en la nordo de la Barcelona metropolitena areo; ĉefe ***Santa Coloma de Gramenet***, sed ankaŭ ***Badalona*** kaj ***Sant Andreu de Llavaneres***. Proksimume dudek altranguloj municipaj kaj regionaj estis imputitaj kiel membroj de kompleksa intrigo. Inter ili estis ***Lluís Prenafeta***, iama dekstra mano de ***Jordi Pujol*** kaj ĝenerala sekretario de la Prezidanteco, kaj ***Macià Alavedra***, kiu estis ministro de ***Pujol*** dum 15 jaroj. Ambaŭ estis akuzitaj je ne-leĝa asocio, influotrafiko kaj monlavado. Ankaŭ la eksa urbestro de ***Santa Coloma***, la socialisto ***Bartomeu Muñoz***, estis arestita, akuzita pri ne-leĝa asocio, postulo kaj kolektado de subaĉetaĵoj, fraŭdo kaj falsado de dokumentoj. Krome estis imputitaj ankaŭ la konsilisto pri Urba Planado


***Lluís Prenafeta***


***Macià Alavedra***


***Bartomeu Muñoz***


***Manuel Dobarco***


***Pascual Vela***


***Luis García Sáez***


***Álvaro Lapuerta***


***Luis Bárcenas***


***Pedro Tirado***


***Jesús Gil* kaj kompanio**


***Juan Antonio Roca***

de ***Santa Coloma***, ***Manuel Dobarco***, kaj ***Pascual Vela***, direktoro de Urbaj Servoj de la sama urbo, kiuj supozeble konsentis kun la entreprenoj pagi makleraĵojn. La cerbo de la intrigo estis ***Luis García Sáez***, iama PSC-deputito kiu, krome estis akuzita je mon-lavado kaj influo-trafiko. La direktoroj de la firmaoj kiuj pagis subaĉetaĵojn kaj parencoj de kelkaj el la implikitaj, kiel ekzemple la edzinoj de ***Alavedra*** kaj ***Prenafeta***, ankaŭ estis akuzitaj. La kazo malrapide iris tra la juĝa sistemo ĝis ĝi estis finfine solvita en 2018, kiam la ĉefaj akuzitoj ricevis signifajn prizonpunojn kaj grandajn monpunojn.

Dum la prezidanteco de ***Aznar*** generiĝis iuj grandaj skandaloj, kiuj komencis esti publike konataj nur post pli ol unu jardeko. ***Aznar*** elektis ***Luis-Bárcenas***-n kiel manaĝeron kaj kasiston de la PP por anstataŭigi ***Álvaro-Lapuerta***-n. La skandaloj en kiuj ili estis implikitaj, kune kun ***Rodrigo Rato*** kaj ***Eduardo Zaplana***, ne estis konataj ĝis 2009. Ni okupiĝos pri tiuj aferoj kiam ni priraportos tiun etapon.


En 2005, dum la operacio "Blanka Baleno", grandega polica enketo pri la mon-lavado de la organizita krimo de drog-kontrabando, prostituado, armil-kontrabandado kaj kidnapo, pluraj advokat-firmaoj estis registritaj en ***Marbella***. Inter la implikitaj estis la urbestro de ***Manilva*** (Malago), ***Pedro Tirado***, kiu estis arestita la 13-an de oktobro 2005 kune kun sia bofrato, ***Francisco Calle***. Kiam iliaj hejmoj estis traserĉitaj, oni trovis ke ***Pedro Tirado*** havis 770.000 eŭrojn en plastaj sakoj kaj ***Francisco Calle***, 20.000. Ambaŭ estis rilataj al ***Royal Marbella Estates***, firmao kiu supozeble servis por lavi drog-monon. Tirado aprobis en 2003 la reklasifikon kiel tereno por konstruado de 1.300.000 kvadratmetra agrikultura biendomo, la ***La Parrada*** loĝdomo, kaj draste pliigis la nombron da permesiloj por konstruado de loĝejoj. ***Royal Marbella Estates***, kiu aĉetis la menciitan biendomon por 12 milionoj da eŭroj, vendis ĝin al kvin konstruistoj per 160-milionoj. ***Tirado*** estis akuzita je falsado kaj subaĉeto, influo-komercado kaj akceptado de donacoj por dikti iun rezolucion. Li asertis, ke la mono devenis el anonimaj donacoj, kaj fine estis kondamnita al monpuno de 12.000 eŭroj.

La ĉefa malkovro de la operacio "**Blanka Baleno**" estis la tiel nomita "Malaja kazo" en la Urba Konsilio de ***Marbella***, konata pro ĝia korupto dum la jaroj en kiuj ĝi estis regita de la ***Grupo Independiente Liberal*** (GIL), la partio kreita de la ombra magnato de nemoveblaĵoj ***Jesús Gil***, kiu estus urbestro inter

1991 kaj 2002. En aprilo de ĉi tiu lasta jaro, li estis malkvalifikita por okupado de publikaj oficoj dum 28 jaroj, devigita eksiĝi kiel urbestro, kaj malliberigita dum ses monatoj pro serio de deliktoj kiuj inkludis influo-trafikon, dokumenta falsado kaj defraŭdo de publikaj monrimedoj, krom fraŭdo kontraŭ la futbalteamo ***Atlético de Madrid*** kaj la ***Marbella*** Urbodomo. ***Gil*** alpropriĝis al si 450 milionojn da pesetoj (2,7 milionoj da eŭroj) de la Urba Konsilio asertante ke tiu mono estis destinita pagi por ke la nomo de la urbo aperu sur la ĉemizoj de la klubo. La fraŭdo ne nur profitigis lin finance, sed ankaŭ akcelis lian balot-kampanjon por fariĝi urbestro en 1991. Inter 1991 kaj 1995, ***Gil*** kaj ses aliaj komplicoj trompis la ***Marbella***-n Urbodomon je 35,2 milionoj da eŭroj en pago de elspezoj al kvar kompanioj. Unu el la kunlaborantoj estis ***Juan Antonio Roca***, urba konsilisto de la Urba Konsilio de ***Marbella***.


***Gil*** mortis antaŭ ol la enketoj de la kontraŭkoruptaj aŭtoritatoj komenciĝis en novembro de 2005. Sub lia protekto, en la 1990-aj jaroj, ***Juan Antonio Roca***, per subaĉeto kaj ĉantaĝo, kreis reton de komercistoj, advokatoj, policanoj kaj eĉ juĝistoj, uzante la kontaktojn kreitajn de la germana konsulo en Malago, ***Hans Hoffmann***, kaj lia filo ***Juan***. Oni devas memori, ke ***Hans Hoffmann*** estis la pioniro de la nemoveblaĵoj en la proksima urbo ***Fuengirola*** kiu riĉigis ***José Antonio Girón de Velasco***. Dum la kreskego de la konstruado de nemoveblaĵoj, ***Roca*** estis la cerbo planinta la malobservojn de urbaj regularoj kiuj riĉigis lin kaj plurajn urbestrojn kaj konsilistojn. La kontant-mono de la komercistoj estis utiligita fare de ***Roca*** por pagi la konsilistojn kaj akiri la aprobon de urbaj planoj kaj konstruo-permesiloj el kiuj li kaj ***Gil*** profitis. La enketoj en liaj agadoj kaŭzis cent enketojn en aliajn koruptajn kazojn kun nomoj kiel ekzemple ***Saqueo 1***, ***Saqueo 2***, ***Minutes***, ***Belmonsa***, ***Urquía*** kaj, plej grave, ***Malajo***, kiuj kondukis ***Roca***-n en malliberejon dum 21 jaroj. Dum la unua el kelkaj procesoj, estis montrite ke ***Roca*** amasigis kontraŭleĝan riĉaĵon de pli ol unu miliardo da eŭroj.

En marto de 2006, la polico trudeniris hejmojn kaj oficejojn en ***Marbella***, Malago, Madrido, Murcio, Kadizo kaj Onubo, konfiskante dokumentojn, egan kvanton da valoraĵoj kaj kontant-monon je 2,4 miliardoj da eŭroj. Multaj ***Roca***-posedaĵoj estis traserĉitaj, de grandaj biendomoj ĝis hoteloj kaj etaĝdomoj. En lia grandega biendomo en ***Marbella***, ***La Caridad***, en marto 2006, estis trovitaj juvelujoj, pluraj luksaj aŭtoj, 245 valoraj pentraĵoj –inter ili, unu el ***Miró*** pendanta en banĉambro–, helikoptero, pavilono plena de ĉas-trofeoj –elefantoj, zebroj, ĝirafoj kaj leopardoj– kaj stalo kun pli ol cent pur-rasaj ĉevaloj. En la bieno ***La Morisca*** en ***Jimena de la Frontera*** (Kadizo) troviĝis cent taŭroj kaj valora kolekto de historiaj taŭroludoj. En la serĉo de la madrida domo de la eksa Konsilanto pri Trafiko de ***Marbella***, ***Victoriano Rodríguez***, estis trovitaj inter tricent kaj kvarcent mil eŭroj, supozeble pretaj por la pago de subaĉetaĵoj, ĉar la mono estis metita en kovertojn etikeditajn per kvantoj kaj nomoj. Tiuj eltrovaĵoj kaŭzis la arestojn de ***Roca***, ***Rodríguez***, la urbestrino de Marbella, ***Marisol Yagüe***, kaj la vicurbestrino ***Isabel García Marcos***.


Victoriano Rodríguez


Marisol Yagüe


Isabel García Marcos


Julián Muñoz kaj ties amantino Isabel Pantoja


Maite Zaldívar

La Registaro prenis la senprecedencan decidon dissolvi la Urban Konsilion en aprilo kaj anstataŭigi ĝin per provizora administranto ĝis la municipa balotado de majo de 2007, en kiu la PP venkis.


Dua fazo de la operacio okazis la 27-an de junio, kiam tricent agentoj de la Ekonomia kaj Fiska Krimo-Unuo (UDEF) eniris lokalojn en Malago, Granado, Kordovo, Sevilo, Madrido kaj Pamplono. Tridek homoj estis arestitaj, inkluzive dek tri iamaj membroj de ***Marbella City Council*** kaj konstru-magnatoj. La 17-an de julio 2006, novaj arestoj estis faritaj, inkluzive tiu de la posteulo de ***Jesús Gil*** kiel urbestro, ***Julián Muñoz***. Poste, la amantino de ***Muñoz***, la kantistino ***Isabel Pantoja***, estis kondamnita al dujara restado en malliberejo pro mon-lavado. Aliaj politikistoj kaj famuloj estis implikitaj en la kazo, kies fifameco vekis intereson fari pri ĝi televidan felietonon. La 14-an de novembro de 2006, en la tria fazo de la enketo, pliaj 11 homoj estis arestitaj, inkluzive la eksedzino de ***Muñoz***, ***Maite Zaldívar***, kiu malprudente komentis en pertelevida intervjuo ke "eniris en ŝian domon sakoj kaj sakoj plenaj je mono". En julio de 2007, akuzoj estis prezentitaj kontraŭ 95 homoj, 52 el kiuj estis trovitaj kulpaj en oktobro de 2013. ***Roca*** estis kondamnita al 11 da malliberejo kaj monpunita al 240 milionoj da eŭroj; ***Yagüe***, al ses jaroj, kaj ***Muñoz***, al du.

Malgraŭ la torento da korupto kaj la antipatio, kiun estigis iuj decidoj kaj aroganteco liaj, ***Aznar***, kiu ne prezentis sin kiel kandidaton laŭ propra decido, estis certa, ke ***Mariano Rajoy*** atingos venkon en la balotado de la 14-a de marto 2004. Li ne kalkulis je la punvoĉdono rezultanta el la nepopulara decido partopreni en la Iraka milito kun ***George W. Bush*** kaj ***Tony Blair***. Li ankaŭ ne rimarkis ke, tri tagojn antaŭe, la bomboj metitaj sur kvar madridaj trajnoj sur la linio, kiu ligas la stacidomon ***Atocha*** kun ***Alcalá de Henares***, mortigos 193 homojn kaj vundos aliajn 2.000. La atako estis la faro de ***Al-Kaida*** ĉelo, en reprezalio por la partopreno de Hispanio en la Iraka milito. Retejo rilata al ***Al-Kaida*** defendis atakojn kontraŭ Hispanio kaj deklaris ke ili certigos la venkon de la PSOE kaj la retiron de la hispanaj trupoj el Irako, surbaze de la deklaroj de la socialisto ***José Luis Rodríguez Zapatero*** faritaj en 2003, laŭsence ke, se li venkus en la sekvonta balotado, li retirus la hispanajn trupojn el la lando. Komence la prezidanto de la eŭska registaro, ***Juan José Ibarretxe***, atribuis la atencon al ETA, same kiel ***Aznar*** mem, kiu persone telefonis

al la direktoroj de kelkaj ĵurnaloj por certigi tiun aserton. La hispanaj ambasadoroj estis instrukciitaj priemfazi tiun punkton. Ĝi estis racia dedukto, ĉar ETA antaŭe atakis madridajn fervojajn stacidomojn, kvankam sensukcese. Tamen baldaŭ akumuliĝis indicoj pri la kulpeco de ***Al-Kaida***. La malkovro de sonbendo kun koranaj registradoj kaj kamioneto enhavanta sep detonacilojn kaŭzis la areston de tri marokanoj. La Registaro kaŝis ĉi tiun informon por si kaj, kiam ĝi estis finfine publikigita, kreskis suspektoj ke ĝi klopodis favori la PP-on balote. La rezultoj estis sensacia korekto al la esperoj de ***Aznar***. La socialistoj venkis en la balotado per 164 parlamentaj seĝoj, 39 pli ol en 2000, kaj 16 pli ol la PP de ***Rajoy***, kiu atingis nur 148, kun perdo de 35.
La kompromita informo, kiun la Registaro volis kaŝi, estis ke la 13-an de marto oni trovis filmeton proksime al la ĉefa moskeo en Madrido, en kiu proparolanto de ***Al-Kaida*** depostulis respondecon pri la murdoj faritaj responde al la rolo de Hispanio en Afganio kaj Irako. En la manifestacioj, kiuj okazis antaŭ la ĉefsidejo de PP en tuta Hispanio, la partoprenantoj kriis: "Viaj militoj, niaj mortintoj!" Enketa komisiono kreita laŭ iniciato de la PSOE, la tiel nomata "Komisiono 11-M", montris ke la atencoj estis faro de islamaj teroristoj kaj ne de ETA. Tiu komisiono ankaŭ konkludis ke la ***Aznar***-registaro kaŝis la veron balotcele kaj ke ĝi subtaksis la islaman terorisman minacon al Hispanio. Kiam la raporto de la Komisiono 11-M estis prezentita al la Kortesoj, ĝiaj konkludoj estis aprobitaj far ĉiuj partioj escepte la PP. Fakte, du jarojn poste, altranguloj de la PP ankoraŭ rifuzis akcepti ke la abomenaĵo ne estis verko de ETA.



***Blair, Bush kaj Aznar*** **en la Pint-kunsido de Acoroj**



**Rezulto de la bomb-atencoj de la 11-a de marto de 2004**



**Popolaj manifestacioj de la 13-a de marto kontraŭ la PP**






Sen absoluta parlamenta plimulto, ***Zapatero*** devis serĉi la subtenon de **Unuigita Maldekstro *(Izquierda Unida - IU)*** kaj ***Esquerra Republicana de Catalunya***. Tio estis unu el pluraj kialoj kiuj inklinis lin adopti progresemajn politikojn. Alia estis la fakto ke lia patroflanka avo, kapitano en la Hispana Armeo en 1936, estis ekzekutita de la ribela militistaro ĉar li rifuzis batali kontraŭ la Respubliko. En la kabineto de ***Zapatero*** estis tiom da virinoj kiom da viroj kaj lia vicprezidantino estis ***María Teresa Fernández de la Vega***. Leĝo pri Egaleco estis aprobita por ke la politikaj partioj inkludu almenaŭ 40 procentojn de virinoj en siaj balotlistoj kaj ke kompanioj kun pli ol 250 dungitoj asignu 40 procentojn de la postenoj en siaj estraroj al virinoj de administrado. La Organika Leĝo pri Rimedoj por Integra Protektado kontraŭ Seksa Perforto celis protekti kaj subteni viktimojn kaj enkonduki severajn punojn por leĝrompintoj. La nombro da virinoj mortigitaj kiel rezulto de seksa perforto malaltiĝis dum la ok jaroj kiujn ***Zapatero*** regis. La geedziĝo de samseksemuloj estis leĝigita en 2005, spit' al la indigno de la dekstraro. Leĝoj pri abortigo estis liberaligitaj kaj ekspresa eksgeedziĝo estis lanĉita, same kiel Dependeco-Leĝo por helpi dependajn homojn pro malsano, handikapo aŭ aĝo. Tiuj iniciatoj renkontis furiozan opozicion de la Romkatolika Eklezio. La konservativa kardinalo Ĉefepiskopo de Madrido, ***Antonio Rouco Varela***, akuzis ***Zapatero***-n je turnado de Hispanio en Sodomon kaj Gomoron.

Unu el la plej kontestataj iniciatoj estis la Leĝo pri Historia Memoro. Ĝi estis tro malmulte kaj venis tro malfrue, malgraŭ tio ĝi estis sisteme blokita kaj sabotita de la Popu-lara Partio. En la unuaj jaroj de la Transiro, la timo pri nova armita konflikto kaj reveno al diktaturo malhelpis ĉian emon esplori la krimojn de la frankistoj dum la enlanda milito kaj post la milito. Malgraŭ la vualo de silento kiu estis tirita super la pasinteco por la konsidero de daŭre delikata demokratio, multaj historiistoj daŭre esploris la militon kaj la postan subpremon. La abomenaĵoj faritaj de la maldekstruloj en la

respublika zono estis ĝisfunde esploritaj de la frankisma reĝimo kaj ĝiaj viktimoj, venĝitaj. Male, kaj la generacio de respublikanoj kiuj suferis tra la milito kaj iliaj idoj daŭre vivis en timo. La fakto ke la polico, la CivilGvardio kaj la juĝistaro ne estis reformitaj dum jaroj estis signifa faktoro. Eĉ kiam la PSOE ekregis en 1982, ĝi ne volis kontentigi la latentan postulon pri esplorado. Ĝi konsideris tion tro danĝera. Krome, priesplori la destinon de la rabitaj posedaĵoj dum kaj post la milito kaj nuligi la milojn da kazoj de homoj maljuste ekzekutitaj aŭ malliberigitaj prezentis multajn jurajn problemojn kaj komplikaĵojn. La impulso fari ion venis el la nepoj de la viktimoj. En la malamika etoso generita de la ***Aznar***-registaro, iom post iom ekestis la sento, ke la demokratio estas sufiĉe forta por subteni debaton pri la lastatempa pasinteco. Ekde la jaro 2000, kaj inspirite de la klo-podoj de juna navara sociologo, ***Emilio Silva Barrera***, kiu volis esplori la destinon de sia avo, malaperinta en Leono en la unuaj monatoj de la milito, naskiĝis kaj kreskis amasa movado favore de tio, kion oni nomas «la reakiro de historia memoro». En la tuta Hispanio aperis lokaj sekcioj de la Asocio por Reakiro de la Historia Memoro, kiuj ricevis milojn da helpopetoj por trovi restaĵojn de parencoj, kaj kies volontuloj komencis fosi amastombojn kaj registri la atestojn de la postvivantoj. Kelkaj regionaj televidstacioj (neniu je nacia nivelo) produktis maltrankviligantajn dokumentarojn pri la subpremo. La registaro de ***Zapatero*** deklaris 2006-n "Jaro de Historia Memoro". En 2007, la Hispana Parlamento aprobis la Leĝon pri Historia Memoro. Estis gravaj regionaj iniciatoj, kiel la kreado fare de la Generalitat de Katalunio de la ento konata kiel "***Memorial Democràtic***", la disponigo en Galegio de publikaj rimedoj por la esploro de historia memoro kaj la kreado en Andaluzio de la granda projekto "Ĉiuj Nomoj". Tamen la esperoj levitaj de la leĝo iom post iom forvelkis. Konservativaj konsilioj ne financis la elfosadojn. Krome, la hispana juĝistaro ne volis esplori la malaperon de dekmiloj da homoj inter 1936 kaj 1939.Tiu ĉi movado por la historia memoro generis malkontenton ne nur por la krimintoj, aŭ ĉi ties parencoj, sed ankaŭ ĉe tiuj, kiuj sentis nostalgion pri Franko kaj inter la pli ampleksaj sektoroj de la socio kiuj, laŭ la pasado de la tempo, finis eltiri profiton el la diktaturo. Serio da tre sukcesaj kaj polemikaj verkoj klopodis kontentigi ĉi tiun publikon. Kritikante la multajn seriozajn esploristojn en Hispanio, grupeto de aŭtoroj kaj dissendantoj laŭte prifajfis ilin de marĝena pozicio laŭ la stilo de futbalaj fanatik-uloj. Ili asertadis ke la malfacilaĵoj de la respublikanaj viktimoj estas nenio alia ol troigoj rezultantaj el sinistra komploto de politike implikitaj historiistoj kaj aldonadis ke ĉi tiuj suferoj estis, ĉiukaze, ilia kulpo. En tiuj ĉi verkoj, kiuj difinis sin "revizi-ismaj", apenaŭ estas novaj esploroj, sed ili limiĝis esence recikligi la tezojn de la frankisma propagando. Per siaj kalumniaj libroj kaj babil-rondoj, ili kritikadis la verk-intojn de la nova historiografio kiel mensogantojn kaj idiotojn. Kiam la Populara Partio revenis regadi en la jaro 2011, finiĝis la jam nesufiĉa financado por la plimulto de la agadoj ebligitaj de la Leĝo pri Historia Memoro. Tial ankoraŭ ne ekzistis nacia censo de mortintoj kaj neniu financado por DNA-testado; anstataŭe, la PP-registaro


María Teresa Fernández de la Vega


Antonio Rouco Varela


Emilio Silva Barrera


Ernest Benach

kontribuis al la prizorgado de la tomboj de falangistaj volontuloj kiuj batalis kune kun la germanoj sur la rusa fronto.
***Rodríguez Zapatero*** heredis fortan ekonomion plejparte danke al la membreco de Hispanio al la eŭro-monunuo. Aliĝi al la komuna eŭropa valuto postulis merkatan liberaligon kaj kaŭzis enfluon de malmultekosta kredito, eŭrop-uniaj financoj kaj eksterlanda rekta investo. Granda parto el la kresko de la Malneta Enlanda Produkto estis rezulto de la ekspansio de la konstruado, kiu kreis milionojn da laborlokoj kaj instigis korupton. La epoko de facila mono komenciĝis kiam la interezo-procentoj de la landoj de la Eŭrozono falis de 14 al ĉirkaŭ 3 procentoj. Germanaj kaj francaj bankoj pruntedonis monon al hispanaj bankoj, permesante al siaj klientoj aĉeti germanajn kaj francajn konsumvarojn kaj unuan aŭ duan hejmon. Dum la unua regadperiodo de ***Zapatero***, la ekonomio kreskis je ĉirkaŭ 3 elcente ĉiujare kaj la senlaboreco falis de 11,5 elcento en marto 2004 al 8 elcento en 2007. Popersona enspezo superis la mezumon de Eŭropa Unio kaj ĝi estis super tiu de Italio, sed kaj la publika kaj la privata ŝuldo estis for de kontrolo kaj ĉiu riĉaĵo dependis troe de la konstruado. La unuaj signoj de krizo aperis meze de 2007, kiam la hispana ekonomio jam malrapidiĝis. La bobelo krevis post la internacia financa krizo de 2008 kaj la Malneta Enlanda Produkto falis je 4,6 elcento fine de 2009. Hispanio eniris recesion, kiu daŭris ĝis 2013. La ekonomia kresko falis de 3,6 elcento en 2007 al malpli ol 1 elcento en 2008. La konstruado-sektoro kuntiriĝis 35 elcento inter 2007 kaj 2010. Unu miliono da laborpostenoj estis perditaj, influante la ceteron de la ekonomio. Senlaboreco altiĝis al 25 elcento kaj la junulara senlaboreco atingis 55 elcenton.
Krom la ekonomia krizo, dum la unua periodo de la registaro de ***Zapatero*** oni semis ankaŭ en Katalunio la semojn de politika krizo kiu danĝeris disŝiri Hispanion. 16 elcento de la hispana loĝantaro loĝas en Katalunio, sed ĝi reprezentas proksimume 20 procente de ĝia ekonomio. La malrapida kaj malvolonta translokigo de funkcioj de Madrido al Barcelono generis malkontenton en Katalunio. Paralele, ***Jordi Pujol*** sekvis politikon plifirmigi la senton de nacia identeco bazita sur lingvo kaj kulturo. En 1990, li komisiis teamon de katalunaj intelektuloj redakti "***Strategio por recatalanització***". Ĝi estis programo destinita pruvi al la loĝantaro, ke Katalunio estis


kulture kaj ekonomie damaĝita de la diskriminacio far la Hispana Ŝtato. La disvolviĝo de aŭtonoma eduka sistemo kaj radio kaj televido en la kataluna lingvo, same kiel la fakto, ke la laborpostenoj de multaj katalunoj dependis de la ***Generalitat*** kontribuis promocii la naciisman senton kaj emon al sendependeco. Estis kreskanta deziro solvi tion, kion vidis Barcelono kiel la mankojn de ambaŭ, la Hispana Konstitucio de 1978 kaj la Statuto de Aŭtonomeco de Katalunio de 1979, t. e. la du leĝaj kodoj regulantajn la rilatojn de la Kataluna Autonomia ento kaj la Hispana Ŝtato. Proksimume 14 elcento el la katalunoj estis favoraj al plena sendependeco el Hispanio en 2005-2006 kaj alia 34 elcento estis favoraj al sendependeco ene de federacia Hispanio. La unua tri-partia registaro de ***Maragall*** promociis la redaktadon de nova Statuto de Aŭtonomeco, kiu estis debatita kaj aprobita de la Kataluna Parlamento kaj poste submetita al aprobo de la Hispanaj Kortesoj. Ĉiuj partioj, krom la Populara, donis sian aprobon al la propono kiu venis de la Kataluna Parlamento, kvankam la plimulto de la PSOE sentis sin mal-kontenta ĉar la teksto difinis Katalunion kiel nacion. ***Mariano Rajoy***, tamen, estis sen-duba: en mitingo okazinta en decembro 2005 en Madrido antaŭ preskaŭ 50.000 anoj kaj simpatiantoj de la PP, li deklaris: «Estas nur unu nacio: la hispana».
Post peniga intertraktado, la Kataluna Statuto estis aprobita de la Hispana Parlamento en junio 2006. Malgraŭ la koncedoj faritaj dum la procezo, precipe rilate al financado, la ĉefaj katalunaj partioj akceptis la tekston aprobitan en Madrido, ĉar en ĝi eksplicite oni agnoskis ke Katalunio estas nacio. Ĝi estis poste aprobita de la katalunoj en referendumo la 18-an de junio, kun alta sindeteno, kiu superis 50 elcenton de la balot-antaro. 74 elcento de tiuj, kiuj voĉdonis, elektis "jes". Fakte, la ĉefa naciisma partio, ***Esquerra Republicana de Catalunya***, kampanjis por la "ne" asertante ke la teksto ne estis sufiĉe ambicia. La PP argumentis ke la rezultoj indikis ke sendependeco ne estis brula temo. Eĉ la "planita" versio de la Statuto de Katalunio, laŭ vortoj de ***Alfonso Guerra***, estis sub severa kritiko de la dekstra gazetaro en granda parto de Hispanio. La PP inves-tis duonmilionon da eŭroj en disiga kampanjo favore al bojkoto de katalunaj produktoj kaj, en kelkaj amaskomunikiloj, kiel la tre populara COPE, la radiostacio de la Epis-kopa Konferenco, aŭdiĝis malamikecaj esprimoj, kiuj limis al etna malamo.
Fine de julio 2006, kiam la Kataluna Statuto estis fariĝonta leĝo, la PP apelaciis kontraŭ ĝi antaŭ la Konstitucia Kortumo, profunde konservativa jura ento. La sekva kvar-jara prokrasto por ĝia validiĝo instigis en Katalunio la plej radikalan sendependec-movadon. La teksto de la sentenco, finfine publikigita la 28-an de junio de 2010, deklaris la kontraŭ-konstituciecon de 14 el la 233 artikoloj de la leĝo, inter kiuj estis tiuj, kiuj donis preferan statuson al la kataluna lingvo kaj donis al Katalunio kontrolon de ĝiaj impostaj enspezoj. En tiu sentenco, krome, oni menciis la "nedisigeblan unuecon de la hispana nacio". ***Ernest Benach***, prezidanto de la Kataluna Parlamento, akuzis la Konsti-tucian decidon kaŭzi "ŝtatan krizon" kaj asertis ke ĝi "rompas la paktón inter Katalunio kaj Hispanio kaj subtaksas la volon de la kataluna popolo". La sekva akriĝo de la sen-dependisma sento speguliĝis en amasa manifestacio en Barcelono la 10-an de julio kun la slogano: "***Som una nació. Nosaltres decidim***" ("Ni estas nacio. Ni decidas").



**Artur Mas**



**Miguel Angel Fernández Ordóñez**



**Pedro Solbes**



**Barck Obama**

La verdikto de la Kortumo koincidis kun la komenco de la severeco trudita de la stata registaro pro la financa krizo, altiĝanta senlaboreco kaj kreskantan zorgon pri korupto. Subteno al kataluna sendependeco ene de federacia Hispanio iomete malpliiĝis al 31 elcento, dum subteno por plena sendependeco de Katalunio signife pliiĝis al 24,5 elcento kaj sin tenis konstante de tiam. En la kataluna balotado de la 28-a de novembro de 2010, CiU gajnis 62 parlamentajn seĝojn, ses malpli ol tiuj necesaj por absoluta plimulto en 135-seĝa kataluna parlamento. ***Artur Mas***, kiu heredis altan ŝuldon de la tripartito, estis devigita fari profunde nepopularajn buĝet-reduktojn, kun la subteno de la kataluna PP, kio pli-grandigis popolan koleron tial ke, kun apenaŭ 16 elcento de la hispana loĝantaro, Katalunio liveris preskaŭ 20 elcenton de la ŝtata imposto-enspezoj, kaj tamen ricevis nur 14 elcenton el la totala elspezo (simila malegaleco okazis en la plej riĉa komunumo en Hispanio, Madrido).

La registaro de ***Zapatero*** malrapide respondis al la signoj de la tutmonda ekonomia krizo. Rimedoj kiel granda redukto de impostoj por ĉiuj impostpagantoj donis al li venkon en la ĝeneralaj balotoj de la 9-a de marto 2008, en kiuj la PSOE akiris 169 seĝojn, 5 pli ol en 2004; la PP, 154, kio signifis kreskon de 4. Sen absoluta plimulto, ***Zapatero*** bezonis specifajn aliancojn kaj, tamen, li elspiris konfidon. En Novjorko la 24-an de septembro 2008, naŭ tagojn post kiam la kolapso de ***Lehman Brothers*** provokis kaj signis la komenciĝon de la financa krizo, li parolis al grupo de direktoroj de multnaciaj firmaoj kaj investbankoj.

Surbaze de la raportoj provizitaj al li de la guberniestro de la Banko de Hispanio, ***Miguel Ángel Fernández Ordóñez***, kaj lia ministro pri Ekonomio kaj Financo, ***Pedro Solbes***, li fanfaronis ke "eble Hispanio havas la plej solidan financan sistemon en la internacia komunumo. Ĝi havis reguligan kaj kontrolan kadron internacie agnoskitan pro ĝia kvalito kaj rigoro". Ĉar la efikoj de la recesio ekregis, impost-enspezoj komencis fali kaj la buĝeta deficito altiĝis al 11,1 elcento de MEP (Malneta Enlanda Produkto) en 2009. La 11-an de majo de 2010, ***Barack Obama*** telefonis al ***Zapatero***, kiu tiutempe estis prezidanto de la Eŭropa Unio, por instigi lin entrepreni la necesajn reformojn por alfronti la ekonomiajn problemojn de Hispanio kaj Eŭropa Unio. Ĝuste kiam la Konstitucia

Kortumo estis publikonta sian verdikton pri la Statuto de Katalunio, plia premo de Eŭropa Unio kaj de la Internacia MonFonduso devigis ***Zapatero***-n alpreni ŝpar-politikojn por redukti la deficiton, kiu realiĝis en 2011 en salajroredukto de 5 elcento al 2,8 milionoj da oficistoj, la kresko de la IAV (Imposto pro Aldonita Valoro) de 16 al 18 elcento, la redukto de la kompenso pro maldungo kaj la frostigo de la jara pliigo de pensioj.
***Zapatero*** iom malfrue ekkomprenis, ke la hispana banka sistemo estis alfrontanta gravan krizon. Multaj ŝparkasoj estis dramece ligitaj al kreditoj faritaj al entreprenistoj ofte en rilato kun korupto. Kiam la recesio okazis, multaj entreprenistoj kaj konstruo-firmaoj ĉesis pagi, kio malfortigis la tutan bankan sektoron, sed estis ĉefe katastrofa por la 45 provincaj kaj regionaj ŝparkasoj, kiuj konsistigis preskaŭ 50 elcenton de la hispana banksistemo. Regataj de estraroj konsistigitaj plejparte de lokaj politikistoj kaj komercistoj, ili estis tentitaj de projektoj kiuj ŝajnis promesi facilajn profitojn aŭ politikan prestiĝon. En marto 2009, la unua bankroto estis tiu de ŝparkaso de ***Castilla-La Mancha*** pro siaj enormaj pruntoj al la konstrusektoro kaj la financado de la nenecesa flughaveno de ***Ciudad Real***. Fine de junio 2009, la Registaro estis devigita alpreni rimedojn por reorganizi kaj restarigi la solvecon de la plej kompromititaj mal-grandaj kaj mezgrandaj bankaj entoj. Tiucele ĝi kreis la Fondaĵon por Orda Banka Restrukturado (FROB). La sekvaj entoj malsukcesintaj estis ***CajaSur***, posedata de la Eklezio, kun sidejo en Kordovo, kaj la Ŝparkaso de la Mediterráneo (CAM), kun sidejo en Valencio, troeksponitaj al toksa kredito de entreprenistoj kaj kun ekzekutivoj kaj direktoroj kiuj profitis de spektaklecaj salajroj, malgraŭ sia malaltaj kvalifikoj, same kiel grandegaj nulinterezaj pruntoj.
La du ĉefaj komercaj bankoj, ***Santander*** kaj BBVA, postvivis la krizon, sed la mal-facila situacio de la ŝparkasoj estis plimalbonigita de la neefika kontrolo far la Banko de Hispanio. La agado de la FROB kaŭzis la redukton de la nombro da ŝparkasoj de 45 ĝis 11 en 2012, plejparte per kununuiĝoj aprobitaj fare de la Banko de Hispanio. La CAM estis vendita al la ***Banco de Sabadell***. En decembro de 2010, sep ŝparkasoj, inklu-zive de ***Caja Madrid***, kuniĝis en unu grandan bankon, ***Banco Financiero y de Ahorros*** (BFA). La detalista filio de ĉi tiu ento, ***Bankia***, estis lanĉita en la borsmerkaton de ĝia ĵus nomumita prezidanto, ***Rodrigo Rato***, eksministro pri Ekonomio dum la regado de ***Aznar*** kaj eksprezidanto de la Internacia Mon-Fonduso. ***Rato*** emfazis la kvaliton de la aktivoj, kiujn ***Bankia*** supozeble havis, kiam fakte ĝi havis problemon de toksaj aktivoj kun valoro de 31,8 miliardoj da eŭroj, kiuj estis apartigitaj, por ke la origina kompanio, BFA, rolu kiel “malbona banko”. Tio kio devus esti la solvo de la krizo de la ŝpar-kasoj kaŭzis egan bankan katastrofon. En marto de 2012, kelkajn tagojn post kiam oni anoncis, ke la profitoj de ***Bankia*** en 2011 altiĝis al 305 milionoj da eŭroj, oni eksciis, ke la banko efektive perdis 2.790 milionojn. La 347.338 etaj investintoj, kiuj aĉetis akciojn de ***Bankia***, perdis plejparton el siaj ŝparaĵoj kiam la akcia prezo falis 80 procenton. La banko bezonis savon de 23.500 milionoj da eŭroj, do en majo 2012 ĝi estis naciigita kaj la prokuroro malfermis enketon pri komerca fraŭdo kaj kontadaj malveraĵoj supozeble faritaj de ***Rodrigo Rato*** kaj aliaj 32 bankoficistoj.

Dume, publika kolerego pro altiĝanta senlaboreco, reduktoj en la publikaj servoj kaj la kolapso de ŝparkasoj konverĝis kun kolero pro la troaj salajroj kiujn bankoficuloj pagis al si kaj la percepto de senpuneco por tiuj implikitaj en kazoj de korupto, ĉio ĉi provokis, la 15-an de majo 2011, la amasan okupadon de la placo de ***Puerta del Sol,*** en Madrido fare de pli ol mil junuloj –plejparte, sed ne ekskluzive–, seniluziigitaj kun politikistoj kaj bankistoj. Tiu ĉi okupacio, kiu daŭris poste tutan monaton, estigis la movadon de la “indignitoj” aŭ “15-M”, kiu havis imitaĵojn tra la tuta Hispanio, kiel la indignitoj tendare en la Placo de Katalunio de Barcelono, kaj kiuj havis la subtenon de senlaboruloj, maljunuloj tuŝitaj de la pensio-stagniĝo kaj forpelo de domposedantoj. Ĉi-lastaj estis viktimoj de la drakona hispana hipotekleĝaro, pro kiu nepago implicis ne nur la perdon de la posedaĵo, sed ankaŭ la devontigon repagi la restantan kvanton de la prunto. La 15-M-movado baziĝis sur la ĝenerala abomeno por la rabeco de la politika klaso kaj inspiris la usonan movadon “***Occupy Wall Street***”. Ĝi kaŭzis la aperon, sub la gvidado de la batalema ***Pablo Iglesias***, de la maldekstra partio ***Podemos***, (Ni povas), kiu dediĉis sin al denunco de la krimoj de la politika kaj komerca elito, kiun ĝi nomis “la kasto”. Malkontento pri la politika klaso kaj ekonomiaj institucioj ne nur fruktis maldekstre. Ĝi ankaŭ donis flugilojn al la hispana partio ***Ciudadanos***, (Civitanoj), kiu unue iĝis konata en Katalunio en 2006 kiel centrista kontraŭnaciisma partio sub la gvido de la juna advokato ***Albert Rivera***.



**Movado de la 15-M. Amasa dummonata koncentriĝo en la ĉefa madrida placo**

En kunteksto de ekonomia malkresko kaj financaj skandaloj, ***Zapatero*** anoncis balot-procezon por la 20-an de novembro 2011, sed li decidis ne kandidatiĝi; la socialista kandidato estis ***Alfredo Pérez Rubalcaba***. En la balot-kampanjo, ***Mariano Rajoy*** asertis ke la ekonomia situacio estis postulanta drastan ŝanĝon. La PSOE sensacie disfalis: ***Rubalcaba*** atingis nur 110 parlamentajn seĝojn, 59 malpli ol en 2008. La PP de ***Rajoy*** gajnis 186, komforta absoluta plimulto. Sub premo de la Eŭropa Komisiono, la Eŭropa Centra Banko kaj la Internacia Mon-Fonduso, ***Rajoy*** daŭrigis kun la severeca politiko jam enkondukita de ***Zapatero***. Fakte, la banka krizo plimalboniĝis pro neglekt-emo de la Banko de Hispanio kaj la CNMV (Nacia Borso-Komisiono) en la ekzercado de necesa viglado. En julio de 2012, la Guberniestro de la Banko de Hispanio, ***Luis Linde***, aperis antaŭ la Ekonomia Komitato de la Parlamento kaj agnoskis ke la kontrolo estis nesufiĉa pro "ia speco de eŭforio kiu kondukis ne vidi, aŭ ne voli vidi, la riskojn kiuj akumuliĝis". La ekstera ŝuldo de Hispanio, je 92 procentoj de MEP, estis ekvivalenta al tiu de Portugalio, Irlando kaj Grekio. ***Linde*** postulis restrukturadon de la banksistemo tiel ke la institucioj "sen sufiĉa pulso" por garantii sian estontecon devus kunfandiĝi aŭ esti likviditaj.

Jen per la ĉi-supra raportado de ĉi tiu ĉapitro estas priskribita la politika marko de la regado de ***Zapatero***. Nun decas ke ni vidu la korupton okazinta ene de tiu politika kadro; tiu korupto, fakte, estas daŭrigo de la antaŭa, ĝistiama, korupto ĉar la sistemo, per si mem, generas kaj plutenas la kondiĉojn kiuj ebligas la koruptadon. Ni vidos ke la koruptuloj apartenis al plejparto el la politikaj fortoj de la lando. Ni komencu per la t. n. **Kazo *Zarrafaya***: en 2005 la socialista urbestro de tiu urbo en Granado, ***Salvador Zamora Pardo***, estis kondamnita al naŭ monatoj da mal-liberejo kaj monpuno de 2.160 eŭroj, kune kun tri urbaj konsili-anoj -kondamnitaj al 7 jaroj da malliberejo-, pro administra delikto, tial ke ili rajtigis la konstruon de hotel-komplekso sur neurbanizebla kampara tereno. Lia posteulo, ***José Miguel Muñoz Ortigosa***, ankaŭ socialisto, estis kondamnita al naŭ monatoj en malliberejo pro grava malobeo al aŭtoritato rifuzante ĉesigi la konstruadon.

Atentindas ke la hispana juĝsistemo, pro la maniero laŭ kiu ĝi funkcias, ne kontribuas ĉesigi aŭ malpliigi la korupton. Pri tio klare atestas la kazo de de la urbo de la Golfo-sporto, pri kiu ni sekve raportos. Temis pri juĝproceso en la urbo ***Las Navas del Marqués***


Albert Rivera


Pablo Iglesias Turrión


Luis María Linde


Salvador Zamora Pardo


José Miguel Muñoz Ortigosa



*Alfredo Pérez Rubalcaba, kiu lideris la socialistan pribalotan malvenkon de la 20-a de novembro de 2011*



*Eksterleĝa kaj ne-punita dehakado de la pinarbaro de Las Navas del Marqués*



*Gerardo Pérez urb-estro de Las Navas del Marqués*



*José Ángel Arranz, Ĝenerala Direktoro de la Natura Medio de la Konsilio de Kastilio kaj Leono*

kiu komenciĝis en 2006 kiam la Administra Ĉambro de la Plej-Supera Tribunalo de Justico de Kastilio kaj Leono nuligis urban projekton entreprenitan en pinarbaro en tiu urbo, sur protektita tereno kiel ***Special Protection Zone for Birds*** (ZEPA), kiu inkludis la konstruadon de 1.600 luksaj hejmoj, golf-sportejo kaj du luks-kvalitaj hoteloj. Por efektivigi la projekton, la municipo ***Las Navas del Marqués*** (en la provinco Avilo, en la aŭtonoma komunumo Kastilio kaj Leono) aĉetis la teron de malnova rezina firmao kiu ekspluatis la pinarbaron kaj oni kreis firmaon kunhavitan de la Konsistorio (kun 70% de la akcioj), la Ministerio pri Natura Medio de la Konsilio de Kastilio kaj Leono (20%), kaj la Deputitejo de Avilo, kun la ceteraj 10%. Poste, la protektitaj terenoj estis re-klasifikitaj, kaj estis aprobita la konstruado de du milionoj da kvadrataj metroj distribuitaj inter la 1.600 dometoj, kvar golfejoj, hotelo kaj distra areo, ĉio sub la nomo de “Urbo de Golfo”. La tereno estis akirita de firmao de Murcio kontraŭ ĉirkaŭ 10 milionoj da eŭroj. La Supera Kortumo de Justico deklaris en oktobro de 2006 ke la rekvalifiko ne estis laŭleĝa kiel rezulto de apelacio prezentita fare de individuo. La juĝo de la Kortumo establis ke la parcelo ne estu reklasifikata kaj ke la projekto kontraŭfrontas la dekreton de protekto de la nigra cikonio de la Konsilio de Kastilio kaj Leono kaj la koncernan ekologian protekton, ke al la projekto mankis “kialoj de publika intereso”, ke “la komencitaj laboroj ne havis laŭleĝan bazon” kaj tial decidis nuligi la klasifikon kiel “tero destinita al urbanizado”. Tamen kelkajn tagojn poste komenciĝis la dehakado de arboj. Tio kondukis al tio ke ok ekologiistaj organizoj prezentis plendon ĉe la Speciala Prokuroro por la Natura Medio kaj Urba Planado. Tiu Prokuroro petis al la urbestro de ***Las Navas*** ĉesi la arbohakadon de la firmao “***Residencial Aguas Nuevas S. L***”. Dek kvin tagojn poste, la Juĝejo numero 2 de Avilo konsentis pri la provizora ĉesigo de la laboro. En ĉi tiu kazo, la Prokurorejo aliĝis al la plendo, konsiderante la ekziston de “raciaj indikoj pri la farado de delikto kontraŭ la teritoria ordenado kaj kontraŭ la natur-medio”.

En 2007, la Tribunalo de Unua Instanco kaj Instrukcio numero 2 de Avilo kaj la prokurorejo akuzis la urbestron de ***Las Navas***, ***Gerardo Pérez***, la iaman teritorian delegiton de la Estraro, ***Félix San Segundo***, la sekretarion de la Urba Konsilio de ***Las Navas del Marqués***, ***Carlos de la Vega***, la Ĝenerala Direktoro de la Natura Medio de la Konsilio de Kastilio kaj Leono, ***José Ángel Arranz*** kaj 15 aliaj personoj pro deliktoj kontraŭ la teritoria

disvolvo-plano, kontraŭ la natur-medio kaj malobeo de la leĝoj. En oktobro 2008, la ĉefprokuroro de Ávila decidis proponi al la Tribunalo numero 2, la imputon en la kazo de la unua vic-prezidantino de la Konsilio de Kastilio kaj Leonio kaj Ministr-ino pri Natur-Medio, ***María Jesús Ruiz***, de la PP, akuzita je mal-obeo de la leĝoj subskribante deklaron de favora efiko de la projekto sur la medio, malgraŭ temi pri protektita tereno.


María Jesús Ruiz

La kazo kaŭzis kvar pecojn, el kiuj estis arkivitaj du. Alia kaŭzis proceson okazintan en 2012 ĉe la Provinca Juĝejo de Avilo kaj kiu finiĝis per la absolvo de la tri akuzitoj, la urbestro, la sekretario de ***Las Navas del Marqués*** kaj la konstruinto. La lasta, kontraŭ 5 teknikistoj kaj altrangaj oficistoj de la regiona administracio pri naturmedio, akuzitaj je delikto de malobeo al la leĝoj, estigis alian proceson en marto de 2014. En la juĝo, la ĉiuj 5 akuzitoj estis absolvitaj. La sentenco ne estis definitiva kaj kontraŭ ĝi eblis apelacii antaŭ la Provinca Juĝejo ene de la sekvintaj 10 tagoj. La akuzintoj de tiu proceso, iu privata persono kaj kelkaj ekologiistaj organizoj, kvankam eblis al ili apelacii kaj sendube ili estus atingintaj pli justan sentencon, ili ne faris tion ĉar la operacio rezultus al ili tro multekosta.


José Manuel Soria

Ĉi tiu estas unu el la faktoroj kiuj certigas ke la kulpaj potenculoj tre ofte restas senpune antaŭ la hispana juĝ-sistemo. Alia misfunkciado de tiu justico estas la fakto ke la procesoj estas multedaŭraj; povas pasi multaj jaroj de la komenco de la juĝado ĝis la fina sentenco. Kiam, fine, la kulpuloj de gravaj korupto-skandaloj estas kondamnitaj al kelkjara enprizoniĝo, ili ne povas esti enkarcerigataj tial ke ili estas jam tro multaĝaj, aŭ estas mal-sanaj, aŭ eĉ jam mortis. Krome estas la fakto ke kiam estas punaj sentencoj pro primonaj deliktoj, kiaj neleĝaj alpropriigoj, la kondamnitoj povas ne repagi la rabitan de ili monon; dum la longdaŭro de la proceso ili povas sekrete transdoni sian tutan havaĵon al parenculoj aŭ konatuloj kaj tiamaniere ili oficiale restas nesolventaj, nepagipovaj, kaj redonas nenion el la rabita mono. Kaj plejgrave, estas la kazoj, kiel tiu de la "Urbo de Golfo" de ***Las Navas del Marqués***. Se la akuzitoj estas gravaj, altrangaj uloj, de politika kaj/aŭ ekonomia vidpunkto, ofte la ĵugistoj sentencas iliafavore, kaj la damaĝitoj, personaj aŭ kolektivaj, ne kapablas pludaŭrigi la ĵuĝproceson. En nia raporto jam aperis sufiĉnombraj el tiaj kazoj kaj daŭre


Carlos Sosa Báez


Margarita Varona




***Paula Chaves Iborra***



***José Villegas Ceballos***
**iama socialista urbestro de *Plasenzuela***



***Domingo Galán Encina***
**iama P.P.-urbestro de *Torremocha***



***Leopoldo Barrantes* (patro) implikita en la kazo *Malaya*, kaj *Leopoldo Barrantes* (filo) implikita en la kazo *Plasenzuela***

ni trovos aliajn kiuj okazis ĝis la nuntempo.

Tia estas, ekzemple, la t. n. "Kazo Salmo". La 6-an de oktobro 2008, la Kontraŭ-Korupta Prokuroro de ***Las Palmas***, ***Luis del Río***, apogis kaj petis aperi en la kazo kiu estis traktita kontraŭ ***José Manuel Soria*** por la kvazaŭa komisiono de sub-aĉet-delikto kiam li prezidis la ***Cabildo de Gran Canaria***, La kazo atribuis favoran traktadon al la norvega komercisto ***Bjorn Lyng*** (tiam forpasinta), posedanto de la kompanio ***Anfi del Mar***, fare de la ***Cabildo de Gran Canaria*** post inviti ***Soria***-n kaj ĉi ties familion vojaĝi al Svedio, Aŭstrio kaj Norvegio por fiŝkapti salmon dum la somero de 2005. La plendo estis prezentita de la ĵurnalisto ***Carlos Sosa Báez***, direktoro de la komunika kanalo ***Canarias Ahora*** kaj akceptita por traktado de la Supera Kortumo de Kanariaj Insuloj (TSJC), kun sidejo en ***Las Palmas de Gran Canaria***, kiel la kompetenta esplora organo. Naŭ monatojn post ties komenciĝo, en majo de 2009, la magistratino de la TSJC ***Margarita Varona*** fermis la kazon ĉar ŝi ne aprezis plenumadon de la delikto de subaĉeto akceptante donacon. Sammaniere, kvankam pro aliaj kialoj ol tiuj de la TSJC, la prokuroro arkivis la dosieron ĉar li konsideris ke la supozata delikto –se ĝi reale okazis– estus preskribinta, ĉar la vojaĝo estis efektivigita en 2005 kaj la limo por ĉi tiu delikto estas trijara laŭ la Hispana Puna Kodo. Post la arkivo de la kazo, la kanaria asocio de juristoj ***Justicia y Sociedad*** prezentis apelacion kontraŭ la TSJC mem, kiu estis rifuzita. Ja la politikaj kaj financaj potenculoj de ĉi tiu lando havas ion, mi ne scias kion, kio igas ke la ĵuĝistaro sentas nerezisteblan inklinon favori ilin.

Tamen, en la kazo de la politikistoj ne ĉiam estas favora al ili la teniĝo de la juĝistoj. Ĉar estas diversaj, interkontraŭantaj politikaj partioj, ankaŭ la inklino de la juĝistaro estas diversa, t. e. ankaŭ la juĝistoj politike interkontraŭas. Tion ni povas vidi, ekzemple, en la t. n. "kazo ***Matsa***". En 2009, la Konsilio de Andaluzio donis subvencion de 10,1 milionoj da eŭroj al la minentrepreno ***Matsa***. La opozicio de la P.P. kaj la sindikato ***Manos Limpias*** denuncis dufoje, ke tiu subvencio malobservis la leĝon pri neakordigebleco, ĉar en ***Matsa*** laboris ***Paula Chaves***, la filino de la andaluzia prezidanto ***Manuel Chaves***. La kasacia kortumo arkivis la du plendojn registritajn konsiderante ke ***Chaves*** faris neniun delikton, sed la firmao ***Matsa*** devis redoni la 10,1 milionojn da eŭroj.

Malsame estas en tiuj kazoj kiam ambaŭ majoritataj partioj, la Socialista kaj la Populara Partio, estas implikitaj en sama skandalo. Tia estis la kazo t. n. “***Plasenzuela***”, en la jaro 2009. Ĝi estis supozitaj delikt-agado, malversacio, fraŭdo kaj mis-agado pri urbanizado far la socialisma urbestro de tiu urbo en ***Cáceres***, ***José Luis Villegas***, akuzita je la deturnado de 4,4 milionoj da eŭroj el publikaj fondusoj kaj alproprigo de pliaj 66.000 eŭroj destinitaj al loĝejo kaj sportejo. Ankaŭ estis akuzita iu socialista konsilisto, la municipa sekretario, kaj la urbestro de la proksima urbo ***Torremocha***, ***Domingo Galán Encina***, de la Populara Partio.

Kiel kutime, la proceso daŭris kelkjaron. Estis la 4-a de septembro de 2015 kiam la Tribunalo numero 2 de ***Trujillo*** arkivis, sen ia ajn puno por la kulpuloj, tiun kazon de ***Plasenzuela***, la plej grandan koruptan procezon okazintan en la regiono ĝis tiam. Sep monatojn antaŭe, la Prokuroro estis petinte la suspendon de la proceso, konsiderante ke ekzistis nesufiĉaj kialoj por subteni la imputon de deliktoj kaj al la iama urbestro de la urbo, ***José Villegas*** (Socialista Partio), kaj al la iama urba sekretario, ***Leopoldo Barrantes***, la iama urb-konsiliano, ***Francisco Crespo*** kaj al la urbestro de ***Torremocha***, ***Domingo Galán***, de la Populara Partio. Atentindas la fakto, ke la kvara akuzito en tiu ĉi afero, estis la municipa sekretario de ***Plasenzuela***, ***Leopoldo Barrantes***, kiu aĝis 44 jarojn, estis filo de la iama sekretario kaj plej alta notario de la Urbodomo de ***Marbella***, ankaŭ li nomata ***Leopoldo Barrantes***, kiu estis implikita en la “kazo Malaya”, kiun la juĝisto lasis libera estinte arestita dufoje.

Sed, verdire, la kulpuloj de iuj kazoj pri korupto en la etapo kiun ni pritraktas, ja, ricevis la meritītan punon el la tribunaloj. Jen iuj el ili: “Kazo ***Bolín***”, en la jaro 2008, ***Enrique Bolín***, de la Populara Partio, iama urbestro de ***Benalmadena***, estis punita al ok-jara nekompetenteco por publikaj funkcioj kaj al monpuno de 16.200 euroj pro priurbanizaj misagoj tial ke li koncesiis permesojn por ne-leĝaj konstruo-laboroj en la jaro 2002. “Kazo ***Sayalonga***”, en la jaro 2009 ***José Luis Navas*** (Socialista Partio), iama urbestro de ***Sayalonga***, estis punita per unu jaro da malliberejo kaj naŭ jaroj da nekompetenteco por publikaj funkcioj pro delikto kontraŭ la leĝo pri teritoria regulado farita en la jaro 2000. “Kazo ***Alzoaina***”, la iama



**_Enrique Bolín_ iama urbestro de _Benalmádena_**



**_José Luis Navas_ iama urbestro de _Sayalonga_**



**_Antonio Blanco_ iama urbestro de _Alozaina_**



**_Antonio Rivas_ kaj _Antonio Fernández García_ implikitaj en la Andaluzia kazo de la _E.R.E._**



***Víctor Manuel Muñiz, Alfonso Carlos Sánchez, María Jesús Otero, Marta Renedo*** y ***José Luis Iglesias Riopedre*** Implikitoj kaj kondamnitoj en la kazo ***Riopedre-Renedo***



***José López Orozco, Oriol Pujol***, ĉi ties patro ***Jordi Pujol, José Blanco López*** kaj ***Jorge Dorribo***, implikitoj en la kazo ***Campeón***



**En la kazo *ITV*, krom *Oriol Pujol*, rilatis kiel implikitoj aŭ simple esploritoj: *Vidal Maragall, Sergi Alsina Jiménez, Sergi Pastor Colldeforns, Isidre Masalles Roman, Josep Tous Andreu, Ricard Puignou Vigo, Germà Gordó Aubarell, María Jesús Muro* kaj *Xavier Pujol***

urbestro de ***Alozaina***, ***Antonio Blanco*** (Unuigita Maldekstro) estis kondamnita en la jaro 2010 al dudek-jara nekompetenteco por publikaj funkcioj pro du deliktoj pri urbo-planismo en la jaroj 2002 kaj 2003.

Ankaŭ per ĉi-lastaj kazoj oni povas konstati ke estas kelk-jara daŭro de la proceso inter la farado de la deliktoj kaj la diktado de la koncernaj sentencoj. Sed sendube la plej longaj procezo kaj proceso estis tiuj de la ERE, dosieroj pri dung-regulado (***Expedientes de Regulación de Empleo***), en kiu estis defraŭditaj proksimume 1.400 milionoj da eŭroj inter la jaroj 2000 kaj 2012 far altranguloj de la Socialista Partio en Andaluzio. La fraŭdo estis malkovrita okaze de la esplorado de la "kazo ***Mercasevilla***" kiam oni detektis neregulajn frupensiiĝojn. La fraŭdo koncernis al 68 entreprenoj. La direktoroj de la intrigo estus, supozeble, ***Antonio Rivas***, delegito en la provinco Sevilo por Labor-dungado, kaj ***Antonio Fernández García***, Konsilisto pri Labor-dungado de la Andaluzia regantaro. La kazo daŭre estis esplorita, en la etapo kiun ni priraportas, far la ordinaraj tribunaloj kaj la Kortumo pri Kontoj. Poste plue daŭris la proceso ĝis la fina sentenco en la jaro 2022. Ni priskribos kaj resumos ĉi-kazon kiam ni priraportos tiun periodon. Nun ni pludaŭrigu la priskribadon de la ceteraj kazoj okazintaj dum la regado de ***Zapatero*** (2004-2011).

"Kazo ***Riopedre***" aŭ ***Renedo***: en januaro 2011 la eksministro pri Edukado kaj Scienco de la Princlando de Asturio de la registaro de ***Vicente Álvarez Areces***, la socialisto ***José Luis Iglesias Riopedre***, estis akuzita pri kontraŭleĝa agado, subaĉeto, influo-trafiko, fraŭdo kaj kontraŭleĝaj postuloj kaj malpermesitaj intertraktadoj por kontraŭleĝaj kontrakt-aljuĝoj kun valoro de pli ol 14 milionoj da eŭroj. En tiuj deliktoj kunkulpis aliaj aŭtoritatuloj de tiu ministrejo de la Asturia registaro. La Provinca Juĝejo de Oviedo kondamnis ok el la 13 akuzitoj de tiu kazo, inter ili ***José Luis Iglesias Riopedre***, ses jarojn da malliberejo, kaj ***María Jesús Otero***, naŭ jarojn kaj duono. Estis kondamnitaj ankaŭ kelkaj entreprenistoj favoritaj per la kontraŭleĝaj kontrakt-aljuĝoj.

"Kazo ***Campeón***": intrigo dediĉita al akirado de kontraŭleĝaj subvencioj por iuj galegaj entreprenoj, kiu okazigis la areston de la direktoro kaj vicdirektoro de IGAPE (Galegia

Instituto pri Ekonomia Promocio). Estis implikitaj du social-istaj regionaj deputitoj, la socialista urbestro de Lugo, ***José López Orozco***, kaj ***Oriol Pujol***, filo de ***Jordi Pujol***. Ĝia plej serioza derivaĵo estas la akuzo pri subaĉeto kaj influ-trafiko far la ministro pri publikaj konstruo-laboroj kaj la vicsekretario de la PSOE ***José Blanco López***, kiu sekrete renkontiĝis ĉe fora benzinstacio kun la komercisto ***Jorge Dorribo***, kiu donintus 400.000 eŭrojn al la kuzo de ***Blanco*** kontraŭ subvencioj. urprizigi nin la fakto ke ĉiuj implikitoj, post la koncerna juĝ-proceso, restis senpunaj, sed tute ne estas por ni surprizo konsiderante kiom multaj similaj kazoj havis similan rezulton en nia lando.

"Kazo ITV": derivita de la antaŭa intrigo; neregulaj koncesioj de ITV (Teknika Inspektado de Veturiloj) en Katalunio. Ĝi kaŭzis la areston, en marto 2012, de du altrangaj katalunaj registaraj oficistoj: ***Josep Tous Andreu***, ĝenerala kunordig-anto de la Barcelona Provinca Konsilio, kaj ***Isidre Masalles***, vic-ĝenerala direktoro de Industria Sekureco, kaj tri komercistoj ***Sergi Alsina Jiménez, Sergi Pastor Colldeforns*** kaj ***Ricard Puignou Vigo***. La resumo akuzas ***Oriol-Pujol***-n je koluzioj kun tiuj deliktoj. Aliaj implikitoj aŭ eblaj komplicoj estis: ***Anna Vidal Maragall, Germà Gordó Aubarell, María Jesús Muro*** kaj ***Xavier Pujol.*** De ***Upprime Energy***, la grupo povis atingi publikajn subvenciojn kaj diversiĝi en la novan komercon en kiu parto de tiuj implikitoj posedis akciojn. ***Oriol Pujol Ferrusola*** devis aliĝi al la nova firmao ne-rekte per sia kunlaboranto, la firmao ***Alsina***. Ĉi-kaze estis kondamnoj al mon-punoj kaj punoj je malliberejo: ***Oriol Pujol*** kaj kvar aliaj akuzitoj restis dum iom da tempo encarcerigitaj.

La "kazo ***Palau***", ankaŭ konata kiel la "kazo ***Millet***" aŭ la pri-rabado de la ***Palau de la Música Catalana***, estis defraŭdo kaj sub-aĉeto aranĝita fare de ***Fèlix Millet i Tusell***, prezidanto de la estraro de kuratoraro de la ***Fundació Orfeó Català-Palau de la Música Catalana*** (kiu estas fondaĵo starigita de ***Fèlix Millet*** mem en 1990 kaj protektita de la ***Generalitat*** de Katalunio, kiel dirite en ĝiaj sta-tutoj), kun la implikiĝo de kelkaj el liaj kunlaborantoj kondamnitaj de la tribunaloj, ***Jordi Montull*** (7 jaroj kaj ses monatoj), ***Gemma Montull*** (4 jaroj kaj 6 monatoj) kaj ***Daniel Osácar*** (4 jaroj kaj 5 monatoj). La defraŭdo estis efektivigita dum proksimume la tuta unua jardeko de la 21-a jarcento. La kazo estigis la konsternon de la kataluna civila socio pro la simbola graveco de la ***Palau*** de la kataluna muziko. La sekvoj de la kazo tuŝis la politikan partion ***Convergència Democràtica de Catalunya*** (CDC), kiu



***Fèlix Millet Tusell, Jordi Montull, Gemma Montull*** kaj ***Daniel Osácar,*** implikitoj en la kazo ***Palau***



***Agustín Cubillo,*** iama urbestro de ***Cambil (Jaén)***



***Ana María Moreno de la Cova,*** iama urbestrino de ***Porcuna (Jaén)***



Rilatintoj al la kazo ***Nóos***: la geparo ***Iñaki Urdangarin*** kaj la infantino ***Cristina***, kaj la entreprenisto ***Diego Torres***.

estintus la ricevanto de la pago de komisionoj de ***Ferrovial*** tra la ***Palau*** de la Muziko kontraŭ la koncesio de publikaj laboraĵoj, kiel la Urbo de Justico aŭ la nefinita linio 9 de la barcelona metroo. La kondamno de januaro 2018 kondamnis ***Félix Millet*** al 9 jaroj da malliberejo kiel la ĉefa respondeca persono.
"Kazo ***Cambil***": puno al 15 monatoj da malliberejo kaj 7 jaroj da malkvalifiko de la eksa socialista urbestro de ĉi tiu urbo en ***Jaén***, ***Agustín Cubillo*** pro prevarikado per donado de du konstrupermesiloj. Ok aliaj implikitoj estis kondamnitaj al ses monatoj en malliberejo.
"Kazo ***Porcuna***": la socialista eksurbestrino de ĉi tiu urbo en ***Jaén***, ***Ana María Moreno de la Cova***, estis kondamnita al 21 jaroj da malkvalifiko por publikaj funkcioj kaj monpuno de 2.190 eŭroj post agnosko, ke ŝi donis tri kontraŭleĝajn konstruo-licencojn inter 2004 kaj 2006. Tri urbkonsilianoj estis kondamnitaj al 14 jaroj de malkvalifiko por publikaj funkcioj kaj la pago de monpuno de 1.460 eŭroj.
"Kazo ***Nóos***": La enketo koncerne al la kromkosto de la velodromo ***Palma Arena***, pri kiu ni temis per la antaŭa ĉapitro de ĉi raporto, originis unu el la plej famaj kazoj de supozata korupto en la historio de la Demokratio en Hispanio, kun sekvoj kiuj rilatis al la iama regiona prezidanto ***Jaume Matas*** kaj al iu membro de la Reĝa Familio, ***Iñaki Urdangarín***. La Duko de ***Palma de Mallorca***, edzo de la Infantino ***Cristina***, ankaŭ estis akuzita je deturnado de publikaj financoj siaprofite tra la ***Nóos Institute***, kies manaĝero estis lia partnero ***Diego Torres***. En Aprilo de 2013, la Infantino estis akuzita far la Juĝisto pro supozata misal-propriigo de publikaj financoj. La Kontraŭ-Korupta Prokuroro apelaciis ĉi tiun akuzon ĉar, laŭ li, ekzistis nenia solida indico. La Fisko taksis la monon enspezitan de la reto de firmaoj de ***Urdangarín*** je pli ol 16 milionoj da eŭroj. La fina sentenco pri ĉi tiu kazo ***Noos*** okazis en februaro de la jaro 2017, jam for de la regad-etapo de Zapatero kiun ni priraportas. Ĉi tiu estas plia kazo kiu montras la lantecon de la funkciado de la justico en Hispanio, kaj krome la sentenco mem montras alian fian aspekton de tiu justico. ***Urdangarín***, Duko de ***Palma de Mallorca***, estis kondamnita al 5 jaroj kaj 10 monatoj da enprizoniĝo, sed li restis en-prizone nur ĝis la jaro 2021, sed oni publike sciis ke en la prizono li ĝuis je speciala komforto. Ĉi tio estus skandalinta la hispanan popolon se ĉi tiu ne estus tro alkutimigita al tiaj aferoj kiam la deliktuloj estas altrangaj uloj. Tamen oni devas aldoni ke ankaŭ ***Diego Torres Pérez*** kaj ***Jaume Matas*** estis punitaj per kelkjara enprizoniĝo pro ci tiu kazo ***Noos***. Krome ili kaj ***Iñaki Urdangarín*** kaj la Infantino ***Cristina*** devis redoni grandajn monsumojn pro ilia kontraŭleĝa enspezado en ĉi tiu kazo.
"Kazo ***Tótem***": Estis arestitaj, inter aliaj, la urbestro, ***Juan Morales***, la estro de la loka polico, kaj sekretario de la Urbodomo de ***Totana*** (Murcio). Ĉi tiu kazo aperis en novembro 2007, kiam la Civil-Gvardio malkovris eblan delikton de pago eŭro-milionajn komisionojn kontraŭ municipaj licencoj en la urbo ***Totana***.
La galegia grupo ***Nuaria*** estus akirinta la licencojn por konstrui pli ol 5.000 loĝejojn per eksterleĝaj komisionoj en kio estus la plej granda loĝkomplekso en la municipo. Dum la enketo, preskaŭ dudek homoj estis arestitaj. Ĉiuj restis senpunaj eĉ sen juĝo, nur la urbestro estis kondamnita al du jaroj da malliberejo.
"Operacio ***Biblioteca***": Estis arestitaj ***José Martínez García***, urbestro, de ***Librilla*** kaj ***Simón Alcaraz*** urbestro de ***Aledo*** (ambaŭ en la provinco de Murcio) kune kun kelkaj aliaj funkciuloj kadre de la esploroj far la Enketa Juĝejo numero 6 de Murcio, kiu malfermis

proceson por subaĉeto, kaj intertraktadoj malpermesitaj al publikaj funkciuloj. Kiel kutime la proceso estis longdaŭra; nur ses jarojn poste estis diktita la sentenco, fakte, unu el la implikitoj jam estis forpasinte tiam, alia deklaris kialojn de malsano cele liberiĝi el enprizoniĝo. En Hispanio, kiel longe daŭras la juĝprocesoj, estas sufiĉe oftaj la la kazoj de kulpuloj kiuj sin liberigas eniri en prizonon pro sia multaĝo.

"Kazo ***Brugal***": enketo komencita en 2006 pri deliktoj de subaĉeto, ĉantaĝo kaj influtrafiko en la aljuĝo de publikaj kontraktoj en konkursoj por la administrado de rubkolektaj servoj en diversaj urboj regataj de la Populara Partio en la provinco de Alakanto. La enketo komenciĝis en la jaro 2006, kaj kelkaj arestoj estis faritaj en majo de 2007. En julio 2010, la kazo estis rekomencita kun novaj implikitoj. Inter la implikitoj estis kvar sinsekvaj urbestr(in)oj, de la P.P., de ***Orihuela***, ***Luis Fernández Cartagena***, ***José Manuel Medin***a, ***Monica Lorente*** kaj ***Emilio Bascuñana***, samkiel aliaj funkciuloj de altranguloj de la sama partió en ***Orihuela***, kaj kelkaj entreprenistoj  La afero finiĝis per kelkaj malliberecaj punoj.

"Kazo ***Logroño Turismo***": La konsiliano de la urbodomo de ***Logroño***, ***Ángel Varea***, de la Rioĥa Partio, kaj lia asesoro ***Erich Reiner*** neregule aljuĝis kontraktojn inter la jaroj 2008 kaj 2011 al la firmao ***Jazz Group*** per la Fondaĵo ***Logroño Turismo***. La du politikistoj kaj la manaĝero de la kompanio estis kondamnitaj en 2021 pro administra malbonfarado, defraŭdo de publikaj monrimedoj kaj influo-trafiko al tri jaroj da malliberejo, 17 jaroj da malkvalifiko de publika ofico kaj monpuno de 6 000 eŭroj.

Ni vidas kiom multe oftas da kazoj de urbo-planisma korupto. Per kontraktoj, falsitaj ofertoj kaj publikaj aljuĝoj kontraŭ la koncerna maklero, la korupto ligita al urba disvolviĝo infektis administraciojn, politikajn partiojn kaj privatajn entreprenojn. La tero, sur kiu eblas konstrui, generas egan kaj facilan monkvanton, kiu permesas skandalajn operaciojn kaj la deturnadon de monsumoj al privataj aŭ partiaj kontoj. La rekvalifiko de tereno kaj la posta ekspansio de la konstruado generis ĉiajn kontraŭleĝajn agojn, kiuj plenigis la poŝojn de ĉiuj implikitoj. La proceduro konsistas el "aĉeti" la urbestron, urbkonsilianon, deputiton aŭ reganton por ricevi la koncernan aljuĝon.

Inter tiom multaj kazoj de koruptado pri urbo-planismo dum tiu etapo, eble ni nevole lasis iujn for de nia raporto. Krome estas la fakto ke multaj kazoj en kiuj oni estis agante eksterleĝe tiam pri ĉi tiu afero kaj aliaj, ne estis malkovritaj ĝis la sekvinta regad-etapo, tiu de ***Mariano Rajoy***, kiun ni priraportos per la sekva ĉapitro.



***Juan Morales, iama urbestro de Totana***



***José Martínez García***, urbestro de ***Librilla*** kaj ***Simón Alcaraz***, urbestro de ***Aledo***, implikitaj en la kazo ***Biblioteca***



***Luis Fernández Cartagena, José Manuel Medina, Mónica Lorente*** kaj ***Emilio Bascuñana***, kvar sinsekvaj urbestroj de Orihuela impliktaj en la kazo ***Brugal***



***Ángel Varea*** kaj ***Erich Reiner***, implikitaj en la kazo ***Logroño Turismo***




Ni ripetas ke, kvankam nia celo estas trakti la temon de la korupto en Hispanio, por pli bona kono de la historiaj cirkonstancoj en kiuj ĝi okazas, ni devas ankaŭ priatenti la fonon aŭ politikan medion en kiu koruptado okazas.

La kresko de la sendependisma movado en Katalunio ekrapidiĝis kiam, post sia ega balota venko de novembro de 2011, la Populara Partio pliseverigis la ĝermantan katalunisman krizon kunigante politikojn de recentralizado kaj severeco, kiuj igis ke la ***Generalitat*** tranĉu elspezojn por publikaj servoj, ĉefe sano kaj edukado. La senlaboreco estis ĉe la origino de multaj eldomigoj. Kadre de la mobilizoj tiorilate, la ***Assemblea Nacional Catalana*** (ANC) estis kreita en marto de 2012, enkanaligante tiujn sociekonomikajn plendojn cele premadi por referendumo pri la plena sendependeco de Katalunio. La ekonomiaj cirkonstancoj instigis la kreskon de la sendependisma sento. La senlaboreco pliiĝis kiel rezulto de la severa politiko de ***Artur Mas***, kun la subteno de la kataluna PP. Por kompensi la sekvan perdon de populareco, ***Artur Mas*** alprenis pli agreseman tonon substrekante la neproporcian naturon de la fiska kontribuo de Katalunio al la hispana ekonomio, tial li pliintensigis sian separisman retorikon. La 11-an de septembro, en la ***Diada*** de tiu jaro, pli ol miliono da personoj manifestaciis favore al sendependeco sub la slogano "***Catalunya, nou estat d'Europa***" ("Katalunio, nova ŝtato de Eŭropo"). ***Mas*** intencis intertrakti fiskan pakton kun Madrido sed, antaŭ iu kunveno antaŭvidita por la 20-a de septembro, ***Rajoy*** provoke deklaris, ke tiam ne estas la tempo por "tumultoj, konfliktoj, polemikoj kaj disputoj" konsiderante la kvanton de la ŝuldo de Katalunio kaj ties sep-cent-mil senlaboruloj. Tio estis vidita en Barcelono kiel incendia faro ĉar la ***Generalitat*** taksis ke Katalunio bezonis peti kvin miliardojn da eŭro-savpakaĵo ĝuste ĉar, ekde la verdikto de la Konstitucia Tribunalo en 2010, la komunumo estas trafita de financa sistemo kiun en Katalunio oni konceptis kiel maljustan. Kiam la kunveno okazis, ***Rajoy*** tute ekskludis ajnan eblan ŝanĝon en la fiska rilato.

***Artur Mas*** respondis al la rifuzo de ***Rajoy*** plifortigante la ligojn de sia partio, CiU kun la sendependistoj de ERC kaj kun la ekologiisma maldekstro de ***Iniciativa per Catalunya Verds***. La popola subteno al plena sendependeco pliiĝis. La 27-an de septembro, CiU aldoniĝis al ERC kaj ICV por subteni postulon de referendumo pri la sendependeco de Katalunio kaj ***Mas*** kunvokis anticipitan balotadon en Katalunio. En la kampanjo por tiu regiona balotado la 28-an de novembro 2012, la konservativa partnero de ***Artur Mas***, ***Josep Antoni Duran i Lleida***, gvidanto de la kristandemokrata partio ***Unió Democràtica de Catalunya*** (UDC), esprimis sian indignon pro la rifuzo de ***Rajoy*** negoci fiskan pakton en la kunteksto de la korupteco de la PP per jenaj vortoj: «***l'Estat és una claveguera***» («la Ŝtato estas kloako»). Tamen, la intensiĝo de la sendependismo de ***Mas*** igis lin perdi la subtenon de anoj de lia partio malfavoraj al la apartigo de Hispanio. La nombro de parlamentaj sidlokoj de CiU falis de 62 al 50, dum ERC gajnis 21 (11 pli ol en 2010) kaj ICV, 13 (3 pli). La plej radikala separisma formacio, la ***Candidatura d'Unitat Popular*** (CUP), konservis siajn tri sidlokojn. Kune, la ensembla voĉdono de CiU, ERC, ICV kaj CUP altiĝis de 85 al 87 sidlokoj. ***Mas*** estis ĵurkonfirmita kiel prezidanto la 19-an de decembro de 2012, post subskribo de interkonsento kun la aliaj du formacioj menciitaj kiu inkludis la engaĝiĝon fari publikan konsulton pri la estonta statuso de Katalunio.

Malgraŭ avertoj de la Konstitucia Tribunalo, laŭlonge en 2013 la naciismaj partioj daŭrigis la preparojn por referendumo pri sendependeco okazonta en novembro de 2014. Kiam la propono okazigi ĉi tiun referendumon estis prezentita al la Hispana Kortumo, en aprilo de 2014, ĝi estis venkita per 299 voĉoj kontraŭ 47. La sendependismaj partioj en la Kataluna Parlamento tiam redaktis leĝon, kiu permesus okazigi nereferendumajn konsultojn. ***Rajoy*** reagis apelaciante la leĝon al la Konstitucia Kortumo, kiu malpermesis la konsulton. ***Mas*** respondis per la ruzo deklari ke temis pri civitana konsulto administrita de volontuloj. Fine, la 9-an de novembro, la tagon de la referendumo, la partopreno estis nur 37 elcento el la voĉ-donantaro, kio respegulas la fakton ke multaj laboristaj katalunoj estis de hispanlingva enmigrint-



**2011- Registaro de *Rajoy***



Homamasa katalunisma manifestacio de la 21-a de septembro de 2012



Kunsidas ***Mariano Rajoy*** kaj ***Artur Mas*** en 2012



***Josep Antoni Duran i Lleida*** kaj ***Artur Mas***



***Johana Ortega* kaj *Irene Rigau* kun *Artur Mas***

deveno. La partio ***Ciudadanos*** profitis la malfortecon de la korupta PP per impeta opozicio al la plebiscito. Kvankam la voĉdono favore al sendependeco de Katalunio estis 80,76 elcento, la malalta partopreno ne subtenis la aserton de ***Mas***, ke la vojo estis malfermita al procezo de plena sendependeco. Post kelkaj tagoj la Ŝtata Prokuroro prezentis akuzon pri malobeo, malbonfarado kaj defraŭdo de publikaj monrimedoj kontraŭ ***Mas***, la vicprezidantino ***Joana Ortega*** kaj la ministrino pri Edukado, ***Irene Rigau***.
Cele profiti la referendumon de la 9-a de novembro, ***Mas*** denove antaŭigis la balotadon por la 27-a de septembro de 2015, argumentante ke la voĉdonado povus havi rangon je plebiscito se la sendependecismaj partioj inkluzivus la separismon en siajn programojn. La 30-an de marto, CiU, ERC kaj reprezentantoj de la sendependismaj civitanaj grupoj –***Carme Forcadell*** nome de la ANC kaj ***Muriel Casals*** nome de ***Òmnium Cultural***– konsentis pri "unueca agadplano por la kataluna suverenisma proceso", kiu inkludis unuflankan sendependec-deklaron en la periodo de 18 monatoj se ilia koalicio, kiu prezentis sin kiel ***Junts pel Sí***, venkus en la balotado. La sekvan tagon, ***Rajoy*** avertis ke la centra registaro ne permesos ajnan malobservon de nacia integreco. Ĉar ***Duran i Lleida*** estis malfavora al ajna kontraŭleĝa separisma ago, en junio de 2015 ***Unió Democràtica*** retiris siajn konsilistojn de la ***Generalitat*** kaj CiU estis dissolvita. ***Convergència*** kaj UDC starus aparte por la baloto. Naŭ tagojn antaŭ la balotado, la tagĵurnalo ***El Mundo*** revivigis la skandalon ke firmaoj al kiuj oni aljuĝis publikajn kontraktojn estis devigitaj fari "bonfaran donacon" ekvivalentan al 3 elcento de la kontrakto al la ***Palau de la Música Catalana***, mono kiu poste estis transdonita al la ***CatDem Foundation***. Tamen, la gazeto malvere deklaris ke parto de tiu mono estis deponita en la privataj bankkontoj de ***Artur Mas*** kaj lia patro, de ***Jordi Pujol*** kaj ankaŭ ties edzino, ***Marta Ferrusola***.
La 27-an de septembro, per 39 elcento el la voĉdonoj kaj 62 sidlokoj, ***Junts pel Sí*** atingis plimulton en parlamento, malproksime el la esperita apogo al la sendependeco. La koalicio de ***Podemos*** kaj ICV, nomita ***Catalunya Sí Que Es Pot***, kiu aspiris al reformo de la Statuto de Aŭtonomeco, akiris 8,94 elcento el la voĉdonoj kaj 11 parlamentajn seĝojn. La PSC-socialistoj, kiuj rekomendis federacian kortuman solvon, gajnis 12,72 elcdenton de la voĉdonoj kaj 16 parlamentajn sidlokojn. Fronte malfavoraj al ajna movado al sendependeco estis la centro-dekstra Partio ***Ciudadanos***, kiu rikoltis 17,9 elcenton el la voĉdonoj kaj 25 parlamentajn seĝojn, kaj la kataluna PP, kiu gajnis 8,49 elcenton kaj 11 seĝojn. ***Mas*** pensis ke eblus daŭrigi la por-suverenecan procezon kunlabore kun CUP, radikala naciisma formacio kaj feroce kontraŭkapitalisma, kiu gajnis 8,21 elcenton el la voĉdonoj kaj 10 parlamentajn seĝojn. Tiuj dek sidlokoj igis la CUP-n la arbitro de la kataluna politiko, decidita doni sian parlamentan subtenon nur kondiĉe al decido pri rapida sendependec-deklaro. En la Parlamento de Katalunio, la 27-an de oktobro, ***Junts pel Sí*** kaj la CUP prezentis rezolucion instigantan la komencon de la procezo de kreado de sendependa kataluna respubliko. Kun la opozicio de la PP, ***Ciudadanos*** kaj la PSC, la rezolucio estis aprobita la 9-an de novembro. ***Rajoy*** tuj faris apelacion al la Konstitucia Kortumo, kiu deklaris ĝin kontraŭa al la Konstitucio.

Kiu ajn estus la kalendaro de ***Mas*** por avanci al la sendependeco, la aferoj akceliĝis ekde la momento kiam la ***Generalitat*** estis pelita de la CUP kaj la bazoj de ANC kaj ***Òmnium Cultural***. Laŭ la vortoj de iu komentisto, la procezo havis nek stirilon nek bremsilojn. En reprezalio pro tio ke ***Artur Mas*** estis aplikinta politikon de reduktado de sociaj rajtoj, la CUP rifuzis subteni lian enoficigon kiel kataluna registrar-prezidento kaj postulis ke ***Junts pel Sí*** prezentu alian kandidaton. Tiel do, ***Mas*** estis anstataŭigita en januaro de 2016 per la iama urbestro de Ĝirono, ***Carles Puigdemont***. En la kongreso de ***Convergència*** en julio de 2016, estis decidite ŝanĝi la nomon de la partio, pro la damaĝo kaŭzita de la malkaŝo en 2014 de la korupt-skandalo rilate al la riĉaĵo kaŝita de ***Pujol*** en diversaj impostaj paradizoj kaj la rompo en 2015 kun Demokratia Unio de Katalunio. Post longa intertraktado, en septembro de 2016 la partio iĝis la ***Partit Demòcrata Europeu Català*** (***PDeCat***). En januaro de 2017, kiam li estis juĝota pro okazigo de la kontraŭleĝa konsulto de 2014, ***Artur Mas*** eksiĝis kiel prezidanto de la ***PDeCat*** por koncentri sin en sian defendon. Li estis trovita kulpa je malobeo kaj deliktado kaj kondamnita al du jaroj da malkvalifiko por plenumado de ŝtatofico, kaj ankaŭ pagi al la publika fisko la kostojn de la referendumo.

Dume, en la cetero de Hispanio, la publika indigno pro la skandalo de ***Bankia*** pliiĝis kiam oni sciis en oktobro de 2014 ke, inter la jaroj 2003 kaj 2012, la administrantoj de ***Caja Madrid*** kaj ***Bankia*** ĝuis la uzon de "nigraj" kreditkartoj uzataj por fiske malklaraj personaj elspezoj, entute 15,5 milionoj da eŭroj. Aldone al salajroj kaj elspezoj ligitaj al ilia profesia agado, la kartoj estis uzitaj por vojaĝado, libertempa agado, vestaĵo, kaj monenspezoj. Ekzemple, ***Rodrigo Rato*** elspezis 54.800 eŭrojn kaj ***Miguel Blesa***, eksprezidanto de ***Caja Madrid***, 436.700 eŭrojn. En februaro de 2017, sesdek kvin membroj de la estraroj de direktoroj de ambaŭ bankoj estis kondamnitaj al totalo de 120 jaroj en malliberejo, kun ***Blesa*** ĉe la pinto de la listo kun ses jaroj, sekvita de ***Rato*** kun kvar kaj duono jaroj. ***Blesa*** memmortigis en julio de 2017.

La krizo en Katalunio, malgraŭ ĝia kreskanta severeco, ne kreis la alarmon pro la fakto ke la atento de la amaskomunikiloj estis koncentrita sur la rilato de la ŝtatestro kun korupto. La tabuo, kiu kutime malhelpis la publikan kritikon kontraŭ la monarkio, ĉesis funkcii post la jaro 2007. Fakte, la ekonomia krizo kaj la



***Carme Forcadell***



***Muriel Casals***



**Geparo *Jordi Pujol* *kaj Marta Ferrusola***



***Carles Puigdemont***



***Rodrigo Rato kaj Miguel Blesa***

redukto de la bonfara ŝtato kaŭzis ke deputitoj de la PNV kaj ERC komencis fari malamikajn demandojn pri la buĝeto de la Krono. Elreviĝo pri la monarkio disvastiĝis dum la ekonomia krizo post-2010 kiel parto de la ĝenerala indigno pro la korupto. La 8-an de majo 2010, ***Juan Carlos*** spertis pulmoperacion kiu komence verŝajne estis pro kancero. Ĝi estis la komenco de progresiva plimalboniĝo en lia sano kiu inkludis intervenojn por enplanti al li genuajn kaj koksajn protezojn. La pozicio de la reĝo plimalboniĝis en la jaro 2012 pro la enketo pri la fraŭda komerco de lia bofilo ***Iñaki Urdangarín***. La situacio pligraviĝis post kiam la monarko estis vundita pro falo dum ĉaso de elefanto en Bocvano en aprilo de 2012, kio provokis impeta kritiko, interalie ĉar li malkaŝis sian rilaton kun la german-dana 40-jaraĝa entreprenistino ***Corinna Larsen***, kiu akompanis lin en tiu vojaĝo. Ili estis renkontiĝintaj en februaro de 2004, kiam ***Corinna*** ankoraŭ estis edzino de la princo ***Casimir zu Sayn-Wittgenstein***, el kiu ŝi disiĝos baldaŭ poste. En la kunteksto de la ekonomia krizo, kun senlaboreco super 25 elcento, la foresto de la reĝo de Hispanio por esti en safaro kun adulta rilato kaŭzis enorman damaĝon al lia populareco.

Kun la kreskanta por-respublikana sento, la “***Urdangarín***-kazo” plue influis la kredindecon de la monarkio. La skandalo estis ekfunkciigita per la rolo de la reĝa familio en la ŝajne soci-utila konsilanta firmao de ***Urdangarín*** nomita ***Instituto Nóos***. Pri la skandalo de la kazo ***Noos*** kaj ties rilato kun la bofilo de la reĝo, ***Iñaki Urdangarín***, ni jam iome informis per la antaŭa ĉapitro, raportante pri la koruptado okazinta dum la regado de ***Zapatero***, sed la afero estis malkovrita kaj iĝis publika skandalo dum la etapo de regado de ***Rajoy***, kiun ni priskribas ĉi tie. Kiel sciate, en la jaro 2004, ***Urdangarín***, kiu kiel rezulto de sia geedziĝo kun la Infantino ***Cristina*** ricevis la titolon de Duko de ***Palma***, estis la direktoro de la ***Instituto Nóos***, de kiu lia edzino estis listigita kiel administrantino. Inter la jaroj 2004 kaj 2006, ***Urdangarín*** kaj lia partnero, ***Diego Torres***, organizis aranĝojn el kiuj ili ricevis astronomiajn kotizojn. Lia rolo estis komence malkovrita en la kadro de la fama korupta kazo de ***Palma Arena***, en kiu estis implikita la eksprezidanto de la PP en Balearaj Insuloj, ***Jaume Matas***. La enketo malkaŝis ke, dank' al la percepto de la reala influo de ***Urdangarín*** kaj sen ia publika konkuro, la ***Instituto Nóos*** ricevis grandegajn kvantojn da publika mono en la Balearoj kaj la Valencia Komunumo por fikciaj aŭ skandale multekostaj servoj: du konferencoj en 2005 kaj 2006 pri turismo kaj sporto por la tiel nomata “***Illes Balears Forum***” kostis po pli ol unu miliono da eŭroj. La fakturitaj elspezoj inkludis 80.000 eŭrojn por “kvar tagmanĝoj, tri vespermanĝoj kaj ses ***coffee breaks***” por la ĉeestantoj. Same, en la Valencia Komunumo, la ***Generalitat*** kaj la Urbodomo pagis pli ol tri milionojn da eŭroj por la organizado de tri kongresoj «***Valencia Summit***» pri la avantaĝoj por urboj gastigantaj sportajn eventojn, kiam la reala kosto de ĉiu kongreso estis de nur cent mil eŭroj. Laŭ la fiskaj aŭtoritatoj, la ***Instituto Nóos*** kaj kompanioj ligitaj al ĝi fakturis almenaŭ 16 milionojn da eŭroj al diversaj publikaj kaj privataj entoj, kaj preskaŭ 40 elcente el iliaj profitoj

venis el publikaj kasoj. Dokumentoj konfiskitaj de ***Nóos*** rivelis ke grandaj monsumoj estis deturnitaj al impostaj paradizoj kiel ekzemple Belizo.

En la jaro 2005, ***Urdangarín*** kaj lia edzino aĉetis luksan loĝejon en la ekskluziva barcelona kvartalo de ***Pedralbes*** per 6 milionoj da eŭroj, kio vekis suspektojn pri la deturniĝo de publikaj monrimedoj tra ***Nóos***. La Reĝa Domo sufiĉe zorgis pri la honesteco de ***Urdangarín*** ĉar organizis oran ekzilon por li kaj lia familio en Vaŝingtono, kiel reprezentanto de ***Telefónica***, en aprilo de 2009, kun salajro de unu miliono da eŭroj. En junio de 2011, la partnero de ***Urdangarín***, ***Diego Torres***, estis akuzita kaj la 7-an de novembro kontraŭkoruptaj prokuroroj traserĉis la ĉefsidejon de la ***Instituto Nóos*** en Barcelono. Post du tagoj, kaj ***Torres*** kaj ***Urdangarín*** estis akuzitaj je dokumenta falsaĵo, fraŭdo kaj malversacio de publika financo. En aprilo de 2012, post kiam ***Urdangarín*** rifuzis partopreni en komuna defenda strategio, la repuŝita ***Torres*** komencis publikigi kompromitajn retpoŝtojn de sia iama partnero.

Tiuj retpoŝtoj, publikigitaj dum la sekvaj monatoj, insinuis ke la reĝo helpis al ***Urdangarín*** akiri kontraktojn kaj rivelis ke ***Corinna zu Sayn-Wittgenstein*** estis implikita en la organizo de la ***Valencia Summit***. En fama intervjuo kun la ĵurnalistino ***Ana Romero***, ***Corinna*** neis esti implikita en ***Nóos***, sed agnoskis ke la reĝo petis al ŝi trovi laboron por ***Urdangarín*** en la mondo de la internacia sporta sponsorado en kiu ŝi moviĝis. Kiam la infantino ***Cristina*** estis akuzita, la Reĝa Domo decidis lasi ***Urdangarín*** defendi sin. La defenda strategio de ***Cristina*** estis deklari ke ŝi sciis nenion kaj ke ŝi agis blindigita de amo al sia edzo. La maltrankvilo, ke ĉio ĉi kaŭzis sur la Reĝo, estis respegulita en lia kristnaska mesaĝo de la jaro 2011. Responde al kreskantaj kritikoj de la maldekstraro kaj de vaskaj, katalunaj kaj galegaj naciistoj, li parolis pri korupto, sen mencio pri ***Urdangarín***, kaj deklaris, ke la justico estas egala por ĉiuj. La 29-an de decembro 2011, ***Urdangarín*** estis formale akuzita je misfarado, malversacio, fraŭdo kontraŭ la Administracio kaj impostfraŭdo. En junio de 2018, li estis kondamnita al kvin jaroj kaj dek monatoj en malliberejo. La damaĝo al la krono estis grandega. La reĝo devis konsenti ke sia filino estu akuzita pro la supervivo de la monarkio.

Ŝajnis pli kaj pli evidenta ke la monarko estis malŝparinta la enorman politikan kapitalon kiun li akumulis inter la jaroj




**La reĝo *Juan Carlos* kun *Corinna Larsen***



***Iñaki Urdangarín***



***Diego Torres Pérez***



***Jaume Matas i Palou***



**Kongreso *Valencia Summit***

1975 kaj 1982. La respublikana sento pligrandiĝis, ĉefe inter la malpli ol 35-jaraĝaj hispanoj. Tamen, en la printempo de 2012, ŝajnis ke la firma, kvankam malfrua, reago al la kazo ***Urdangarín*** komencis ripari la situacion. Ironie, la 14-an de aprilo, en la 81-a dat-reveno de la proklamo de la Dua Respubliko, eksplodis la menciita krizo, en kiu la reĝo devis suferi kirurgion pro triobla frakturo de la femuralo kun dekstra koksa protezo enplantita kiel rezulto de sia falo en Bocvano. Lia ĉasado jam provokis la indignon de aktivuloj pri bestaj rajtoj, kaj ankaŭ demandojn de deputitoj de PNV kaj ERC pro ilia alta kosto, en tempo de reduktado de buĝetoj pri sano kaj edukado.
Fakte, la 750.000 eŭroj kiujn kostis la Bocvana ĉaso estis pagitaj de saudi-arabia amiko de la monarko, kvankam ĉi tiun relative pozitivan informon ombris la malkaŝo de la kunulino de ***Juan Carlos***. Kiam ili unue renkontiĝis, ***Corinna*** estis laboranta por ***Boss & Co***, londona fabrikanto de specialaj pafiloj, kiu organizadis luksajn safarojn por riĉaj klientoj. En 2006, ***Corinna*** komencis sian propran konsilantan firmaon, ***Apollonia Associates***, kiu organizis sponsoradojn por altprofilaj sporteventoj. La elefantoj kaj la germana princino konspiris por krevi la amaskomunikilan digon kiu protektis la privatan vivon de la reĝo ĝis tiam. Dum jaroj, onidiroj pri la mal-facilaĵoj de lia geedziĝo kun la reĝino ***Sofia*** eroziis la popularecon de la monarkio. Laŭmezure ke kreskis la rilato de la reĝo kun ***Corinna***, lia teniĝo al ***Sofía*** iĝis pli mal-amika, ĝis tia punkto ke la monarko estis laŭdire aŭdita diri, rilatante al sia edzino: "mi ne povas elteni ŝin, mi malamas ŝin". La duobla skandalo de la Bocvana ĉasado kaj malfideleco intensigis kritikon. La PNV-prezidanto ***Iñigo Urkullu*** deklaris ke li estis "ŝokita kaj embarasita" pro la konduto de la reĝo, kaj kondamnis la Bocvanan ĉason kiel "absolute frívola". La UGT kaj ***Comisiones Obreras*** priskribis la vojaĝon kiel malkonvenan kaj postulis klarigojn. La 30-an de majo de 2012, IU, ERC kaj BNG unuiĝis en la Kortesoj por peti komisionon de enketo por establi mekanismojn de parlamenta kontrolo kaj travidebleco sur la publikaj agadoj de la reĝo kaj la reĝa familio. Krom la kritiko pri la nerespondeco de la Bocvana ĉaso kaj la ***Urdangarín*** aventuro, klaĉo kaj klaĉo cirkulis pri la plimalboniĝon de la edzeca situacio de la monarko. La plej severaj riproĉoj koncernis la rilaton de ***Juan Carlos*** kun ***Corinna*** kaj la fakton, ke ŝi ofte akompanis lin en vojaĝoj eksterlanden, kie ŝi foje alprenis oficialajn funkciojn kaj eĉ posedis diplomatian pasporton.
Dum lia restado en la hospitalo, la reĝo kaj liaj konsilistoj estis forte trafitaj de la ondo de publika kritiko kaj ĉi-lastaj konsilis al la monarko alparoli al la nacio. Do, kiam ***Juan Carlos*** forlasis la klinikon, la televidkameraoj atendis lin. Li parolis vortojn neniam aŭditajn el la lipoj de iu hispana ŝtatestro, reĝa aŭ respublikana: «***Mi tre bedaŭras. Mi eraris kaj tio ne okazos denove***». Lia pento faciligis al la Registaro, la PP, la PSOE kaj CiU esprimi sian subtenon al li. La unua fojo, kiam oni oficiale faris mención pri ***Corinna***, estis kiam oni diris al la ĵurnalistoj: "De nun, ***Don Juan Carlos*** sin tenos tre diskretece rilate al personaj amikoj, kiuj akompanas lin en liaj privataj agadoj kaj vojaĝoj. Tamen, aldonis oficialaj fontoj, la reĝo ne rezignas ĉi tiujn amikecojn, kiuj

inkluzivas la proksiman rilaton, kiun li havis dum jaroj kun la germana princino ***Corinna zu Sayn-Wittgenstein***, entreprenistino kaj organizantino de safaroj, kiu ankaŭ akompanis la monarkon ĉe la ĉaso de Bocvano”. En septembro de 2013, ***Corinna*** rakontis al usona ĵurnalisto ke ŝi kaj la reĝo estis geamantoj, sed nun ili estis “intimaj amikoj”. Iuj homoj ne komprenas, ke en difinita momento povas okazi aferoj, kiuj poste finiĝas, sed la amikeco ne finiĝas.

Paralele al lia populareco, ankaŭ la sano de ***Juan Carlos*** plimalboniĝis. En novembro de 2012, li havis protezan enplantaĵon en sia maldekstra kokso; En marto de 2013, li suferis diskan hernion kaj denove estis enhospitaligita ses monatojn poste kiam lia maldekstra koksa protezo iĝis infektita. Oni deĉenigis konjektojn pri la bezono de la reĝo abdiki ne nur pro siaj sanproblemoj, sed ankaŭ ĉar la ekonomia krizo estis konsiderata pruvo de la nekompetenteco kaj korupto de la politika klaso, kies bazŝtono ***Juan Carlos*** estis. La 5-an de januaro 2014, kiam la reĝo estis sepdek-jaraĝa, la tagĵurnalo ***El Mundo*** publikigis balotenketon indikante ke 62 elcento el la civitanaro estis favora al lia abdiko. La 6an de januaro, eble postebria post ekskurseto al Londono, li apenaŭ povis kompletigi sian paroladon ĉe la ĉiujara Armea Paska festado. La venontan tagon, januaron 7, ***Cristina*** estis akuzita. Pro la daŭra presara adversa komunikado kaj opiniado, ***Juan Carlos*** komencis pripensi abdikon.

Konvinkita ke estus malfacile al li reakiri la popularecon kiu devus esti la bazo de la supervivo de la Krono, aŭ simple tro laca por provi tion intenci, ***Juan Carlos*** decidis doni al sia filo Filipo la 6-a la plej bonan ŝancon resti sur la trono longan tempon: li abdikis la 2-an de junio 2014. Poste lia bildo estis plue makulita per la publikigo en julio 2018 de registradoj de interparolo okazinta en Londono en 2015 inter ***Corinna***, ***Juan Villalonga*** kaj la sinistra ekspolicano ***Jose Manuel Villarejo***. La korupta ***Villarejo*** amasigis riĉaĵon per monlavado kaj ĉantaĝo, en la kurso de ombraj operacioj por privataj kaj publikaj klientoj. ***Corinna***, kiu poste asertis ke ŝi ne sciis ke ŝi estis registrata, diris ke ***Juan Carlos*** petis al ŝi edziniĝi al li. Ŝi ankaŭ faris kompromitigajn revelaciojn pri la negocoj de la monarko. ***Corinna*** asertis ke li instigis la agadon de ***Urdangarín*** ĉe la ***Instituto Nóos***, ke li havis sekretajn bankkontojn en Svislando, ke li metis


La reĝo *Juan Carlos* ĉasas elefantojn


*Iñigo Urkullu*


*Juan Villalonga*


*José Manuel Villarejo*


*Joaquim Torra*

posedaĵojn en ŝian nomon en Monako kaj ke li gajnis riĉaĵon en komisionoj de diversaj entreprenoj en Saud-Arabio, inkluzive de la konstruado de la rapidtrajna linio inter Mekao kaj Medino.
La sekva malboniĝo de la bildo de la monarkio ne estis la sola problemo kiun ***Juan Carlos*** testamentis al sia filo. Se en la jaro 2014 ankoraŭ ne estis evidenta, en 2018 evidentiĝis ke Filipo la 6-a heredis la tronon de amare dividita lando, kun rompita politika sistemo, rezulto de korupto kaj politika nekompetenteco. Eĉ antaŭ la fina erozio de la pozicio de lia patro, kolerego pro la ĝeneraligita korupto de la politika klaso komencis pezi sur publika opinio. La rezulto povus esti kontrolita en 2015 per la pliiĝo de la maldekstraj popolistoj de ***Podemos***. En la ĝenerala balotado de la 20-an de decembro de tiu jaro, la kombinitaj voĉdonoj favore al la PSOE kaj la PP falis al rekorda minimumo de 51 elcento. La PP akiris 123 el la 350 seĝoj en la Kongreso (63 malpli ol en la antaŭa leĝdona periodo) kaj la PSOE 90 (20 malpli). Ĝia hegemonio en la Cortes estis pridubita de ***Podemos***, kun 42 sidlokoj, kaj de la centrodekstra Partio ***Ciudadanos***, kun 40. La Parlamento estis blokita kaj neniu interkonsento estis atingita pri la formado de registaro. ***Rajoy*** daŭre funkciis kiel prezidanto de la provizora registaro ĝis la nova balotado estis okazigita la 26-an de junio. La PP denove gajnis ilin, sed per nur 137 parlamentaj sidlokoj ĝi restis malproksime el absoluta plimulto. La socialistoj restis dualoke, kvankam ili perdis kvin sidlokojn. La kontraŭkorupta fronto ***Unidos Podemos***, formita de ***Podemos***, ***Izquierda Unida*** kaj diversaj regiónismaj formacioj, havis 71 sidlokojn.
La malforteco de la Registaro de Madrido, rezulto de korupto, donis flugilojn al la sendependisma movado en Katalunio, kie la subteno al tute sendependa Ŝtato altiĝis al 47 elcento. Puŝita de la CUP, en julio 2016, la naciisma koalicio de ***Puigdemont*** provis profiti la malfortecon de la centra registaro por antaŭenigi la referendumon pri la sendependeco de Katalunio, kiu jam estis malpermesita de la Konstitucia Kortumo. La vojo estis tiel malfermita al katastrofa procezo de konfrontiĝo inter Madrido kaj Barcelono, kies sekvoj dividis ne nur Hispanion, sed ankaŭ Katalunion. La malbona evoluado de la kataluna problemo fare de kaj ***Rajoy*** kaj ***Puigdemont*** povis nur konduki al katastrofo. La malzorgemo de ĉi-lasta permesis al ***Rajoy*** plifortigi sian pozicion adoptante firme kontraŭ-katalunan teniĝon anstataŭ apelacii al la plimulto el la katalunoj kiuj ne akceptis la celon de separismo. ***Rajoy*** komence pensis ekspluati la kontraŭkatalanismon, kiun li kreskigis en Hispanio dum la antaŭa jardeko, kalkulante ke necedema teniĝo plifortigus la popularecon de la PP en la cetero de la ŝtato. Kiam li konsciis ke tiu ĉi teniĝo ne plu estis favora al li, estis tro malfrue. Per sia konduto li ignoris konstanton de la lastaj cent jaroj de la hispana historio: ke la kataluna separismo sin nutras de la centralisma necedemo de Madrido.
Post polemika kontraŭleĝa referendumo la 1-an de oktobro 2017 kaj la agado de la hispana polico por provi malhelpi ĝin, la kataluna krizo atingis sian bolpunkton. Kvankam tre malgranda procento de la censo voĉdonis, kaj ekzistis neniu fidinda kontrolsistemo, la rezulto estis plejparte favore al sendependeco. La stato de ne-

certeco kaj streĉiĝo igis la reĝon Filipo la 6-a fari pertelevidan paroladon la 3-an de oktobro por esprimi sian subtenon al nesendependecaj katalunoj kaj al la unueco de la lando. Fine, la Registaro aktivigis la artikolon 155 de la Konstitucio, eksigis la katalunan registaron kaj anoncis baldaŭan balotadon. Fine de la jaro 2017, post kiam la prokurorejo akuzis la registaron de la ***Generalitat*** pri ribelo kaj defraŭdo de publikaj monrimedoj, ***Puigdemont*** kaj kvar el liaj ministroj fuĝis eksterlanden, dum aliaj membroj de la kataluna kabineto estis arestitaj kaj akuzitaj, subriske ricevi punojn de tridek jarojn en malliberejo. Post la balotado al la Parlamento de Katalunio en decembro de 2017, en kiu venkis ***Ciudadanos*** sen sufiĉa plimulto por regadi, rezulte de turmentaj intertraktadoj, en majo de 2018 kiel prezidanto de la ***Generalitat*** ĵuris la radikala sendependisto, ***Joaquim Torra***, kiu malakceptis ĉian sindevontigon al Madrido kaj estis decidita subtenanto de plena sendependeco.

La PP daŭre plu regadis en Madrido kun la subteno de ***Ciudadanos*** ĝis majo de 2018, kiam la komento de la juĝisto en la kazo ***Gürtel***, ke la atesto de ***Rajoy*** ne estis "sufiĉe kredinda", pravigis la aŭdacan movon de ***Pedro Sánchez*** prezenti mocion de cenzuro la 1-an de junio. La pozicio de ***Rajoy*** jam estis malfortigita pro ĝia mis-administrado de la kataluna krizo kaj la opinisondoj montris ke la PP estis kolaps-ante. La prezidento perdis la mocion de cenzuro. Fine, ***Gürtel*** finis la indiferentecon al korupto ĝis grave subfosi la fidon al la publikaj institucioj kaj al la politika klaso, kio kaŭzis balotan sukceson, unuafoje ekde la restarigo de la demokratio, de la ekstrema dekstro. En la ĝenerala balotado de la 28-a de aprilo de 2019, ia relative nova ekstrem-dekstra partio, ***Vox***, eltiris profiton el la notinda perdo de 71 parlamenta seĝoj al la PP. ***Vox*** akiris 10,6 elcenton el la voĉdonoj kaj 24 deputitojn post kampanjo bazita sur radikala kontraŭkatalanismo kaj kontraŭfeminismo kaj sinteno kontraŭ enmigrado. La PSOE revenis al la povo, kvankam sen absoluta plimulto, en Parlamento kiu denove estis blokita.

Estis ŝanĝiĝintaj multaj aferoj ekde la jaro 1982. ***Juan Carlos de Borbón*** ne plu estis nacia heroo. La Popola Partio ne plu estis la partio kiu alternis en la povo kun la PSOE dum preskaŭ kvardek jaroj. La PSOE reakiris povon en nestabila maniero. Ambaŭ partioj estis cedintaj al miksaĵo de korupto kaj aroganteco. La manko de klara disiĝo inter la politika elito kaj la juĝistaro –kiu, kompreneble, estis speciale skandala dum la frankismo– fortigis senton de nevundebleco kaj la arogan konvinkon ke, post la instituciigita korupto de la frankisma diktaturo, nun ĝi estis ilia vico eltiri profiton el la politika potenco. Iamaniere, la kulturo de la "pilko-bato" estis reago al la rabado el kiu profitis la elito de la frankismo. Post la Transiro, la enorma ekonomia kresko de la PSOE-periodo de registaro, pelita de la eniro en la Eŭropan Ekonomian Komun-umon, faciligis konsiderindan internan investadon. Ega kvanto da nigra mono estis elspezitaj por spekulado, kiu estis favorita de la financaj dereguligoj derivitaj de la eniro de Hispanio en la Eŭropan Komunumon. Korupto ankaŭ estis respondo al la fakto ke demokrata politiko en la epoko de televido kaj amaskomunikiloj estas ege multekosta. Kelkaj el la unuaj kaj plej konataj koruptskandaloj -kiel ekzemple la



**Pedro Sánchez**



**Luis Bárcenas**




**Rodrigo Rato**



**Eduardo Zaplana**



**Álvaro Lapuerta**

kazoj ***Filesa*** kaj ***Naseiro***- estis origine pro la bezonoj de balot-financado de la partioj. Kompreneble, tuj kiam la mono komencis cirkuli, parto el ĝi estis deturnita al la poŝoj de individuoj sur ĉiuj niveloj de la politika piramido, ekde la trono ĝis la plej mal-altranga urb-konsilantano. Al tio aldonindas, kiel jam menciite, tion ke la juĝistaro traktis la problemon de koruptado per ega malrapideco.

Nun ni priskribos la korupt-kazojn de la etapo de regado de ***Rajoy***. Kelkaj el tiuj kazoj generiĝis jam dum la prezidanteca etapo de ***Aznar***; iuj grandaj skandaloj bezonis pli ol jardekon por esti publike konataj. ***Luis Bárcenas*** estis elektita de ***Aznar*** kiel manaĝero de la PP en 1989. ***Rodrigo Rato*** estis tre grava en la Registaro, kaj ***Eduardo Zaplana*** estis tre influopova en tiu periodo. Ĉiuj tri estis en la centro de koruptskandaloj rilataj al multaj eŭro-milionoj, la unua el kiuj komenciĝis en 2009 kiam, kadre de la enketo de la ***Gürtel***-intrigo pri la financado de la PP, la juĝisto ***Garzón*** demandis al la svisaj aŭtoritatoj ĉu ***Luis Bárcenas*** havas financon en bankoj de Ĝenevo. Kun granda alarmo de la gvidantaro de la PP, oni eksciis, ke tie li havis personan riĉaĵon de 48,25 milionoj da eŭroj, amasigita dum la jaroj kiam ***Bárcenas*** laboris kun ***Álvaro Lapuerta***, kasisto de la PP inter 1993 kaj 2008 ĝis ***Bárcenas*** sukcedis lin en tiu funkcio. Ambaŭ uzis la paralelan kontadon de la partio por enkanaligi grandegajn, nedeklaritajn, kontraŭleĝajn mondonacojn al la PP. Krom la sumoj kiujn ***Bárcenas*** konservis por si, tiu mono estis uzita por pagi diversajn elspezojn de la partio, inkluzive de gratifikoj por ĝiaj altaj postenuloj. Kiam ***Bárcenas*** unue estis esplorita, ***Mariano Rajoy*** asertis ke ĝi estis politike motivita atako kontraŭ la partio. Sed post la malkaŝo de la kontoj en Svis-lando, li igis ke ***Bárcenas*** eksiĝu de siaj postenoj kiel PP-kasisto kaj senatano. Por mildigi la baton, la partio konsentis doni al li la titolon de konsilisto, kun jara salajro de 255.600 eŭroj, kovri liajn jurajn elspezojn ĝis 200.000 eŭroj kaj daŭre havigi al li aŭton kaj sekretarion.

La esploroj de la hispanaj kontraŭ-koruptaj aŭtoritatoj antaŭen-iris, kio favoris la kunlaboron inter la hispanaj tribunaloj kaj la svisaj aŭtoritatoj ekde 2012. La rezulto estis ke la Popu-lara Partio, jam sub premo de la komenco de la krizo de ***Bankia***, en kiu ***Rodrigo Rato*** estis implikita, decidis ne pludaŭrigi la apogon al ***Bárcenas***.

La 31-an de januaro 2013, la tagĵurnalo ***El País*** publikigis serion da manskribitaj paĝoj kun paralela kontado de ***Bárcenas*** inter 1990 kaj 1993 kaj inter 1996 kaj 2008. La enspezoj, ĉefe donacoj de konstruentreprenoj, sed ankaŭ mono de la komerca imperio de ***Francisco Correa***, malobservis la leĝon pri financado de la partioj. La elspezoj, same kontraŭleĝaj, havis la formon de gratifikoj por la altrangaj postenuloj de la PP. La ĉefa profitinto estis ***Mariano Rajoy***, kies nomo aperis 35-foje en la kontoj de ***Bárcenas***, kun totala monkvanto de 322.231 eŭroj en 11 jaroj, inkluzive de tri jaroj dum kiuj li estis ministro en la ***Aznar***-registaro. Inter 1990 kaj 2008, aliaj grandaj profitantoj estis ***Francisco Álvarez Cascos***, kiu laŭsupoze ricevis 321.391 eŭrojn, ***Rodrigo Rato***, 216.711 eŭrojn, kaj ***Jaime Mayor Oreja***, 181.440 eŭrojn. ***José María Aznar*** ricevis la plej modestan mon-sumon je 9.198 eŭroj en 1990, kiam li estis unu el la ses vic-prezidantoj de la PP kaj respondecis pri la financo de la partio. Poste, la saman tagon kiam la tielnomitaj "sekretaj notoj" aŭ "***Bárcenas***-notoj" estis publikigitaj, li neis ke tiaj pagoj estis faritaj de li. Sed komence de junio 2012, ***Bárcenas*** konfesis al la redaktisto de la tagĵurnalo ***El Mundo***, ***Pedro J. Ramírez***, ke la dokumentoj estas aŭtentaj. Li agnoskis ke kaj li kaj lia antaŭulo kiel partia kasisto, ***Álvaro Lapuerta***, kreis kontraŭleĝan fondaĵon per la mono kiun ili ricevis de entreprenistoj. Dum la sekvintaj kvin jaroj, ***Rajoy*** asertis esti nekonscia pri la agado de ***Bárcenas***, lia familia-amiko kaj kunpartiano, malgraŭ signoj de koluzio publikigita fare de ***El Mundo***, en la formo de poŝ-telefonaj mesaĝoj de subteno kiun ***Rajoy*** iam sendis al ***Bárcenas*** kaj ĉi ties edzino, ***Rosa***, kun vortoj kiel "**Kuraĝiĝu**" kaj "**Estu forta**".

***Gürtel*** estas la plej grava kazo en kiu altrangaj oficistoj de PP estis implikitaj kaj ĝi tre rilatas al la ***Bárcenas***-kazo. Ĝi estis malkovrita komence de 2009, kvankam la procesoj de la akuzitoj ne komenciĝis ĝis oktobro 2016 kiel rezulto de la insistaj provoj de la PP malakcepti la juĝistojn. La polico uzis la kodvorton "***Gürtel***" ("rimeno" en la germana lingvo, "correa" en la hispana) en referenco al la familia nomo de la ĉef-suspektato, ***Francisco Correa Sánchez***. La kapablo de ***Correa*** plezurigi la riĉulon kaj potenculon kreskigis lian influon ĝis la grado je akirado de komisionoj por organizi balot-eventojn, inkluzive sensaciajn amasajn mitingojn en toreejoj. La juĝenketo de ***Baltasar Garzón*** komenciĝis post kiam du denunc-



**Francisco Correa**



**Francisco Alvarez Cascos**



**Jaime Mayor Oreja**




**Pedro J. Ramírez**



**Baltasar Garzón**



***José Luis Peñas* kaj *Ana Garrido Ramos***



***Arturo González Panero* kaj *Juan Siguero***



***Francisco Camps* kaj *Ricardo Costa***



***Pablo Crespo Sabarís***



***Álvaro Pérez Alonso (el Bigotes)***

intoj –***José Luis Peñas***, el ***Majadahonda***, kaj ***Ana Garrido Ramos***, el ***Boadilla del Monte***– informis la policon. La sekva akuzo al la populara urbestro de ***Boadilla***, ***Arturo González Panero***, kondukis al lia eksiĝo kaj ekzilo, kaj la polico petis la areston de lia sukcedinto, ***Juan Siguero***. La urbestroj de la PP de ***Majadahonda***, ***Boadilla***, ***Pozuelo de Alarcón*** kaj ***Arganda del Rey*** kaj eksaj konsilistoj de la registaro de la Komunumo de Madrido de la PP estis akuzitaj pro esti enspezintaj pli ol kvar milionojn da eŭroj pro la kontraŭleĝa aljuĝo de kontraktoj kaj la ankaŭ fraŭda koncesio de konstrupermesiloj.

Same kiel en la plej multaj el tiuj kazoj, la ĉefaj akuzoj estis subaĉeto, monlavado kaj impostfraŭdo. En ĉi tiu okazo, la implikitoj estis vasta reto kontrolita de ***Correa***, kiu konsistis el PP-komercistoj kaj politikistoj, partoprenintoj en kontraŭleĝaj agadoj ligitaj al la financado de la partio kaj manipulado de ofertoj por publikaj kontraktoj en aŭtonomaj komunumoj regataj de la PP, precipe la Valencio kaj Madrido, sed ankaŭ Galegio. Pere de ***Orange Market***, firmao de ***Correa*** dediĉita al organizado de eventoj, estis faritaj donacoj kaj kontantpagoj al PP-politikistoj, inkluzive de la pago de vestokompletoj por ***Francisco Camps***, ***Ricardo Costa*** kaj aliaj altrangaj oficuloj de la valencia PP. Ĉi tiuj kaj aliaj pagoj estis faritaj kontante, per kvincent-eŭraj bank-notoj, de la iama sekretario pri organizo de la galega PP, ***Pablo Crespo***, administranto de ***Orange Market*** kaj unu el la ĉefaj partneroj de ***Correa***. La tajloro kiu malkovris la intrigon denuncante la donacojn de vestokompletoj perdis sian labor-postenon. Oni kalkulis ke la agado de la reto, per impostfraŭdo kaj nenecesaj aŭ ŝveligitaj kontraktoj por konstrulaboroj kaj urbaj servoj, kostis al la publika trezoro ne malpli ol 120 milionoj da eŭroj. La personaj enspezoj de ***Correa*** eble estis proksimume 9 milionoj da eŭroj.

La monenspezoj estis tiom grandaj ke ***Correa*** –moknomita "***Don Vito***" de liaj amikoj– malkaŝe kalkulis grandajn monsumojn dum manĝado en la luksa madrida restoracio ***Sorolla***, kie li estis kutima kliento. Laŭŝajne, li ankaŭ organizis orgiojn por politikistoj kaj pasigis tiom da tempo en proksima bordelo nomita ***Pygmalion*** ke li kaj liaj partneroj nomis tiun bordelon "la oficejo". Por administri sian ĉiam pli kompleksan imperion, ***Correa*** organizis teamon de konsilistoj, revizoroj kiuj faris kontadon de la subaĉetaĵoj kaj donacoj, kaj advokatojn kiuj kreis fikciajn firmaojn en Hispanio kaj eksterlande por kaŝi

la monon. Pere de ***Pablo Crespo***, la reto, kiu komence funkciis en Madrido, ampleksiĝis ankaŭ al la valencia PP.

La esploroj komenciĝis post kiam ***José Camarasa Albertos***, socialista deputito en la Valencia Parlamento, esprimis siajn suspektojn pri la neregula komerco de ***Orange Market***. La firmao, estrita en Valencio fare de la partnero de ***Correa***, ***Álvaro Pérez Alonso", El Bigotes*** (hispanlingve "La liphararo"), organizis mitingojn, konferencojn kaj kongresojn, krom dungado de reklam-ekspertoj por la PP-kampanjoj en la valenciaj regionaj balotoj de 2007 kaj en la ĝeneralaj balotoj de 2008. En la proceso de 2018, ***El Bigotes*** deklaris ke kiam la firmao eklaboris por ***José María Aznar***, "ni donis al li freŝan kaj dinamikan bildon; homoj pensis, ke ŝi havis vizaĝan haŭtetendon; Mi transformis lian vizaĝon de aĉa humoro». La esploro koncentriĝis sur ***Pablo Crespo*** kaj la eksa ĝenerala sekretario de la valencia PP, ***Ricardo Costa***. La PP sin defendis dirante ke ĉio estis ia intrigo de la PSOE.

***Correa*** estis arestita kune kun pluraj el siaj kolegoj en februaro de 2009. Li ne povis pagi la astronomian kaŭcion, fiksitan je 15 milionoj da eŭroj, pro ki li restis en malliberejo dum tri jaroj dum la esploroj daŭris, post kio la kaŭcio estis reduktita al unu miliono. En junio 2009, komenciĝis la enketo pri la agado de ***Luis Bárcenas***. La procezo estis akompanata de multaj ŝanĝoj en la juĝistoj implikitaj, komenciĝante per ***Baltasar Garzón***, kiu estis forpelita de la jura kariero pro tio ke li rajtigis kontraŭleĝan subaŭskultadon de konversacioj inter la akuzitoj kaj ties advokatoj.

Fine, en januaro de 2016, komenciĝis la proceso de 37 el la implikitoj. ***Correa*** atestis, ke lia rilato kun la PP komenciĝis en la jaro 1993 danke al liaj kontaktoj kun ***Álvarez Cascos*** kaj ***Bárcenas***. Li konfesis, ke li transdonis kovertojn kun mono al la urbestro de ***Pozuelo***, ***Jesús Sepúlveda***, al ***Luis Bárcenas*** kaj aliaj altranguloj de la PP, kaj ankaŭ kontribuis al la financado de la balotkampanjoj de la PP en ***Pozuelo***, ***Majadahonda*** kaj Valencio. Li ankaŭ faris gravajn donacojn –inkluzive de du luksaj aŭtoj– al ***Sepúlveda*** kaj ĉi ties edzino ***Ana Mato***, deputito de PP kaj, de 2011 ĝis 2014, ministrino pri Saneco. ***Correa***, aludante al la ĉefsidejo de PP en strato ***Génova*** en Madrido, deklaris: «Mi pasigis la tutan tagon en ***Génova***; Mi pasigis tie pli da tempo tie ol en mia oficejo. Tie estis mia domo». Li ankaŭ deklaris tion ke laŭ propono de ***Bárcenas***



***José Camarasa Albertos***



***Ana Mato kaj Jesús Sepúlveda***



***Luis Bárcenas kaj Rosalía Iglesias***



***Guillermo Ortega***



***José Luis Izquierdo López***

li agis kiel peranto inter la PP kaj grandaj entreprenoj, intertraktante gravajn publikajn kontraktojn kontraŭ grandaj kontantkomisionoj, el kiuj li enpoŝigis parton kaj donis la ceteron al ***Bárcenas***. Unu el la stelaj momentoj de la proceso okazis en junio de 2017 per la apero de ***Mariano Rajoy***. Li estis la unua ĉefministro devigita atesti en tribunalo, kvankam li faris tion nur kiel atestanto. Malgraŭ la notoj de ***Bárcenas***, ***Rajoy*** neis esti ricevinta ajnan gratifikon kaj asertis ne konscii pri la partopreno de la PP en la fraŭdoj konfesitaj de ***Correa***. Li insistis ke li simple fiksis partian politikon kaj havis nenian farendaĵon kun ĝia ekonomio. En januaro de 2019, ***Bárcenas*** asertis ke la polico kaptis dokumentaron pruvantan ke ***Rajoy*** kaj aliaj PP-gvidantoj ricevis monon.
La 17-an de majo de 2018, la Nacia Kortumo deklaris 27 individuojn kaj la PP-n kiel juraj entoj kulpaj je fraŭdo kaj monlavado. ***Correa*** estis kondamnita al 51 jaroj kaj dek unu monatoj da enprizoniĝo; ***Crespo***, al 37 jaroj kaj ses monatoj; ***Bárcenas***, al 33 jaroj kaj kvar monatoj kaj monpuno de 44 milionoj da eŭroj; lia edzino, ***Rosalía Iglesias Villar***, al 15 jaroj kaj unu monato; ***Guillermo Ortega*** (iama urbestro de ***Majadahonda***), al 38 jaroj kaj tri monatoj; ***José Luis Izquierdo López***, al 17 jaroj kaj sep monatoj; ***Jesús Sepúlveda*** (iama urbestro de ***Pozuelo de Alarcón*** kaj eksedzo de ***Ana Mato***), al 14 jaroj kaj kvar monatoj; ***José Luis Peñas*** (iama urb-konsiliano de ***Majadahonda*** kaj denuncinto de la ***Gürtel***-afero), al 4 jaroj kaj naŭ monatoj; ***Álvaro Pérez Alonso*** estis absolvita. La PP estis monpunita je 245.492,80 eŭroj kiel profitanto de la reto ***Gürtel*** danke al la nigra kaso de la partio, per kiu la makleroj pagitaj de entreprenoj kontraŭ publikaj kontraktoj estis uzataj por financi la partion kaj riĉigi kelkajn individuojn. La juĝisto deklaris ke la aserto de ***Rajoy***, ke li nenion sciis pri tiu kontraŭleĝa mono, ne estis "sufiĉe kredinda". La damaĝo al la reputacio de la partio estis nekalkulebla kaj igis la registaron perdi post kiam la PSOE prezentis kaj gajnis parlamentan moción de deklaro de ne-konfido contra la regantaro de ***Rajoy*** la 1-an de junio. Dum la debato pri tiu mocio de cenzuro, la deputito de ***Podemos***, ***Irene Montero***, elnomis sesdek gravajn kazojn de korupto en kiuj la PP estis implikita. En la sentenco de la juĝo pri la kontraŭleĝa financado de la valencia PP, oni konstatis, ke tri milionoj kaj duono da eŭroj estis uzataj por balotaj elspezoj de la partio, inkluzive de la organizo de kalumnia kampanjo kontraŭ la ĝenerala sekretario de la PSOE. ***José Luis Rodríguez Zapatero***.
La "kazo ***Gürtel***", nomita ankaŭ "kazo ***Bárcenas***", pri kiu ni jam informis, havis ian sekvon eĉ post la finiĝo de la regado de ***Rajoy*** kiam, rezulte de enketo far la Hispana Kontraŭkorupta Prokurorejo, oni malkovris aferon rilate al tiu skandalo, kiu estis nomita "kazo ***Kitchen***" ("Kuirejo" en la angla lingvo). En tiu afero estis implikita la komisaro ***José Villarejo*** –denove tiu ulo– kaj la ankaŭ komisaro ***Eugenio Pino***, same kiel ***Sergio Ríos***, iama ŝoforo de ***Luis Bárcenas***. Temis pri operacio por ŝteli informojn de la iama kasisto de la PP kiu povus damaĝi alrangulojn de la partio.
En 2013, la Ministerio de Internaj aferoj, tiam komandita de ***Jorge Fernández Díaz***, efektivigis ĉi tiun operacion kun la helpo de ***Villarejo*** por ŝteli kompromitigajn dokumentojn de ***Luis Bárcenas*** dum li estis en malliberejo. Laŭ la ĵurnalo ***El Mundo***, la polico sukcesis ŝteli de ***Luis Bárcenas*** lian personan taglibron, kontadajn

dokumentojn de PP, notojn pri la neregula financado de balot-kampanjoj en Madrido kaj notojn rilate al la fiska situacio de la partio. La 23-an de oktobro de 2013, la loĝejo de ***Luis Bárcenas*** estis atakita de ***Enrique Olivares García***, kun historio de rabo kun forto kaj posedo de drogoj, konata kiel falsa pastro en la kazo ***Kitchen***. Li estis kondamnita al 22 jaroj de malliberejo pro enrompo en la domon kaj minaco al la edzino de ***Bárcenas***, ŝia filo, kaj iu mastrumistino per revolvero. Li admonis ilin dirante "la teatraĵo estas finita", kaj aldonis ke "li estis tie por preni ĉion kion sinjorino ***Iglesias*** (edzino de ***Bárcenas***) sciis estis kaŝita en la domo", temante pri la tiel nomitaj "***Bárcenas***-paperoj" kiuj estis la supozebla konto-registro B. de la PP. Rezulte de la esploro farita de la Nacia Kortumo, oni eksciis pri la kontraŭleĝaj agadoj de ***Villarejo*** kaj la enhavon de la konto-registro B de la PP. En februaro de 2023, la Kontraŭkorupta Prokurorejo petis 15-jaran punon je mallibereco kaj 33-jaran malkvalifikon por la eksministro ***Jorge Fernández Díaz*** pro la deliktoj de kunkulpeco, defraŭdo kaj agado kontraŭ privateco, kaj 19-jaran punon je malliberejo por la emerita komisaro ***José Manuel Villarejo***. Same oni petis 15 jarojn da malliberejo por la eksa Ŝtata Sekretario pri Sekureco ***Francisco Martínez*** kaj por la eksa Direktoro de la Nacia Polico ***Eugenio Pino***. Kiam oni redaktas ĉi tiun tekston ankoraŭ oni ne konas la rezulton de tiu proceso; kiel sciate la justico en ĉi tiu lando ne tro rapidas.

Krom tiuj korupt-skandaloj en la pinto de la reganta PP, en kiuj estis implikitaj eĉ ministroj, tiu partio ege koruptadis ankaŭ en iuj hispanaj regionoj, ĉefe en Valencio. Grava persono de tiu partio kies nomo tre aperis en la informmedioj dum kelkaj jaroj estis ***Rita Barberá***. Ŝi estis urbestrino de Valencio-urbo dum multaj jaroj kaj poste eĉ senatanino. Ŝi mortis en novembro de 2016, kiam la tribunaloj komencis prijuĝi aferojn en kiu ŝi estis implikita. Ŝia nomo aperis jam, kiel ebla komplicino, en la kazoj ***Gurtel*** kaj ***Noos***. Alia kazo, nomita ***"Rita Leaks"***, rilatis rekte al ŝi. Temis pri neklaraj elspezoj kiujn la urbestrino faris, laŭ akuzo de iu valencia partio. ***Compromís*** denuncis ke multenombraj fakturoj respondis al luksaj elspezoj kaj montris eblan neregulan financadon de la Valencia PP. La tribunaloj opiniis ke tiuj faroj ne havis kriman gravecon.

Ne tiom favoraj al ***Rita Barberá*** estis aliaj kazoj rilataj al ŝi. La "***kazo Taula***" temis pri afero de monlavado, defraŭdo kaj


**Jorge Fernández Díaz**


**Eugenio Pino**


**Sergio Ríos**


**Enrique Olivares**


**Francisco Martínez**



**Alfonso Grau kaj Rita Barberá**



**Alfonso Rus kaj Rita Barberá**



**José María Corbín kaj Alfonso Grau**



**Jaime Febrer**



**José Luis Vera**

subaĉeto far multaj gravuloj de la PP de Valencio. Kiam la justico entreprenis la proceson pri tiu afero, la PP men suspendis la partian membrecon de ***Rita Barberá*** kaj kelkdeko da valenciaj postenuloj kiel ***Alfonso Grau***, iama vicurbestro de Valencio, kaj ***Alfonso Rus***, iama prezidanto de la Provinca Konsilio de Valencio kaj prezidanto de la PP en Valencio. La “kazo ***Azud***” rilatis al supozita pago de komisionoj al publikaj funkciuloj kaj de la PP kaj de la PSOE k. a. por favori la aljuĝigon de kontraktoj, ĉefe ligitaj al urba planado, inter 1999 kaj 2013, koncentritaj ĉefe al la Urbodomo de la valencia ĉefurbo, sed ankaŭ al aliaj municipoj el la valencia regiono. ***Azud*** estas digo, kiu deturnas parton aŭ la tutan fluon de rivero de ĝia natura kurso kaj io simile estis koruptskemo antaŭenigita de komercisto ***Jaime Febrer***. Tial la nomo donita al la kazo. La intrigo naskiĝis en la internaĵoj de la Valencia Urba Konsilio kun la kompliceco de ***Rita Barberá***, ŝia bofrato ***José María Corbín*** kaj ŝia dekstra mano ***Alfonso Grau*** en elstara rolo, la intrigo etendis siajn tentaklojn al la PSPV, man-en-mane kun la advokato ***José Luis Vera***, tre proksima al la partio. La juĝproceso daŭris kvin jaroj post la morto de ***Rita Barberá***, sed ***Alfonso Grau*** estis enkacerigita dum iom da tempo kaj estis punita pagi ioman monsumon. Aliaj implikitoj estis kondamnitaj al diversaj punoj. Ankaŭ la entreprenisto ***Jaime Febrer*** kaj ***José María Corbín*** estis kondamnitaj al enkarceriĝo.

La koruptado ne estis afero ekskluziva de la PP, sed dum la regado de ***Rajoy*** la kazoj je koruptado estis speciale multenombraj kaj gravaj en tiu partio. Ĝenerale, la teniĝo de la partia gvidantaro, kiam malkovriĝis novaj skandaloj, estis nei ilin kaj rifuzi la respondecon de la partio pri ili. Kiam estis publikigitaj la unuaj informoj pri la afero ***Gurtel***, ***Rajoy*** deklaris ke ĝi ne estis intrigo de la PP sed intrigo kontraŭ la PP. Poste evidentiĝis la kulpeco de tiu partio en la aferoj ***Gurtel***, ***Kitchen***, ***Azud***, ***Taula***… kaj la partia reago estis suspendi la membrecon de la personoj pli rekte implikitaj en la skandaloj. Tiele oni apartigis el la partio ulojn kiaj la iama ministro ***Jorge Fernández Díaz***, ***Rita Barberá*** kaj multaj aliaj PP-anoj de la Valencia regiono.

Alia fama kazo je suspendo de la PP-membreco estis tiuj de ***Sonia Castedo***, iama urbestrino de Alakanto kaj ***Luis Díaz Alperi***, kiu antaŭis ŝin en tiu posteno, kaj aliaj urb-gravuloj de Alakanto, kaj ***Orihuela***. Ili estis imputitaj en la t. n. “kazo ***Brugal***”, pri kiu ni jam raportis per la antaŭa ĉapitro. Sonia estis

denuncita far la socialista grupo de la Urb-Konsilio de Alakanto pro influtrafiko kaj fraŭdo pri la plano de disvolvigo en iu urba kvartalo. En Aprilo de 2009, kelkaj el la plendoj estis definitive arkivitaj de la Kontraŭ-Korupta Prokuroro, kaj aliaj estis provizore arkivitaj atendante la decidon pri la tuta kazo far la Supera Kortumo de la Valencia Komunumo. En oktobro 2010, la Kontraŭ-Korupta Prokuroro faris akuzon kontraŭ ***Sonia Castedo*** esti implikita en la koruptintrigo de la kazo ***Brugal*** en la prilaborado de la nova Ĝenerala Plano por Urba Planado de Alakanto (PGOU), kune kun ŝia antaŭulo, la PP-ano ***Luis Díaz Alperi***, kaj la konstruo-entreprenisto, ***Enrique Ortiz Selfa***. La Prokuroro akuzis ŝin je subaĉeto, influkomerco kaj malkaŝo de privilegia informo, notante ke ŝi estis pagita per donacoj. ***Sonia Castedo*** deklaris ke "***Ortiz*** ricevis nenion el tio kion li petis", akceptante unu el la donacoj: jaktovojaĝo al Balearaj Insuloj. Laŭ malkaŝo de polica esploro, en la kunteksto de la redaktado de la PGOU de Alakanto, inter Majo 2008 kaj junio de 2010, la konversacioj inter ***Enrique Ortiz*** kaj ***Sonia Castedo*** estis preskaŭ ĉiutagaj, kio por la polico pruvas "kunlaboron de la respondeculoj pri la Urba Planado kun la entreprenisto". La 22-an de majo de 2011, ***Sonia Castedo*** atingis la plej bonan balotan rezulton en la historio de Alakanto por la PP, irante de 15 ĝis 18 konsilianoj (per 15.000 pliaj voĉoj), malgraŭ la kazo ***Brugal***. Tamen, en oktobro de 2012, ŝi estis akuzita de la Supera Justica Kortumo de Valencio pro la supozata manipulado de la Urba Planado de Alakanto. La 23-an de decembro de 2014, post esti vokita por atesti la 16-an de januaro 2015 kiel akuzita pri diversaj eblaj deliktoj, ***Sonia*** prezentis sian demision kiel urbestrino de Alakanto. La proceso daŭrigis sian kurson, sed ĝia provizora arkivado estis dekretita la 12-an de majo 2016, ĉar la magistrato taksis ke la preciza identigo de la krimoj "ne estis farita, tial ke la transskribo de la konversacioj, kiun la polico povas fari, se povus esti uzataj por komenci enketon, sed ne nepre devas subteni akuzon". En decembro de 2016, la Provinca Tribunalo dekretis la finan arkivon de la kazo, konkludante ke ekzistis "neniaj specifaj datumoj kiuj priskribus deliktan agon atribueblan al iu ajn publika funkciulo". La tribunalo rifuzis la apelaciojn prezentitajn de la Kontraŭkorupta Prokuroro kaj la PSPV kontraŭ la suspendo de la proceso. En januaro de 2017, iu juĝisto denove juĝis ***Sonian*** pro falsado de la PGOU de Alakanto favore al ***Ortiz***. En julio de 2021, ***Sonia***



**Sonia Castedo kaj Luis Díaz Alperi**



**Enrique Ortiz Selfa kaj Sonia Castedo**



**Sonia Castedo kaj José Joaquín Ripoll**



**Esteban Cuesta**



**Enrique Crespo**



Juan José Roca Samper



Ignacio Bernácer



Juan Morenilla



Carlos Fabra

***Castedo*** kaj la ceteraj akuzitoj en la kazo ***Brugal*** estis absolvitaj de la Provinca Tribunalo de Alakanto. Kazoj kiel ĉi tiu, oftaj en la hispana publika vivo, generas ian malfidon je popola nivelo pri la juĝsistemo kiu ŝajnas emi favori la potenculojn. Sed pli notindas ke multenombraj popolanoj politike apogas famajn koruptulojn en la balotoj.

Pli severaj estis la punoj pri la "kazo ***Emarsa***". Temis pri korupt-afero okazinta en la Valencia regiono kiu iĝis publika afero fine de 2011 kiam estis imputitaj la estroj de la firmao ***Emarsa*** (Municipa ento por la purigado de kloaka akvo) kreita de la Valencia Urba Konsilio kaj 17 aliaj proksimaj municipoj. La ĉefa misio de tiu ento estis la administrado de la purigejo ***Pinedo***. La du ĉefaj akuzitoj estis la eks-prezidanto de la firmao, la PP-ano ***Enrique Crespo***, kiu en februaro de 2012 estis devigita eksiĝi de siaj postenoj de urbestro de ***Manises*** kaj vicprezidanto de la Provinca Konsilio de Valencio, kaj ***Esteban Cuesta***, agento de ***Emarsa*** kaj iama vilaĝa urbestro de ***Benimámet*** nomumita de la urbestrino de Valencio ***Rita Barberá***. En julio 2010, la PP de la Valencia regiono, kiu regis la firmaon ekde 1995, decidis la likvidon de ***Emarsa*** ĉar ĝi bankrotis. Sed la kontoj montris ke mankis 17 milionoj da eŭroj, tial juĝ-esploro estis malfermita por la periodo inter 2004 kaj 2010 malkovrante multajn neregulaĵojn kiuj igis la enket-juĝiston akuzi 16 homojn, inkluzive de la prezidanto de la firmao, ***Enrique Crespo*** pro fraŭdo, daŭra trompado kaj aliaj deliktoj. La juĝa enketo malkovris ke la administrantoj de ***Emarsa*** laŭŝajne pagis milionajn monsumojn por neekzistintaj servoj kaj provizoj -preskaŭ 40 milionoj da eŭroj pagitaj al proksimume 35 firmaoj, kelkaj el ili ligitaj al postenuloj de ***Emarsa***- kaj ke ili ankaŭ ŝargis la firmaon per siaj aĉetoj de luksaj aĵoj, manĝoj en altekostaj restoracioj, vojaĝoj eksterlanden kun la tuta familio, loĝantaj en luksaj hoteloj, butikumado en super-bazaroj ktp. je entute pli ol unu miliono da eŭroj. Oni taksas ke la tuta fraŭdo povus superi 30 milionojn da eŭroj. Oni malkovris ankaŭ ke la agentoj ricevis milionajn salajrojn kaj ke oni pagis salajrojn al uloj kies rolo en la firmao estis nur enspezi la monon (unu el ili estis konsiliano de Urbo-planado de la PP en ***Moncada***, kaj alia iama proparolanto de la PP de ***Benetúser)***. La agento ***Esteban Cuesta*** siaflanke enspezis 250.000 eŭrojn en siajn kontojn inter 2005 kaj 2009.

En februaro de 2012 ***Enrique Crespo*** demisiis el siaj postenoj pro la ***Emarsa***-skandalo. La enket-juĝisto metis kaŭcion de 25 milionoj da eŭroj por ***Crespo***, kiel eksprezidanto de ***Emarsa***, kaj por la eksagento ***Esteban Cuesta*** pro la laŭŝajna defraŭdo de publikaj monrimedoj. ***Enrique Crespo*** "provizore" forlasis la PP-n, sed la regiona gvidantaro de la PP jam estis suspendinta lian membrecon. Mankis ***Jorge Ignacio Roca Samper***, posedanto de pluraj firmaoj kiuj fakturis ĝis 15 milionoj al ***Emarsa***, plejparte sen pravigo. En Aprilo de 2012, estis akuzita ***Ignacio Bernácer***, estro de operacio de la publika firmao de la ***Generalitat*** respondeca pri financado kaj kontrolado de la valenciaj purigejoj. Estis akuzita ankaŭ ***José Juan Morenilla*** implikita en la intrigo fiksante troan prezon por la traktado de la ŝlimo de la ***Pinedo***-purigejo kaj kundividante la kostojn kun ***Enrique Crespo*** kaj ***Esteban Cuesta***. En junio 2015, ***Jorge Ignacio Roca Samper***, unu el la ĉefaj "planintoj" de la intrigo, estis arestita en Moldavio. La 22-an de junio de 2018, la Provinca Juĝejo kondamnis la akuzitojn al pli ol 90 jaroj da malliberejo entute. La plej altaj punoj estis por ***Esteban Cuesta***, 12 jarojn da malliberejo, kaj por la iama urbestro de ***Manises***, ***Enrique Crespo***, 10 jarojn. La komercisto ***Jorge Ignacio Roca Samper***, la sola kiu tiam estis en malliberejo, ricevis 6 jarojn kaj unu tagon kiel necesa kunlaboranto en krimo de defraŭdo de publikaj monrimedoj kaj kiel aŭtoro de falsa dokumentado. La 11-an de januaro de 2019, la PriKonta Kortumo kondamnis la akuzitojn pagi 20,5 milionojn da eŭroj kaj konstatis la ekziston de fraŭdo en iliaj agoj.
En la ĉi-ĉapitra raportado pri la kazoj ***Gürtel***, ***Noos*** k. a. aperis kaj plu aperos aferoj kaj personoj kiuj jam estis menciitaj en la antaŭaj ĉapitroj, ĉefe en tiu dediĉita al la etapo de regado de ***José María Aznar***. Nomoj kiaj: ***Francisco Correa Sánchez***, ***José Luis Izquierdo López***, ***Sonia Castedo***, ***Carlos Fabra, Eduardo Zaplana***, ***Jaume Matas***... kaj iome pri ties korupta agado jam estis vidite de niaj legantoj en antaŭaj ĉapitroj. Okazas ke tiuj korupt-aferoj komenciĝis sub la regado de ***Aznar*** sed nur poste, iom post iom, estis publike konataj, kaj ĉefe, pro la lanteco de la juĝ-procesoj, la kulmino de la aferoj okazas tre poste. Ekzeple, pri la kazo de la ERE, kies inico okazis sub la regado de ***Felipe González***, la punoj al ***Manuel Chaves*** kaj ***Antonio Griñán*** ne estis konataj ĝis la regado de ***Pedro Sánchez***, kiun ni priskribos per la sekvonta ĉapitro, kaj pri la aferoj de ***Francisco Camps***, kiun ni komencis pritrakti ĉi-ĉapitre, la juĝ-sentenco estas ankoraŭ nekonata kiam oni verkas ĉi-linioj en la printempo de 2023.
Pri ***Carlos Fabra***, ni jam vidis per iu el la antaŭaj ĉapitroj ke li estis juĝ-esplorita ekde la jaro 2008 tial ke li ne povis pravigi la devenon de milionaj monsumoj kiujn li deponis en siajn bank-kontojn. Klariĝinte ke lia riĉaĵo estis frukto el koruptaj operacioj je subaĉeto, influo-komerco kaj impost-fraŭdo, li estis kondamnita, en novembro de 2013, al kvar jaroj da malliberejo. Nun ni povas pli detale priskribi la koruptecan karieron de tiu ulo. Interalie, li estis akuzata kombini sian publikan oficon kun konsulta komerco pere de propra kompanio dediĉita al konsilado inter 2000 kaj 2004. La Fiska dokumentaro rivelis ke ***Fabra*** kolektis de almenaŭ sep diversaj firmaoj, iuj el ili kun kontraktoj aljuĝitaj de la publika administracio de ***Castellón***, por kvanto je 841.021 eŭroj. La firmaoj de ***Vicente Vilar***, pagis al ***Fabra*** pli ol 150.000 eŭrojn inter 2000 kaj 2001 pro tia influo-

komerco. La esploroj malkovris aliajn kompaniojn kiuj pagadis tiajn komisionojn; tiuj de la komercisto ***Fernando Roig*** pagis pli ol 200.000 eŭrojn inter 2000 kaj 2003.
Post la balotado de 2007 de la Valencia Komunumo, ***Carlos Fabra*** diris ke li sentas sin absolvita kaj aprobita de la popolo. Siaflanke, la lidero de la PP, ***Mariano Rajoy***, priskribis ***Fabra***-n en 2008 kiel "ekzempla civitano". ***Francisco Camps***, tiama Prezidanto de la PP de la Valencia regiono diris en 2010, post kiam la kazo ***Gürtel***, eksplodis, ke tiel li kiel la provinco de ***Castelló***n ĝuas "grandan bonŝancon" havi ***Fabra***-n kiel prezidanton de la Provinca Konsilio. La 1-an de decembro de 2014 ***Fabra*** eniris en la malliberejon de Aranjuez. Ekde kiam la t. n. "kazo ***Fabra***" aperis ĝis lia eniro en malliberejon, pasis 11 jaroj. La 18-an de april, 2016, ***Carlos Fabra*** pasis al tria grado laŭ juĝa ordono. De tiu tago, li pasigis nur la noktojn en la ***Aranjuez***-malliberejo. Entute, li restis en malliberejo dum 16 monatoj.
Tiel al ***Carlos Fabra*** kiel al ***Francisco Camps*** oni suspendis la PP-membrecon kiam la estraro de tiu partio komprenis ke la implikeco kaj kunkulpeco de ambaŭ en korupt-intrigoj estis klara afero. Tamen ***Camps*** -ankoraŭ- ne estis punita per restado en malliberejo, kvankam li jam estis kelfoje juĝita pro diversaj korupt-skandaloj. Kelkfoje oni juĝprocesis lin pro lia ebla partopreno en la ***Gürtel***-kazo; ĝis nun li ĉiam estis absolvita sed kiam aperas novaj indicoj de lia implikiĝo oni remalfermas la esploron; nuntempe (aprilo de 2023) oni denove li estas sub juĝa enketo. Estis aliaj kazoj kiuj ia- aŭ alia-maniere rilatas al li, ekzemple, la "kazo ***Fórmula 1***". La ***Generalitat*** de Valencio prezentis akuzon kontraŭ la eksprezidanto ***Francisco Camps***, kiel la ebla responsulo de deliktoj de malversacio kaj falsado en la konstruado de la ***Formulo 1***-cirkvito en Valencio. Ankaŭ ĉi tiu proceso estis plurfoje arkivata kaj remalfermata sed fine ***Camps*** restis absolvita. Oni absolvis lin ankaŭ pri la kazo de la kontraŭleĝa aljuĝo de kontraktoj rilate al la preparo de la vizito de la papo Benedikto la 16-a al Valencio en la jaro 2006. La koncernaj procesoj kondamnis preskaŭ tridekon da personoj sed neniu el ili estis ***Francisco Camps***.
Ĉiuj tiuj korupt-kazoj ne estus povinte okazi sen la kono, konsento kaj kompliceco de ***Francisco Camps***. Sed la funkciad-maniero de la tribunaloj havas sian propran logikon: la tribunaloj ne povas kondamni kaj puni sen la ekzisto de klaraj pruvoj pri la deliktoj, kaj en la kazoj de ***Camps*** tiaj pruvoj ne estis trovitaj. Li, ja, havis politikan respondecon pri la koruptaj faktoj ĉar ili okazis sub lia jurisdikcio, sed la juĝa respondeco estas alia afero malsama ol la politika respondeco. Kiel aŭtoritatulo de la Valencia regiono kiam tiuj aferoj okazis, ***Camps*** estis politika respondeculo ĉar la aferoj ne eblus sen lia kono, kaj se vere li ne konis ilin, tio akredintus lian nekapablon kiel reganto, do, ĉiukaze, li estas politike rifuzinda. Alia politika persono de la PP kies koruptado ne povis esti leĝe punita estas ***Esperanza Aguirre y Gil de Biedma*** kiu, dum kelkaj jaroj, rolis kiel Prezidantino de la Aŭtonomia Komunumo de Madrido. La maniero laŭ kiu ŝi aliris al tiu alta politika posteno ne estis tre honesta. En la regiona balotado de la 25-a de majo de 2003, la PP atingis 55 deputitojn, unu parlamentan seĝon malpli ol la tuto de la Socialista Partio, 47 seĝoj, plus Unuiĝinta Maldekstro, 9 seĝoj. Do, La maldekstra

koalicio povus trudi sian kandidaton. Tamen, la elekto de maldekstrema dupartia registaro ne estis efektivigita ĉar du socialistaj deputitoj forlasis sian partion kaj ne apogis ties kandidaton. Tio ebligis ke la PP enpostenigu kiel Prezidantinon de Madrido sian kandidatinon ***Esperanza Aguirre***. En la plenumado de sia rolo, ŝi distingiĝis per sia reakcia, kontraŭsocia politiko, kio estas logike ĉar ŝia dekstrara partio havas la celon administri la interesojn de la superregantaj klasoj. Ekzemple, interalie, ŝi entreprenis la politikon de malfortigo de la publika sanec-sistemo favore al la privata saneco en Madrido, politiko kiu poste estis sekvata de ŝiaj posteuloj ĝis la nuntempo.

La registaro de ***Aguirre*** estis implikita en esploroj kaj akuzoj rilate al kazoj de spionado supozeble faritaj de sekurecaj oficistoj de la Komunumo de Madrido kontraŭ membroj de la sama registaro. La Provinca Tribunalo malfermis procedojn por defraŭdo de publikaj financoj, ĉar en si mem, "sekvi personon ne konsistigas ajnan kriman delikton". La 15-an de julio 2010, iu esplorjuĝejo de Madrido rifuzis la kazon, konsiderante ke oni ne povis kontroli ĉu ili uzis aŭ ne publikajn rimedojn por la spionado. Alia kazo: en 2012, la Ŝtata Impostadministra Agentejo prezentis raporton al la juĝisto de la Nacia Kortumo en kiu, laŭ siaj esploroj provizante pruvojn de ebla kontraŭleĝa financado kaj de la ekzisto de falsaj fakturoj emisiitaj de firmaoj de la intrigo ***Gürtel*** pro servoj faritaj al la partio en la balot-kampanjoj. La Kontraŭkorupta Prokuroro ne daŭrigis la enketon, ĉar la supozata delikto jam preskriptiĝis. Alie, en ***Villanueva de la Cañada***, la patrinflankaj onkloj de ***Esperanza Aguirre*** enspezis du milionojn da eŭroj en ses jaroj per spekulado pri terenoj por konstruado. Ili aĉetis 24.326 m² da nekonstruebla tereno en la jaro 2000 kontraŭ 419.995 eŭroj, kaj vendis ĝin en 2006 po 4,6 milionoj da eŭroj kiam jam oni povis konstrui sur ĝi. En ***Tres Cantos*** ili aĉetis teron per 3,1 milionoj da eŭroj en 2001 kaj vendis ĝin en 2004 kontraŭ 11,2 milionoj da eŭroj. ***Esperanza Aguirre*** ne alprenis politikan respondecon pri la riĉiĝo de siaj parencoj. La **Hispana Altrapida Trajno** (AVE) Madrido-Gvadalaĥaro-Ĝirono, konstruita dum la regado de ***Aguirre***, ne haltas en la centro de la urbo Gvadalaĥaro sed 8 km for, sur tereno apartenanta al firmao posedata de onklino kaj kuzoj de la edzo de ministrino de ***Esperanza Aguirre***. Tiuj ĉi terenoj estas urbanizitaj sub la nomo ***Ciudad Valdeluz*** kun 9.500 projektitaj hejmoj. Ĉi tiu AVE-stacio en 2013 ricevis nur 70 pasaĝerojn tage. Alia kazo kiu rilatas al ***Esperanza Aguirre*** estas tio ke du firmaoj apartenantaj al ŝia edzo atingis profiton de preskaŭ 6 milionoj da eŭroj da publika mono. Ambaŭ firmaoj enspezis, nur en 2015, pli ol 300.000 eŭrojn el publikaj subvencioj sub la prezidanteco de ***Aguirre*** dum la tempo kiam ŝi estis akciulo de unu el la kompanioj. Ŝia edzo nomiĝas ***Fernando Ramírez de Haro y Valdés***. Ambaŭ geedzoj havas nobelan, aristokratecan devenon, sed iome malprosperaj; fakte, li estis implikita en proceso kun siaj fratoj por la posedo de malnova kaj valora pentraĵo apartenanta al la familio. Pri la malregulaĵoj de la familio de ***Esperanza Aguirre*** ŝi ricevis nenian juĝan punon ĉar, same kiel en la kazoj de ***Francisco Camps***, ŝia tuta misfarado konsistis el politika, ne eksterleĝa koruptado. Tio estas, la regantoj povas decidi kiujn subvenciojn aprobi, kiujn terenojn deklari konstrueblajn… La politika respondeco devas esti juĝata de


Francisco Camps kun Mriano Rajoy kaj Carlos Fabra


Francisco Camps kaj Esperanza Aguirre


Esperanza Aguirre kun ŝia edzo Fernando Ramírez de Haro y Valdés


Esperanza Aguirre kaj Francisco Granados


Esperanza Aguirre kaj Ignacio González

la civitanoj kiuj voĉdonas, ne de la tribunaloj. Kaj en la hispana voĉdonantaro estas konsiderinda inklino apogi la politikajn fortojn de la dekstraro, eĉ inter la malriĉularo. Kial okazas tiu stranga fenomeno? Ni devos okupiĝi pri tiu afero ĉar ni vidos ke tiu realaĵo persistas ankoraŭ.

Se ***Esperanza Aguirre*** bone lertis liberiĝi el juĝaj punoj, ne okazis same al uloj de ŝia partio kiuj prosperis dank' al koruptado sub ŝia jurisdikcio kaj protekto. Inter ili ni citu iujn el la plej elstaraj kazoj. ***Francisco Granados*** estis PP-ano, urbestro de ***Valdemoro*** ekde 1999 al 2003. Li partoprenis el la intrigo ***Gürtel*** kiun ni jam priskribis kaj en la "kazo ***Púnica***", kiun ni priskribos poste. Krome oni akuzis kaj juĝis lin pro deliktoj de monlavado, kontraŭ la Publika Trezoro, dokumenta falsigo, subaĉeto kaj influo-trafiko. Li restis kelkajn jarojn en malliberejo. La sukcedinto de ***Aguirre*** en la Prezidanteco de la Madrida Komunumo estis ***Ignacio González***. Ankaŭ li restis en malliberejo dum iom da tempo. La akuzoj al li estis: krima organizo, trompado, defraŭdo, subaĉeto, monlavado, fraŭdo kaj dokumenta falsado. Ŝajnas ke ĉi lastaj kazoj, kiel multaj aliaj de la procesitaj koruptuloj, atendas ankoraŭ la finan sentencon de la tribunaloj.

Sekvinta Prezidantino de Madrido, ankaŭ de la PP, estis ***Cristina Cifuentes***. Ankaŭ ĉi ties nomo aperis baldaŭ ligita al korupt-aferoj ĉu dubindaj aŭ ne. La 2-an de junio de 2017, ŝi devis deklari antaŭ la Komisiono por pri-Korupta Esploro de la Madrida Asembleo, por klarigi ŝajnajn neregulaĵojn kadre de la ***Punika*** Operacio. Sed la 20-an de aprilo 2021, la Centra Enketa Tribunalo numero 6 de la Nacia Kortumo konsentis eksigi ŝin el tiu kazo ne vidante pruvojn ke ŝi partoprenis en la aljuĝo de la kafejo-servo de la Asembleo de Madrido por favori supozitan donacinton de la PP je regiona nivelo nek, do, ke tio havis ian ajn rilaton kun supozata neregula financado de la partio.

La 4-an de aprilo de 2018, ***Cristina Cifuentes*** devis deklari antaŭ la plenkunsido de la Asembleo post peto pri klarigoj rilate al ŝajnaj neregulaĵoj en sia akademia arkivo rilate al la akiro de sia jurisprudenca universitata titolo en la akademia jaro 2011-2012. La 15-an de februaro 2021, sekcio 15 de la Provinca Juĝejo de Madrido absolvis ŝin, pro manko de pruvoj, de la delikto de induktado al dokumenta falsaĵo, pri kiu la Prokuroro akuzis ŝin. Tamen, la juĝistoj ja kondamnis al

trijara restado en malliberejo personon el la Universitato kiu konfesis esti ellaborinta la raporton falsigante la subskribon de du aliaj instruistoj, kaj iaman konsiliston kiu intervenis en la afero. La 25-an de aprilo de 2018, la amaskomunikilaro elsendis filmeton de la jaro 2011, en kiu ***Cristina Cifuentes*** estis observita en sekureca ĉambro de komerca centro post provo de rabo supozeble farita de ŝi. Tuj post tio, en gazetara konferenco, ***Cifuentes*** anoncis sian demision kiel prezidantino de la Komunumo de Madrido, asertante esti viktimo de "kampanjo de persekuto kaj renverso". Oni suspektis, ke la elsendo de la video pri la ŝtelo de ***Cifuentes*** en la komerca centro estis iniciato de ŝia partio, la PP, por altrudi al ŝi la demisión tial ke la skandalo de la falsaj akademiaj kvalifikoj estis damaĝante la prestiĝon de la partio.


Plurfoje ni faris aludon pri la tiel nomita "***Punika*** operacio". Ĝi estis polica operacio farita de la Centra Operacia Unuo de la CivilGvardio, laŭ peto de la juĝisto de la Nacia Tribunalo de Hispanio. La 27-an de oktobro 2014 estis arestitaj 51 politikistoj, magistratanoj, funkciuloj kaj komercistoj ĉar supozeble ili estis implikitaj en korupt-intrigo kiu aljuĝis publikajn servojn kun valoro de 250 milionoj da eŭroj dum du jaroj. La arestitoj apartenis, plejparte al la PP sed estis ankaŭ pluraj el la Socialista Partio kaj eĉ iu el Unuigita Maldekstro. Supozeble, kontraŭleĝaj komisionoj estis ŝargitaj per 2 aŭ 3 elcente el la kvanto de la kontrakto, kiuj poste estis lavitaj tra kompania reto. Kiel ni jam menciis, ***Francisco Granados***, iama duarangulo de la PP en la Komunumo de Madrido post ***Esperanza Aguirre***, estis unu el la ĉefaj partoprenantoj. Krome estis arestitaj ankaŭ ses urbestroj de la Komunumo de Madrido (tiuj de ***Parla***, ***Valdemoro***, ***Torrejón de Velasco***, ***Casarrubuelos***, ***Collado Villalba*** kaj ***Serranillos del Valle***), la sekretario de la Instituto de Turismo de la Regiono de Murcio, la iama urbestro de Kartageno, ***José Antonio Alonso*** kaj la prezidanto de la Provinca Konsilio de León, ***Marcos Martínez Barazón***. Krome, pluraj komercistoj, kiuj supozeble estis la organizintoj de la intrigo, estis arestitaj kaj pluraj firmaaj sidejoj estis inspektitaj. Post la aresto la 28-an de oktobro de ***José Martínez Nicolás***, Ĉefoficisto de la Komunumo de Madrida Agentejo pri Informadika Teknologio kaj Komunikado, la nomo de la kompanio ***Indra*** aperis kiel unu el la eblaj firmaaj profitintoj.



**Ignacio Gonzalez kaj Cristina Cifuentes**



**Cristina Cifuentes kaj Isabel Díaz Ayuso**



**José Antonio Alonso**



**Marcos Martínez Barazón**



**José Martínez Nicolás**


Antonio Sánchez Fernández


Alejandro de Pedro Llorca


David Marjaliza


Juan José Güemes


Manuel Lamela


Gádor Ongil


Borja Sarasola

Laŭlonge de kelkaj jaroj, ekde 2014 ĝis 2019, oni faris pliajn arestojn en rilato kun ĉi tiu ***Punika***-kazo. La arestitoj estis poste liberigitaj sed kiam oni verkas ĉi raporton ankoraŭ ne estis finita la juĝa proceso, tiel do ankoraŭ ne eblas informi pri la punoj kaj punitoj. Cetere, ni ne povas pritrakti tiom granda serio da imputitoj; ni nur menciu kelkajn inter la ĉefaj el ili.

La 4-an de novembro de 2014, ***Antonio Sánchez Fernández***, tiama urbestro de ***Serranillos del Valle***, estis malkovrita de la Civil-Gvardio prenante kestojn da dokumentoj el la urbestra oficejo, post esti atentigita la aŭtoritato far loka funkciulo pri la ebleco ke oni faru tian delikton. Dum la esplorado pri ĉi tiu okazaĵo, ***Antonio Sánchez*** estis akuzita je malbonfarado, fraŭdo, subaĉeto kaj defraŭdo. Antaŭe li estis citinta malbonan sanon kiel kialon de ne atestado antaŭ la juĝisto. En oktobro de 2017, la defenda advokato de ***Francisco Granados*** prezentis al la juĝisto raporton per kiu li petis pri-esplori aliajn altrangulojn de la Komunumo de Madrido, kiel ***Ignacio González***. En novembro de 2017, la enketistoj sendis plurajn raportojn al la Centra Tribunalo de Instrukcio numero 6 per kiu ili petis etendi la enketon ankaŭ al ***Eduardo Zaplana***. En 2018, la ĉefaj esploroj koncentriĝis pri klarigado de la supozataj ligiloj de la komputila fakulo ***Alejandro de Pedro Llorca*** kun politikaj kaj komercaj personuloj, precipe en la medio de Kartaĥeno. La 2-an de septembro de 2019, juĝisto determinis la akuzon en unu el la pecoj de la kazo de ***Esperanza Aguirre*** kaj ***Cristina Cifuentes***, eksprezidantinoj de la Komunumo de Madrido substrekante en la ordono la "decidan kaj esencan" rolon ke la unua eble havis en la kontraŭleĝa financado de la PP. En la longa listo de akuzitoj aperis ankaŭ, interalie, ***Juan José Güemes*** (eksministro pri Labor-Dungado), ***Manuel Lamela***, ankaŭ eksministro, fundamente implikita ekde siaj postenoj en la Kanalo de Izabela la 2-a, k. a. ***Gádor Ongil***, iama Ministrino pri Sociaj Servoj) kaj ***Borja Sarasola***, ankaŭ eksministro.

Alia kazo je koruptado kiu generis amason da implikitoj kaj kies fina juĝa sentenco ankoraŭ ne estis diktita estas tiu nomita ***Pitiusa***. En majo de 2012, estis arestitaj 88 homoj kiel eblaj partoprenantoj en reto de ŝtelo kaj kontrabandado de konfidencaj registaraj datumoj, kun centro en Barcelono kaj agadoj disvastigitaj tra 11 aŭtonomaj komunumoj. Tiu reto esploris gravajn komercistojn aŭ oficulojn, la edzon de ***María Dolores de Cospedal***, ***Ignacio López del Hierro***, ***Telma Ortiz***, fratino de reĝino ***Letizia***, aŭ potencaj andaluzaj politikistoj kaj komercistoj. En multaj el tiuj spionoj, ***Matías Bevilacqua***, retpirato kiu foje kunlaboris kun la CNI (Nacia Inteligentec-

Centro), estis uzita. La informoj estis venditaj al privataj entoj, ĉefe bankoj kaj firmaoj de telekomunikado, tra detektiv-agentejoj. Inter la arestitoj estis 40 privataj detektivoj, 15 publikaj gravuloj kaj 33 komercistoj kaj alitipaj uloj, kaj ili estis arestitaj kiel eblaj kulpuloj je profesia entrudiĝo, subaĉeto, malkovro kaj malkaŝo de sekretoj kaj monlavado. Dum la ekzameno de la informoj kaptitaj de ĉi tiu reto, oni malkovris, ke la retpirato ***Matías Bevilacqua***, spion-eksperto, kiu laboris por la CNI, estis dungita de la advokato de ***Iñaki Urdangarin***, ***Mario Pascual Vives***, por analizi kaj organizi la retmesaĝojn de la Instituto ***Nóos***.

***Juan Antonio Rama***, laŭ polica raporto, okupis plejaltan ŝtupon en la intrigo de vendado de informoj, komercaj raportoj, akiro, translokigo kaj kontraŭleĝa komercigo de rezervitaj personaj datumoj por enspezigaj celoj kun troa graveco, konduto en kiu intervenas aliaj homoj kun rilato al publikaj estaĵoj kaj privataj agentejoj de "komerca informado kaj esplorado", efektivigante peradon inter la demandanto kaj la fonto kiu posedas konfidencan informon, apogante sin je larĝa reto de perantoj kaj informantoj en la tuta teritorio kaj en strategiaj punktoj de la administracio, telefonistoj, foraj agentejoj, ktp. Per alia raporto oni emfazas, ke ili akiras konfidencan informon de iu ajn civitano aŭ firmao "per subaĉetado de publikaj funkciuloj kaj privataj homoj". Kaj aldonas ke, kune kun aliaj perantoj, "li koruptis oficistojn de la Fiska Agentejo, Social-asekuro, Polico, Katastro, Statistiko, ktp".

Poste, la nombro de akuzitoj atingis la nombron de 180 homoj inter oficistoj, telefonistoj, detektivoj, komercistoj kaj perantoj. Kaj por faciligi la proceson, la kazo estis dividita en 9 malsamajn pecojn depende de la deliktoj, pri kiuj la akuzitoj estas akuzitaj. La plej elstara de la unua peco, estus ***Rama***. Sed ne povis esti; tagojn antaŭe, liaj perantoj alportis al la juĝisto ŝokan novaĵon: ***Juan Antonio Rama*** estis mortinta la 16-an de januaro, monaton antaŭ la deklarado komenciĝus. Detektivo amiko de ***Rama*** klarigis ke "ĉi tiu tuta afero estas tre stranga. Mi parolis kun li je la Kristnasko; li diris al mi ke li faris sankontrolon kaj ke li ege bonfartis. Kiam mi eksciis pri lia morto, mi parolis kun la familio kaj oni diris al mi ke li havis strangan virusan infekton kaj post unu semajno li mortis. Do, subite". Alia fonto asertis ke "al neniu interesis ke ***Rama*** klarigu kiu mendis aferojn al li kaj al kiu li mendis ilin. Sed estas ankaŭ vere ke per la kontaktoj kiujn li havis tre facilus por li falsi sian morton kaj daŭre funkcii sub alia nomo. Kaj alia detektivo emfazis ke "mi parolis kun lia familio kaj oni



***Matías Bevilacqua***



***Juan Antonio Rama***



***Jaime Aguilera***




***Marienna Sánchez Jáuregui***



***Francisco Rodríguez*, urbestro de Oŭrenso**



***Adolfo Gacio*, urb-estro de *Boqueixón***



***Francisco Fernández Liñares*, *urb-konsiliano* de Lugo**



***Fernando Varela*, urb-konsiliano en Oŭrenso**


diris al mi, ke oni kremaciis lian kadavron, tiel do, eĉ se oni devus esplori tiun ĉi strangan morton, tio ne eblus, ĉar la korpo ne plu ekzistas”.

Rilate al ĉi tiu kazo ***Pitiusa*** okazas ia kurioza kaj paradoksa fakto. La legantoj de ĉi tiu nia raporto pri korupto en Hispanio povis konstati ke ni tre dokumentis la raportitajn koruptajn skandalojn per informoj kaj eĉ bildoj pri la koruptuloj, eĉ se ili estis ministroj kaj ŝtatestroj. Sed en tiu ĉi “kazo ***Pitiusa***”, kiu havis tiom egan nombron da implikitoj, ni apenaŭ povis kolekti kelkajn nomojn kaj fotojn de la kulpuloj. Opaka mantelo kovras tian personaron kiu distingiĝis ĝuste pro sia manko je respekto al la privateco kaj konfidenceco de ĉiaj homoj kaj institucioj. Krom la menciitaj ***Matías Bevilacqua*** kaj la eble mortinta ***Juan Antonio Rama***, ni povis kolekti nur, post longa kaj pena serĉado en Interreto, la nomojn de ***Jaime Aguilera***, prezidanto de UNILEVER, kaj ***Marienna Sánchez Jáuregui***, iama urbestrino de Ibizo.

Ni atentu nun pri alia kazo je korupatado, la t. n. “Operacio ***Pokémon***”. Temas pri juĝa enketo en Galegio ekde septembro de 2012 rilate diversajn epizodojn de ŝajna korupto, en kiu estis implikitaj kelkaj galegaj politikistoj, kiel la urbestro de Oŭrenso, ***Francisco Rodríguez***, la urbestro de ***Boqueixón***, el la Socialista Partio de Galegio, ***Adolfo Gacio***, el la PP, aŭ la unua konsiliano de Urbanismo de Lugo, ***Francisco Fernández Liñares***, el la Socialista Partio. Preskaŭ cent homoj estis akuzitaj, inter ili komercestroj, politikistoj kaj oficialuloj, igante ***Pokémo***n la plej egan korupt-intrigon malkovritan en Galegio. La polica esploro montris indikojn, ke komerca grupo kun sidejo en Madrido, ***Véndex***, ricevis kontraktojn de malsamaj publikaj administracioj en Galegio kontraŭ pagoj aŭ subaĉetaĵoj al postenuloj, eĉ urbestroj. ***Véndex*** estas grupo formita de proksimume 30 firmaoj kiuj dediĉiĝas al diversaj taskoj de asistado de publikaj administracioj, kiel purigado, lerneja prizorgado, socia helpo aŭ demarŝado de publika parkado.

Kadre la polica esplorado pri ĉi kazo estis dua serio da arestitoj, inter ili estis tiu de la loka polica estro de Oŭrenso, kiu estis liberigita sub kaŭcio, tiu de la konsilisto de la Galega Naciisma Bloko (BNG) en Oŭrenso, ***Fernando Varela***, ankaŭ liberigita sub kaŭcio, tiu de la urb-konsiliano de la Socialista Partio en ***Cospeito***, ***Manuel Pico***, same kiel tiuj de iuj komercistoj, aŭ tiu de la iama kunordiganto de la loka polico en Lugo. Iuj

el la imputitoj estis absolvitaj pro manko je pruvoj sed la juĝa proceso ankoraŭ ne estas tute fermita. Ni jam klarigis ke absolvo far la tribunaloj ne signifas senkulpecon; ĝi indikas nur ke la prezentitaj indicoj, eĉ se tre evidentaj, ne sufiĉas por dikti punojn se ne ekzistas nerebateblaj pruvoj.
Cetere, eĉ personaro de la juĝa povo skandalas nin per korupta konduto, kiel montras la t. n. "kazo ***Dívar***": La prezidanto de la Juĝistaro, ***Carlos Dívar***, pagis 30 vojaĝojn al la Sunmarbordo per publika mono, kun restadoj en kvarstelaj hoteloj. La 5-an de junio de 2012, la gazeto ***El País*** publikigis detalan raporton pri la 20 longaj semajnfinaj vojaĝoj faritaj de ***Carlos Dívar*** inter novembro de 2008 kaj marto de 2012 al ***Puerto Banús***. Laŭ la ĵurnalo, "la Ĝenerala Konsilio de la Juĝistaro (CGPJ) pagis al sia prezidanto, ***Carlos Dívar***, kvartagajn restadojn en ***Marbella*** (Malago) kun vojaĝado, loĝado kaj manĝoj inkluzivitaj, por ĉeesti publikajn eventojn daŭrantajn kelkajn horojn, kiuj foje okazis en iu malsama provinco kaj, en kelkaj kazoj, 200 kilometrojn for. Estis aliaj longaj semajnfinoj (ĉirkaŭ 20 labortagoj estis prenitaj kiel liberaj), kies viv-kostoj kaj loĝejaj elspezoj pagis li, sed la translokigo estis ŝargita al la CGPJ kaj la manĝoj en luksaj restoracioj estis kontitaj kiel protokolaj elspezoj (unu el ili kun ununura manĝanto, li mem). Post esti senkulpigita far liaj kunuloj, kaj post du semajnoj da forta parlamenta kaj amaskomunikila premo, ***Dívar*** prezentis la rezignon pri sia posteno la 21-an de junio de 2012, estante la unua prezidanto de la Juĝistaro kiu demisias el sia alta ofico.
La "kazo de Kunlaborado" aŭ "Kazo ***Blasco***" estas la nomo de korupt-intrigo kiu okazis en la Valencia Komunumo inter 2008 kaj 2010, kiam ***Francisco Camps*** estis prezidanto de la Valencia ***Generalitat***, en kiu ses milionoj da eŭroj de la fondusoj kiujn tiu institucio dediĉis al kunlaboro kun Triamondaj landoj kaj kiuj neniam atingis sian celon. La komploto, estrita de ***Augusto César Tauroni*** (la nura akuzito, kiu komence estis malliberigita), deturnis la monon dank' al liaj ligoj kun la Ministerio de Solidareco kaj Civitaneco, estrita de la PP-ano ***Rafael Blasco***, kiu estis la departemento kiu donis la helpon. La unuaj arestoj okazis la 26-an de februaro 2012, kaj dum la sekvaj monatoj la nombro de akuzitoj pliiĝis al 27 (inter ili ses altrangaj oficistoj de la valencia regiona administracio, tiam prezidata de la PP-ano ***Alberto Fabra***). La 12-an de junio 2012, la juĝisto pritraktanta la kazon komencis la procedojn por la imputado de la tiama


Carlos Dívar



Rafel Blasco


Augusto Cesar Tauroni


Agustina Sanjuán



Carlos Mulas




Emblemo de *AMY MARTIN*









La eta Nikolao kaj ties emo esti fotita apud gravuloj

ministro ***Rafael Blasco***, kiu estis la proparolanto de la PP-grupo en la Valenciaj Tribunaloj, kaj kiu pro tio estis provizore forigita de lia posteno. Pro lia leĝa privilegio kiel parlamentano, la “kunlabor-kazo” iris al la Supera Kortumo de Justico de la Valencia Komunumo.

La juĝaj esploroj konfirmis la respondecon de ***Tauroni*** kiel estro de reto de kompanioj kaj NRO-oj, kiuj ricevis proksimume 6 milionojn da eŭroj de la ***Blasco***-Ministerio por diversaj kunlaboraj projektoj kun subevoluintaj landoj, kiuj neniam estis efektivigitaj, kaj ke ili alpropriigis al si la monon kiu iris al kontoj de la intrigo kaj kompanioj en Usono kaj Hispanio. La tribunalo kiu juĝis ĉi tiun kazon diktis plurajn malliberecajn punojn. ***Rafael Blasco*** estis kondamnita al ses jaroj kaj duono da malliberejo. La eksa ĝenerala sekretariino de la Ministerio de Solidareco kaj Civitaneco, ***Agustina Sanjuán***, estis punita per ses jaroj, dum la eksa vicsekretario, ***Alejandro Catalá***, estis kondamnita al kvar jaroj kaj duono.

La imago de la senhontuloj, kiuj volas profiti el publikaj monrimedoj, estas senlima, kiel atestas la sekva korupta skandalo. “Kazo ***Amy Martin***”: en januaro de 2013, la kazo ***Amy Martin*** estis publikigita de la amas-informiloj, pri la “***Fundación Ideas***”, ligata al la Socialista Partio. Ĝi fakturis nome de inventita persono. Poste oni malkovris, ke ***Amy Martin*** estis enkarnigita de la direktoro de la Fondaĵo, ***Carlos Mulas Granados***. La “Fondaĵo Ideoj” pagis 50.000 eŭrojn por diversaj artikoloj al supozata verkistino nomata ***Amy Martin***, kies varmarko kaj emblemo estas registritaj de la direktoro de la institucio, ***Carlos Mulas***. Iamaj dungitoj de la fondaĵo certigis, ke ***Amy Martin*** ne ekzistas kaj ke fakte ŝi estas gratifiko al ***Mulas***, kiu starigis la fikcion. La fantoma aŭtorino enspezis 3.000 eŭrojn pro artikoloj per kiuj ŝi prezentis sin kiel fakulino pri la plej diversaj temoj kaj kiuj estis publikigitaj nur en la retejo “Fondaĵo Ideoj”. Ĝuste kelkaj el la verkoj de ***Amy Martin*** koincidas kun aliaj eldonitaj de ***Mulas*** mem. Li estis forigita de lia posteno en tiu sama jaro 2013.

Alia eĉ pli groteska kazo kiu famiĝis dum la regado de ***Rajoy*** estis tiu de la t. n. “***Pequeño Nicolás***” (Eta Nikolao). ***Francisco Nicolás Gómez Iglesias***, moknomita de la gazetaro kiel “la Malgranda ***Nicolás”***, estas iama jurstudento, kiu famiĝis kiam li estis arestita en oktobro de 2014 akuzita je falsado de dokumentoj, provo de fraŭdo kaj uzurpo de publikaj funkcioj kaj civila stato, krom esti poste akuzita pri malkaŝado de sekretoj, nedeca sub-

aĉeto, defraŭdo de publikaj monrimedoj kaj influotrafiko. Iuj gazetaraj fontoj indikis ke la junulo enŝoviĝis en la altajn nivelojn de la hispana politika kaj ekonomia potenco, eĉ asertante ke li laboris kiel kunlaboranto por la polica CNI kaj paradis kiel gasto ĉe la mankiso en la Reĝa Palaco post la proklamo de Filipo la 6-a kiel reĝo.
Supozeble, li trompis dekojn da homoj, al kiuj li promesis profitdonajn negocojn danke al siaj supozataj kontaktoj en la plej altaj niveloj de la Hispana Administracio kaj Registaro, kaj eĉ la CNI. Li luis altnivelajn veturilojn por plifortigi siajn inventitajn rakontojn kaj en unu el ili eĉ estis trovita portante hele bluan lumon similan al tiu uzata de la sekretaj unuoj de la Sekurecaj Taĉmentoj por identigi sin en kazo de krizo kaj preterpasi ruĝajn lumojn kaj eviti trafikŝtopiĝon. Li eĉ dungis personajn korpogardistojn por doni pli da kredindeco al siaj identecoj. La renkontiĝoj estis okazigitaj en domo posedata de ***Cyril de Preslav***, filo de la antaŭa caro Simeono de Bulgario. La esploroj derivitaj de lia aresto malkaŝis la ekziston de krimaj retoj por monlavado. Li estis akuzita ke li aperis kun la falsa identeco de registara konsilisto por postuli pagon de komisionoj por permesi la malŝloson de entreprenoj kaj investoj. Oni raportis ankaŭ, ke li kontaktis la advokaton de la familio de ***Jordi Pujol*** en la kazo de imposta fraŭdo, pozante kiel sendito de la CNI postulanta monon de la advokato kontraŭ klopodoj plibonigi la juĝan situacion de la eksprezidento de la ***Generalitat*** de Katalunio. La 14-an de aŭgusto 2014 estis atendita la vizito de reĝo Filipo la 6-a al la luga urbo Ribadeo pro onidiro diskonigita de la eta Nikolao. Sekureca protokolo estis efektivigita kaj eĉ la urbestro de Ribadeo atendis akcepti la monarkon, sed kion ili trovis estis la eta Nikolao mem, kiu alvenis akompanita de kvar aŭtoj kaj ok eskortoj, kun sirenoj, krom la loka polico eskortante lin.
Post lia aresto, la 14-an de oktobro de 2014, la 18-an de oktobro, la juĝistino de la kazo konsentis pri lia provizora liberigo sen kaŭcio. Ŝi mem deklaris, ke ŝi ne komprenis kiel "per lia nura vortemo, ŝajne kun propra identeco, ***Francisco Nicolás*** povis aliri la konferencojn, lokojn kaj eventojn al kiuj li aliris sen atentigi iun ajn dekomence pri lia konduto" eĉ se li deklaris ke li apartenas al la junulara organizo de politika grupo. En la kadro de la juĝa procezo, la raporto de la jura kuracisto konkludis, ke ***Gómez Iglesias*** posedas "floran deliran ideon je megalomania tipo". La 9-an de junio de 2021, li estis kondamnita de la Provinca Juĝejo de Madrido al sia unua puno, unu jaron kaj naŭ monatojn da malliberejo kaj monpunon je 2.700 eŭroj, pro falsigo de sia identkarto por ke iu amiko lia anstataŭu lin en lerneja ekzameno. Pri la Ribadeo-epizodo okazinta en 2014, la Provinca Juĝejo de Madrido trudis al li trijaran mal-liberecan punon en julio 2021 pro krimo de uzurpo de publikaj funkcioj kaj alia de aktiva subaĉeto. La 12-an de decembro 2022, la Provinca Juĝejo de Madrido diktis kontraŭ li sian trian punon, ĉi-foje pro deliktoj de uzurpo de publikaj funkcioj kaj falsado de oficiala dokumento, ŝajnigante esti registara sendito por peri en la vendo de bieno. La puno trudita por tiuj deliktoj aldonis al tri jaroj kaj kvin monatoj da malliberejo. Fine, la 29-an de marto 2023, oni eksciis, ke la 3-an de marto la Provinca Juĝejo kondamnis lin al kvar jaroj kaj tri monatoj da malliberejo kaj al pago de monpuno de 7.300 eŭroj pro deliktoj


Ana Botella de Aznar


Fermín Oslé Uranga


Concepción Dancausa


José Enrique Núñez Guijarro


María de la Paz González


Pedro María Corral Corral


Dolores Navarro Ruiz

de malkaŝo de sekretoj, malobservo de oficialaj sekretoj kaj aktiva subaĉeto, pruvite ke li aliris al konfidencaj policaj informoj por akiri ekonomiajn avantaĝojn. La antaŭaj punoj sumigas entute 22 jarojn kaj kvin monatojn da malliberejo.

Alia korupt-skandalo de la epoko estis tiu t. n. "kazo ***Pujol***". Ĝi iĝis publika en julio de 2014 kiam la eksprezidento de la ***Generalitat*** de Katalunio ***Jordi Pujol i Soley***, lia edzino ***Marta Ferrusola i Lladós*** kaj aliaj membroj de lia familio estis enketitaj pro la deliktoj de subaĉeto, influkomerco, imposta fraŭdo, monlavado, malversacio, defraŭdo kaj malvero. Tiel ***Jordi Pujol*** kiel lia edzino kaj idaro estas ligataj al diversaj kazoj de korupto kaj al la tenado de egaj ĉekkontoj en fiskaj paradizoj. Ekde 2014, iuj amasinformiloj  informis pri la ekzisto de neregulaj kontoj de ili en Svisio. La implikitoj neas la deliktojn atribuitaj al ili, kaj la juĝproceso estas multelonga, kiel okazas kun ĉiuj juĝaferoj en kiuj estas implikitaj famuloj. La proceso ankoraŭ ne estas finita kiam oni redaktas ĉi raporton.

Alia kazo ankoraŭ ne finita estas la t. n. ***Terra Natura Benidorm***: En julio de 2009, la plenuma komisiono de la Societo de Temaj Projektoj de la Valencia Komunumo (SPTCV) subskribis interakordon kun ***Terra Natura Benidorm*** kiu permesas pagi pro la uzo de publika tereno per park-enirbiletoj. Tio kompensus ŝuldon de 1,2 milionoj da eŭroj pagendaj la 31-an de decembro de 2009, kaj la ŝuldo por la jaroj 2010 kaj 2011. Laŭ la Revizoficejo de la Valencia Komunumo, daŭre ne estas konkretita la celo kaj uzo de la la enir-biletoj. ***Terra Natura Benidorm*** okupas 320.000 m² da publika tereno kaj ĝuas koncesion pri teruzo dum 75 jaroj kontraŭ ĉiujara kotizo, kiu devas esti pagata al la SPTCV.

Alia kazo kiu tre odoras je korupto estis tiu de la vendo de sociaj, protektitaj loĝejoj en Madrido. En 2013, la urbestrino ***Ana Botella***, edzino de ***Aznar***, ŝi kaj ŝia urb-konsilio vendis al vultura fonduso 1.860 loĝejojn, 1.797 parkejojn kaj 1.569 stokejojn, kontraŭ 128,5 milionoj, kiam pli ol 151 milionoj povus esti enirintaj, laŭ la Revizora Kortumo. Pro ĉiuj ĉi kialoj, en novembro 2017, la Madrida Urb-regantaro (tiam konstituita de maldekstra plimulto) anoncis la prezenton de proceso antaŭ la Konta Kortumo kontraŭ la antaŭa urba registaro de ***Ana Botella*** kaj la tiama direktoro de la Municipa Entrepreno de Loĝej-demarŝado, ***Fermín Oslé***, pro vendo de protektitaj loĝejoj en operacio efektivigita en oktobro de 2013. La 27-an de decembro de 2018, la Konta Kortumo diktis kondamnon kontraŭ ***Fermín Oslé***, ***Ana Botella*** kaj la ceterajn urbkonsilianojn kiuj havis ian respondecon pri la afero: ***José Enrique***

***Núñez Guijarro***, ***Dolores Navarro Ruiz***, ***Pedro María Corral Corral***, ***María de la Paz Gonzalez***, ***Diego Sanjuanbenito*** kaj ***Concepción Dancausa***, pagi monsumon proksiman al 23 milionoj da eŭroj pro la vendo de 1.860 publikaj loĝejoj al vultur-fondusoj en 2013. La publika instanco konsideris ke la vendo de ĉi tiuj domoj estis farita laŭ la merkata prezo kaj akuzas ilin "agadi krude neglekteme" kaj "damaĝi publikan proprieton". Sed, kiel kutime, la proceso plu daŭris pro apelacioj de la kondamnitoj kaj, fine, la Plejsupera Kortumo, kie tiom da simpatiantoj havas la superregantaj klasoj, absolvis ĉiujn ilin.

Nekredeble, en tiu Madrido, kaj ĝenerale en la tuta lando, kie okazis la multenombraj korupto-kazoj, pri kies plej alta respondeco rilatas al la politikaj fortoj de dekstraro, en la balotadoj pli kaj pli la voĉdonantoj apogas la kandidatarojn de tiuj dekstremaj partioj, la ĉefa el ili la PP. Eble estas necesa al ni la helpo de sociologoj por klarigi la kialon de tia stranga fenómeno.

Eble tia socia teniĝo ne favoras la bataladon kontraŭ la koruptemo. Fakte, ĉi tiu estas tre enradikigita en ĉi tiu lando. Eĉ institucioj kies rolo aŭ funkcio, teorie, estas kontraubatali la korupton, agadas koruptece. Por meti finon al ĉi tiu ĉapitro dediĉita al la regad-etapo de Rajoy, ni mencios la kazon de "***Manos Limpias***" (Puraj Manoj). ***Manos Limpias*** estas sindikato fondita en 1995 de ***Miguel Bernard Remón***, advokato kaj eksa ĝenerala sekretario de la ekstremdekstra partio Nacia Fronto. En sia retejo ***Manos Limpias*** difinas sin kiel "nacia, sendependa sindikato, ne hipotekita de io aŭ iu ajn kaj kies celo estas defendi la legitimajn kaj leĝajn interesojn de siaj anoj". La celoj de la sindikato ***Manos Limpias***, laŭ deklaro de ĝia retejo, estas: plenumi la Konstitucion, plibonigi politikan travideblecon, ekstermi korupton en la politika kaj juĝa sferoj, defendi la rajtojn de la laboristoj kaj konservi la unuecon de Hispanio.

Malgraŭ ne havi reprezentantaron en iu ajn laborejo, ***Manos Limpias*** registris mezumon de 80 plendoj jare ekde ĝia komenco, krom centoj da plendoj kontraŭ kvazaŭaj malobservoj de la jur-ŝarĝo kaj korupto.


***Miguel Bernard Remón***


***Luis Pineda Salido***


***Virginia López Negrete***


***Rafael Prieto Tenor***

Kelkaj el la plendoj rilatis al realaj kazoj de korupto kiuj, fakte, ankaŭ estis denuncitaj tra aliaj vojoj, sed la plej multaj estis ridindaĵoj aŭ aferoj kiuj gravas nur de ultradekstra ideologio. Ekzemple, ili agis kontraŭ ***Pablo Iglesias*** tial ke li, laŭ ilia opinio, sekvas la paŝojn de Hitlero, Lenino, ***Pol Pot*** kaj ***Castro***. La sindikato kverelis pro "elmontroj de samseksemo" kontraŭ ***Los Lunnis***, pro prezentado de edziĝo de samseksemuloj, kaj kontraŭ la CivilGvardio, kiam ĉi tiu decidis modifi la regularon de la kazerno por permesi al samseksemaj agentoj vivi kune. Alia afero kiu altiras la rifuzon de ***Manos Limpias***, estas tiu de la flagoj, aŭ ties manko. Ili plendis kontraŭ la municipaj registaroj de Eŭskio, Katalunio kaj Navaro pro ne plenumi la leĝon pri flagoj pendigante ilin sur la fasadoj de la urbodomoj. Ankaŭ la 15-M-movado estis denuncita ĉar ili konsideras ĝin "krima" reto. Ili prezentis plendon kontraŭ la urbestrino de Barcelono, ***Ada Colau***, kaj la membroj de la Platformo de Nocitoj de Hipotekoj, kiun la urbestrino reprezentis jam en 2013, pro minacoj kaj trudado en la manifestacioj kontraŭ ***Bankia***.

La 15-an de aprilo de 2016 estis arestita ***Miguel Bernad***, la prezidanto de ***Manos Limpias***, kaj ***Luis Pineda Salido***, kiel videblaj kapoj de ŝajna ĉantaĝ-reto kiu, interalie, negocis, kontraŭ ega monsumo, la retiron de la akuzo al la Infantino ***Cristina*** pro la ***Nóos***-kazo. Unu jaron poste ambaŭ jam estis apartigitaj de ĉia agado, markitaj kaj garditaj de la Justico. ***Bernardo*** estis enŝlosita en sia domo, kaj ***Pineda*** en la malliberejo de ***Estremera***. Tria implikita, la advokatino ***Virginia López Negrete***, kiu ŝajne batalis kune kun siaj kolegoj por purigi Hispanion de brutuloj kaj koruptoj, estis en libero sed for de la agado de ***Manos Limpias***. Tiuj tri uloj, kapoj kaj bildo de la supozita batalo kontraŭ korupto, estis tiam ekster la agado de la supozita sindikato, ***Manos Limpias***, kiu estis en malkresko kaj disrompiĝo. Poste, nova advokato aperis, ***Rafael Prieto Tenor***, al kiu ***Bernad*** cedis la kontrolon de ***Manos Limpias***. Li estas kristana advokato de la Eklezia Tribunalo de Malago, kiu akceptis la postenon de delegito de ***Manos Limpias*** en tiu andaluzia provinco en septembro de 2015. En la daŭro de la longa procezo, en decembro de 2017, en sia akuzo, la Prokurorejo petis malliberecajn punojn por la dek unu akuzitoj en ĉi tiu kazo kaj la dissolvon de la sindikato ***Manos Limpias*** pro deliktoj de fraŭdo, monlavado, ĉantaĝo, minacoj, maljusta administrado, fraŭdo en subvencioj kaj aparteno al krima organizo. Ĝi petis 24 jarojn kaj 10 monatojn da mallibero por ***Bernad***, kaj 11 jarojn kaj 11 monatojn por ***López Negrete***. En 2022 estis prizonaj punoj por ***Miguel Bernad*** kaj ***Luis Pineda***, kiuj tiam prezentis apelaciojn, ankoraŭ ne solvitaj.

Resume pri la regad-etapo de ***Rajoy***, oni devas reliefigi ke ĝi estis karakterigita de korupto kaj mensogoj, kio kontribuis al tio ke la popola fido je la politikaj institucioj malpliiĝis. Pro la korupto-kazoj en kiuj estis implikita la reĝo, li sin vidis devigita abdiki. Krome la konstitucio kaj ties leĝaro ricevis egan baton okaze de la sendependigan provon de la Kataluna Aŭtonoma Komunumo. Al ĉio ĉi aldonendas la fakto ke la juĝa potenco pli kaj pli faladis sub la kontrolo de la reganta partio kiu uzadas ĝin siaserve, siaprofite. Tiu fia realaĵo pli kaj pli iĝis grava ĝis atingi egan problemon, ankoraŭ ne solvitan, en la sekvinta regad-etapo, kiu ni priskribos per sekva ĉapitro.




Kiel jam priskribite per la antaŭa ĉapitro, la ekregado de la socialista ***Pedro Sánchez*** estis sekvo, ĝuste, de la situacio de la koruptado en Hispanio. La 25-an de majo de 2018, la Socialista Grupo de la Kongreso de la Deputitoj registris mocion pri deklaro de nekonfido kontraŭ la ĉefministro ***Mariano Rajoy***, post la verdikto de la Nacia Kortumo pri la kazo ***Gürtel***, kiu deklaris la kulpecon de la Populara Partio (PP). La 1-an de junio, la decidpropono estis adoptita fare de absoluta plimulto de la Kongreso de Deputitoj, kaj ***Sánchez*** estis ĵurkonfirmita kiel nova ĉefministro.

Cele atingi sufiĉan parlamentan plimulton por tiu registrar-ŝanĝo estis necesa la voĉdona apogo ne nur de la ceteraj politikaj fortoj de Maldekstraro sed ankaŭ de la naciismaj partioj de Eŭskio kaj Katalunio. Tio utilis de tiam al la PP kaj al la Dekstraro ĝenerale por propagandi kontraŭ la socialista regantaro asertante ke ĉi tiu regadas dank' al malamikoj de Hispanio kaj do kontraŭ la interesoj de la patrujo. Tia argumentado, eĉ se ne deca, estas tute legitima ene de la logiko kaj la funkciad-maniero de la politika konkurado en la demokraiaj politik-sistemoj. Sed en la tro insista argumentado pri tiu afero, de tiam kaj ĝis la nuntempo, enestis ia stranga faktoro kiu kontribuis de tiam venenigi la politikan etoson en la lando. Temas pri la fakto ke en ĉi aludo, far la PP-proparolantoj, enestas, ĉu eksplicite, ĉu implicite, la ideo ke la socialista regado estas nelegitima, tio estas, ke la socialistoj kaj ties maldekstraj aliancanoj estis regante kontraŭleĝe, rezulte de puĉo kiu metis finon al la legitima regado de la PP.

Kompreneble, tiaj akuzoj ne povus havi ian ajn juran aŭ parlamentan efikon, sed aldirektitaj al malklera publiko, ili kontribuas krei en ampleksaj sektoroj de la loĝantaro senton je malfido al la institucioj kaj al la politika sistemo ĝenerale. Ni rimarku ke saman strategion sekvis, kaj daŭre sekvas, la usona eksprezidento ***Donald Trump***. La verkado de ĉi ĉapitro koincidas kun tiu etapo antaŭ baldaŭa balotkampanjo en Usono por elekti prezidenton. Nu, ***Trump***, kiu celas estis reelektita por tiu posteno,



**Gratulo de *Rajoy* al *Pedro Sánchez* post la voĉdonado de la mocio pri deklaro de nekonfido**





**Unua registaro de *Pedro Sánchez***



***Sánchez* kaj la germana kancelierino *Angela Merkel* la 26-an de junio de 2018**



***Pedro Sánchez* kun la Franca prezidento, *Emmanuel Macron* la 26-an de julio de 2018**

ne agnoskis sian malvenkon en la antaŭa balotado kaj insistas ke la regado de la nuna prezidento estas kontraŭleĝa, rezulte de trompo kaj puĉo. Eble estas aliaj similaj kazoj en aliaj lokoj, sed ŝajnas evidente ke temas pri strategio celanta mal-stabiligi la politikan sistemon eble kun la espero kaj intenco anstataŭgi parlamentan kaj konstituciajn reĝimojn, kiuj asignas gravan rolon al la civila socio, per aŭtoritatecaj regad-formoj. Ja, tiutipa strategio utilis, en la pasinta jarcento, por la kapto de la politika potenco far la faŝismaj fortoj.

Sur la fono de tia agresema opozicio, disvolviĝis kelkjara politika vivo dum kiu ne mankis aliaj ŝokaj situacioj, kiel ni vidos. Preskaŭ samtempe al la komenciĝo de la socialista regado de ***Pedro Sánchez***, okazis ankaŭ komenciĝo de la kataluna registaro subgvide de ***Quim Torra***, kio signifis la finon de la aplikado de la leĝaj dispozicioj (155-a artikolo de la Konstitucio) uzitaj por sufoki la sendependisman provon en Katalunio. Tio signifis ke iome mildiĝis la teniĝo de la centra regantaro de la lando kontraŭ la sendependisma emo de iuj regionoj de la landa periferio. Ekzemple, la 10-an de junio, nur kvar tagojn post la prezentado de la socialista registaro, dekmiloj da personoj formis homan ĉenon kunig-antan la tri eŭskajn ĉefurbojn favore al la decidrajto. Tiuj signoj de plifortiĝo de la separatisma emo nutris la propa-gandon de la dekstraro kontraŭ la registaro de ***Pedro Sánchez*** cele veki kontraŭ ĉi tiu la naciisman hispanisman senton. Kiel dirite, tiutipa propagando estis senĉesa dum la jaroj de regado de ***Sánchez***, al kio kontribuis ankaŭ la defia teniĝo de ***Quim Torra*** kiu oftege eksplicis apartisman, sendepend-isman intencon rande de la limo de la leĝeco.

Baldaŭ post la perdo de la politika povo, ***Mariano Rajoy*** forlasis la politikan aktivadon kaj demisiis kiel prezidanto de la PP. Sukcedis lin en tiu posteno ***Pablo Casado***, kiu jam dekomence de lia prezidanteco entreprenis la opozicion al la Socialista Partio pere de politiko de senlegitimado de ĉi tiu surbaze de ties apogiĝo sur la naciismaj fortoj de Eŭskio kaj Katalunio.

Dume daŭre la korupto estis protagonisto de la politika vivo de Hispanio. Nur unu semajnon post la konstituo de la nova registaro devis demisii unu el ties membroj, la Ministro pri Kulturo kaj Sporto, ***Màxim Huerta***, kiam iĝis publike ke li estis trompinte la Fiskon en la jaroj 2006,

2007 kaj 2008. Alia tiutipa skandalo pri korupto okazis en septembro de la sama jaro 2018 kiam la Ministrino pri Sano kaj Socia Bonfarto, ***Carmen Montón***, devis demisii tial ke oni eksciis ke ŝi estis atinginta per neregulaĵoj sian akademian titolon en siaj studoj ĉe la Universitato en la akademia jaro 2010-2011.

La intenco de ***Sánchez*** estis ne fari novan balotadon antaŭ la fino de la parlamenta periodo, tio estas, junio de 2020. Sed la malakcepto de la plimulto de la partioj al la propono de la Registaro pri Ĝeneralaj Ŝtataj Buĝetoj por 2019 devigis lin kunvoki politikan balotadon por la 28 de aprilo de 2019. Unu el la plej elstaraj planoj de lia registaro estis la elfosado de la postrestaĵoj de la diktatoro ***Franco*** el la ***Valle de los Caídos***. En novembro 2018, la kataluna polico komunikis la areston de loĝanto de ***Tarrasa***, kiu, ĉagrenita pro la planoj por elfosado de ***Franco*** kaj kun arsenalo de 16 pafiloj ĉe sia hejmo, supozeble intencis atenci kontraŭ la vivo de ***Sánchez*** por meti finon al, laŭ siaj vortoj, "la feka ruĝulo".

En junio 2018, Italio kaj Malto rifuzis eniron de la ŝipo ***Aquarius*** en siajn havenojn lasante ĝin en la Mediteranea Maro kun 629 migrantoj. Fronte al tia situacio, la Registaro de ***Sánchez*** proponis la havenon de Valencio kiel sekuran lokon por la elŝipiĝo de tiu personaro. En tiu sama monato, la Registaro akceptis alian ŝipon, ĉi-kaze de la hispana NRO ***Open Arms***, kun 59 enmigrintoj surŝipe post esti denove malakceptita de la malta kaj itala registaroj. Same okazis komence de aŭgusto, la Registaro denove akceptis la ŝipon de ***Open Arms*** kun 87 enmigrintoj, ĉi-foje en la haveno de Algeciras. Ĉi tiu afero de la akcepto de fremdaj enmigrintoj pli kaj pli iĝis kialo de la politikaj atakoj de la dekstrara opozicio al la Registaro de ***Sánchez***. La rifuzo de fremduloj, de homoj de alia raso aŭ alia etno, fariĝas, en multaj kazoj, pli potenca kaj decida pri balot-motivigiloj ol klas-intereso. En la longega tempo antaŭ la apero de agrokulturo ne povis ekzisti klasbataloj; la homaj grupoj vivadis per kolektado de fruktoj, ĉasado, fiŝkaptado... Sed jam estis perforto inter la homoj: temis pri intergentaj, intertribaj, interrasaj luktoj... inter homaj grupoj konkurantaj por la teritorioj de fruktkolektado aŭ ĉasado el kiuj ili vivadis. Tial la malamo al la eksterulo, la ksenofobio, estas tiel enradikiĝinta en nia specio, ĝi estas parto de nia naturo, ĝi ekzistas ekde la komenco mem de la homa



**Quim Torra**




**Pablo Casado**



**Màxim Huerta kaj Carmen Montón**




**Ŝipo *Aquarius* kun enmigrantoj**



**Ksenofobio generita de la ega enmigrado**



*Pedro Sánchez* kaj *Pablo Iglesias* prezentas inter-akordon pri regado la 12-an de novembro - 2019



Koalicia registaro de la jaro 2020



*Irene María Montero*, Ministrino pri Egaleco



*Isabel Díaz Ayuso*, liderino de la PP en Madrido

specio kaj ĝi daŭris eĉ post la estiĝo de la agrokulturo kaj la industrio kunekzistanta kun tiu de klasaj kontraŭdiroj ene de ĉiu komunumo. Tiel, la malakcepto de enmigrintoj estas parto el la sento de malamikeco kaj malfido al eksterlandanoj. Estas konate kiel la faŝismaj movadoj baziĝas sur tiu ĉi profunde enradikiĝinta homa emo cele rikolti siajn politikajn triumfojn.

Kontraste al la antaŭa regado de ***Rajoy***, la registaro de ***Pedro Sánchez*** aprobis gravajn dekretojn de socia progresista inspiro. La 21-an de decembro 2018 estis aprobita la dekreto, kiu fiksis la minimuman salajron por 2019 je 900 eŭroj, la plej alta pliiĝo ekde 1977. En 2019, la Registaro altigis la plilongigon de lukontraktoj de 3 ĝis 5 jaroj, kio malhelpas pliiĝon de la luprezo esti aplikata dum 5 jaroj. Alia populara dispozicio estis la abolo de la imposto pro la uzado de sunaj paneloj por la atingo de elektra energio.

Tiuj kaj aliaj decidoj plibonigis la politikan situacion de la PSOE, kaj en la ĝenerala balotado de la 28-a de aprilo de 2019 ĝi atingis parlamentan plimulton super la dekstrara PP. Sed tio ne sufiĉis por rajti la formadon de nova registaro. La Socialista Parlamenta Grupo ne ĝuis absolutan plimulton por la investado de ***Sánchez*** sen alies subteno. Do, estis aranĝitaj intertraktadoj kun la cetero de la parlamentaj fortoj. Post kiam ne estis atingita interkonsento kun ***Unidas Podemos***, la investituro estis malakceptita de la Kongreso de la Deputitoj. Poste neniu alia kandidato atingis la necesan subtenon por esti investita dum la sekvintaj du monatoj, tial la 30-an de septembro 2019 la reĝo dissolvis la Kortesojn por revoki ĝeneralan balotadon.

La novaj parlamentaj balotadoj okazis la 10-an de novembro. La PSOE estis la partio kun la plej multaj voĉdonoj denove kun 28 elcento de la voĉdonoj kaj 120 parlamentaj seĝoj, tri malpli ol en la antaŭa periodo. Nur du tagojn post la balotado, ***Pedro Sánchez*** kaj ***Pablo Iglesias*** aperis kune anoncante interkonsenton inter la PSOE kaj ***Unidas Podemos*** por formi koalician registaron gviditan de la socialista kandidato. ***Sánchez*** sukcesis esti ĵurkonfirmita kiel prezidanto per simpla plimulto. Sed por atingi la necesajn 167 voĉodonjn favorajn estis necese ke krom la PSOE kaj ***Unidas Podemos***, apogu tiun investadon ankaŭ la PNV, ***Más País-Compromís***, ***Nueva Canarias***, k a. La naciismaj fortoj ERC kaj ***EH Bildu*** sin detenis je voĉdono. Tio utilis al la dekstraro, de tiam kaj ĝis la nova balotado de la nuna jaro 2023, por daŭrigi ĝian politikon je senlegitimado de la koalicia registaro.

La fakto ke, ekde la jaro 2020, la Socialista Partio regadis en koalicio kun la pli maldekstraj fortoj de ***Unidas Podemos,*** devigis aŭ ebligis ke la politiko de la nova registaro de ***Pedro Sánchez*** estis eĉ pli progresema ol la antaŭa. En tiu registaro estis kelkaj ministroj el la partio de ***Pablo Iglesias***, kiu rolis kiel Vic-prezidento, inter ili eĉ pluraj komunistoj kiel ***Yolanda Díaz*** kaj ***Alberto Garzón***. Estis speciale notinda la agado de ***Irene María Montero*** kiel Ministrino pri Egaleco en la fronto por la defendo de la virinaj rajtoj. La agresa politiko de senlegitimado de tiu maldekstra registaro far la PP kaj VOX iĝis pli intensa. Inter la atakoj al la publikaj figuroj de la politika maldektro ne mankis kalumnioj kaj publika insultado.

Paradokse, la sociala politiko de tiu registaro de Maldekstraro ne altiris la simpation kaj apogon de la landa loĝantaro, eble pro tiu kialo kiun ni menciis pri la prioritato de la ksenofobia sento sur la klas-intereso kiam la fremda enmigrado iĝas intensa kaj notinda. Iom post iom la politikaj fortoj de dekstraro estis progresante en la lando, ĉefe en Madrido kaj Andaluzio. En Andaluzio la Socialista Partio tie gvidata de ***Susana Díaz Pacheco*** perdis la politikan povon favore al la PP tie gvidata de ***Juan Manuel Moreno Bonilla***.

Simila politika evoluo okazis en Madrido. Krom la regado en la Aŭtonoma Komunumo, kiu estis firme kontrolita de ***Isabel Díaz Ayuso*** post la politika malapero de ***Cristina Cifuentes***, ankaŭ la urbodomo de Madrido falis sub la povo de la dekstrara PP. En la urba balotado de junio de 2019, la urbestrino ***Manuela Carmena*** perdis sian postenon favore al la PP-ano ***José Luis Martínez Almeida***. Ĉi tio malfavore efikis sur la afero de unu el la korupto-skandaloj kiujn ni priskribis per la antaŭa ĉapitro. Ni memoru la aferon de la sociaj, protektitaj loĝejoj kiujn la antaŭa urbestrino de Madrido eksterleĝe vendis al iu vultura fonduso. La tribunaloj kondamnis la responsulojn de tiu fiago sed estis apelacioj de la kondamnitoj, kiuj atingis absolvon. Sed la proceso plu daŭris ĉar la urbodomo de la maldekstra urbregantaro de ***Manuela Carmena*** faris la koncernan apelacion kontraŭ la absolvo. Sed la jur-procesoj en nia lando estas tro longdaŭraj, kaj la nova urbregantaro de ***Almeida***, el la dekstrara partio de la kondamnitoj, ĉesis subteni la proceson entreprenitan kontraŭ ili.

Kiel dirite, la tempo-periodo kiun ni priskribas estis tre malstabila de politika vidpunkto. Okazis en nia lando notindaj ŝanĝoj tiel en la Dekstraro kiel en la Maldekstraro. En ĉi



***Yolanda Díaz* kaj *Alberto Garzón***



***Susana Díaz Pacheco***



***Juanma Moreno Bonilla***



***Manuela Carmena***



***José Luis Martínez Almeida*, urbestro de Madrido**


Alberto Núñez Feijóo


Albert Rivera kaj Inés Arrimada


Antonio Cantó García


Santiago Abascal


Iñigo Errejón kaj Yolanda Díaz

lasta ne longe persistis la unueco inter la diversaj politikaj organizaĵoj. Se, unu-flanke, konkretiĝis antaŭbalota koalicio inter IU kaj ***Podemos***, en ĉi lasta estiĝis skismo liderita de ***Iñigo Errejón***. Ĉi tio kontribuis al la malsukceso de ***Manuela Carmena*** en la balotado de la jaro 2019.
En la Dekstraro iom postiom, aŭ pli ĝuste, balotado post balotado, malboniĝis la politika influo de la partio ***Ciudadanos*** ĝis ties kompleta malapero. Dume plifortiĝis la faŝisma organizaĵo VOX, liderata de ***Santiago Abascal***, kaj ĝi tre kunlaboris kun la PP en la pribalotaj venkoj sur la Maldekstraro en regionaj kaj urbaj balotadoj. Sed la PP mem devis alfronti iun krizon pri lidereco. ***Pablo Casado*** malaperis el la politika scenejo viktimo de intrigo en kiu ludis gravan rolon la madrida Prezidantino ***Isabel Díaz Ayuso***. Sukcedis lin en la gvidado de la PP ***Alberto Núñez Feijóo***. Alia notinda politika aventuro estis la kariero de ***Toni Cantó***, kiu plurfoje ŝanĝis sian partiomembrecon forlasante organizaĵojn rande de mal-apero por fine instaliĝi en la promeso-plena PP. Eble tia teniĝo sufiĉe proksimas al la prikoruptaj kondutoj kiujn ni pritemas.
Tiuj politikaj eventoj konstituas la fonon de la skandaloj pri koruptado kiujn ni priskribos poste. Sed estis en la fono ankaŭ alitipaj okazintaĵoj kiuj rilatas nenion al la homa agado. Unu el tiuj eventoj estis la t. n. “Vulkano de ***La Palma***”. La 19-an de septembro de 2021, en ***La Palma***, unu el la Kanariaj insuloj komenciĝis erupcio de nova vulkano. La elfluado de lafo, ofte akompanata de tertremoj pli malpli intensaj, daŭris 85 tagojn, ĝis la 13-a de decembro. Pro la laf-fluo al la marbordo, kiam la vulkana agado estis definitive finiĝinta, la surfaca etendo de la insulo estis kreskinta je pli ol unu kvadrata kilometro. Sed 370 hektaroj da agrokultura tereno estis detruitaj, same kiel 1220 hektaroj da loĝebla tereno kaj 2998 konstruaĵoj kun ties hidraŭlikaj kaj elektraj provizo-retoj, proksimume 6000 personoj perdis sian loĝejon… Tre multe la ŝtato devis peni por alfronti la katastrofon kaj helpi la viktimojn.
En tiaj kazoj oni pli klare perceptas la utilon kaj neceson de la ŝtato, de la publika demarŝado de la socio. Ĉi tion oni devas rimarki ĉar oni tre intencas promocii tiun politikon kiu, subpretekste je malpliigo de la impostoj, reale celas ruinigi la ŝtatan kapablon alfronti la bonfarismon, la publikajn servojn je saneco, edukado, sekureco… Ĉi tio evidentiĝis ankaŭ okaze de alia evento kiu estis parto el sceneja fono de la periodo kiun

ni priraportas. Temas pri la t. n. ***Covid***-pandemio, Kron-virusa pandemio, kiu disvastiĝis al la tuta mondo ekde la jaro 2019 kaj kies sekvoj ankoraŭ ne tute malaperis en iuj lokoj.

En Hispanio preskaŭ 13.850.000 estis trafitaj de tiu malsano, el kiuj mortis preskaŭ 121.000. La sekvoj kaj disvolviĝo de la malsano estis afero de longa politika polemiko en la lando. Ekzemple, en Madrido mortis, pro la virusa pandemio, multaj maljunuloj en la geriatriejoj tial ke, laŭ dispozicioj de la registaro de ***Isabel Díaz Ayuso*** oni malpermesis la translokigon de la malsanuloj de tiuj lokoj al hospitaloj.



**Vulkano de la *Palma***

Aliflanke la partioj de la Dekstraro uzis la aferon de la pandemio por ataki la registaron de ***Sánchez***, sed ilia strategio ne estis kohera. Unue ili akuzis la socialistan ministraron je senefiko kaj malkapablo por eviti la kontaĝon de la malsano kaj ĉi ties disvastiĝon en la lando. Sed poste, kiam ili konstatis ke la dispozicioj por eviti la kontaĝadon (malpermeso de publikaj spektakloj kaj vojaĝado, deviga enhejma restado…) estis malvolonte akceptataj de plejparto el la publiko, la dekstraraj politikistoj tuj ŝanĝis la enhavon de ilia opozicio kaj iĝis negaciistoj pri la danĝero de la epidemio kaj postuladis la nuligon de la diktitaj dispozicioj por ties prevento.

La Kron-virusa pandemio kaj ties cirkonstancoj estis okazo de diversaj koruptaĵoj en nia lando. Poste ni priskribos ilin. Sed nun ni klarigu ke la menciita PP-intrigo kiu metis finon al la lidereco de ***Pablo Casado*** en tiu partio kaj ties anstataŭo far ***Alberto Núñez Feijóo*** rilatas al unu el tiuj skandaloj je koruptado okaze de la pandemio. En aprilo de 2020, en la plej malbona momento de la pandemio, la Madrida San-Ministrejo aĉetis 250.000 maskojn el komercisto sen konata sperto pri tiu komerco. Oni pagis preskaŭ ses eŭrojn por ĉiu masko, entute 1.512.000 eŭroj. Estis kontrakto sen konkurso, profitante ke la alarmstato ebligis urĝan proceduron. La komercisto kiu vendis tiujn maskojn, ***Daniel Alcázar***, neniam antaŭe kontraktis ion kun la Komunumo de Madrido kaj la ĉefa kaj nur konata ligo kun ĉi tiu administracio estas lia amikeco kun la gefratoj ***Tomás*** kaj ***Isabel Díaz Ayuso***. En la PP oni pensis ke la frato de la Prezidantino de Madrido ricevis makleraĵon pro tiu komerca operacio, kiun pagis la firmao de lia amiko.



**Dum la *Covid*-Pandemio**

La PP-estraro de ***Pablo Casado*** iniciatis esploradon pri la afero kaj la interna malakordo en la partio iĝis publika. Se la presara informo estis certa, temis pri eksterleĝa makleraĵo de



**Daniel Alcázar**



**Alberto Núñez Feijóo kaj Isabel Díaz Ayuso**



**Rusa invado al Ukrainio**



**Vladimir Putin**



**Pedro Sánchez kaj Volodímir Zelenski**

280.000 eŭroj kiuj estis enspezitaj de la frato de la madrida Prezidantino. ***Isabel Díaz Ayuso*** neis ĉion kaj akre respondis al la Ĝenerala Sekretario de ŝia partio. Evidentiĝis ke estis ia lukto por la lidereco de la partio kiu jam ekzistis de antaŭe sed kiu pliintensiĝis ekde la 21-a de oktobro de 2020. La interna malakordo de la PP iĝis publika la 16-an de februaro de 2022 kaj de tiam la partia membraro, ĉefe ties komitatanoj kaj regionaj lideroj, devis poziciiĝi en la konflikto. La fakto ke ili decidis anstataŭigi ***Casado***-n per ***Núñez Feijóo*** atestas ke en tiu partio –kiel eble en ĉiuj ceteraj– oni premias la sukceson kaj punas la fiaskon. Ja, ***Ayuso*** kaj ***Feijóo*** estis sukcesintaj politikistoj en la balotoj de siaj respektivaj regionoj, dum ***Casado*** estis fiaskinta partia lidero en la tutlanda balotado.

Alia evento kiu enestis fone de la regado de ***Pedro Sánchez***, konkrete ekde la 24-a de februaro de 2022, estis la milito de Ukrainio. Same kiel ĉiu ajn milita konflikto, tiu inter Rusujo kaj Ukrainio havis antaŭaĵojn kiuj povas utili por kompreni la kialojn de la militado. Tamen, la loĝantaro de nia lando, eble ankaŭ tiu de aliaj landoj, scias nenion pri tiuj antaŭaĵoj dum konas sufiĉe detale tion okazintan en Ukrainio post la menciita dato de la 24 de februaro de 2022. Tio okazas ĉar la presaro amplekse informas pri la milito sed nenion pri la aferoj kiuj generis ĝin. Tio estas, la oficiala informado/propagando prezentas la aferon kvazaŭ la rusa-ukraina konflikto estus subita kaj neatendita okazaĵo kies origino estis ĝuste la rusa invado de tiu 24-a de februaro de 2022. Tian informadon ni taksas politika propagando ĉar ĝi estas ĝuste tio: ĉar Hispanio apartenas al la militista kontrakto NATO kaj krome membras ĉe Eŭropa Unio, havas devojn kun la ceteraj eŭropaj landoj submetitaj al la geopolitika strategio de la usona imperiismo. Same kiel la regantaro de aliaj eŭropaj landoj, la hispana devis provizi armilaron al Ukrainio kaj apogi la koruptajn regantojn de tiu lando.

Kaj nun ni priatentu la korupton de nia propra lando. La mondo tre evoluis ekde la 15-a jarcento, de kiam startis nia priraportado de la korupteco en Hispanio. Dum tiu kelkjarcenta periodo tre progresis la scienco kaj la tekniko, ŝanĝiĝis la politikaj sistemoj kaj ankaŭ la superregantaj klasoj de la socio, sed en nia lando la afero de la koruptado daŭre estas same kiel ĉiam. Kaj krome la koruptuloj daŭre ĝuas la popolan simpation.

En la politikaj balotadoj la konkurantaj partioj atingas des pli bonan rezulton ju pli alta estas la implikiĝo de ties publikaj figuroj en korupto-kazoj. Kial okazas ĉi tio? Por tion kompreni ni devas atenti pri tiu sociologia realaĵo aŭ koncepto kiun oni nomas "kolektiva animo". Ni priatentu jenajn paragrafojn de verko de ***Gustave Le Bon***:

> ***La plej stranga el la fenomenoj prezentitaj de iu psikologia amaso, estas jena: kiaj ajn estus la individuoj kiuj formas ĝin kaj kiom ajn diversaj aŭ similaj estus ilia vivmaniero, iliaj okupoj, ilia karaktero au ilia inteligenteco, la nura fakto esti transformita en homamason provizas al ĝi ian kolektivan animon. Ĉi tiu animo igas ilin senti, pensi kaj agi tute malsame ol kiel ĉiu el ili sentus, pensus kaj agus izole. Iuj ideoj kaj certaj sentoj ne estiĝas aŭ fariĝas agoj krom en la uloj konstituitaj en amaso. La psikologia amaso estas provizora estaĵo konstituita de heterogenaj elementoj, dummomente velditaj, ĝuste kiel la ĉeloj de vivanta korpo formas per sia kuniĝo novan estaĵon, kiu montras karakterojn tre malsamaj de tiuj kiuj ĉiu el tiaj ĉeloj posedas.***

Jen fajna difino de kolektiva animo. Sed, tamen, ni klarigu ke ***Gustave Le Bon*** temas pri provizoraj amasoj, tiuj kiuj agadas en konkreta specifa okazo, subinflue de specialaj cirkonstancoj, ekzemple la alsalto al la Bastilo la 14-a de julio de 1789, sed ni temas pri la konstanta kolektiva animo de la popoloj, kiu formiĝas laŭlonge de generacioj kaj kiun ĉiu ulo alprenas en la proceso de edukado, same kiel la gepatra lingvo. Do, konstituas la kolektivan animon de iu popolo, etno, lando… krom la gepatra lingvo, ĉiuj elementoj –kaj bonaj kaj malbonaj– de la koncerna tradicio, moroj, legendoj, aspiroj, folkloro, religio, valoroj, politikaj kriterioj, antaŭjuĝoj… ekzemple, la naciismaj sentoj, kiujn havas en Hispanio iuj regionoj aŭ etnoj, formiĝis laŭlonge de preskaŭ deko da generacioj. Alie, evidentas ke la homoj de ĉiu generacio tendencas alpreni kaj konservi la religion de siaj antaŭuloj. Nu, tio klarigas la emon de hispanoj voĉdoni en la balotoj favore al fiaj politikaj fortoj. Ilia kolektiva animo formiĝis laŭlonge de jarcentoj de rabado kaj dispredado de aliaj popoloj, Inkvizicio, maltoleremo, civil-militoj, rasismo, ksenofobio, vir-superemo... do grandparto el la loĝantaro de tiu popolo sin sentas reprezentata, de la politikistoj kiuj respegulas tiajn "valorojn".
Tial la korupto estas esenca komponaĵo de la hispana animo, do la multenombraj nuntempaj kazoj, el kiuj ni mencios nur kelkajn ĉar ne eblas atingi informon pri ĉiuj, vekas nenian rifuzon -eĉ intereson- de la hispana loĝantaro. Foje en ĉi raporto, temante pri tiuj korupto-kazoj, ni nomis ilin "skandaloj", sed verdire tiuj eksterleĝaj faroj tute ne skandalas en la hispana socio.
Unu el tiuj korupto-kazoj, relative ĵusaj sed pri kiu preskaŭ neniu memoras en la lando, estis tiu nomata ***Operación Madeja***. Temis pri kontraŭkorupta operacio direktita de juĝistino ***Mercedes Alaya*** kaj esplorita de Civil-Gvardio. La operacio, kiu startis en 2013 kaj kiu estis submetita al juĝa sekreteco en siaj fruaj etapoj, esploris supozitajn makleraĵojn de la firmao ***Fitonovo*** kontraŭ kontraktoj, kiuj kaŭzintus damaĝon al publikaj institucioj en Andaluzio, Ekstremaduro, Aragono, la Valencia Komunumo, Katalunio, Kanariaj Insuloj kaj la Komunumo de Madrido, kaj ankaŭ la Ministrejo pri Publika Konstruo, la municipoj de Sevilo, ***Algeciras*** kaj ***La Carolina***, kaj la publika firmao ***Adif***. Unu el la ĉefaj akuzitoj estis ***Domingo Enrique Castaño***, iama



**Procesitoj de la juĝistino *Alaya* pro la kazo *Madeja: Manuel Marchena, Antonio Rodrigo Torrijos, Fernando Mellet, Daniel Ponce, José Luis Sánchez Domínguez, Domingo Enrique Castaño, Gonzalo Crespo y María Victoria Bustamante.***



**La juĝistino *Mercedes Alaya***



**La juĝisto *José de la Mata***

konsiliano de la areo pri Publika Vojo de la Sevila Urbodomo kaj iama konsiliano de la socialista grupo. La esploro malkaŝis kvazaŭan kontraŭleĝan riĉiĝon taksitan de la Civil-Gvardio je pli ol 400.000 eŭroj kaj indicojn rilate al pagoj ricevitaj de ***Enrique Castaño*** de la firmao ***Fitonovo***, interalie. Inter la servoj de la firmao ***Fitonovo*** estis la realigo de laboraĵoj en iu loka socialista sidejo, kontraŭ 6.839 eŭroj, kaj la pago de 155.000 eŭroj al Unuiĝinta Maldekstro post la aljuĝo de 11 kontraktoj por instali artefaritan gazonon en futbalkampoj, estante unua vicurbestro ***Antonio Rodrigo Torrijos***.

La 11-an de novembro de 2014, la "Operacio ***Madeja"*** kondukis al la tielnomita "Operacio ***Enredadera***, polica amas-aresto de proksimume tridek homoj en la provincoj de Sevilo, Kordovo, Ĥaeno, Onubo, Kadizo, Granado, Badaĥozo, Madrido, Valencio, Zaragozo, Barcelono, ***Lanzarote*** kaj ***Las Palmas*** de Granda Kanaria-insulo. En ĉi tiu operacio oni priesploris oficialajn organizaĵojn kiel la konsilantaroj de Sevilo, Kordovo kaj Ĥaeno, kaj ankaŭ diversaj kompanioj kaj privataj hejmoj. Inter la arestitoj estis kvar akuzitoj de ***Adif*** kaj sekciestro de la Ministerio pri Disvolviĝo de la Ekstremadura Konsilantaro. En aprilo 2017, la juĝisto de la Nacia Tribunalo ***José de la Mata*** akuzis du iamajn socialistajn urbestrojn de Algeciras (Kádizo) inter 2005 kaj 2011, ***Tomás Herrera*** kaj ***Diego Sánchez Rull***, en aparta juĝ-peco de la kazo ***Madeja*** aŭ ***Fitonovo***, pro la supozata pago je 280.000 eŭroj kiel makleroj pro la aljuĝo de konstruo je sportejo. En julio de 2017 la juĝisto ***De la Mata*** finis la enketon de la kazo ***Fitonovo*** aŭ ***Madeja***, kiu atestis pri la korupto de teknikistoj kaj meznivelaj oficistoj, kaj ordigis la procesadon de 66 homoj en kvin apartaj juĝ-pecoj.

Evidentas ke la korupto estas planto kiu kreskas en ĉiutipaj politikaj terenoj: dekstre, maldekstre, centre… La kazoj ***Madeja*** kaj ***Enredadera*** havis protagonistojn de la politika Maldekstro, kaj same okazis kun la t. n. "Kazo ***Plan 1000***". Temis pri supozata afero de aĉetado de voĉdonoj far la antaŭa PSOE-urbestro de ***Huévar del Aljarafe***, ***Rafael Moreno***, kaj ties posteulino en tiu ofico, ***Áurea Borrego***, en kiu kontraktoj estis aljuĝitaj aŭ laborlokoj ofertitaj en la urbodomo kontraŭ voĉdonoj. Okazas ke tiu urbo havas la Urbodomon kun plej multe da ŝuldo por loĝanto en Hispanio. ***Rafael Moreno*** ricevis tribunalajn kondamnojn, sed spit' al ĉi tio, lia partio daŭre proponis lin por aliaj politikaj publikaj funkcioj.

Alia kazo de korupto en rilato kun la sistemo de voĉdonado estis tiu nomata: Kazo ***Albaida de Aljarafe***. Oni esploris la aferon rezulte de denunco laŭ kiu ekzistis iu "intrigo" por "monopoligi, laŭ ruza kaj krima maniero" la plej grandan nombron da voĉdonoj en la lokaj balotoj por la Socialista Partio. Tio estis atingita farante promesojn je laborpostenoj kontraŭ voĉdonoj, ĉiam laŭ la denunco, kiu mencias "vualitajn minacojn je ne akiro de la laborpostenoj en la okazo ke oni ne akceptus la menciitajn proponojn". Supozeble, por certigi, ke tiuj homoj voĉdonis por la Socialista Partio, ilia voĉdono estis enpoŝtita, tiel ke oficisto de Poŝtejo kolektis la petojn kaj kovertojn kun la voĉdono de la supozeble premataj laboristoj de la urbodomo. Okazis ankaŭ kazoj de homoj, kiuj ne petis voĉdoni perpoŝte, sed voĉdonis tiel. La socialista urbestro ***José Antonio Gelo*** deklaris, ke ĉio estis mensogo kaj ke ne estis rilato kun tio ke la procento de perpoŝta voĉdonado estis multe pli alta en lia urbo ol la landa mezumo. Kvankam la fraŭdo estis evidenta, ĝi ne provizis la necesajn jurajn pruvojn por konstati kulpecon, do la kazo estis fermita, kiel en multaj kazoj en la lando, sen puno por la kulpuloj.
Tute simila kazo estis tiu de ***Vega del Genil***, kies urbestro, ***Leandro Martín***, laŭ denunco de aliaj partioj, atingis sian elektadon rezulte de aĉeto de voĉdonoj. Ankaŭ ĉi-kaze la juĝafero estis arkivita pro manko de la necesaj pruvoj. Ĉi lastaj kazoj tute ne estis izolitaj koruptaĵoj de la Socialista Partio en Andaluzio. Por tiu partio, dum pluraj jardekoj Andaluzio estis kvazaŭ ĝia privata farmdomo. Ni memoru la kazon de la ERE kiun ni jam priraportis. Fakte, la politika koruptado profite al la Socialista Partio estis ĝenerala en tiu regiono, kaj, iamaniere, ĝia perdo de la politika povo ekde la jaro 2019 estas rezulto de popola reago al tiu situacio. Nun, kiam ni skribas ĉi-tion en la jaro 2023, la situacio estas tute malsama. La Dekstraro, PP kaj VOX, superregas en la regiona regantaro kaj en plejmulte el la urbodomoj, kaj ili respondecas pri fiagoj kiujn ni devos priraporti poste.
Sed atentante pri la etapo post la jaro 2019 ni devos okupiĝi pri la fraŭdoj dum la pandemio. Ni jam priskribis la kazon en kiu estis implikita la frato de la Madrida Prezidantino ***Isabel Díaz Ayuso***. Alia grava simila kazo estis tiu de la La filo de la pozistino ***Nati Abascal*** kaj de la iama duko de



***Rafael Moreno kaj Áurea Borrego***


***José Antonio Gelo,*** **socialista urbestro de** ***Albaida de Aljarafe***


***Leandro Martín,*** **urbestro de** ***Vegas del Genil***


***Luis Medina Abascal*** **filo de la duko de** ***Feria***


***Alberto Luceño***



Salvador Illia Roca,



José Luis Ábalos,



Nadia María Calviño,



Conrado Domínguez Trujillo



Rayco Rubén González

***Feria***, ***Luis Medina***, estas nun plej konata pro tio ke li aĉetis jaĥton per la makleraĵo de 971.210 eŭroj, kiun li akiris post provizado de maskoj, gantoj kaj Kronvirus-testoj al la Madrida Urbodomo. Lia komerca partnero ***Alberto Luceño*** atingis pli grandan profiton: 4.953.582 eŭrojn, per kiuj li akiris luksajn aŭtomobilojn: unu ***Ferrari***, unu ***Lamborghini***, kaj tri luksajn horloĝojn: oraj ***Rolex***, krom domon en la elita suburbo ***Pozuelo de Alarcon*** kaj luksan 10-tagan restadon en ***Marbella*** kontraŭ 60.000 eŭroj. La debato pri la makleraĵoj estis intensa. Ambaŭ uloj riĉiĝis per la tragedio, laŭ ies aserto. Sed la vero estas ke la juristoj asertas ke estas nenio kontraŭleĝa (la moralo estas alia afero) aldoni troan procenton de makleraĵo al la aĉeto kiam la merkato estis sen kontrolo. “La tikla afero ne estas la makleraĵo, sed ĉu la operacio estis laŭleĝa”. Ĝuste ĉi tio estis la radiko de la afero. Dum la Stato de Alarmo en 2020, ĉiuj obstakloj por kontraktado estis provizore forigitaj ĉar iĝis necesaj urĝaj proceduroj per kiuj la administracioj povis rekte decidi la kontraktojn kaj tio eliminis la normojn kiuj celas eviti kriman konduton. ***Medina*** kaj ***Luceño*** estis akuzitaj je deliktoj de fraŭdo, falsado de dokumentoj, mon-lavado kaj forkapto de monresursoj. La kulminon de la koncerna proceso ni devos atendi dumlonge; estas konate ke la juĝaferoj estas tre lantaj en nia lando.

Ni jam pritemis kazon de la frato de la Prezidantino de Madrido. Nun oni devas aldoni ke kiel reago al la politika pozicio de la socialista regantaro rilate al ĝi, la kunlaborantaro de ***Ayuso*** kontraŭatakis denuncante 13 operaciojn de la socialista registaro dum la pandemio, pri kiuj la Prokurorejo devis atenti. Inter tiuj aferoj, estis suspektindaj aĉetoj de la Sanec-Ministerio subgvide de ***Salvador Illa***, kiu akiris 500.000 foruzeblajn kitelojn koste de 10.192.605 eŭroj. “Troa” prezo por ĉiu (16,7 eŭroj kiam en aliaj lokoj ili valoris malpli ol 0,3 eŭro), laŭ la denunco.

Krome oni denuncis kvar kontraktojn por entute 488.000.000 maskoj provizitaj de firmao, kies socia agado baziĝis sur alkoholaĵoj kaj ĝia solveco ne estis kontrolita. La firmao jam estis kondamnita en la jaro 2016 pro fraŭdo. Kaj tiel kun kontraktoj de la Ministerio pri Transportado (kiam ĝi estis administrita de ***José Luis Ábalos***) aŭ kun alia de la Ministerio pri Migrado kiuj estis aljuĝitaj al firmao kies merkatdirektoro estas la edzo de la Unua Vicprezidantino, ***Nadia María Calviño***.

Ankaŭ la partio VOX faris denuncon contra la Ministerio pri Saneco ĉi-kaze pro kontrakto de 92 milionoj da gantoj por la

sanec-servoj. Ĉi tiu kazo estis arkivita sen ia ajn proceso sed la ceteraj daŭre estas esplorataj far la juĝistaro. Same okazas, ekde aŭgusto de 2021, kun la kazo de la kontrakto de spirigiloj, kies demarŝado implikis "internaciajn procedurojn", laŭ inform-fontoj kiuj rifuzas publikigi ĉi tiun kazon. Ili klarigas, ke kvankam estas vere, ke necesas klarigi ĉu okazis deturno de publikaj financoj dum la kvarantena periodo, ankoraŭ ne eblas temi ia ĝenerala skemo de agado.

Krom tiuj de la centra registaro, la plej multaj el la plej altprofitaj fraŭdoj rilatis al Madrido. Tiel, la Urba Polico mem raportis aron de 500.000 maskoj kiuj neniam estis liveritaj. La Urbodomo pagis ne malpli ol 1.250.000 eŭrojn por nenio. La maskoj ne alvenis al sia celloko kaj la provizanto ***Philippe Haim*** kies ĉefsidejo estis en Novjorko malaperis. Simila fraŭdo estis tiu okazinta en Kanariaj Insuloj. La Tribunalo de ***Gran Canaria*** akceptis la denuncon de la Prokuroro kontraŭ la direktoro de la Kanaria Sanservo ***Conrado Domínguez***, la direktoro de Ekonomiaj Rimedoj, kaj la estro de la kompanio RR7 ***Rayco Rubén González***. Lia aŭtomobila kompanio vendis kelkajn maskojn, kiuj neniam alvenis. Ne malpli ol 4.000.000 estis pagitaj el la publikaj kasoj.

Depost la Kron-virusa pandemio kaj ties sekvoj en rilato kun korupt-skandaloj, la koruptado ne ĉesis en la lando, ĉefe en rilato kun la politika praktikado. Dum la tuta etapo de regado de ***Pedro Sánchez***, kaj ĝis nun, ne eblis efektivigi la renovigon de la Ĝenerala Konsilio de la jura povo. La blokado de tiu politika operacio estis kaj daŭre estas, en oktobro de 2023, respondeco de la Populara Partio (PP) subgvide unue de ***Pablo Casado*** kaj poste de ***Alberto Núñez Feijóo***. Okazas ke, kutime kaj ĝenerale en la lando, la renovigon de tiu jura organo oni efektivigas per interakordo de la du plej gravaj partioj. Kompreneble, la procento da juĝistoj en tiu jura konsilio respegulas la forto-rilato inter ambaŭ partioj, t. e. en la Plejsupera Tribunalo havas plimulton da juĝistoj la reganta partio. Sed tiu kutimo rompiĝis ĝuste elde la komenciĝo de la regado de ***Pedro Sánchez***. La PP rifuzis procedi al la koncerna renovigo kaj daŭre konservas la plimulton kiu ĝi havas en la plejalta juĝ-konsilio de la lando ekde la regad-etapo de ***Mariano Rajoy***. Ĉi tio utilas por ke tiu partio konservu influon por protekti ties multenombrajn koruptulojn. ***Mariano Rajoj*** kaj ***Jorge Fernández Díaz*** ankoraŭ ne estis enkarcerigitaj kaj verŝajne ili daŭre restos en tiu ambigua situacio ĝis kiam ili estos sufiĉe maljunaj por laŭleĝe liberiĝi el enkarceriĝo.

Ĉar en nia priskribado de la politika malstabileco en kiu devis barakti la registaro de ***Pedro Sánchez*** ni devis okupiĝi pri la naciistaj fortoj, ni devas nun aldoni ke la politika situacio en Katalunio ŝanĝiĝis ekde septembo de la jaro 2020. De tiam jam ne plu regas en tiu aŭtonoma regiono ***Kim Torras*** sed ***Pere Aragonés***. Tiu ŝanĝo estis favora al la paktoj kiujn la Socialista Partio devas aranĝi por atingi sufiĉan apogon por regi la landon. Sed tiu apogo sur naciismaj, separatismaj politikaj fortoj provizis/as politikan argumenton al la dekstraro kontraŭ la koalicio de maldekstraro. Ĉi tio iĝis tre evidenta en la batotadoj okazintaj ĉi-jare (2023) kaj en la (ĝis)nuna pliintensiĝo de la politika malstabileco en la lando.



Pere Aragonés



















Ĉefa, eĉ se ne oficiala, slogano de la balotkampanjo de la Dekstraro por la Elektadoj de la jaro 2023

Estis ankaŭ faktoroj de malstabiligo ene mem de la reganta koalicio. La 4-an de majo de 2021, ***Pablo Iglesias*** anoncis sian eksiĝon de ĉiuj siaj postenoj ĉe ***Unidas Podemos*** kaj sian forlason de la institucia politiko. De tiam la rolo Vicprezidanto de la Registaro kiun ***Iglesias*** estis plenuminta, kiel lidero de ***Unidas Podemos,*** estis efektivigita de ***Yolanda Díaz***, sed ŝi ne same heredis la liderecon de ***Unidas Podemos***. Kiel sciate, ankaŭ ĉi tiu estas koalicio, kaj ene de ĝi la rilato inter ambaŭ komponaĵoj, ***I.U.*** kaj ***Podemos***, ne estis glata. Ĉi tio gravis ĉar ***Yolanda*** entreprenis poste la kreadon de politika platformo por kandidatiĝi en la sekvonta ĝenerala balotado. Ĉi tiu nova politika projekto estis identigita de la amaskomunikiloj kiel “ampleksa fronto”. La 19-an de majo 2022, ŝi registris novan politikan enton nomitan “***Sumar***” (kun la signifo de “aldoni”, “adicii”) ĉe la Ministerio pri Internaj Aferoj. Ĝia celo estis unuigi la politikajn fortojn maldekstre de la Socialista Partio. En junio de tiu sama jaro, ***Sumar*** komencis “aŭskultprocezon” ĉie en la lando por informiĝi pri la civitanaj bezonoj kaj konstrui politikan projekton kiu reprezentus ilin.

Kiel dirite, grava rezisto al la unuiĝo estis ĝuste tiu de ***Podemos*** kun kiu estis en koalicio ***Yolanda*** kaj ĉi ties gekamaradoj. Cetere la ĉefa liderino de ***Podemos***, la Ministrino pri Egaleco ***Irene María Montero***, suferis dum la lasta etapo antaŭ la balotado egan politikan erozion kaj multajn atakojn de la dekstrara opozicio por leĝo, kies parlamentan apogon ŝi atingis favore al la celo protekti la virinojn el seks-atakoj, sed kies aplikado estis malbone alĝustigita al la juraj proceduroj, el kio rezultis ke multaj enkarcerigitaj seksperfortigintoj estis liberigitaj aŭ ricevis punreduktadon. En tiu kunteksto okazis la urbaj kaj regionaj balotoj de la 28-a de majo ĉi-jare kies rezulto estis katastrofa por la Koalicio de Maldekstraro.

La balotkampanjo de la PP kaj VOX kontraŭ la Socialista Partio centriĝis, ĝisnaŭze, en unu konkreta punto: la fakto ke la socialistoj kaj ties maldekstraj kunkoalicianoj povis regadi nur dank’ al la apogo de la naciismaj fortoj de Katalunio kaj Euskadio. En septembro 2022, estis aperinta en la amaskomunikilaro la slogano: “Ke ***Txapote*** voĉdonu por vi”, uzata de politikistoj kaj simpatiantoj de la PP kaj VOX por ataki la Prezidenton ***Pedro Sánchez***. Tiu slogano estis tre disvastigita en la balotkampanjoj de ĉi-jaro 2023. ***Txapote*** estas kaŝnomo de la eŭska teroristo ***Francisco Javier García Gaztelu*** kiu murdis kelkajn homojn kadre de la terorisma kampanjo en Eŭskio.

En la urbaj kaj regionaj elektoj de la 28-a de majo 2023, la Socialista Partio suferis egan malsukceson en la tuta lando, perdante plurajn aŭtonomajn komunumojn kaj urbestrojn profite al la PP de ***Alberto Núñez Feijoo*** kaj al la ekstrem-dekstra partio VOX. ***Feijoo*** sin taksis kapabla balote venki ankaŭ por atingi la registaran potencon kaj pretiĝis postuli antaŭenigon de la ĝenerala elektado, sed ne estis necese al li fari mobilizon favore al tiu postulo. ***Pedro Sánchez*** mem, konsiderante la malbonajn rezultojn por la Maldekstraro, la 29-an de majo, publikigas sian deziron antaŭenigi la ĝeneralan balotadon de 2023, planitajn por decembro, al la 23-an de julio.
En la balot-kampanjo la partioj de la Dekstraro daŭre plu insistis je la propagando-tipo kiu tiom bonaj rezultoj alportis al ili la 28-an de majo. Dume la partioj de la koalicio de Maldekstraro priemfazis la socialajn atingoj de ties registaro dum la antaŭaj jaroj: plialtigo de pensioj, plialtigo de la minimuma salajro, reteno de prezoj kaj la ibera escepto en la prezo de energio, rekordo en kreado de laborpostenoj, promocio de laborleĝaro, kiu reakiras rajtojn kaj protektas laboristojn, limigo de plialtiĝo de la prezo de luodomoj, malpermeso de eldomigoj de vundeblaj familioj dum la pandemio, la efektivigo de la Minimuma Porviva Enspezo...
Kiu ajn estu la kaŭzo, la balotado de la 23-a de julio ne tiom estis bona por la Dekstraro. Kvankam la PP estis la partio kiu atingis pli altan voĉdonon-nombron, al ***Alberto Núñez Feijoo*** ne eblis regadi eĉ kun la apogo de VOX kaj aliaj dekstremaj fortoj. La Reĝo ***Filipo*** la 6-a komence decidis la nomumon de ***Alberto Núñez Feijóo*** kiel kandidaton por la prezidanteco de la Registaro. Lia investituro estas malaprobita de la Kongreso en septembro 2023 per 176 kontraŭaj voĉdonoj kaj 172 favoraj. En nova serio de kontaktoj, ***Filipo*** la 6-a nomumas ***Sánchez***-on kiel kandidaton por la prezidanteco la 3-an de oktobro. La 24-an de oktobro, ***Pedro Sánchez*** interakordis kun ***Yolanda Díaz***, la gvidanto de ***Sumar***, por prezenti investituran pakton simile al tiu, kiun li faris en novembro 2019 kun ***Pablo Iglesias***, tiama lidero de ***Unidas Podemos***. Gravaj progresemaj iniciatoj estis inkluditaj, kiel la redukton de laborhoroj.
Sed, ankaŭ same kiel en 2019, por atingi sufiĉan parlamentan apogon por la nomumo kiel Registrar-Prezidento, ***Sánchez*** bezonis la apogon de la naciismaj fortoj de Eŭskio kaj Katalunio, kaj tio plu kaj pli estis ŝanco por la politikaj atakoj de la partioj de Dekstraro. Sed ĉi-foje la atakoj ne estis nura propagand-kampanjo, sed estiĝis situacio de preskaŭ civitana ribelo. Krom la amasaj laŭleĝaj manifestacioj, estis, dum kelkaj sinsekvaj tagoj, kaj noktoj, sufiĉe perfortaj manifestacioj antaŭ la sidejo de la Socialista Partio.
Tiu movilizado okazis dum la negocado de ***Pedro Sánchez*** kun la lideroj de la katalunaj partioj kiuj respondecis pri la iama sendependism-cela puĉo-provo en tiu regiono, ĉefe ***Puigdemont***, kiu ankoraŭ restis eksterlande post lia fuĝo kiam la ribelo fiaskis. La ĉefa kondiĉo de tiuj katalunismaj lideroj por apogi la parlamentan investadon de ***Pedro Sánchez*** estis la koncedo de amnestio por la implikitoj en tiu fiaskinta operacio. La mobilizoj de la politika Dekstraro, laŭteorie, estis kontraŭ la koncedo de tiu jura dispozicio, sed pro la formo kiun alprenis la opoziciado, ĉefe la menciitaj manifestacioj antaŭ la Socialista sidejo, evidentis ke la mobilizoj estis kontraŭ la konstitucio kaj ties simboloj.




**Manifestacioj kaj tumultoj de la Dekstraro en Madrido kontraŭ la parlementa investado de *Pedro Sánchez***



**La 16 de novembro de 2023 la hispana Parlamento aprobis la (re)nomumon de *Pedro Sánchez* kiel Prezidento de la Registaro**

En la manifestaciaj sloganoj oftis esprimoj kontraŭ la konstitucio kaj la reĝo kaj oni flirtigis flagojn kaj aliajn simbolojn de faŝisma ideearo. Temis pri mobilizskemoj de la etapo de la kapto de la ŝtata potenco far la faŝismoj de la pasinta jarcento, t. e. kampanjo kies celo estas estas senkreditigi, senlegitimigi la demokratiajn instituciojn kadre de proceso kiu kulminus per la renversigo de la politika reĝimo. La mobilizoj de tiuj tagoj, kaj noktoj, iel memorigis nin la iamaj «Ribeloj de ***Squilache***», movado de la reakciaj fortoj de la lando en 1766 kontraŭ progresista politiko kiun oni volis entrepreni tiam.

Pri la metodoj de la faŝismaj fortoj, la politikaj povoj kiuj kreas tiujn fortojn kaj la celo kiun oni volas atingi per ĉio-ĉi, ni jam amplekse priraportis per la 97-a numero de ĉi tiu revuo Heleco. Ni nun diru nur ke sur la fono de tiuj tumultoj la investado de ***Pedro Sánchez*** efektiviĝis en la Parlamento spit' al la opozicio de la Desktraro.

Kaj ni profitas tiu eventon kiel fina signo de nia raportado pri la korupto en Hispanio. Tamen ni devas deklari, konsternite, ke restas for de nia raportado multaj prikoruptaj skandaloj, pri kiuj ni eksciis lasttempe. Estis/as gravaj korupto-kazoj en la futbalo, kiuj estis publikigitaj post la fama afero de ***Luis Rubiales***, ulo kiu meritas esti aldonita plen-honore al la listo de operet-roluloj kiun ni prezentis en la antaŭa revua numero temanta pri la koruptado en nia lando. Krome estas ankaŭ la afero de la multenombraj kazoj de pederastio en la Eklezio kaj la intenco kaŝi ilin. Kaj multaj aliaj prikoruptaj skandaloj pri kiuj oni ekscias preskaŭ ĉiutage.

Sed ni ne povas okupiĝi pri tiom abunda materialo; ni rezignas; la tasko pretersuperas nian kapablon… Pritemi ĉiujn nove aperintajn korupto-kazojn postulus aldoni kromajn cent paĝojn al ĉi tiu numero de la revuo. Krome, dum la verkado de tiu suplemento okazus pluaj koruptaĵoj kiuj postulus kroman suplementon. Do, ni kapitulacas: niaj fortoj estas limigitaj, la koruptado ne, ĝi estas senlima, same kiel la homa stulteco kaj la amplekso de la universo… Nu, pri ĉi lasta ne estas certeco ke ĝi estas senlima.

# LA KORPUPTAJ REGANTOJ AGADAS SENHONTE KAJ FIE ĈAR ILI SCIAS KE NENIO OKAZOS



***José María Castillo***

Multaj homoj estas konvinkitaj ke, por ke iu lando -kaj la socio de tiu lando- funkciu "kiel ĝi devus", la plej grava afero estas ke la koncernaj regantoj de la lando estu **bonaj regantoj: inteligentaj, kompetentaj, spertaj, honestaj, ktp.** Pri kio estas nenia dubo. Evidentas ke bone regata lando estas kaj ĉiam estos lando kiu kreskas, prosperas kaj en kiu la civitanoj sentas sin feliĉaj, tiel feliĉaj kiel eblas al loĝantoj de iu ajn lando. Ĉi tio estas evidenta.
Sed estas alia afero, rilate al ĉi tiu temo, pri kiu preskaŭ neniu pensas. Kaj tamen, laŭ mia modesta opinio, ĝi estas tio kio estas vere decida. Mi diros ĝin per kelkaj vortoj. Kiom ajn gravas la kompetenteco kaj honesteco de la "regantoj", **la honesteco de la "regatoj"** estas multe pli grava kaj decida. Ĝuste nun, en Hispanio preskaŭ ĉiuj demandas sin ĉu la aferoj estos pli bonaj aŭ pli malbonaj kun la nuna ŝanĝo ol kun la antaŭa registaro. Pri tiu ĉi afero, kompreneble, ĉiu havas sian vidpunkton kaj certe ankaŭ sian konvinkon. Ĝi estas la plej logika afero, se ni pensas pri la ideoj, kiuj estis metitaj en niajn kapojn.
Tamen, jam estas tempo por ni vidi aferojn alimaniere. Necesas, ke ni rimarku, ke, kiom ajn grava estas la administrado de la regantoj, **la honesteco de la regatoj estas pli grava**. Krome, oni povas certigi, ke **la koruptaj regantoj perdas honton kaj dignon, ĉar ili scias, ke ili povas perdi tion kaj nenio okazos**. Kio signifas, ke, en lando, en kiu korupto inter tiuj, kiuj regas, okazas, ĉar la plej koruptaj estas tiuj, kiuj estas regataj. Tiuj, kiuj restas silentaj, tiuj, kiuj ne volas eniri en problemojn, tiuj, kiuj scias, ke per sia silento kaj pasiveco ili povos prosperi kaj altrangiĝi. Kaj tiel plu.
Lando, en kiu la aferoj tiel funkcias, estas lando, kiu neniam eliros el korupto. Malgraŭ kiom ajn bonaj regantoj estus. **En tia lando, la regantoj finiĝas koruptaj**. Lasttempe, profesoro ***Emilio Lledó*** rezignis oran medalon kiun la Komunumo de Madrido atribuis al li. Ĉar li sciis ke akceptante tiun dignon, li farus sin neinda. Kaj li kontribuus al la neindeco de la civitanoj.
Kaj mi finas. Kiel oni scias, mi dediĉis mian vivon al la studo kaj instruado de kristana teologio. Nu, en miaj longaj jaroj de studado kaj laboro pri tiu ĉi afero, mi neniam trovis en la Evangelio eĉ unu denuncon, per kiu Jesuo kulpigis la politikajn aŭtoritatojn de la Imperio pri la ĉiuspecaj misuzoj, kiujn ili faris en Palestino en la 1-a jarcento. Kiam Herodo senkapigis Johanon la Baptiston en nokto de festeno, ni ne scias, ke Jesuo publike denuncus tian krimon. Kaj la tago, kiam oni diris al Jesuo, ke Pilato tratranĉis la gorĝojn de kelkaj galileanoj, kiam ili oferis "religian oferon", **Jesuo diris eĉ ne unu vorton kontraŭ Pilato**. Kion li ja diris al la homoj estas, ke "se vi ne pentos, ankaŭ ĉiuj vi pereos" *(Luko 13:1-5)*. Jesuo klare vidis, ke la radiko de la problemo estis nek en Herodo nek en Pilato. Estis en la korupto de popolo, kiu trankviligis sian konsciencon per la religiaj observoj truditaj de la Religio. La postuloj de la Evangelio ne interesis ilin.
Ni ŝanĝis regantojn. Kaj **tio donas iom da espero al iuj, dum ĝi forprenas ĝin de aliaj**. Kiam, en la realo, tio, kion ni devas vidi tre klare, estas, ke nur nian honestecon, kiam ni ne mordus nian langon antaŭ "korupto" (kiu ajn ĝi estu la koruptulo), kiam tiu "korupto" estus publike diskonigata, ĝi estus priraportata kaj ĝi ne estus tolerata, tiam estas kiam ni estus plenaj civitanoj. La tago kiam oni edukus nin ĉiujn por reagi tiele al la korupto, tiu tago la koruptado finiĝus. Estos pli da egaleco. Kaj ni vidos aferojn alimaniere. Ni ne trompu nin. Ni ne trankviligu nian konsciencon kulpigante aliajn.



# Sínodo de la Sinodeco: Marŝi kune, sed, kien?



La RomKatolika Eklezio estas nun en sinoda procezo kun ampleksaj sed ambiguaj celoj. Supozeblas ke sinodo estas asembleo malpliranga ol tiu de koncilio. Ĝenerale, sinodoj estas tute demarŝataj kaj efektivigataj fare de la klerikala klaso, specife de la plej altaj niveloj de la eklezia hierarkio. La nuna Sinodo pri la Sinodeco estas escepto laŭsence ke oni faris konsulton al la laikaro kaj la socio ĝenerale. La temo mem, la Sinodeco, jam esprimas per si mem la deziron plivastigi la amplekson de la partopreno en la eklezia debato, tio estas, reakiri por la eklezia administrado la asemblean naturon, kiu ĝi neniam devis esti perdinta. La lokaj, diocezaj kaj kontinentaj etapoj de la sinoda procezo provizis ampleksan temaron kiu, pro ties graveco, multe pretersuperas tiun de la koncilioj. Fakte, inter la proponitaj temoj estas aferoj kiujn la Dua Vatikana Koncilio decidis flankenlasi: dogmara heredaĵo, hierarkia strukturo de la Eklezio, pastra celibato, situacio de la virinoj en la Eklezio...

La fakto, ke tia Sinodo estis entreprenita, ŝajnas indiki ke ekzistis konscio pri la mankoj en la funkciado de la Eklezio dum multaj jarcentoj, la abismo inter la klerikaro kaj la laikaro en la grado de partopreno en la aferoj de la Eklezio. Estas pozitive tio ke ĉi tiu problemo estis perceptita kaj oni klopodas solvi ĝin. Sed ni ne faru al ni iluziojn. De tre frue estas perceptataj la limoj, la malamplekso de tio, kio povas esti atingita en ĉi tiu procezo. Dekomence estas klare, ke la radiko de la tuta eklezia problemaro estas la klerikalismo. En la respondoj al la sinoda demandaro ne mankas konstatado de tiu ĉi realo, sed oni ne sukcesas proponi taŭgajn solvojn.

Ŝajnas, ke tiuj, kiuj postulas la aliron de virinoj al pastra ordeniĝo, la ĉeson de la devigo de klerikala celibato kaj la benon de samseksemul-paroj fare de pastroj de la Eklezio, ne rimarkas, ke per ĉi tiuj petoj ili omaĝas la koncepton mem de pastraro, de la institucia hierarkio de la Eklezio. Se ni konkludas, ke tia eklezia hierarkio, pro la simpla fakto ke ĝi ekzistas, kaj pro la funkcioj kiujn ĝi atribuis al si, estis dum du jarmiloj faktoro de perversigo de la naturo mem de la kolektivo, kiun Jesuo volis krei, la rimedo aplikata devus esti radikale malsama ol tio kion la Sinodo povas konsideri kaj akcepti. Tiamaniere, la Sinodo de la Sinodeco estas kondamnita esti, samkiel estis la Dua Vatikana Koncilio, vana peno meti novan flikaĵon sur malnovan veston.

Subgvide de tiaspecaj “paŝtistoj”, kiujn la Eklezio havis dum tiom da jarcentoj, la institucio evidentiĝis nekapabla je ajna memreformo. Fakte, ĉiuj ŝanĝoj, kiujn ĝi entreprenis: dogmoj, preceptoj, kultmanieroj, misdevotecoj, hierarkia potenciiĝo, riĉiĝo, koluzioj kun la super-regantaj potencoj de la mondo... iris ĝuste en la kontraŭa direkto al la instruo de la Majstro. La rezulto estas ia formo de eklezia organizo kiu ne povas servi por plenumi la mision kiun Jesuo asignis/as al siaj sekvantoj. Ja, la







**La eklezia hierarkio, pro la fakto mem ke ĝi ekzistas, kaj pro la rolo kiun ĝi atribuis al si, estis dum du jarmiloj faktoro de perversigo de la naturo de la komunumo de sekvantoj, kiun Jesuo volis krei**

Eklezio difinas kaj vidas sin kiel "komunumo de kredantoj". Komunumo de kredantoj estas religio, kun ties kredoj, preceptoj, ritoj kaj devotecoj, kies esenca celo estas deturni la gregon el la direkto, kiun Jesuo volas, ke ĝi sekvu. Li ne pensis pri "komunumo de kredantoj" sed pri "komunumo de sekvantoj". Ne estas same, la kredantoj devas nur preĝi kaj fasti kiam ordonite de la Sankta Patrina Eklezio por akiri la eternan vivon. Sed la sekvantoj estas alvokitaj imiti Jesuon kaj labori por lia projekto de la Regno de Dio sur la Tero. Jesuo ne alvokas kredantojn iri en templojn por preĝi kredarojn kaj litaniojn; Li volas homojn implikitajn kaj devontigitajn plibonigi en la mondo aferojn kiuj daŭre malbonas.

Ĉiu tipo je komunumo havas la tipon de gvidantoj kiu alĝustiĝas al ĝia celo. La "komunumo de kredantoj" estas gvidata de la pastra tipo de gvidado, la funkciuloj kiuj vivtenas sin per plenumado de la kulto kiu karakterizas ĝin. Jesuo pensis pri alia speco je komunumo kun alia speco de gvidantoj. Li neniam difinis sin kiel pastron sed enkadrigis sin en la profetan tradicion, kaj kunvokas siajn sekvantojn por tiu speco de misio kaj la ekzercado de tiu speco je profeta gvidado: ***...oni persekutos vin kiel oni persekutis la profetojn kiuj estis antaŭ vi***. (Mateo 5, 12).

La funkcio de la religioj estas legitimi la superregantojn de la socio. La projekto de Jesuo el Nazareto, kiun li transdonas al siaj sekvantoj, ne estas alĝustiĝi al la maljustaj sistemoj de superregado de ĉi tiu mondo. Labori por la Regno de Dio kaj ties justeco, kiel la Majstro petas, estas defii tiujn potencojn, ne starigi kun ili konkordatojn kiuj legitimas ilin kaj kiujn ili rekompencas per bonaĵoj kiel, ekzemple, la bien-registrado praktikita en Hispanio. La Sinodo, kiu adoptis la devizon: "Marŝi kune" devas konkretigi kaj klarigi en kiu direkto kaj kun kiu celo marŝi. Se ne temas pri sekvi Jesuon, la marŝo havas nenian sencon, ĉu kune aŭ dise.

# La senlegitimigo kiel politika strategio

La 23-an de julio ĉi-jare, 2023, okazis en Hispanio Ĝeneralaj Elektoj post la antaŭa procezo de la Lokaj kaj Regionaj balotoj. Ĉi tiuj estis specifaj cirkonstancoj kiuj postulas iun analizon. La rezulto de la menciitaj elektoj estis tre malfavora por la politikaj fortoj de la maldekstra koalicia registaro, kaj ankaŭ estis tre malalta balota partopreno. Se ni volas interpreti la signifon de ambaŭ eventoj, la alta sindeteno kaj la antaŭeniĝo de la politika dekstraro, ni devas analizi la karakterizaĵojn de la politika kadro en kiu ili okazis. Por fari tion ni devos priatenti la ideologian influon, kiun la ekonomia potenco ĝuas sur la loĝantaro, kaj ankaŭ konsideri ke tio ne estas io specifa de nia lando sed havas pli ampleksan geografian kadron.

Ne nur en Hispanio, sed ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj kaj eĉ en Usono, Latin-Ameriko... en la lastaj jaroj oni perceptis laŭgradan kreskon de agresemo en la manieroj ekzerci la politikan opozicion. Tiaj aferoj kontribuas al degradado kaj distordado de la demokratio, kaj ŝajnas klare ke ĝi rezultas el intenco misfamigi la politikajn instituciojn kaj subfosi la fidon de homoj al la regantoj kiuj estas elektitaj, kiam ili ne estas tiuj kiuj konvenas al la potenco reganta la ekonomion. Tio estas, oni klopodas stimuli, en landoj kie ankoraŭ konservas demokratiajn sistemojn, seninteresiĝon de ampleksa civitanaro pri partopreno en elektoj kaj la politiko ĝenerale, ĉio favore al la interesoj de la super-regantoj de la maljusta ekonomia sistemo.

Paradigma ekzemplo de ĉi tiu praktiko aŭ strategio de senlegitimigo de la demokratio estis la atako de la partianoj de ***Donald Trump*** kontraŭ la Kapitolo en januaro de 2021. La fakto mem de la atako, pli ol ago kontraŭ la nova prezidanto, kiu estis elektita, estis senlegitimigo de la juraj institucioj kiuj atestis la venkon de ***Biden***. Evidentas, ke ni vidas strategion kiel tiu kiu ebligis la apogeon de la faŝismo en la 20-a jarcento. Ĉi tiuj tipoj je politikaj movadoj plifortiĝas ankaŭ en Eŭropo: ***Le Pen*** en Francio... kaj ekregas kelkloke: ***Orbán*** en Hungario, ***Meloni*** en Italio... En nia lando la partio VOX rapide kreskis la lastajn jarojn kaj komencas ŝanceliĝi nur tie, kie la PP pli rapide evoluas al faŝismo kaj ties metodoj. Ekzemple, en Andaluzio kaj Madrido ne estas necesa VOX ĉar tie jam regas ***Juan Manuel Moreno Bonilla*** kaj ***Isabel Díaz Ayuso***, respektive.

La politika strategio de ĉi tiu novfaŝisma dekstraro estas la konstanta kalumnio kaj senlegitimigo de la kontraŭuloj. Ekde la socialisma venko en la Mocio de Cenzuro kontraŭ la Registaro de ***M. Rajoy***, kaj ĉefe ekde la formado de la maldekstrema koalicia registaro, la tipo je opozicio kiu estis ekzercita kontraŭ la laŭleĝe establita regantaro ne estas tiu kiu konvenas en demokratia sistemo. Karakterizaĵo de demokratio estas la agnosko de la kontraŭulo kaj la diverseco de ideoj: la rajto regi kiam oni estas registaro kaj la rajto opozicii kiam oni estas en opozicio; La demokratia konkurado baziĝas sur la konfrontiĝo de ideoj kaj proponoj, sur publika diskuto pri temoj de kolektiva intereso en la publika sfero. Sed, en la perversiĝo de la demokratio kaj ĝiaj valoroj, kiujn la novfaŝismo celas, oni trudas kalumniojn kiel ŝtatan politikon, oni klopodas trudi hegemonion bazitan sur propagando kaj atakoj kontraŭ specifaj homoj. Ni povas vidi, ke en la politika

propagando de la dekstraro gvidata de ***Alberto Núñez Feijoo*** kaj ***Santiago Abascal*** estis multaj senlegitimigantaj esprimoj kiel "okupa" (enkrakisto, senrajta posedprenanto de vakanta loĝejo) kaj "pucherazo" (balot-manipulanto) aludante al ***Pedro Sánchez*** kaj la politiko de la koalicia registaro. La Registaro povas esti kritikata de la opozicio, sed la politiko de senlegitimado damaĝas la juran kadron en kiu la Registaro estis kreita: la Konstitucion kiu reguligas la regularon de Mocioj de Cenzuro, la elektojn en kiuj la regantoj estis elektitaj, la balotajn kontrol-organojn kiuj atestis la leĝecon de la balotaj rezultoj, la Ŝtatestro kiu komisiis la venkinton de la elektoj formi registaron...
Ĉi tiuj laŭleĝaj, konstituciaj mekanismoj de legitimado de la registaro atribuas al la civila socio, al la civitanoj, la gravecon, la gvidan rolon, kiu koncernas al ili. Ŝajnas, do, ke la celo de la sistema senlegitimigo, kiun ekzercas la novfaŝismo, celas malfortigi aŭ eĉ nuligi la civilan socion kaj igi la parlamentojn ne debat-spacon kaj konfrontiĝo de ideoj sed prefere en batalkampojn, kie eblas kalumnio kaj ĉiaspecaj personaj atakoj. Dum la lastaj jaroj ni multe vidis ĉion-ĉi en la Hispanaj Kortesoj.
Alia negativa trajto de la novfaŝismo al kiu evoluas la hispana dekstraro estas la perversiĝo de la potenco-ekvilibro de la Ŝtato. Dum la lastaj jaroj ni vidis, kiel la PP, kun diversaj pretekstoj, kontraŭstaris la renovigon de la Juĝistaro. Laŭ tiu maniero, tiu partio troe plilongigis la decidan influon kiun ĝi havis en tiu organo, kaj uzis ĝin ne nur por protekti siajn multajn koruptajn oficialulojn sed ankaŭ por bloki ajnan leĝdonan parlamentan iniciaton de la Registaro. Se al ĉi tiu juĝa povo, kiun la dekstraro jam ekzercas, oni aldonas la politikan povon, kiun ĝi akiras en venontaj elektoj, ni trovos nin submetitaj al suverena potenco kun klara alvokiĝo decidi pri legitimeco, tio estas, kun la kapablo proklami la suspendon de la leĝo, kontroli la voĉdonajn organojn, kiuj permesos al ĝi fari leĝojn laŭ sia konveno, decidi kiu povas legitime regi...
Tio estas, pridubi la legitimecon de demokrata Registaro aŭ la rezulton de la balotoj dum la formado de Parlamento implicas la inokuladon de malestimo al leĝeco kaj ĝiaj konstituciaj instrumentoj cele al atako kontraŭ la demokratia sistemo kaj ĝia anstataŭigo per formoj de registaro kiuj ekskludas la civitanan partoprenon. Sed ni devas insisti, ke la desegnado de tiu ĉi senlegitimiga strategio havas specifan socian celon: temas pri ŝirmi la interesojn de la regantaj klasoj, nuligi la popolan volon kaj ĝiajn leĝajn kaj konstituciajn instrumentojn kapablajn ĉesigi la potencon de la granda kapitalo; de la multnaciaj firmaoj, de la ekonomiaj interesoj, kiuj sin nutras el la ekspluatado de la homoj. La privilegiitaj de la sistemo de superregado profitas de la nescio de la homoj pri kio estas la klas-strukturo kaj ilia loko en ĝi. Evidentas, ke unu el la kaŭzoj de la malsukceso de la Maldekstraro en la lastaj urbaj kaj regionaj elektoj estas tio ke ĝi ne sciis klarigi al la loĝantaro ke ni estas en klasbatalo, en kiu atingas profiton tiuj kiuj scias kio tio estas kaj agadas laŭ siaj interesoj profitante la nescion de la plimulto de la loĝantaro, kiu ne estas ĝuste informita pri siaj klasaj interesoj.

**Faustino Castaño**

# iomete da amuzado...
# sur fono de koruptado...

